


BUDHISMAJ TRADUKOJ 3

佛学世界语译丛 3

LA ANTAŬAJ VIVOJ  
DE LA BUDHO  
佛本生故事集



Budhana Retejo Esperantista

佛学世界语网



# **BUDHISMAJ TRADUKOJ 3**

佛学世界语译丛 3

## **LA ANTAŬAJ VIVOJ DE LA BUDHO**

佛本生故事集

Elangligis Miaohui  
Voĉlegis Zhao Jianping  
妙慧世译  
赵建平配音

Budhana Retejo Esperantista  
佛学世界语网

<http://www.budhano.com>

<http://www.budhano.cn>

<http://www.budhano.net>

Rimarko:

Ĉe ĉiu titolo estas kvadrata kodo, per kiu vi povas aŭdi la koncernan voĉlegon de s-no Zhao Jianping dum via legado se vi skanas ĝin per via poŝtelefono.

提示:

每个标题旁边都有二维码。阅读时用手机扫描二维码，则可以收听赵建平老师的配音。

# Budhismaj rakontoj

## Enhavo

1. Demonoj en la dezerto.....	1
2. Trovi novan fonton.....	9
3. La ora telero.....	14
4. La vendanto de morta muso.....	21
5. Prezisto.....	29
6. Reĝido elokventulo kaj la akva demono.....	36
7. Malgranda reĝido senpatrulo.....	53
8. La centa reĝido.....	61
9. La reĝo kun unu griza haro.....	69
10. La feliĉa monaĥo.....	75
11. Belo kaj grizo.....	83
12. Reĝo banjana cervo.....	90
13. Montara cervo kaj vilaĝa cervino.....	105
14. La ventcervo kaj miela herbo.....	113
15. Mallernema cervido.....	119
16. Cervido ŝajniganta morton.....	122
17. Vento kaj luno.....	128
18. Kapro kaj pastro.....	131
19. Feo en banjano.....	138
20. Simia reĝo kaj akva demono.....	142

21. Arbo kaj ĉasisto.....	148
22. La hunda reĝo arĝento.....	153
23. La granda ĉevalo ĉioscio.....	166
24. Malpura banakvo.....	177
25. Virina vizaĝo.....	181
26. Plej intimaj amikoj.....	188
27. Bovo plaĉo.....	196
28. Nigrulo de avino.....	203
29. Du bovoj kaj porkido.....	210
30. Ĉielo 33.....	214
31. Dancanta pavo.....	237
32. Koturna reĝo kaj ĉasisto .....	241
33. Fortuna fiŝo.....	247
34. Kotrunido ankoraŭ ne flugpova.....	252
35. Birdoj saĝaj kaj malsaĝaj.....	257
36. Naskiĝo de banjano.....	260
37. Gruo kaj krabo.....	265
38. Kaŝitaj trezoroj.....	276
39. Silenta budho.....	281
40. La malbeno de mitavindo.....	290
41. Kolombo kaj korvo.....	324
42. Patro de bambuo.....	335
43. Du malsaĝaj infanoj.....	339
44. Akvumi ĝardenon.....	343
45. Sala vino.....	347

46. Mgia pastro kaj kidnapantaj gangsteroj...	350
47. Perdo de novedzino pro steloj.....	363
48. Reĝido kun bona plano.....	368
49. Reĝo bono la granda.....	376
50. Reĝo frukabundulo kaj reĝido sivali.....	395
51. Bando de drinkemuloj.....	454
52. La sennoma arbo.....	459
53. Reĝido kvinarmilo kaj monstro glŭaro...	466
54. Giganta orpeceo.....	478
55. Sinjoroj simio kaj krokodilo.....	482
56. Simia reĝido.....	488
57. Du manieroj de tamburado.....	496
58. Du patrinoj.....	500
59. Pastro vetludinta per vivo.....	513
60. Maliculino kaj buterlakta saĝulo.....	530
61. Vilaĝano kaj lia edzino el urbo.....	543
62. La saĝo de reĝino mildakoro.....	548
63. Fratineco, edzineco kaj patrineco.....	558
64. 3000 Naskiĝoj.....	562
65. Obstinema serpento.....	564
66. Ŝovelila saĝulo.....	567
67. Kolektanto de malseka brulligno.....	576
68. Elefanta reĝo boneco.....	581
69. Kvaropo sur lignoŝtipo.....	594
70. Novaj hejmoj de arbaj feoj.....	612

71. Fiŝo farinta miraklon.....	615
72. La meditanta gardisto de sekureco.....	619
73. Dekses songôj.....	624
74. Ilisa la avarulo.....	664
75. Senpatrina filo.....	685
76. Timokreanto kaj malgranda arkopafisto..	690
77. Arbaraj ermitoj en la plezura ĝardeno.....	705
78. Heroo nomata misfortuno.....	711
79. Demando de sep-jara knabo.....	718
80. Leciono el serpento.....	720
81. Pastro adora al fortuna.....	726
82. Falsa sanktulo.....	734
83. Unudirekta gastamo.....	742
84. Venenaj ĵetkuboj.....	747
85. Mistero de la perdita kolringo.....	750
86. Malsingardema leono.....	766
87. Sanktulo strebanta al plisankteco.....	770
88. Reĝo la grandulo klarvido.....	774
89. Reĝido kaj demonino.....	762
90. Homo nomata malbono.....	801
91. Viro nomata saĝo.....	806
92. Atingi “nenion”.....	810
93. Saĝa admono de la patrino.....	815



# 1. DEMONOJ EN LA DEZERTO



## [Ĝusta pensmaniero]

Antaŭe estis du amikoj. Ili ambaŭ pretis fari komercan vojaĝon por vendi siajn varojn, do ili devis decidi, ĉu ili vojaĝu kune. Ili opiniis, ke estas tro maloportune vojaĝi samtempe, ĉar ili posedas po 500 ĉaroj kaj iros al la sama loko laŭ la sama vojo.

Unu el ili decidis iri la unua. Li pensis: "Se mi iros antaŭ li, la vojo ne estos sulkigita de la ĉaroradoj; la bovoj povos manĝi la plej bonajn herbojn; ni trovos

la plej bonajn fruktojn kaj vegetaĵojn por manĝi; miaj sekvantoj aprecos mian gvidadon, kaj je la fino mi povos marĉandi per la plej favora prezo."

Post zorgema pripensado, la alia opiniis, ke estas avantaĝe iri malantaŭe. Li pensis: "La ĉaroj de mia amiko malmoligos la teron, kaj mi ne bezonos ripari la vojon. Liaj bovoj manĝos malfreŝajn herbojn kaj la freŝaj elkreskos por la niaj. Ili prenos malfreŝajn fruktojn kaj vegetaĵojn, kaj la freŝaj elkreskos por nia ĝuo. Mi ne bezonos elspezi tempon marĉandi negocante je la prezo decidita de li." Do li konsentis, ke la amiko vojaĝu unue. La unua komercisto estis sufiĉe memfida, ke li trompis sian amikon kaj

havigos al si profiton. Tiel li ekvojaĝis ĝojplene.

La komercisto, kiu iris la unua, renkontis danĝeron. Ili venis al la sovaĝejo nomata "Senakva Dezerto", kie laŭdire hantis demonoj. Kiam la karavano atingis la mezon de la dezerto, ili renkontis aronda homoj alvenantaj de la kontraŭa flanko. Akvo gutadis el la kotoplenaj ĉaroj de la alvenantoj, kiuj portis lotusflorojn kaj akvoliliojn en la manoj kaj en la ĉaroj. La ŝajne bone klerigita ĉefo de la alvenantoj diris al la komercisto: "Kial vi ankoraŭ kondukas la ĉarojn ŝarĝitajn per tiel peza akvo? Baldaŭ vi atingos oazon plenan je akvo por trinki kaj jujuboj por manĝi. Vi tro lacigis viajn bovojn per la pezaj ĉaroj

kun senutila akvo. Do forverŝu la akvon kaj faru bonon al viaj kompatindaj bestoj!"

Malgraŭ la atentigo de lokanoj pri la demonoj, la komercisto tute ne konsciis, ke la fremduloj estas ne veraj homoj, sed aliformiĝintaj demonoj. Li kaj liaj sekvantoj renkontis danĝeron esti manĝotaj de la demonoj. Preninte la fremdulojn por helpemulojn, la komercisto vere elverŝis la akvon sur la teron laŭ la konsilo de demonoj.

Daŭrigante la vojon, la komercisto kaj sekvantoj trovis nek oazon nek akvon. Iuj el ili ekkomprenis, ke ili estas trompitaĵoj de tiuj, kiuj eble estas demonoj. La sekvantoj komencis plendi kaj insulti al la komercisto. Vespere la homoj elĉerpiĝis,

kaj ankaŭ la bovoj ne plu havis forton tiri la ĉarojn pro soifego. Ĉiuj homoj kaj bestoj kuŝiĝis senforte kaj endormiĝis profunde. La demonoj en siaj veraj timindaj aspektoj alvenis nokte kaj englutegis ĉiujn senfortajn kaj senhelpajn vivestaĵojn. Post ilia foriro, tie restis neniu vivanto krom blankaj ostoj.

Post pluraj monatoj la dua komercisto komencis sian vojaĝon laŭ la sama vojo. Atinginte la dezerton, li kunvenigis ĉiujn sekvantojn kaj diris al ili: "Ĉi tie estas la loko nomata 'Senakva Dezerto'. Mi jam informiĝis, ke ĉi tie frekventas homvoraj demonoj kaj diabloj. Do ni devas esti singardemaj. Eble estas venenaj akvo kaj plantaĵoj, do ne trinku ĉitiean akvon sen

mia konsento." Tiel ili ekvojaĝis en la dezerton.

Sur la vojo ili renkontis malsekajn demonojn same kiel la unua karavano. La demonoj proponis, ke ili forverŝu sian akvon ĉar estas oazo proksime. Sed la saĝa komercisto travidis ilian fiintencon. Li sciis, ke tute ne eblas esti oazo en la loko nomata "Senakva Dezerto". Krome, la fremduloj havis okulojn ruĝajn, kaj kondutojn krudajn kaj agresemajn, do li suspektis, ke ili estas demonoj. Li ignoris la konsilon, dirante: "Ni estas komercistoj, kiuj ne forverŝas bonan akvon ĝis ni scias precize, kie efektive estas akvo."

Vidinte la dubon de siaj propraj sekvantoj, la komercisto avertis: "Antaŭ

ol ni trovos la veran akvon, ne kredu tiujn, kiuj eble estas demonoj. La oazo, pri kiu ili diris, eble estas nenio alia ol iluzio aŭ miraĝo. Ĉu vi iam aŭdis pri la akvo en 'Senakva Dezerto'? Ĉu vi sentas pluvventon kaj vidas ŝtormnubon?" Ili respondis: "Ne." Li daŭrigis: "Se ni kredus la fremdulojn kaj elverŝus la akvon, ni havus nenion por trinki kaj kuiri; ni estus malfortaj kaj soifaj. La demonoj venus por rabi kaj eĉ manĝi nin facile. Do ni ne forlasu eĉ guton da akvo ĝis ni vere trovos la freŝan."

La karavano daŭrigis sian vojon, kaj en la vespero, ili atingis la saman lokon, kie la homoj kaj bestoj de la unua karavano estis mortigitaj kaj formanĝitaj

de la demonoj. Ili trovis ĉarojn kaj ostojn de homoj kaj bestoj kuŝantajn ĉie. Ili rekonis, ke la plenaj ĉaroj kaj disĵetitaj ostoj apartenis al la antaŭa karavano. La saĝulo ordonis gardostari ĉirkaŭ la tendoj dumnokte.

La sekvantan matenon, ili prenis manĝon kaj bone nutris la bovojn. Ili metis la plej valorajn varojn de la unua karavano en siajn ĉarojn. Fine ili travojaĝis sian tutan vojon sukcesplene kaj revenis hejmen sekure. Ĉiuj iliaj familianoj ĝuis la profiton.

La moralinstruo estas: Oni ĉiam devas esti sufiĉe saĝa por ne trompiĝi de falsaj diroj kaj falsaj aspektoj.



## 2. TROVI NOVAN FONTON



### [Persisteco]

Iam antaŭe, komercisto gvidis karavanon al alia lando por vendi siajn varojn. Laŭ la vojo ili venis al la rando de varmega dezerto. Ili demandis pri la loko kaj informiĝis, ke dumtage la sablo estas tiel varmega kiel brulanta karbo pro ardigo de la suno, kaj neniu el homoj, eĉ bovoj kaj kameloj povas iri sur ĝi. Do la komercisto dungis vojgvidiston, kiu kapablis gvidi ilin sur la ĝusta vojo laŭ steloj post la malvarmiĝo de la sablo. Tiel ili komencis la danĝeran noktan vojaĝon

tra la dezerto.

Tiel pasis pluraj noktoj. Iutage ili atendis ĝis malvarmiĝo de la sablo kaj ekiris vespermanĝinte. La vojqvidisto en la unua ĉaro vidis laŭ la steloj, ke ili estas proksimaj al la kontraŭa flanko de la dezerto. Li manĝis tro multe, do kiam li malstreĉiĝis, li ekdormetis. La bovoj ne kapablis distingi direkton laŭ la steloj, do ili iom post iom sin turnis flanken kaj iris cirkle ĝis ili atingis la lokon, de kie ili ekiris.

Je la mateniĝo la homoj ekkonsciis, ke ili revenis tien, kie ili ripozis lastanokte. Ili malesperiĝis kaj komencis plendi pri la fatalaĵo. Ili iam supozis, ke ili povos tuj trapasi la dezerton, do ili konservis ĉe si

neniom da akvo. Ili ektimis, ke ili perdos vivon pro soifego. Ili ekinsultegis la estron kaj vojqvidiston. "Nenion ni povos fari sen akvo!" ili plendis.

La karavanestro pensis: "Se mi perdas kuraĝon en nuna malfacila situacio, mia estreco havas nenian signifon. Se mi ploras kaj bedaŭras pri la fatalaĵo, tio nenion helpas kaj pro tio eble perdiĝos ĉiuj varoj kaj mortos ĉiuj bestoj kaj homoj, inkluzive de mi mem. Mi devas fariĝi pli kuraĝa kaj energioplena por fronti kontraŭ la malfacilo." Do li komencis piediri tien kaj reen, klopodante trovi metodon por solvi la problemon.

Estante atentema, li rimarkis aron da herboj de la okuloanguloj. Li pensis:

"Neniu vegetaĵo povus vivi en tiu ĉi dezerto sen akvo." Do li tuj alvenigis la plej fortajn virojn el la sekvantoj por fosi puton ĉeloke. Oni fosadis ĝis ili trafis gigantan ŝtonon post iom da tempo. Vidinte tion, ili haltis kaj komencis plendi kontraŭ la estro, dirante: "Tute vanas nia klopodo. Ni nur malŝparaĉas niajn tempon kaj energion." La estro konsolis ilin: "Ne! ne! Miaj amikoj. Se ni rezignos la klopodon, ruiniĝos niaj vivoj kaj mortos niaj kompatindaj bovoj. Estu kuraĝaj!"

Tion dirinte, li subiris en la fositan kavon, alpremis sian orelon al la ŝtono kaj aŭdis sonon de fluanta akvo. Li tuj alvenigis knabon fosintan la kavon kaj diris: "Se vi rezignos, ni mortos. Do

frakasu la ŝtonegon per peza martelo."

La knabo levis la martelon super la kapon kaj ekbategis la ŝtonon per sia tuta forto. Jen! Li surpriziĝis kiam la ŝtono rompiĝis kaj akvo ŝprucis forte el sub la ŝtono. Ĉiuj homoj tuj ekzaltiĝis. Ili trinkis, sinbanis, lavis bestojn, kuiris manĝaĵon kaj manĝis ĝissate.

Antaŭ sia foriro ili starigis altan flagon por ke aliaj vojaĝantoj vidu de malproksime la novan fonton en la mezo de la varmega dezerto. Poste ili daŭrigis la vojaĝon sekure ĝis la fino.

La moralinstruo estas: Ne rezignu tro facilanime, kaj daŭrigu la klopodon ĝis vi atingos sukceson.

### 3. LA ORA TELERO



#### [Avido kaj Honesto]

Iam en la regiono nomata Seri estis du komercistoj de kuiriloj kaj ornamaĵoj. Ili interkonsentis dividi la regionon de la urbo inter si. Ili ankaŭ decidis, ke post la negoco en sia propra parto, ili rajtas iri en la alian por provi sian ŝancon.

Iutage, kiam unu el la komercistoj faris komercon sur strato de sia parto, malriĉa knabineto vidis lin kaj petis sian avinon aĉeti por ŝi braceleton. La maljuna avino respondis: "Kiel ni malriĉulinoj povus aĉeti braceletojn?" La knabineto diris: "Ni

havas neniom da mono, tamen ni povas doni al li nian malnovan teleron nigre fumumitan." La maljunulino konsentis provi, do ŝi invitis la vendiston en sian hejmon.

La komercisto vidis, ke ili estas tre malriĉaj kaj senkleraj, do li ne volis malŝpari tempon ĉe ili. Malgraŭ la peto de la maljunulino, li diris obstine, ke li havas nenian braceleto, por kiu ŝi kapablas pagi. Tiam ŝi demandis: "Ni havas malnovan teleron senutilan al ni. Ĉu ni povas ŝanĝi ĝin kontraŭ via braceleto?" La komercisto prenis la teleron, kaj dum la ekzameno li hazarde gratis ĝian fundon. Surprizite, li trovis, ke sub la nigra malpuraĵo estas vera oro! Sed li ŝajnis,

ke li tute ne rimarkis tion. Anstataŭe, li decidis trompi la povrulinojn por akiri la oran teleron kontraŭ preskaŭ neniom. Li diris: "Tiu ĉi telero estas ne tiel valora kiel braceleto, kaj ĝi estas tute senvalora. Mi ne volas ĝin." Li forlasis pensante, ke li revenu poste por havigi al si la teleron per malpli da elspezo.

Samtempe, la alia komercisto finis la negocon en siaj kvartaloj de la urbo kaj venis al tiuj de la unua laŭ la antaŭa interkonsento. Li venis al la sama domo. La malriĉa knabineto denove petis sian avinon ŝanĝi la malnovan teleron kontraŭ braceleto. Vidinte, ke tiu ĉi komercisto havas afablan mienon, la maljunulino pensis: "Li estas bona komercisto, tute



malsama ol la antaŭa malĝentilulo." Do ŝi invitis lin hejmen kaj petis ŝanĝi sian nigre fumumitan teleron kontraŭ braceleto. Kiam li ekzamenis la teleron, li ankaŭ vidis, ke estas pura oro sub la malpuraĵo. Li diris al la maljunulino: "Ĉio el miaj mono kaj varoj ne estas tiel valora kiel la ora telero!"

Kompreneble, la maljunulino surpriziĝis de tio. Tiam ŝi konsciis, ke li estas viro vere bona kaj honesta. Ŝi do respondis, ke ŝi volonte akceptos kiom ajn li povas pagi por la telero. La komercisto proponis: "Mi donu al vi ĉion el miaj mono kaj varoj, se vi nur lasus ĉe mi ok monerojn kiel vojaĝkoston, kaj ankaŭ la pesilon, per kies tenujo mi tenos la oran

teleron." Ili interkonsentis pri la negoco. Poste, li iris al rivero, kaj tie li pagis ok monerojn al boatisto por transpasi la riveron.

Tiam la avida komercisto revenis kun imago de granda profito en la kapo. Kiam li denove vidis la knabinton kaj ŝian avinon, li diris, ke li jam ŝanĝis sian ideon kaj konsentas aĉeti la senutilan nigran teleron per pluraj moneroj anstataŭ ajna braceleto. La maljunulino informis al li aplombe, ke ŝi jam faris negocon pri la telero kun honestulo. Ŝi diris: "Vi trompis nin, sinjoro."

Anstataŭ honti pro sia mensogo, la avidulo pensis malĝoje: "Mi perdus la oran teleron, kiu valoras cent mil monerojn."

Li do demandis al la maljunulino senprokraste: "Laŭ kiu vojo li iris?" Ŝi montris al li la vojon, laŭ kiu foriris la honestulo. Li haste lasis ĉiujn siajn varojn ĉe ŝia domo kaj ekkuregis al la rivero, pensante: "Li prirabis min! Li prirabis min! Li tute ne rajtas tiel molesti min!"

Ĉe la bordo li vidis la honestan komerciston en la boato. Li do kriis al la boatisto: "Revenu! Revenu!" Sed la honestulo ordonis la boatiston daŭrigi sian remadon al la transa bordo, kaj tiu lasta obeis.

Vidinte, ke li povas fari nenion kontraŭ tio, la avidulo eksplodis de kolero. Li saltegis kaj bategis al si la bruston. Li turmentiĝis pro tiel granda furiozo kontraŭ

la honestulo, ke li sputadis sangon. Li  
trafiĝis de koratako kaj tuj mortis sur la  
riverbordo!

La moralinstruo estas: Honesteco estas  
la plej bona taktiko.

## 4. LA VENDANTO DE MORTA



### [Diligenteco kaj Dankemo]

Iam antaŭe grava konsilanto de kortego iris viziti la reĝon kaj aliajn konsilantojn. De la okulanguloj li vidis mortan muson sur la vojo. Li diris al sia akompananto: "Eĉ de komenco malgranda kiel la morta muso, energia homo povas akiri grandan riĉaĵon. Se li laboras diligente kaj uzas sian propran inteligentecon, li kapablos komenci negocon kaj vivteni siajn edzinon kaj aliajn familianojn."

Preteriranta junulo hazarde kaptis la vortojn. Li sciis, ke la parolanto estas fama

konsilanto de la reĝo, do li decidis agi laŭ lia aserto. Li prenis la mortan muson je la vosto kaj daŭrigis sian vojon. Bonŝance, eĉ antaŭ ol li trapasis unu kvartalon, estro de vendejo haltigis lin kaj diris: "Mia kato ĝenas min tutan matenon. Mi donu al vi du kuprajn monerojn por la muso." La junulo akceptis la negocon.

Li aĉetis dolĉajn kukojn per tiuj du moneroj kaj atendis ĉe la vojo kun iom da akvo. Ĝuste kiel li esperis, pluraj homoj revenis de la laboro kolektinte florojn por fari florkronojn. Ili ĉiuj suferis de malsato kaj soifo, do ili volonte aĉetis po dolĉa kuko kontraŭ bukedo da floroj. Vespere la junulo elvendis la florojn en la urbo kaj aĉetis pli da dolĉaj kukoj per la gajnita

mono. En la sekva tago li revenis al la antaŭa loko por vendi kukojn al la floristoj.

Tiel iris lia afero ĝis la tago de terura ŝtormo kun torenta pluvo kaj forta vento. Irante preter la plezura ĝardeno de la reĝo, li vidis, ke sur la tero kuŝas multaj branĉoj derompiĝintaj pro la vento. Li proponis al la ĝardenisto, ke li volonte purigu la teron se li povos posedi la branĉojn. La maldiligenta ĝardenisto tuj konsentis.

La viro alvenigis plurajn geknabojn ludantajn en parko trans la strato, promesante doni al ili po dolĉa kuko por tio, ke ili kolektu branĉojn en la ĝardeno. Ili ĝojplene kolektis la branĉojn kaj balais la vojojn en la ĝardeno por ricevi dolĉan kukon.

Alvenis reĝa potisto, kiu kutime serĉis lignaĵon por sia brulanta forno. Por aĉeti la branĉojn kolektitajn de la geknaboj, li pagis al la junulo grandan sumon, plus iom da potoj.

Per la profito de la floroj kaj lignaĵoj, la junulo funkciigis vendejon de trinkaĵo. Iutage ĉiuj lokaj herbofalĉistoj iris en la urbon kaj ripozis en lia vendejo. Li donacis al ili dolĉajn kukojn kaj trinkaĵon. Ili surpriziĝis de lia favoro kaj demandis: "Kion ni faru por vi?" Li respondis, ke li bezonas nenion de ili, sed eble li informos ilin pri sia bezono estonte.

Semajnon poste li aŭdis, ke ĉevalkomercisto venos al la urbo kun 500 ĉevaloj por vendi. Do li kontaktis la



herbofalĉistojn kaj petis, ke ĉiu el ili donu al li faskon da herbo kaj vendu neniom al ĉevalkomercisto antaŭ ol li elvendis la sian. Tiel li enspezis grandan sumon.

Tempo pasis ĝis la tago, kiam klientoj en la vendejo diris al li, ke nova eksterlanda ŝipo estas ankrita en la haveno. El tio li denove vidis bonŝancon. Li pripensis kaj eltrovis bonan metodon por komerco.

Unue li iris al sia amiko, kiu vendis juvelojn, kaj aĉetis per tre malalta prezo valoran oran ringon kun bela rubeno sur ĝi. Li sciis bone, ke la ŝipo venis el la lando, kie estis nenia rubeno kaj oro estis tre rara. Do li donacis la belegan ringon al kapitano kiel antaŭpagon de komisio.

Pro la neatendita donaco, la kapitano konsentis, ke li fariĝu makleristo de la pasaĝeroj. Li gvidis la pasaĝerojn al la plej bonaj vendejoj en la urbo kaj la vendistoj rekompencis lin tre multe.

Kiel makleristo la viro ege riĉiĝis post la enhaveniĝo de pluraj ŝipoj. Ĝuante plezuron pro sia sukceso, li ankaŭ memoris, ke ĉio ĉi komenciĝis laŭ la aserto de la saĝa kortega konsilanto. Do li decidis donaci al li 100000 orajn monerojn. Tio estis duono de lia havaĵo. Post la aranĝo, li sukcese vizitis la konsilanton, prezentis al li la donacon kaj ankaŭ humilan dankon.

La konsilanto estis surprizita, kaj li demandis: "kiel vi gajnis tiel grandan riĉaĵon kaj kial vi prezentas al mi tiel

valoran donacon?" La junulo respondis, ke ĉio ĉi komenciĝis pro lia aserto antaŭ ne tre longe. Li rakontis sinsekve pri la morta muso, malsata kato, dolĉaj kukoj, bukedoj da floroj, arbobranĉoj derompiĝintaj en ŝtormo, geknaboj en la parko, la potisto de la reĝo, la trinkaĵa vendejo, herbo por 500 ĉevaloj, ora ringo kun rubeno, bona komerca kontakto, kaj ĝis fine, la granda riĉaĵo.

Aŭdinte tion, la kortega konsilanto pensis: "Estas malbone preterlasi talentulon kiel tiun ĉi energian junulon. Mi ankaŭ havas riĉaĵon kaj amindan filinon. Kiel fraŭlo, li meritas edziĝi kun ŝi. Tiam li povos heredi mian riĉaĵon kaj bone prizorgos mian filinon."

Ĉio iris glate. Post la morto de la saĝa konsilanto, la junulo, kiu agis laŭ lia propono, fariĝis la plej riĉa en la urbo. La reĝo promociis lin konsilanto. Li malavare donacis monon por feliĉo kaj bonhaveco de multaj homoj dum la restantaj jaroj de sia vivo.

La moralinstruo estas: Kun energio kaj kapablo oni povas gajni grandan riĉaĵon eĉ de malgranda komenco.

## 5. PREZISTO



### [Malsaĝo]

En malproksima loko reĝo regis en Benareso de norda Hindio antaŭ longa tempo. Unu el liaj korteganoj estis nomata Kortega Prezisto. Li estis tre honesta. Lia devo estis difini la justan prezon por ĉio, kion la reĝo volis aĉeti aŭ vendi.

La reĝo ne akiris grandan profiton laŭ sia deziro, do al li ne plaĉis la prezo difinita de la prezisto. Li nek volis pagi multe kiam li aĉetis nek volis vendi por tiom, kiom li opiniis ne sufiĉa. Do li decidis ŝanĝi la preziston.

Iutage li vidis plaĉan junulon kaj pensis: "Tiu ĉi junulo konvenas por esti mia prezisto." Do li eksigis la antaŭan honestulon kaj enoficigis la junulon kiel novan preziston. La junulo pensis: "Mi devas plezurigi la reĝon per aĉeto je malalta prezo kaj vendo je tre alta." Do li difinis ridindan prezon ignorante la veran valoron. Tio donis al la avida reĝo multe da profito kaj ege ĝojigis lin. Samtempe pro tio malĝojis ĉiuj aliaj, inkluzive de aliaj korteganoj kaj ordinaruloj, kiuj komercis kun la nova prezisto.

Iutage alilanda ĉevalvendisto venis al Benareso kun 500 ĉevaloj por vendi. La ĉevalaro konsistis el ĉevaloj, ĉevalinoj kaj ĉevalidoj. La reĝo invitis la vendiston

al la palaco kaj alvenigis la kortegan preziston por difini la prezon de ĉiuj 500 ĉevaloj. Kun intenco nur plezurigi la reĝon, la junulo diris: "La tuta ĉevalaro valoras tason da rizo." Do la reĝo ordonis, ke oni pagu al la vendisto tason da rizo kaj konduku ĉiujn ĉevalojn en la reĝan ĉevalejon.

Kompreneble, la vendisto de ĉevaloj estis ege malĝoja, sed li povis fari nenion kontraŭ tio. Informiĝinte pri la antaŭa prezisto honesta kaj justa, la vendisto faris specialan viziton kaj informis al li, kio okazis. Li petis proponon de la antaŭa prezisto por akiri la justan pagon de la reĝo. La antaŭa prezisto respondis: "Se vi agos laŭ mia propono, la reĝo konvinkigos

pri la vera valoro de la ĉevaloj. Iru al la prezisto kaj subaĉetu lin per valora donaco. Petu lin difini la valoron de taso da rizo antaŭ la reĝo. Se li konsentos, venu kaj diru al mi. Mi iros al la reĝo kune kun vi."

La vendisto vizitis la preziston laŭ la propono kaj prezentis al li valoran donacon. La prezisto ekzaltiĝis de la donaco kaj vidis la valoron plezurigi la vendiston. La vendisto petis: "Mi estas tre kontenta pri la prezo, kiun vi difinis. Ĉu vi bonvolus konvinki la reĝon pri valoro de taso da rizo?" La malsaĝa prezisto respondis senpripense: "Kial ne? Mi povos klarigi al vi pri la valoro de taso da rizo eĉ antaŭ la reĝo."



La prezisto opiniis, ke la vendisto de ĉevaloj estas tre kontenta pri la taso da rizo. Li do aranĝis aŭdiencon de la reĝo al la komercisto, kiam ĉi lasta decidis forlasi Benareson por reveni al sia lando. La komercisto raportis tion al la estinta prezisto, kaj ili kune vizitis la reĝon.

Ĉiuj ministroj kaj korteganoj kolektiĝis en la kortega kunvenejo. La komercisto de ĉevaloj diris al la reĝo: "Via Reĝa Moŝto, mi komprenas, ke en via lando miaj kvincent ĉevaloj valoras nur tason da rizo. Antaŭ la forlaso el via lando, mi volas scii pri valoro de taso da rizo." La reĝo sin turnis al la prezisto kaj diris: "Kio estas la valoro de taso da rizo en nia lando?"

La malsaĝa prezisto iam intencis

plezurigi la reĝon kaj difinis la prezon de kvincent ĉevaloj je taso da rizo. Nun akceptinte la subaĉeton de la alilanda komercisto, li volis ankaŭ plezurigi al li. Do li respondis al la reĝo kun serioza mieno: "Via Reĝa Moŝto! Taso da rizo valoras la urbon de Benareso, eĉ inkluzive de via haremo kaj ĉiuj ĉirkaŭurboj de la urbo. Alivorte, ĝi valoras la tutan regnon de Benareso!"

Aŭdinte tion, de ridego eksplodis ĉiuj el la reĝaj ministroj kaj korteganoj en la tuta kunvenejo, frapante sian korpon per ambaŭ manoj. Kiam ili iom kvietiĝis, ili diris: "Antaŭe ni aŭdis, ke la regno estas senpreza. Nun ni informiĝis, ke la tuta Benareso, kun palacoj kaj etaĝdomoj

valoras nur tason da rizo! La difino de la prezisto estas vere kurioza. Li nur taŭgas por kontentigi vian postulon, sed ne por difini justan prezon al la vendisto, kiu vendis ĉevalojn en nia lando."

Aŭdinte la ridojn kaj vortojn de la ministroj kaj korteganoj, la reĝo sentis grandan honton. Li do repostenigis la antaŭan preziston. Li konsentis pri la justa prezo difinita de la honesta prezisto por la ĉevaloj. La reĝo kaj liaj regatoj vivis juste kaj prospere pro la grava leciono.

La moralinstruo estas: Malsaĝulo en alta posteno povas hontigi eĉ la reĝon.

## 6. REĜIDO ELOKVENTULO KAJ LA AKVA DEMONO



### [Ĉapitro 1. Naskiĝo de la Bodisatvo]

Iam estis reĝo tre justa. Li havis amindan reĝinon, kiu naskis al li ĉarman bebon. La reĝo sentis grandan feliĉon pro tio. Li decidis doni al sia filo nomon, kiu povis helpi la bebon en la tuta vivo. Do li nomis la filon Reĝido Elokventulo.

Fakte, la reĝido ne estis ordinara homo, kaj tio ne estis lia unua vivo aŭ renaskiĝo. Milionojn da jaroj antaŭe li estis disĉiplo de longe forgesita instruanta 'Budho', la vera 'Iluminiĝinto'. Li tutkore

deziris fariĝi budho kiel sia estimata majstro.

Li renaskiĝis en multaj vivoj iam kiel kompatindaj bestoj, iam kiel longviva dio kaj iam kiel ordinara homo. Li ĉiam klopodis korekti siajn erarojn kaj praktiki "Dek Perfektajn Kondutojn" por ke li purigu sian menson kaj forigu la tri radikalajn kaŭzojn de malbonaj kondutoj: malvirtoj de avido, malamo kaj iluzio pri aparta memo. Aplikante la dek perfektajn kondutojn, iutage li povos anstataŭigi la malvirtojn per tri meritoj de senavido, kompatemo kaj saĝo.

Tiu ĉi "Grandulo" estis modesta disĉiplo de la forgesita Budho. Lia celo estis atingi iluminigon de Budho, sperto

de la kompleta vero. Do oni nomis lin Bodisatvo, kiu signifas "Ilumini Vivestaĵojn". Neniu scias detale pri la milionoj da vivoj de la granda heroo, tamen en multaj famkonataj rakontoj troviĝas tiuj de la reĝido nomata Elokventulo. Post multaj pliaj renaskiĝoj li fariĝis Budho, kiun oni memoras kaj amas en la tuta mondo eĉ hodiaŭ.

## **[Ĉapitro 2. La Instruo de la Dioj]**

Nelonge poste, la reĝino naskis alian filon nomatan Reĝido Luno. Apenaŭ ambaŭ infanoj eklernis piediri, grava malsano subite trafis ilian patrinon kaj forrabis ŝian vivon.

La reĝo prenis novan edzinon kiel reĝinon por helpi en vartado de la vigloplenaj reĝidoj. La reĝino naskis brile ĉarman knabon post kelkaj jaroj. Li estis nomata Reĝido Suno. La reĝo estis tiel ĝoja, ke li volis rekompenci la reĝinon por plezurigi ŝin pro ŝia vartado de la tri infanoj. Do li promesis realigi ŝian deziron. La reĝino pensis pri tio kaj respondis: "Dankon al vi, Via Reĝa Moŝto. Mi prezentu mian deziron estonte."

Tempo pasis rapide kaj ĉiuj tri reĝidoj fariĝis energioplennaj knaboj. Vidinte, ke Reĝido Elokventulo estas tre inteligenta kaj komprenema, la reĝino pensis: "Se tiuj du pli aĝaj reĝidoj restos en la palaco, mia filo Reĝido Suno neniam havos ŝancon

por esti reĝo. Do mi devas fari ion por lia estonteco."

Iutage, kiam la reĝo estis en bona humoro, la reĝino respektoplene alproksimiĝis kaj atentigis lin pri la antaŭa promeso. Li estis tre ĝoja kaj respondis senpripense: "Diru al mi kion ajn vi deziras!" La reĝino diris: "Mia edzo kaj reĝo, certigu, ke vi heredigos la reĝecon al mia filo, Regido Suno ."

La reĝo surpriziĝis de la postulo. Li respondis kolere: "Miaj unuaj du infanoj similas al brilaj steloj! Kiel mi povus transdoni mian regnon al la tria filo? Ĉiuj popolanoj kulpigus min pro tio. Tute ne eble!" La reĝino silentiĝis.

Nun malĝojo superis la feliĉon de



la reĝo. Plene de dubo kaj timo, la reĝo suspektis, ke la reĝino eble faros ion malican kontraŭ liaj unuaj du filoj. Li do decidis sekurigi ilin unue.

Sekrete alveniginte reĝidojn Elokventulo kaj Luno, la reĝo informis ilin pri la danĝera deziro de la reĝino. Li diris malĝoje, ke la nura metodo por sekurigi ilin estas forlasi la regnon, kaj ke ili revenu kaj prenu la justan postenon por regi la regnon nur post la forpaso de la patro. La du obeemaj reĝidoj akceptis la ordonon kaj ekpreparis sin por foriro.

Post kelkaj tagoj ili estis pretaj. Dolore adiaŭinte siajn patron kaj amikojn, ili forlasis la palacon. Sur la vojo preter la reĝa ĝardeno ili renkontis reĝidon

Suno, kiu estis amema kaj amika al siaj pliaĝaj duonfratoj. Li maltrankviliĝis informiĝinte, ke ili forestos longan tempon, do li decidis akompani ilin forlasi la regionon. La tri amikaj reĝidoj ekvojaĝis kune.

Post kelkaj monatoj, ili atingis arbaran regionon de Himalajo. Elĉerpante de la longa vojaĝo, ili sidiĝis sub arbo por ripozi. La plejaĝa frato, Reĝido Elokventulo, diris al la malplej aĝa, Reĝido Suno: "Bonvolu iri al proksima lago kaj alporti akvon per lotusfolioj por ke ni mildigu nian soifon."

Ili tute ne sciis, ke la bela malhele blua lago estas posedata de akva demono! Lia reganto permesis al li manĝi ĉiun vivestaĵon, kiun li povas trovi en la akvon,

kun escepto, ke li ne rajtas manĝi tiun, kiu scias la respondon al la demando: "Kio estas la instruo de la dioj?"

Atinginte la lagbordon, Reĝido Suno, soifa, laca kaj malpura, rekte iris en la akvon sen esplorado. La demono subite sin montris el la akvo kaj kaptis lin.

La demono demandis lin: "Kio estas la instruo de la dioj?" Reĝido Suno respondis: "Mi scias la respondon de tio. La suno kaj luno estas la instruoj de la dioj." "Vi ne scias la instruon de la dioj, do vi apartenas al mi!" diris la demono. Poste, li tiris lin sub la akvon kaj malliberigis lin en profunda kaverno.

Pro nereveno de Reĝido Suno, Reĝido Elokventulo petis la alian fraton, Reĝido

Luno, iri al la lago por porti akvon per lotusaj folioj. Kiam Reĝido Luno atingis tien, ankaŭ li rekte enakviĝis sen pririgardi. La akva demono refoje aperis, kaptis lin kaj demandis: "Kio estas la instruo de la dioj?" Reĝido Luno respondis: "Mi scias la respondon al la demando. La kvar direktoj nordo, oriento, sudo kaj okcidento estas la instruo de dioj." "Vi ne scias la instruon de la dioj, do vi apartenas al mi!" respondis la demono. Do li katenis Reĝidon Luno kune kun Reĝido Suno en la sama kaverno sub la akvo.

Ambaŭ fratoj ne plu revenis, do Reĝido Elokventulo maltrankviliĝis kaj pensis, ke ili estas en danĝero. Li mem

iris al la bela malhele blua lago. Estante saĝa kaj atentema, li ne iris rekte en la akvon. Anstataŭe, li esploris kaj vidis du liniojn da piedsignoj direktantaj al la lago senrevene. Por sin protekti, li pretigis siajn glavon, pafarkon kaj sagojn. Li komencis iri ĉirkaŭ la lago.

Vidinte, ke tiu ĉi reĝido ne rekte iris en la lagon, la akva demono sin ŝanĝis en humilan vilaĝanon kaj diris al la reĝido: "Vi estas laca kaj soifa de longa irado, mia kara amiko. Kial vi ne iru en la akvon por lavi vin, trinki akvon kaj manĝi lotusajn radikojn?"

Pensante pri la unudirektaj piedsignoj, Reĝido Elokventulo respondis: "Certe vi estas demono aliformiĝinta kiel homo!

Kion vi faris kontraŭ miaj fratoj?" Mirigite pro tio, ke li estis tiel rapide malkaŝita, la demono aperigis sian veran ferocan formon kaj respondis al la saĝa reĝido: "Mi jam kaptis ilin laŭ mia rajto."

La reĝido demandis: "Pro kio?" "Pro la rajto, ke mi povas engluti ilin baldaŭ," respondis la demono, "laŭ permeso de mia reganto mi rajtas manĝi ĉiujn, kiuj iris en la lagon sed ne scias pri la instruo de la dioj. Mi ne rajtas manĝi tiun, kiu scias la instruon de la dioj."

La reĝido demandis: "Pro kio vi bezonas tion scii? Kian avantaĝon vi havos por scii la instruon de la dioj?" La demono respondis: "Mi certas, ke tio donos avantaĝon al mi." "Do mi sciigos al vi,

kio estas la instruo de la dioj," respondis Reĝido Elokventulo: "Sed ne estas konvene por mi tion fari nun. Rigardu min. Mi estas kovrita de malpuraĵo kaj polvo pro la longa vojaĝo. Mi ne rajtas doni al vi la saĝan instruon en la nuna stato."

Tiam la demono ekkonsciis, ke tiu ĉi reĝido estas eksterordinare saĝa. Li do invitis lin baniĝi kaj ripozi. Li donis al la reĝido akvon per lotusfolioj por trinki kaj freŝajn lotusradikojn por manĝi. Li pretigis komfortan sidejon ornamitan per belaj sovaĝaj floroj. Demetinte siajn glavon, pafarkon kaj sagojn, la Iluminiĝinto sidiĝis sur la bele ornamita sidejo. La feroca demono sidiĝis ĉe liaj piedoj kvazaŭ

lernanto aŭskultanta al estimata instruisto.

Reĝido Elokventulo diris: "Jen la instruo de la dioj:

Vi devas honti pro via malbono.

Vi devas timi pro via malbono.

Vi devas ĉiam fari bonon.

Tio donos feliĉon al aliaj, kaj helpos al la vivestaĵoj.

Tiam vi ilumiĝos per la interna lumo de koraj paco kaj kvieto."

La akva demono ekzaltiĝis de la respondo kaj laŭdis: "Estimata Reĝido, vi tute kontentigis min por mia demando. Vi tiel ĝojigis min, ke mi redonu al vi unu el viaj fratoj. Kiun vi elektos?"

Reĝido Elokventulo respondis: "Bonvolu liberigi mian malplej aĝan



fraton Reĝido Suno." La demono diris: "Mi opinias, ke vi nur scias la instruon de la dioj, sed ne praktikas ĝin, Estimata kaj Saĝa Reĝido!" La reĝido demandis: "Pro kio vi tiel opinias?" La demono respondis: "Ĉar vi lasas la pliaĝan morti kaj savas la plijunan. Vi ne respektas pliaĝajn homojn!"

La reĝido diris: "Mi scias la instruon de la dioj kaj ankaŭ praktikas ĝin, Démono. Ni tri reĝidoj venis en tiun ĉi arbaron nur pro nia malplej aĝa frato. Lia patrino postulis la regnon de nia patro por li. Do por protekti nin nia patro elsendis nin. La juna reĝido Suno partoprenis en nia vojaĝo nur pro amikeco. Kiu kredos nin se ni revenos al la kortego

sen li kaj diros, ke li estis manĝita de akva demono, kiu volis scii la instruon de la dioj? Ili opinios, ke ni mortigis lin ĉar li estis la kaŭzo de nia danĝero. Tio donos humiligon al ni kaj malfeliĉon al la regno. Timante tian malbonan rezulton mi denove postulas, ke vi liberigu la plej junan reĝidon Suno."

La akva demono tiel kontentiĝis pri la respondo, ke li diris: "Bone, bone, bonege, Via Moŝto! Vi scias la veran instruon de la dioj kaj vi praktikas ĝin vere bone. Kun granda ĝojo mi redonos al vi ambaŭ viajn fratojn!" Tion dirinte, li subakviĝis kaj portis ambaŭ reĝidojn sur la bordon. Ili estis malsekaj, sed bonfartaj.

Poste, la Bodisatvo prezentis aliajn

helpajn admonojn al la demono. Li diris: "Ho, akva demono, mia nova amiko, vi certe faris multajn malbonojn en la antaŭaj vivoj, do vi naskiĝis kiel viandmanĝa demono. Se vi daŭre kondutas tiamaniere, vi dronos en des pli timigan staton en la postaj vivoj. Malbonaj kondutoj kondukas vin al renaskiĝoj hontigaj, timigaj kaj malfeliĉaj. Sed bonaj kondutoj gvidas vin al renaskiĝoj memrespektaj, pacaj kaj feliĉaj. Do estas pli bone por vi havi purajn kondutojn anstataŭ la malpurajn ekde nun." Tio konvertis la demonon de siaj antaŭaj malbonaj kutimoj, kaj la reĝidoj kune vivis feliĉe sub lia protektado.

Iutage venis informo, ke la reĝo forpasis. La tri reĝidoj revenis al la

ĉefurbo kune kun sia amiko akva demono.  
Reĝido Elokventulo kroniĝis kiel la reĝo.  
Reĝido Luno fariĝis ĉefministro, kaj  
Reĝido Suno komandanto de la armeo.  
La akva demono ricevis rekompencan de  
sekura loko, kie oni prizorgis kaj regalis  
lin tre bone dum lia restanta vivo. Tiel  
ili ĉiuj gajnis bonajn kaj meritoplenajn  
pensojn, kondukantajn al la renaskiĝo en  
ĉiela mondo.

La moralinstruo estas: Malbonaj  
kondutoj kaŭzas honton kaj teruron, dum  
bonaj memrespekton kaj pacon.

## 7. MALGRANDA REĜIDO

### SENPATRULO



#### [La Forto de la Vero]

Iam antaŭe, la reĝo de Benareso partoprenis en pikniko okazigita en arbaro. Li estis absorbita de la belaj floroj, arboj kaj fruktoj. Aprecante la belan pejzaĝon, li malrapide iris pli kaj pli profunden en la arbaron. Post nelonge, li ekkonsciis, ke li estas sola for de la akompanantoj.

Tiam li aŭdis dolĉan kanton de juna virino, kiu kantante kolektis brullignon. Por forpeli la timon de soleco, la reĝo sekvis la belan kanton. Kiam li

proksimiĝis al la virino, li trovis, ke ŝi estas ĉarma kaj juna, kaj tuj enamiĝis al ŝi. Ili fariĝis geamantoj, kaj la reĝo gravedigis la junulinon.

Poste li eksplikis, ke li perdiĝis en la arbaro, kaj konvinkis ŝin, ke li fakte estas la reĝo de Benareso. Ŝi montris al li la direkton por ke li reiru al la palaco. La reĝo donis al ŝi ringon sigelitan kaj valoran, dirante: "Se vi naskos knabinon, vendu la valoran ringon kaj vartu ŝin per la mono. Se nia infano estos knabo, prenu lin al mi kune kun tiu ĉi ringo kiel atesto." Tion dirinte, li revenis al Benareso.

Je ĝusta tempo la junulino naskis amindan knabon. Kiel simpla kaj hontema virino, ŝi ne kuraĝis konduki sian filon al

la kortego tute ne imagebla por ŝi, sed nur tenis ĉe si la sigelitan ringon de la reĝo.

Post kelkaj jaroj, la infano fariĝis knabeto. Kiam li ludis kun aliaj infanoj en la vilaĝo, ili insultis, molestis lin, kaj eĉ batis lin. Ĉar lia patrino ne edziniĝis, la aliaj infanoj humiligadis lin. Ili kriis al li: "Senpatrulo! Senpatrulo! Via nomo estu Senpatrulo!"

Kompreneble la knabeto sentis honton, doloron kaj malĝojon pro tio. Li ofte kuris hejmen kaj ploris ĉe sia patrino. Iutage, li rakontis al ŝi, kiel aliaj infanoj kriis al li: "Senpatrulo! Senpatrulo! Via nomo estu Senpatrulo!" Lia patrino respondis: "Ne hontu, mia kara. Vi ne estas ordinara knabo. Via patro estas la reĝo de

Benareso!"

La knabeto surpriziĝis. Li demandis la patrinon: "Ĉu vi havas ateston por tio?" Ŝi do rakontis al li pri lia patro, kiu donis al ŝi sigelitan ringon kaj volis ke ŝi konduku la infanon al li kun la ringo kiel atesto se la infano estos knabo. La knabeto proponis: "Ni iru al li." Pro la okazaĵo, ŝi konsentis kaj ili ekvojaĝis al Benareso en la sekva tago.

Post kiam ili atingis la palacon, la pordisto informis al la reĝo, ke virino kun sia malgranda knabo volas viziti lin. Ili iris en la kortegan halon plenan de reĝaj ministroj kaj konsilantoj. La virino atentigis la reĝon pri ilia kuniĝo en la arbaro. Poste ŝi diris: "Via Reĝa Moŝto,



jen via propra filo."

La reĝo eksentis honton antaŭ ĉiuj gesinjoroj en la halo. Kvankam li sciis bone, ke la virino diris la veron, li respondis: "Li ne estas mia filo!" La patrino de la knabeto montris la sigelitan ringon kiel ateston. La reĝo denove rifuzis agnoski la veron pro honto. Li diris: "Ĝi ne estas mia ringo!"

Tiam la kompatinda virino pensis: "Mi havas nek atestanton nek ateston por pruvi, kion mi diris. Mi havas nur kredon al forto de la vero. Ŝi do diris al la reĝo: "Mi ĵetu la knabeton en la aeron. Se li vere estas via filo, li restus en la aero senfale. Se li ne estus via filo, li falus sur la plankon kaj mortus!"

Ŝi subite kaptis la knabeton je la piedoj kaj ĵetis lin en la aeron. Ho! La knabo sidis kun kruroj krucitaj antaŭ si kaj pendis en la aero senfale. Neniu povis diri eĉ vorton pro surpriziĝo. Sidante supre en la aero, la malgranda knabo diris al la majesta reĝo: "Via Reĝa Moŝto, mi vere estas via filo. Vi prizorgas multajn homojn, kiuj havas nenian rilaton kun vi. Vi eĉ prizorgas sennombrajn elefantojn, ĉevalojn kaj aliajn bestojn, sed vi ne volas prizorgi kaj varti min, vian propran filon. Bonvolu prizorgi min kaj mian patrinon!"

Aŭdinte tion, la reĝo sobriĝis el sia vanta digno. Li estis humiligita de vero pri la knabeto. Li etendis siajn brakojn kaj diris: "Venu al mi, mia kara filo. Mi

prizorgos vin."

Mirigite de la eksterordinara afero, ĉiuj en la halo etendis siajn brakojn. Ili ankaŭ petis la pendantan knabeton veni al ili, sed li rekte sin ĵetis en la sinon de sia patro. Kun la filo sidanta sur la genuo, la reĝo anoncis, ke li kronos la knabeton kiel reĝidon kaj lian patrinon kiel unuan reĝinon.

Tiel la reĝo kaj ĉiuj korteganoj eksciis pri forto de la vero. Benareso famiĝis kiel la regno de paco, honesteco kaj justeco. Kiam la reĝo forpasis, la plenaĝa reĝido volis montri al la popolo, ke ĉiuj estas respektindaj, do li donis al si mem oficialan nomon "Reĝo Senpatrulo". Li regis la regnon juste kaj indulgeme.

La moralinstruo estas: La vero ĉiam  
estas pli forta ol mensogo.

## 8. LA CENTA REĜIDO



### [Obeemo al Saĝa Instruisto]

Iam estis reĝo, kiu havis cent filojn. La plej juna filo estis Reĝido Gamani. Li estis energia, pacienca kaj bonkora.

Ĉiu el la reĝidoj lernis ĉe instruisto. Kvankam Reĝido Gamani estis la centa laŭvice, li bonŝance havis la plej bonan instruiston. Lia instruisto estis la plej erudicia kaj saĝa el ĉiuj instruistoj. Li similis al la patro por Reĝido Gamani, kiu amis, respektis kaj obeis lin.

Tiam estis kutimo sendi ĉiun klerigitan reĝidon al aparta provinco por disvolvi la

landon kaj helpi la popolon. Kiam Reĝido Gamani aĝis sufiĉe por posteno, li iris al la instruisto kaj demandis, kiun provincon li elektu. La instruisto respondis: "Neniun provincon elektu. Anstataŭe, diru al la reĝo, via patro, ke restos ĉe li neniuj filoj por servi ĉe li en la hejmurbo se li elsendos vin, sian centan filon." Reĝido Gamani obeis la konsilon kaj plezurigis sian patron per bonkoreco kaj fideleco.

La reĝido denove iris al la instruisto kaj demandis: "Kiel mi povas plej bone servi al mia patro kaj la civitanoj en la ĉefurbo?" La saĝa instruisto respondis: "Petu la reĝon, ke li ordonu al vi kolekti imposton kaj honorarion, kaj ankaŭ disdoni la monhelpon al la popolo. Se li

konsentos, plenumu la devon honeste kaj juste kun energio kaj bonkoreco."

La reĝido denove sekvis la konsilon de sia instruisto. Je la fido al sia centa filo, la reĝo ĝojplene sendis lin al tiuj postenoj. Kiam la plej juna reĝido plenumis la malfacilan taskon kolekti honorarion kaj imposton, li ĉiam estis ĝentila, justa kaj laŭleĝa; kiam li distribuis manĝaĵojn al la malsatuloj kaj vivbezonaĵojn al la mizeruloj, li ĉiam estis malavara, afabla kaj kompatema. Post nelonge, la centa reĝido gajnis respekton kaj amon de ĉiuj homoj.

Poste, la reĝo kuŝis sur la morta lito. Liaj ministroj demandis al li, kiu estu la sekva reĝo. Li respondis, ke ĉiu el la cent

filoj rajtas fariĝi reĝo, kaj li volis, ke la civitanoj elektu per si mem.

Forpasis la maljuna reĝo. Ĉiuj civitanoj konsentis elekti la plej junan reĝidon kiel la novan reĝon. Oni kronis lin "Reĝo Gamani la Justa" pro lia bonkoreco.

Kiam la naŭdek naŭ pliaĝaj fratoj aŭdis pri tio, ili pensis, ke ili estis humiligitaj. Plenaj je envio kaj kolero, ili pretis ekmiliti. Ili sendis al Reĝo Gamani mesaĝon, kiu diras: "Ni ĉiuj estas viaj pliaĝaj fratoj. La najbaraj landoj mokos nin se ni estos regataj de la plej juna reĝido. Rezignu la regnon. Alie ni prenos ĝin per milito!"

Ricevinte la mesaĝon, Reĝo Gamani portis ĝin al la saĝa instruisto, kaj petis



lian konsilon.

La honora kaj ĝentila instruisto estis neniu alia ol reenkarniĝinta Iluminiĝinto. Li respondis: "Diru al ili, ke vi rifuzas militon kontraŭ viaj fratoj, vi ne helpas ilin mortigi senkulpajn homojn kiujn vi konas kaj amas. Sed anstataŭe, dividu la heredaĵon de la reĝo inter ĉiuj cent reĝidoj. Poste sendu al ĉiu ties porcion." La reĝo denove obeis sian instruiston.

Samtempe la naŭdek naŭ pliaĝaj fratoj jam kondukis siajn naŭdek naŭ malgrandajn armeojn ĉirkaŭ la ĉefurbon. Post kiam ili ricevis la respondon kaj malgrandan porcion de la reĝa heredaĵo, ili okazigis kunvenon kaj opiniis, ke ĉiu porcio estis tiel malgranda, ke ĝi estis

preskaŭ sensignifa. Ili ne plu volis akcepti la dividajon.

Sed tiam ili ekkonsciis en la sama maniero, ke la regno apartiĝos en malgrandajn partojn se ili batalos unue kontraŭ Reĝo Gamani kaj poste unuj kontraŭ aliaj. Ĉiu malgranda parto de la granda regno estis tro malforta kontraŭ malamikaj landoj. Do ĉiu el ili redonis sian porcion de la reĝa heredaĵo kiel oferon por paco, kaj akceptis la regadon de Reĝo Gamani.

La reĝo plezure invitis siajn fratojn al la palaco por celebri la pacon kaj unuecon de la regno. Li regalis ilin per plej perfektaj manieroj de malavaro, plezura konversacio kaj instruo por favori ilin, kaj

ankaŭ traktis ilin kun ĝusta modesteco.

Tiel la reĝo kaj la naŭdek naŭ reĝidoj fariĝis des pli intimaj ol ordinaraj fratoj. Ili forte subtenis unuj al aliaj. Informiĝinte pri tio, neniuj el la najbaraj landoj plu kuraĝis minaci la regnon kaj ĝian popolon. Post pluraj monatoj, la naŭdek naŭ fratoj revenis al siaj provincoj.

Reĝo Gamani la Justa invitis sian instruiston saĝan kaj maljunan vivi en la palaco. Li honorigis lin per granda riĉaĵo kaj multaj donacoj. Li okazigis celebradon por sia estimata instruisto. Li diris al la korteganoj: "Mi, la plej juna el la cent kapablaj reĝidoj, ŝuldas ĉiujn sukcesojn al la saĝa konsilo de mia instruisto malavara kaj komprenema. Same, ĉiuj sekvantoj de

lia saĝa instruo povas gajni prosperon kaj feliĉon. Eĉ la unuecan kaj fortan regnon mi ŝuldas al mia estimata instruisto."

La regno prosperis sub la regado de la justa kaj malavara Reĝo Gamani la Justa.

La moralinstruo estas: Sekvi konsilon de saĝa instruisto rekompencas vin centoble.

## 9. LA REĜO KUN UNU GRIZA HARO



[**Monahîgo**]

Antaŭ sufiĉe longa tempo homoj vivis multe pli longe ol nun. Ili vivis milojn da jaroj. Tiam la Iluminiĝinto naskiĝis kiel bebo nomita Makadeva. Li vivis 84000 jarojn kiel infano kaj estis kronita kiel reĝido. Je la tempo de nia rakonto, li jam vivis kiel juna reĝo dum 80000 jaroj.

Iutage, Makadeva diris al la kortega barbiro: "Se vi vidus grizajn harojn sur mia kapo, tuj informu min!" La barbiro promesis tion fari.

Pasis 4000 jaroj. Makadeva estis juna reĝo dum 84000 jaroj. Iutage, kiam la barbiro razis harojn al la reĝo, li trovis unu grizan haron sur lia kapo. Do li raportis: "Via Reĝa Moŝto, mi vidis grizan haron sur via kapo." La reĝo respondis: "Do eltiru kaj metu ĝin en mian manon." La barbiro elprenis oran prenileton, eltiris la grizan haron kaj metis ĝin en la manon de la reĝo.

Tiam la reĝo ankoraŭ havis almenaŭ 84000 jarojn por vivi kiel maljuna reĝo. Rigardante la grizan haron en la mano, li eksentis grandan timon pri la morto. Li sentis, ke la morto proksimiĝas al li, kvazaŭ li estus katenita en brulanta domo. Li estis tiel timigita, ke li ŝvitis kaj tremis

tutkorpe.

Reĝo Makadeva pensis: "Oh, malsaĝa reĝo, vi vane pasigis vian longan vivon kaj nun vi jam proksimas al morto. Vi neniam klopodis por vivi kun amo, elradikigi viajn avaron kaj envion, kaj forigi vian nesciecon per la metodo lerni veron kaj fariĝi saĝa."

Pensante pri tio, li sentis la korpon brulanta kaj ŝviton senĉese elfluanta. Tiam li decidis senhezite: "Estas tempo por mi rezigni la reĝan povon, monaĥiĝi kaj praktiki meditadon." Tiel pensinte, li transdonis la rajton por la imposto de la tuta urbo al la barbiro. Tio estis sufiĉe granda monsumo ĉiujare.

La reĝo alvenigis sian plej aĝan filon

kaj diris al li: "Mia filo, mi jam vidis mian grizan haron. Mi estas maljuniĝanta. Mi jam ĝuis mondan plezuron de grandaj riĉaĵo kaj povo. Kiam mi mortos, mi volas renaskiĝi en la ĉielan mondon por ĝui la plezuron de dioj. Do mi estos ordinita kiel monaĥo. Vi devas transpreni la respondecon de reĝo. Mi vivos ermite en la arbaro."

Aŭdinte tion, la kortegaj ministroj kaj ĉiuj aliaj korteganoj kuris al la reĝo kaj demandis: "Via Reĝa Moŝto, kial vi subite volas forlasi la sekularan vivon?"

La reĝo elmontris la grizan haron en la mano kaj respondis: "Miaj ministroj kaj korteganoj, laŭ mia opinio, la griza haro montras, ke la tri etapoj de la vivo, tiel



nomataj juneco, mezaĝo, kaj maljuniĝo, jam venis al la fino. Tiu unua griza haro estas kuriero de morto sidanta sur mia kapo. Grizaj haroj similas al anĝeloj senditaj de Dio de Morto. Do nun estas la tempo por mia ordiniĝo kiel monaĥo."

La popolanoj ploris je la informo de lia adiaŭo. Reĝo Makadeva forlasis sian reĝan vivon, iris en la arbaron kaj fariĝis monaĥo. Tie li praktikis "la kvar sanktajn mensstatojn" tiel nomatajn de la sanktuloj. La unua el ili estas ami ĉiujn vivestaĵojn; la dua estas kompati ĉiujn suferantojn; la tria estas ĝui feliĉon pro plezuro de homoj kaj la kvara estas teni la menson paca kaj kvieta eĉ antaŭ la malfacilo kaj malfeliĉo.

La Bodisatvo forpasis post diligentaj

meditado kaj praktikado de tiuj mensstatoj kiel ermita arbara monaĥo dum 84000 jaroj. Li renaskiĝis en alta ĉiela mondo kaj ĝuis la vivon longan je milionoj da jaroj.

La moralinstruo estas: Eĉ longa vivo estas tro efemera por malŝpari.

## 10. LA FELIÇA MONAHO



### [Gojo de Spirita Vivo]

Iam estis riĉulo de alta kasto. Kiam li maljuniĝis, li konsciis, ke la sufero de maljuniĝo okazas same al la riĉuloj kaj malriĉuloj. Do li rezignis siajn riĉaĵon kaj kaston, iris en arbaron kaj vivis kiel malriĉa monaĥo. Li praktikis meditadojn kaj disvolvis sian menson. Li sin liberigis de malbonaj pensoj kaj fariĝis kontenta kaj feliĉa. Liaj trankvileco kaj amikeco iom post iom altiris 500 disĉiplojn.

Tiam antaŭ longa tempo plejparto da monaĥoj kutime mienis tre serioze, sed

estis iu monaĥo, kiu, kvankam digna, ĉiam havis rideton sur la vizaĝo. Kio ajn okazis, li neniam perdis radion de sia interna feliĉo. En la feliĉaj okazoj, li ĉiam ridis plej ĝoje kun malfermita buŝo.

Ne nur aliaj homoj, sed ankaŭ monaĥoj iam demandis lin, kial li estas tiel feliĉa, ke li ĉiam ridetas. Li ridis kaj respondis: "Eĉ se mi dirus al vi, vi ne kredus min! Kaj se vi opinius, ke mi mensogas, tio estus honto por mia majstro." La saĝa majstro sciis bone pri la kaŭzo de lia feliĉo kaj faris lin sia unua asistanto.

Iujare la maljuna majstro kaj liaj 500 disĉiploj iris al la urbo post pluva sezono. La reĝo permesis ilin loĝi en la plezura ĝardeno por pasigi printempon.

La reĝo estis bona homo, kiu serioze plenumis sian respondecon kiel reganto. Li laŭeble klopodis protekti la popolanojn kontraŭ danĝero kaj pliigi iliajn bonhaston kaj bonfartron. Li ĉiam devis maltrankviliĝi pri la najbaraj reĝoj, el kiuj iuj estis malamikaj kaj minacaj. Li ofte devis paciĝi siajn rivalajn ministrojn de la lando.

Fojfoje liaj edzinoj batalis inter si por gajni lian favoron kaj por akiri profiton por siaj filoj. Fojfoje malkontenta regato eĉ minacis lian vivon. Kompreneble, li devis senĉese zorgi ankaŭ pri la financo de la lando. Do li havis tiel multajn zorgojn, ke li havis neniom da tempo por ĝui feliĉon.

Proksimiĝis la somero, kaj li

informiĝis, ke la monaĥoj pretis reiri al la arbaro. Pensante pri la sanstato kaj bezono de la maljuna majstro, li iris al tiu kaj diris: "Estimata Majstro, nun vi estas tre maljuna kaj malforta. Kia bono estas por vi reiri al la arbaro? Vi povas sendi viajn disĉiplojn reiri tien dum vi restu ĉi tie."

La majstro alvenigis sian unuan asistanton kaj diris al li: "Vi estu la ĉefo de la aliaj monaĥoj kiam vi ĉiuj loĝos en la arbaro. Mi estas tro maljuna kaj malforta, do mi restos ĉi tie laŭ la propono de la reĝo." La 500 monaĥoj reiris al la arbaro dum la maljuna restis.

La unua asistanto daŭre praktikis meditadojn en la arbaro. Li gajnis tiel multe da saĝo kaj paco, ke li fariĝis multe

pli feliĉa ol antaŭe. Li sopiris al sia majstro kaj volis dividi sian feliĉon kun li. Do li revenis al la urbo por viziti sian majstron.

Veninte al sia majstro, li sidiĝis sur tapiŝeto ĉe la piedoj de la maljunulo. Ili ne parolis multe, tamen la unua asistanto konstante ripetadis: "Kia feliĉo! Ho, kia feliĉo!"

Tiam la reĝo venis viziti ilin. Li esprimis sian respekton al la majstro. Sed la monaĥo el la arbaro senĉese diradis: "Kia feliĉo! Ho, kia feliĉo!" Li eĉ ne haltis por saluti la reĝon por esprimi sian respekton. Tio ĉagrenis la reĝon, kaj li pensis: "Spite al miaj maltrankvilo kaj okupiteco por prizorgi mian landon, mi elspezas tempon por la vizito, sed tiu ĉi

monaĥo ne salutis min kaj eĉ ne rekonis min. Kiel humilige!" Li do diris al la maljuna majstro: "Estimata Majstro. Ĉi tiu monaĥo eble stultiĝis pro troa manĝado. Eble tio estas la kaŭzo kial li plenas de feliĉo. Ĉu li ĉiam kuŝas ĉitie maldiligente?"

La Ĉefmonaĥo respondis: "Ho, Via Reĝa Moŝto. Estu pacienca, kaj mi diru al vi la kaŭzon de lia feliĉo. Ne multaj homoj scias pri tio. Li iam estis reĝo ĝuste tiel riĉa kaj potenca kiel vi, sed li rezignis sian reĝan vivon kaj ordiniĝis kiel monaĥo. Nun li opinias, ke lia antaŭa feliĉo estis ne komparebla kun lia nuna ĝojo!"

"Li kutime estis ĉirkaŭata de la armeanoj, kiuj gardis kaj protektis lin. Nun



sidante sola en la arbaro kun nenia timo, li ne plu bezonas gardistojn. Li jam rezignis sian ŝarĝon zorgi pri la riĉaĵo bezonanta protekton. Anstataŭe, sen zorgo pri la riĉaĵo kaj sen timo pri perdo de la potenco, li kaj la aliaj estas protektataj de lia saĝo. Li jam gajnis en meditado la internan pacon, tiel ke li ne povas sin deteni de la diro ‘Kia feliĉo! Ho, kia feliĉo!’”

La reĝo tuj komprenis. La rakonto pri la feliĉa monaĥo pacigis lin. Li restis momenton kaj ricevis instruon de ambaŭ monaĥoj. Tiam li honoris ilin kaj revenis al la palaco.

Poste la feliĉa monaĥo, kiu iam estis reĝo, esprimis sian estimon al sia majstro kaj reiris al la bela arbaro. La maljuna

Ĉefmonaĥo vivis ĝis la fino, forpasis kaj renaskiĝis en alta ĉiela mondo.

La moralinstruo estas: Feliĉo pli multiĝos al tiu, kiu ne zorgas pri riĉaĵo kaj potenco.

## 11. BELO KAJ GRIZO



[Saĝa Estro]

Iam estis ĉefo de mil cervoj. Li havis du filojn. Unu estis svelta kaj alta, kun brilaj viglaj okuloj kaj glata ruĝa hararo. Li nomiĝis Belo. La alia estis grizhara, kaj ankaŭ svelta kaj alta. Li nomiĝis Grizo.

Post kiam Belo kaj Grizo plenkreskis, iutage ilia patro alvenigis ilin kaj diris: "Mi estas tre maljuna, do mi ne plu kapablos prizorgi la grandan cervaron. Mi volas, ke vi, miaj du plenaĝaj filoj, estu la ĉefoj kiam mi retiriĝos de la prizorgado al ili. Ni dividu la cervaron kaj vi gvidu po

500 cervojn." Do ili agis laŭ lia ordono.

En Hindio, kiam venas la tempo por rikolto, la cervoj estas ĉiam en danĝero. La rizplantoj estas plej altaj, kaj la cervoj ne sindeteneble iras en la rizkampojn kaj manĝas la kreskaĵon. Por eviti la damaĝon de la kreskaĵo, oni fosas kavojn, metas akrajn pikilojn en la teron, kaj konstruas ŝtonajn kaptilojn por kapti kaj mortigi cervojn.

Kun abunda scio pri la sezono, la saĝa maljuna cervo alvenigis ambaŭ filojn nove estriĝintajn. Li konsilis, ke ili gvidu la cervarojn en la montarajn arbarojn por sin teni malproksimaj de la danĝeraj kampoj. Jen estis la metodo, per kiu li ĉiam protektis la cervojn de vundiĝo kaj morto.

Li kutime revenigis ilin al la malaltaj kampoj post la rikolto.

Ĉar li estis tro maljuna kaj malforta por la vojaĝo, li volis resti sin kaŝinte. Li atentigis la filojn esti atentemaj por vojaĝi sekure. Belo ekkondukis sian cervaron al la montara arbaro, kaj Grizo same ekvojaĝis kun la sia.

Ĉiuj vilaĝanoj ĉe la vojo jam sciis bone, ke estas tempo por cervoj vojaĝi de la malaltaj kampoj al altaj montaroj. Do ili sin kaŝis ĉe la vojo por mortigi cervojn kiam tiuj preterpasis.

Grizo tute ne zorgis pri la konsilo de sia patro. Anstataŭ esti atentema por vojaĝi sekure, li volis hasti al la densa arbaro en la montaro. Do li senĉese

paŝigis sian cervaron dum nokto, je tagiĝo kaj vesperiĝo, kaj eĉ en la tago. Tio faciligis al la homoj pafi la cervojn de Grizo per pafarkoj kaj sagoj. Iuj cervoj estis mortigitaj, kaj pli multaj vundiĝis kaj mortis de doloro iom poste. Grizo atingis la arbaron nur kun malmultaj cervoj restantaj vivaj.

La alta Belo kun glata kaj ruĝa hararo estis sufiĉe saĝa por kompreni la danĝeron al sia vojaĝanta cervaro. Do li sin tenis tre atentema. Li sciis, ke estas plisekure malproksimiĝi de la vilaĝoj kaj ĉiuj homoj, kaj estas ne sekure vojaĝi en la tago, kaj eĉ je la tagiĝo kaj vesperiĝo. Do li gvidis sian cervaron malproksime de la vilaĝoj kaj vojaĝis nur en la meznokto. La

cervoj de Belo atingis la montaran arbaron sekure kaj bonorde kun neniu mortigita aŭ vundita.

La du cervaroj renkontiĝis, kaj restis en la montaro ĝis finiĝo de la rikolta sezono. Tiam ili komencis reveni al la kamparo.

Grizo lernis neniom de la unua vojaĝo. Estis pli malvarme en la montaro, do li hastis atingi la varman kamparon. Li estis malatentema tute kiel antaŭe. Denove la homoj sin kaŝis ĉe la vojo, atakis kaj mortigis la cervojn. Ĉiuj cervoj de Grizo estis mortigitaj, kaj poste manĝitaj aŭ venditaj de la vilaĝanoj. Nur Grizo sola postvivis la vojaĝon.

Belo gvidis sian cervaron same

atenteme kiel antaŭe. Li kondukis ĉiujn 500 cervojn tute sekure. Kiam la cervoj estis ankoraŭ malproksimaj, la maljuna cervo diris al sia edzino: "Rigardu la cervojn venantajn al ni. Belo revenas kun ĉiuj el siaj sekvantoj kaj Grizo revenas sola lamante sen sekvantoj. Tiuj, kiuj sekvas saĝan kaj virtan ĉefon, estos ĉiam sekuraj. Tiuj, kiuj sekvas malsaĝan kaj malatenteman ĉefon, kiu ĉiam pensas pri si mem, falos en malfacilaĵon kaj ruiniĝon."

Post iom da tempo, la maljuna cervo mortis kaj renaskiĝis laŭ sia propra destino. Belo fariĝis la ĉefo de la cervaro kaj vivis longe, amate kaj admirate de ĉiuj cervoj.



La moralinstruo estas: Saĝa ĉefo konsideras la sekurecon de siaj sekvantoj antaŭ ĉio.

## 12. REĜO BANJANA CERVO



### [Ĉapitro 1. Kompato]

Iam antaŭe bela kaj eksterordinara cervo naskiĝis en la arbaro ĉe Benareso en la norda Hindio. Kvankam li estis tiel granda kiel ĉevalido, lia patrino naskis lin tre facile. Kiam li malfermis siajn okulojn, liaj okuloj estis tiel brilaj kiel glimantaj juveloj. Lia buŝo estis tiel ruĝa kiel la plej ruĝaj beroj en la arbaro; liaj hufoj estis tiel nigraj kiel polurita karbo; liaj malgrandaj kornoj glimis kiel arĝento kaj lia koloro estis ora kiel somera tagiĝo. Post kiam li elkreskis, 500 cervoj ariĝis ĉirkaŭ li, kaj li

famiĝis kiel Reĝo Banjana Cervo.

Ne malproksime alia bela vircervo en brila ora koloro naskiĝis en la sama periodo. Alia aro de 500 cervoj venis sekvi lin post nelonge, kaj li estis konata kiel Branĉa Cervo.

La Reĝo de Benareso ŝatis manĝi cervajon. Pro tio li kutime ĉasis kaj mortigis cervojn. Ĉiufoje kiam li ĉasis, li iris al malsama vilaĝo kaj ordonis al popolanoj servi al li. Ili devis ĉesigi kion ili faras, ĉu terplugadon, rikoltadon aŭ ion alian por partopreni en la ĉasado de la reĝo.

la vivo de la popolanoj estis ĝenata de tiaj interrompiĝoj. Pro tio ili plantis malpli da grenplantaĵoj kaj ankaŭ enspezis malpli

multe per aliaj okupoj. Do ili kunvenis kaj decidis konstrui grandan cervan parkon por la reĝo de Benareso. Tie li povus ĉasi per si mem sen servo de la vilaĝanoj.

Do la popolanoj konstruis la cervan parkon. Ili faris laĝetojn por ke cervoj trinku akvon, kaj plantis arbojn kaj herbojn por ke cervoj manĝu. Kiam ĉio estis preta, ili malfermis la pordon kaj iris en la proksiman arbaron. Ili ĉirkaŭis la tutajn arojn de Banjana kaj Branĉa Cervoj. Poste per bastonoj, armiloj kaj bruigiloj, ili pelis ĉiujn cervojn en la cervan parkon kaj fermis la pordon post ili.

Post pretigo de la cervoj, la popolanoj iris al la reĝo kaj raportis: "Ni suferas pro malabunda rikolto de greno kaj malprofito

de negocoj pro via ĉasado. Nun ni jam pretigis por vi cervan parkon sekuran kaj plezuran. Vi povas ĉasi per vi mem laŭ via plaĉo en la parko, kaj ĝui la ĉasadon kaj manĝadon de la cervajo sen nia helpo."

La reĝo iris en la novan cervan parkon. Tie li ĝojplene vidis grandan aron da cervoj. Rigardante ilin, li subite trovis du ĉarmajn orkolorajn cervojn kun plenkreskintaj kornoj. Li admiris ilian raran belecon, kaj tuj faris proklamon por protekti ambaŭ orajn cervojn. Li ordonis, ke oni tenu ilin tute sekuraj, kaj neniu rajtu damaĝi aŭ mortigi ilin.

Ĉiutage la reĝo venis unufoje kaj mortigis cervon por sia vespermanĝo. Iam kiam li estis tro okupita, li ordonis al sia

kuiristo fari tion. La mortigitan cervon oni portis al haktabulo por buĉi kaj rosti.

Kiam ajn la cervoj vidis pafarkojn kaj sagojn, ili teruriĝis, tremis kaj diskuris freneze por sin savi. Iuj vundiĝis kaj multaj suferis grandan doloron.

Iutage, la cervoj de Reĝo Banjana Cervo kolektiĝis ĉe li. Li alvenigis Branĉan Cervon kaj la du arojn da cervoj por kunveno. Reĝo Banjana Cervo diris: "Kvankam neniuj el ni povas eviti morton en la fino, tamen ni povas preventi tian senfinan suferon de vundiĝoj. La reĝo nur volas cervajon ĉiutage, ni do lotu inter ni kaj elektu unu por oferi al li ĉiutage. En la unua tago ni oferu unu el nia cervaro kaj en la alia tago vi oferu unu el la

via. Tiamaniere per lotado ni decidu la viktimon ĉiufoje."

Branĉa Cervo konsentis. Ekde tiam, ĉiu elektita cervo eliris obeeme kaj metis sian kolon sur la haktabulon. La kuiristo alvenis, simple mortigis la atendantan viktimon kaj preparis cervajon por la reĝo.

Iutage, la loto hazarde trafis gravedan cervinon el la cervaro de Branĉa Cervo. Konsiderante pri la bono al aliaj, al si mem kaj la bebo en la ventro, ŝi iris al Branĉa Cervo kaj petis: "Via Reĝa Moŝto, mi estas graveda. Lasu min vivi ĝis mi naskos mian idon. Tiam ni havos du ŝancojn anstataŭ unu kaj ŝparos vivon je unu tago."

Branĉa Cervo respondis: "Ne! Mi ne

povas ŝanĝi la regulojn de la procedo kaj transigi vian vicon al aliaj. La gravedeco estas via, kaj naski idon estas via propra respondeco. Do foriru de mi."

La kompatinda patrino iris al Reĝo Banjana Cervo kaj esprimis sian problemon post la malsukceso ĉe Branĉa Cervo. Li respondis ĝentile: "Reiru trankvile. Mi ŝanĝos la regulojn de la procedo kaj transigos vian vicon al iu alia."

La cerva reĝo iris al la haktabulo, kaj metis sian orkoloran kolon sur ĝin.

Granda silento falis en la cervan parkon. Iuj rakontistoj eĉ diris, ke la silento regis en aliaj mondoj ne videblaj de ĉi tie.



Post nelonge la reĝa kuiristo venis mortigi la memvolan viktimon sur la tabulo. Sed kiam li vidis, ke la cervo estas neniŭ alia ol unu el la oraj cervoj, kiujn la reĝo ordonis ŝpari, li ne kuraĝis mortigi lin. Li do iris kaj raportis tion al la reĝo de Benareso.

La reĝo surpriziĝis, kaj tuj iris al la parko. Li diris al la ora cervo ankoraŭ kuŝanta sur la tabulo: "Ho, Reĝo de cervoj, ĉu mi ne promesis teni vian vivon? Por kio vi venis ĉi tien kiel la aliaj?"

Reĝo Banjana Cervo respondis: "Ho, Reĝo de homoj, ĉifoje estas vico de graveda cervino. Ŝi petis, ke mi savu ŝin por la aliaj kaj ankaŭ ŝia naskiĝonta bebo. Mi ne povas helpi ŝin krom veni ĉitien

anstataŭ ŝi por sperti ŝian suferon. Mi povis helpi neniom krom ploradi, pensante pri la malgranda bebo, kiu neniam povus vidi la tagiĝon aŭ gustumi la roson. Kaj mi ankaŭ ne rajtas trudi la suferon de morto al la aliaj, kiuj ankoraŭ ne devas morti laŭvice. Do, Majesta Reĝo, mi oferu mian vivon por savi la cervinon kaj ŝian feton. Jen mi alvenas pro tio."

La Reĝo de Benareso estis emociita. Kvankam li estis potenca, larmo falis de sur lia vizaĝo. Li diris: "Ho, Granda Reĝo, la ora reĝo de cervoj, eĉ en la homaro mi vidis neniun tiel noblan kiel vi! Mi neniam vidis tiel grandan kompatemon por transpreni la suferon de aliaj! Mi neniam vidis tiel grandan malavarecon por

oferi vian vivon! Kaj mi neniam vidis tiel grandan bonkorecon kaj teneran amon al ĉiuj viaj cervoj! Stariĝu. Mi ordonos, ke oni ne plu mortigu vin en mia regno. Kaj krome, oni ankaŭ ne mortigu la cervinon kaj ŝian bebon."

Sen levi la kapon, la ora cervo diris: "Ĉu nur ni estos savitaj? Kio okazos al la aliaj cervoj, niaj amikoj kaj parencoj en la parko?" La reĝo promesis: "Via Reĝa Moŝto, mi ne povas rifuzi vin. Mi garantias la sekurecon kaj liberecon al ĉiuj cervoj en la parko. " "Kaj kio okazos al la cervoj ekster la parko? Ĉu oni mortigos ilin?" demandis Banjana. "Ne, Via Reĝa Moŝto. Mi savos ĉiujn cervojn en mia tuta regno."

La ora cervo ankoraŭ ne levis sian kapon. Li petis: "Do la cervoj estas sekuraj, sed kio okazos al la aliaj kvarpiedaj bestoj?" "Via Reĝa Moŝto, de nun ili estos sekuraj en mia lando." "Kaj kio okazos al la birdoj? Ankaŭ ili deziras vivi plue." "Jes, Via Reĝa Moŝto. La birdoj estos ankaŭ sekuraj kontraŭ mortigo en la manoj de homoj." "Kaj kio okazos al la fiŝoj, kiuj vivas en la akvo?" "Eĉ la fiŝoj estos liberaj por vivi, Via Reĝa Moŝto." Tion dirinte, la reĝo de Benareso garantiis malpermeson de ĉasado kaj mortigo al ĉiuj bestoj en lia lando.

Akirinte la promeson por sekurigi ĉiujn vivestaĵojn, la Granda Cervo stariĝis.

## [Ĉapitro 2. Instruo]

Reĝo Banjana Cervo, la luminiĝinto, donis instruon al la Reĝo de Benareso pro (per) siaj kompatoj kaj dankemo. Li konsilis al li praktiki kvin-paŝan trejnon por purigi sian menson. Li eksplikis ilin, "Tio donos al vi profiton, se vi rezignos kvin malbonajn kondutojn, kiuj estas:

--Mortigi vivestaĵon. Tio estas senkompatemo.

--Preni tion, kion oni ne donis. Tio estas avideco.

--Fari seksan miskonduton. Tio estas malbonkoreco.

--Diri mensogon. Tio estas malhonesteco.

--Perdi saĝon pro alkoholaĵo. Tio faligos vin el unuaj kvar paŝoj."

Li plue konsilis al li fari bonajn agojn, por ke tiu ĝuu feliĉon en la vivoj nunaj kaj postaj. Poste Reĝo Banjana Cervo kaj ambaŭ cervaroj ĝojplene revenis al la arbaro.

Je la ĝusta tempo la graveda cervino restanta en la cervaro de Banjana naskis cervidon, kiu estis tiel bela kiel floranta lotusfloro oferita al dioj.

Post kiam la cervido kreskis kiel juna vircervo, li komencis ludi kun tiuj de Reĝo Branĉa Cervo. Vidinte tion, la patrino diris al li: "Pli bone morti post mallonga vivo ĉe kompatemulo ol havi longan vivon ĉe ordinarulo." Poste, ŝia filo vivis feliĉe

en la cervaro de Reĝo Banjana Cervo.

Malkontentiĝis nur la vilaĝanoj kaj kamparanoj de la reĝlando. Pro la protekto fare de la reĝo, la cervoj komencis senskrupule manĝi grenon de homoj. Ili eĉ sin paŝtis en legomaj ĝardenoj de la vilaĝoj kaj la urbo de Benareso!

Do la popolanoj plendis al la reĝo, kaj petis permeson mortigi almenaŭ por atentigi la cervojn. Sed la reĝo respondis: "Mi promesis al Reĝo Banjana Cervo, ke mi protektos la cervojn, do mi preferas forlasi la tronon ol rompi mian promeson al li. Neniu rajtas damaĝi cervon!"

Kiam Reĝo Banjana Cervo informiĝis pri tio, li diris al ĉiuj cervoj: "Vi ne rajtas manĝi grenon de homoj." Kaj li

sendis mesaĝon al la popolanoj. Li petis ilin ligi tufojn da arbaj folioj kiel limon ĉirkaŭ siaj kampoj anstataŭ fari barilojn. Tiel komenciĝis la hinda kutimo marki la kampojn per ligitaj folioj por eviti damaĝon de cervoj. Tiun rimedon oni uzas eĉ en la nuna tempo.

Ambaŭ Reĝo Banjana Cervo kaj la Reĝo de Benareso vivis ĝis la lasta momento en paco, forpasis kaj renaskiĝis laŭ siaj propraj kondutoj.

La moralinstruo estas: Kompatemo estas granda, kie ajn ĝi estas.



# 13. MONTARA CERVO KAJ VILAĜA CERVINO



## [Fanatika Enamiĝo]

Iam antaŭe en norda Hindio estis aro da vilaĝaj cervoj. Ili kutime vivis ĉe vilaĝoj, kie ili naskiĝis. Ili sciis bone, ke ili devas esti singardemaj kontraŭ homoj. Tio estis precipe grava ĉe la rikolta tempo, kiam la plantoj estis altaj kaj la vilaĝanoj ĉiam klopodis kapti kaj mortigi cervojn proksimiĝintajn.

Je la rikolta tempo la vilaĝaj cervoj restis en la arbaro dum tutaj tagoj. Ili nur proksimiĝis al la vilaĝo en nokta mallumo.

Unu el ili estis bela cervino. Ŝi havis hararon molan kaj ruĝe brunan, voston blankan kaj vilan, kaj okulojn grandajn kaj brilajn.

Tiam juna montara cervo ankaŭ restis en la sama arbaro. Iutage li vidis la belan cervinon, kaj eksentis korinklinon al ŝi. Li sciis nenion pri ŝi, sed li imagis, ke li profunde amas ŝin nur pro ŝiaj hararo ruĝe bruna, vosto vila kaj blanka, kaj okuloj grandaj kaj brilaj. Li eĉ songis pri ŝi, kvankam ŝi eĉ ne sciis pri lia ĉeesto.

Kelkajn tagojn poste, la juna montara cervo decidis sin prezenti al ŝi. Kiam li iris en la senarban lokon, kie ŝi estis manĝanta herbojn, li estis altirita de ŝia beleco kaj neniel povis turni sian rigardon for de

ŝi. Li ekparolis: "Ho, mia dolĉa belulino, tiel aminda kiel stelo kaj tiel brila kiel la suno, mi konfesos al vi, ke mi profunde..." Ĝuste tiam lia piedo trafis stumpon de arboradiko, li stumblis kaj falis teren, kaj lia vizaĝo plaŭdis en koto! La bela vilaĝa cervino ridetis pro la flato, sed pensis en si, ke tiu montara cervo estas vere stulta.

Samtempe la cervoj ne sciis, ke pluraj arbofeoj vivas en tiu parto de la arbaro. Ili vidis la montan cervon, dum tiu ĉi sekrete fiksrigardis la vilaĝan cervinon. Kiam li iris en la senarban lokon, komencis sian paroladon kaj falis en koton, la feoj ridadis pro tio. "Kiel stultaj estas la bestoj!" Ili kriis. Sed iu el ili ne ridis. Li diris: "Mi timas, ke tio aŭguras danĝeron al tiu ĉi

juna cervo!"

La juna cervo embarasiĝis, sed li ne perceptis la malbonan antaŭsignon. Ekde tiam, li sekvis la cervinon kien ajn ŝi iris. Li senĉese rakontis al ŝi kiel bela ŝi estas kaj kiel arde li amegas ŝin. Tamen ŝi neniel direktis sian atenton al tio.

Noktiĝis, kaj estis tempo por la cervino reveni al la vilaĝo. La homoj loĝantaj ĉe la vojo sciis bone, ke la cervoj preterpasas dumnokte. Do ili instalis kaptilojn por kapti ilin. Tiun nokton atendis ĉasisto sin kaŝinte malantaŭ arbusto.

La vilaĝa cervino ekiris atenteme. La montara cervo ankoraŭ sekvis ŝin kaj ĵetadis laŭdojn al ŝi. Opiniante ke la cervo estas stulta, ŝi haltis kaj diris al li: "Mia

kara cervo, vi estas sensperta por resti ĉe vilaĝoj. Vi tute ne scias kiel danĝeraj estas homoj. La vilaĝo kaj la vojo povas kaŭzi morton al ni cervoj eĉ dum la nokto. Estante tiel juna kaj sensperta, vi ne devas iri al la vilaĝo kun mi. Vi devas resti sekure en la arbaro."

La arbaj feoj aplaŭdis je la atentigo. Sed kompreneble, la cervoj ne aŭdis ilin.

La juna cervo tute ne zorgis pri la atentigo de la cervino. Daŭre sekvante ŝin, li nur diris: "Kiel amindaj estas viaj okuloj en la lunlumo!" Ŝi diris: "Se vi ne obeas min, almenaŭ tenu vian buŝon fermita". Li tiel ebriiĝis de ŝia beleco, ke li tute ne povis sin regi. Sed fine li sukcesis fermi sian buŝon.

Post iom da tempo, ambaŭ cervoj proksimiĝis al la loko, kie la ĉasisto sin kaŝis malantaŭ arbusto. La feoj, kiuj rigardis ilin, maltrankviliĝis kaj teruriĝis pro ilia sekureco. Ili flugis nerveze ĉirkaŭ la arbobranĉoj, sed povis fari nenion kontraŭ tio ol nur rigardi.

La cervino flarsentis la kaŝitan homon. Ŝi timis pri la kaptilo. Por sin protekti kontraŭ la eventuala danĝero, ŝi lasis la cervon iri antaŭen dum ŝi sekvis iom poste.

Kiam la ĉasisto vidis la senskrupulan montaran cervon, li pafis sagon kaj mortigis lin senprokraste. Vidinte tion, la timigita cervino tuj sin turnis kaj forkuris en densejon de la arbaro kiel eble plej

rapide.

La ĉasisto proklamis la mortigon. Li bruligis fajron, senfeligis la cervon, kuiris iom da cervaĵo kaj manĝis ĝissate. Poste, li ĵetis la ĉasaĵon sur sian ŝultron kaj portis ĝin hejmen por vivteni sian familion.

Kiam la feoj vidis la okazaĵon, kelkaj el ili eĉ ekploris. Iuj el ili sentis naŭzon, rigardante la ĉasiston distranĉi la ŝajne noblan cervon dum la aliaj insultis la singardeman cervinon, ke ŝi kondukis la cervon al la buĉisto.

Sed la saĝa feo, kiu donis atentigon unue, diris: "La malsaĝa cervo perdis sian vivon nur pro sia propra fanatikeco de enamiĝo. Tiaj blindaj deziroj povas okazigi falsan feliĉon unue, sed doloron kaj suferon

finfine."

La moralinstruo estas: Fanatika  
enamiĝo kondukas al detruigo.



## 14. LA VENTCERVO KAJ MIELA

### HERBO



#### [Avidemo al Bongusto]

Iam antaŭe, la reĝo de Benareso havis ĝardeniston, kiu prizorgis lian plezuran ĝardenon. Bestoj frekventis la ĝardenon el la proksima arbaro. La ĝardenisto plendis al la reĝo pri tio, kaj la reĝo respondis: "Se vi vidos rarajn bestojn, informu min senprokraste."

Iutage, li vidis raran cervon en la malproksima flanko de la ĝardeno. Vidinte la ĝardeniston, ĝi tuj forkuris rapide kiel vento. Jen kial oni nomis tian beston

ventcervo. Ĝi apartenis al rara speco, kiu estis tre timema. Ĝi estis facile timigita de homoj.

La ĝardenisto raportis la reĝon pri la ventcervo, kaj la reĝo demandis, ĉu li povos kapti la raran beston. Li respondis: "Se Via Reĝa Moŝto bonvolus doni al mi iom da mielo, mi eĉ povus konduki ĝin en la palacon!" Do la reĝo ordonis, ke oni donu al li tiom da mielo kiom li volas.

La speciala ventcervo ŝatis manĝi florojn kaj fruktojn en la plezura ĝardeno de la reĝo. La ĝardenisto iom post iom alproksimiĝis al ĝi, kaj sekve de tio la cervo fariĝis malpli timema al li. Poste, li komencis ŝmiri mielon sur herbojn en la loko, kien la ventcervo kutime venis

por manĝi. Do la cervo vere komencis manĝi herbojn ŝmiritajn per mielo. Ĝi baldaŭ formis avidemon al la gusto de la mielaj herboj. La avidemo gvidis ĝin al la ĝardeno ĉiutage. Nelonge poste, ĝi manĝis nur mielajn herbojn.

La ĝardenisto proksimiĝis al la ventcervo iom post iom. Je la komenco, ĝi tuj forkuris je lia proksimiĝo. Sed poste, ĝi perdis singardemon kontraŭ li kaj ekpensis, ke la viro estas sendanĝera. Kiam la cervo al kutimiĝis al la ĝardenisto, tiu logis ĝin manĝi mielajn herbojn el lia mano. Li daŭre tion faris dum iom da tempo por havigi al ĝi kredon kaj fidecon.

Samtempe, la ĝardenisto starigis du vicojn da kurtenoj, konstruigis larĝan

vojon de la malproksima fino de la plezura ĝardeno al la reĝa palaco. Sur la vojo, la kurtenoj malhelpis la ventcervon vidi la homojn, kiuj timigus ĝin probable.

Kiam ĉio estis preta, la ĝardenisto prenis sakon da herboj kaj botelon da mielo kun si. Je la apero de la ventcervo, li denove komencis manĝigi ĝin permane. Tiamaniere li iom post iom kondukis la cervon en la kurtene ŝirmitan vojon. Li daŭre logis ĝin per mielaj herboj, ĝis ĝi sekvis lin en la palacon. Apenaŭ la cervo eniris, la gardisto de la palaco fermis la pordojn, kaj ĝi estis malliberigita. Vidinte la homojn en la palaco, ĝi subite teruriĝis, kaj ekkuregis tien kaj reen panike por eskapi.

La reĝo malsupren iris al la halo kaj vidis la panikan ventcervon. Li diris: "Kia ventcervo! Kiel ĝi povas fali en tian situacion? Dum tutaj sep tagoj ventcervo neniam reiras al la loko, kie ĝi vidis homon. Ordinare, se ventcervo estas timigita en iu loko, ĝi neniam reiros tien dum sia tuta vivo. Sed rigardu! Eĉ la timema sovaĝa besto povas allogiĝi pro sia avidemo al dolĉaĵo, kaj povas esti forlogita en la centron de la urbo kaj eĉ en la palacon.

“Miaj amikoj, la instruistoj atentigis, ke ni ne tro kroĉiĝu al niaj loĝejoj, ĉar ĉio forpasos. Ili diris, ke kroĉiĝo al amika rondeto limigas nian pli vastan perspektivon. Jen kiel danĝera estas simpla

avidemo al dolĉa gusto aŭ aliaj! Jen kiel bela kaj timema besto estas kaptita de mia ĝardenisto pro la avido al bongusteco."

Por ne damaĝi la mildan ventcervon, la reĝo ellasis ĝin en la arbaron. Ĝi neniam revenis al la reĝa plezura ĝardeno, nek sopiris al la gusto de miela herbo plu.

La moralinstruo estas: Estas pli bone manĝi por vivi, ol vivi por manĝi.

## 15. MALLERNEMA CERVIDO



### [Vaganto el la Klaso]

Iam estis aro da arbaraj cervoj. En la cervaro estis saĝa kaj estimata instruisto erudicia pri cervaj kondutoj. Li instruis al cervidoj artifikojn kaj taktikojn por sin protekti.

Iutage, lia plijuna fratino kondukis sian filon al li por ke li instruon, kio estas grava por cervoj. Ŝi diris: "Ho, frato instruisto, jen mia filo. Bonvolu instrui lin pri la artifikoj kaj taktikoj de cervoj." La instruisto diris al la cervido: "Tre bone. Venu morgaŭ je la nuna tempo por via

unua leciono."

Komence la cervido vizitis la klasojn obeeme laŭ la postulo. Sed iom poste li pli kaj pli interesiĝis pri amuziĝo kun aliaj cervidoj. Li tute ne konsciis, kiel danĝere estos, se li lernos nenion krom cerva amuziĝo. Li komencis vagi el la klasoj kaj baldaŭ li ekforestis de klasoj dum la tuta tempo.

Iutage la mallernema cervido malfeliĉe trafis ŝnurkaptilon kaj estis kaptita. Lia patrino maltrankviliĝis pro lia perdiĝo. Ŝi iris al la instruisto kaj demandis: "Kara fraĵo, kio estas la situacio de mia filo? Ĉu vi vere instruis vian nevon pri la artifikoj de cervoj?"

La instruisto respondis: "Kara franjo,



via filo estas malobeema kaj needukebla. Pro estimo al vi, mi laŭeble klopodis por klerigi lin. Sed li ne volis lerni la artifikojn kaj taktikojn de cervoj. Li ĉiam forestis de klasoj. Kiel mi povus lin instrui? Vi estas obeema kaj fidela, sed li ne. Estis tute senutile por klopodi lin instrui."

Post nelonge ili aŭdis malĝojan informon. La cervido obstina kaj mallernema estis kaptita kaj mortigita de ĉasisto. Li senfeligis ĝin kaj portis la viandon hejmen.

La moralinstruo estas: Forestante de klaso oni lernas nenion de instruisto.

## 16. CERVIDO ŜAJNIGANTA MORTON



### [Ĉeestanto de Klasoj]

Iam estis aro da arbaraj cervoj. En la cervaro estis saĝa kaj respektinda instruisto, kiu estis erudicia pri cervaj kondutoj. Li instruis la junajn cervojn pri artifiko kaj taktikoj por sin protekti.

Iutage, lia plijuna fratino kondukis sian filon al li por ke li instruu tion, kio estas grava por cervoj. Ŝi diris: "Ho, frato instruisto, jen mia filo. Bonvolu instrui lin pri la artifiko kaj taktikoj de cervoj." La instruisto diris al la cervido: "Tre bone.

Venu morgaŭ je la nuna tempo por via unua leciono."

La juna cervo venis al la klasoj obeeme. Kiam la aliaj lernantoj forvagis el la klasoj kaj elspezis tutan tagon ludadi, li restis kaj lernis ĉe la instruisto atenteme. Kvankam li plaĉis al ĉiuj gecervidoj, tamen li ludis kun ili nur post kiam li plenumis ĉiujn siajn hejmtaskojn. Kun granda intereso al lernado, li ĉiam venis al la klasoj akurate. Li estis ankaŭ pacema kun aliaj lernantoj, sciante, ke iuj lernas pli rapide ol aliaj. Li respektis la instruiston pro lia erudicio, kaj ankaŭ estis dankema al li pro lia fervora instruado.

Iutage la cervido trafis kaptilon en la arbaro kaj estis katenita. Li ekkriis pro

doloro. Tio timigis la aliajn cervidojn. Ili kuris al la cervaro kaj raportis lian patrinon pri lia katastrofo. Lia patrino tuj kuregis al sia frato. Verŝante larmojn kaj tutkorpe tremante pro timo, ŝi diris al li: "Ho, kara fraĉjo. Ĉu vi aŭdis, ke mia filo trafis kaptilon de ĉasisto? Kiel mi savu la vivon de mia karulo? Ĉu li lernis bone ĉe vi?"

Ŝia frato respondis: "Ne timu, Franjo. Mi certas, ke li estos sekura. Li lernis tre diligente kaj ĉiam faris sian taskon plej bone. Li neniam forestis de la klasoj kaj ĉiam estis atentema. Ne timu, nek maltrankviliĝu. Li ne estos damaĝita de homoj. Ne maltrankviliĝu. Mi garantias, ke li revenos al vi kaj denove ĝojigos

vin. Li jam ellernis ĉiujn artifikaĵojn kaj taktikaĵojn de cervoj por trompi la ĉasistojn. Do trankviliĝu. Li baldaŭ revenos al vi."

Samtempe la katenita cervido pensis: "Ĉiuj miaj amikoj forkuris pro timo. Neniu povas helpi min por fuĝi el la mortiga kaptilo. Nun mi devas uzi la artifikaĵojn lernitajn ĉe mia saĝa instruisto, kiu ĉiam klerigis nin tiel bone."

Li decidis uzi la taktikon nomatan "sin ŝajnigi morta". Unue, li fosis teron kaj herbon por ŝajnigi, ke li klopodas forkuri. Poste li fekis kaj pisis, ĉar tion kutime faris la cervoj malliberigitaj en kaptilo kaj mortintaj pro paniko. Sekve, li kovris sian tutan korpon per salivo.

Kuŝante flanke sur la tero, li tenis la

korpon rigida kaj la krurojn rektaj. Li suprenturnis siajn pupilojn kaj etendis la langon ĉe la buŝangulo. Li plenigis la pulmojn kaj ŝveligis la ventron per aero. Fine, kun klinita kapo sur la tero, li ekspiris nur per la malsupra naztruo.

Kuŝante senmove, li aspektis kiel kadavro, tiel ke la muŝoj flugadis ĉirkaŭ li, allogite de la fiodoro. Korvoj atendis proksime por manĝi lian karnon.

Mateniĝis post nelonge. La ĉasisto venis esplori sian kaptilon kaj vidis la cervon ŝajnigantan morton. Li frapis je lia ŝveliĝinta ventro kaj trovis, ke ĝi jam malmoliĝis. Vidante la muŝojn kaj malpuraĵon, li pensis: "Ha, ĝi jam rigidiĝis. Ĝi estis kaptita tre frue ĉimatene,

do pro tio la freŝa karno ekputriĝis. Mi devas senfeliĝi ĝin senprokraste, distranĉi la kadavron ĉi tie, kaj porti la viandon hejmen."

Li tute kredis, ke la cervo estis morta, do li deprenis cervidon kaj purigis la kaptilon. Li purigis lokon kaj komencis sterni foliojn sur la teron por buĉado. Konsciante, ke li jam estas libera, la cervido salte stariĝis kaj forkuregis kiel malgranda nubito blovita de forta vento al la komforta kaj sekura loko de sia patrino. La tuta cervaro celebris lian revenon, danke al bona lernado ĉe la saĝa instruisto.

La moralinstruo estas: Bone lernitaj lecionoj alkondukas grandan rekompencan.

## 17. VENTO KAJ LUNO



### [Amikeco]

Antaŭ longa tempo du bonaj amikoj loĝis kune en ombro de roko. Eble oni miris, ke unu el ili estis leono, dum la alia tigo. Ili konatiĝis kiam ili estis tro junaj por koni la diferencon inter leonoj kaj tigroj. Do ili tute ne opiniis, ke ilia amikeco estas malnormala. Krome, ili vivis pace en kvieta parto de la montoj, eble pro la influo de arbara monaĥo vivanta proksime. Li estis ermito loĝanta fore de aliaj homoj.

Iutage la amika paro disputegis pro



io, kion oni ne sciis. La tigro diris: "Ĉiuj scias, ke la malvarmo venas kiam la luno malkreskas de pleneco al arko." La leono respondis: "De kie vi aŭdis la absurdaĵon? Ĉiuj scias, ke malvarmo venas kiam la luno kreskas de arko al pleneco."

Ilia diskutado pli kaj pli intensiĝis, kaj neniu povis konvinki la alian. Anstataŭ atingi la konkludon por ĉesigi la disputadon, ili eĉ ekinsultis unu la alian. Timante rompiĝon de sia amikeco, ili decidis konsulti la erudician monaĥon. Li certe sciis ĉion pri tio.

Veninte antaŭ la paceman ermiton, la leono kaj tigro sin klinis respekte al li kaj parolis pri sia disputado. La amikema monaĥo respondis post momenta pripenso:

"Malvarmo okazas en ĉiu lunfazo, de plenluno al lunarko kaj de lunarko al plenluno. La vento portas malvarmon, ĉu de okcidento, de nordo aŭ de oriento. Do vi ambaŭ estas pravaj, kaj neniu el vi estas venkita de la alia. La plej grava afero estas vivi unuece kaj harmonie sen konflikto. Unueco estas plej grava."

La leono kaj tigro dankis la saĝan ermiton. Ili daŭre vivis feliĉe kiel intimaj amikoj.

La moralinstruo estas: Malgraŭ ŝanĝiĝemo de la vetero, la amikeco ĉiam restas senŝanĝa.

## 18. KAPRO KAJ PASTRO



[Senscieco]

Iam antaŭ longa tempo estis tre fama pastro de antikva religio. Li certis, ke estas ĝusta tago por rito oferi kapron. Pro sia senscieco li opiniis, ke tio estas ofero postulata de lia dio.

Li trovis konvenan kapron por la ofera rito. Li ordonis, ke liaj servistoj portu la kapron al sankta rivero por ĝin bani kaj ornami per florkronoj. Poste, ili sin banis kiel parto de la sinpuriga praktikado.

Atinginte la riverbordon, la kapro subite komprenis, ke ĝi neeviteble estos

mortigita. Ĝi ankaŭ eksciis pri siaj pasintaj naskiĝoj, mortoj kaj renaskiĝoj. Ĝi konsciis, ke okazos la lasta rezulto de ĝiaj pasintaj fikondutoj. Do ĝi eligis laŭtan ridegon laŭ la kapra maniero, similan al frapado de cimbaloj.

Dum la ridado, ĝi konsciis pri alia fakto, ke la pastro suferos saman teruran rezulton pro sia malsaĝa mortigo. Do ĝi ekploregis tiel laŭte kiel ĝi ĵus ridegis.

La servistoj sin banantaj en la sankta rivero aŭdis unue la ridegon, kaj poste la ploregon. Ili ekmiris, kaj demandis la kapron: "Kial vi ridegis tiel laŭte kaj ankaŭ ploregis same brue? Kio kaŭzis tion?" La kapro respondis: "Mi diros la kaŭzon al vi, sed nur dum ĉeesto de la

pastro, via mastro."

Pro granda scivolemo, ili senprokraste portis la oferotan kapron al la pastro. Ili raportis la okazaĵon al li. La pastro ankaŭ estis scivola. Li demandis la kapron respektoplene: "Kial vi ridegis tiel laŭte kaj poste ploregis same laŭte, sinjoro?"

Diris la kapro kun memoro pri siaj antaŭaj vivoj: "Antaŭ longa tempo ankaŭ mi estis pastro same kiel vi, bone edukita pri ofera rito de la religio. Mi opiniis, ke oferi kapron estis necese al la dio, kiu benos la aliajn kaj ankaŭ min mem en niaj estontaj renaskiĝoj. Sed la vera rezulto de mia konduto estis, ke mi suferis de senkapiĝo en ĉiu el miaj sekvaj 499 vivoj."

"Kiam vi pretigis min kiel la oferaĵon

hodiaŭ, mi konsciis, ke hodiaŭ estos la 500-a fojo de mia senkapiĝo. Poste mi tute liberiĝos de ĉiuj konsekvencoj pro miaj malbonaj kondutoj faritaj antaŭ longa tempo. Mi ridegis nedeteneble pro ĝojo."

"Poste, mi subite konsciis, ke vi, la pastro, ripetos la saman malbonan konduton, kaj suferos la teruran senkapiĝon en ĉiu el viaj sekvaj 500 vivoj! Do pro miaj kompatoj kaj simpatio, mia ridego fariĝis plorego."

La pastro timis, ke eble pravus la diro de la kapro, do li diris: "Bone, sinjoro Kapro. Mi ne mortigos vin." La kapro respondis: "Estimata pastro, eĉ se vi ne mortigos min, mi scias, ke hodiaŭ mi perdos mian kapon kaj liberiĝos finfine de

la konsekvenco de mia antaŭa fikonduto."

La pastro diris: "Ne timu, mia bona kapro. Mi protektos vin laŭ mia eblo kaj persone garantios al vi, ke neniuj damaĝoj okazos al vi." Sed la kapro respondis: "Ho, pastro, la forto de via protekto estas tro malforta kompare kun tiu de la konsekvenco kaŭzita de mia fikonduto."

La pastro rezignis la decidon pri la ofera rito, kaj ne plu volis mortigi senkulpajn bestojn. Li liberigis la kapron, kaj kune kun siaj servistoj, sekvis ĝin por protekti ĝin de la eventuala danĝero.

La kapro iris en rokplenan lokon. Ĝi vidis kelkajn freŝajn foliojn sur branĉo kaj etendis la kolon por atingi ilin. Subite aperis tondroŝtormo de kie oni ne sciis.

Fulmo trafis supre pendantan rokon, kaj faligis akran rokpecon. La falinta rokpeco hazarde dehakis la kapon de la kapro! Ĝi tuj mortis, kaj ankaŭ la tondroŝtormo ĉesis.

Informiĝinte pri la afero tre stranga, centoj da lokanoj venis al la loko. Neniu havis komprenon pri la stranga okazaĵo.

Estis feo loĝanta en proksima arbo. Li vidis la tutan okazaĵon. Li aperis leĝere frapante siajn flugilojn en la supran aeron kaj ekinstruis ilin, dirante: "Rigardu, kio okazis al la kompatinda kapro. Tio estis rezulto de bestmortigado. Ĉiuj vivestaĵoj naskiĝas kaj suferas pro la malsano, maljuniĝo kaj morto. Ĉiuj deziras daŭre vivi, anstataŭ morti. Sen konscio pri



tiu ordinara afero, iuj mortigas aliajn vivestaĵojn. Tio kaŭzos suferon ankaŭ al la mortiganto ne nur en la nuna, sed ankaŭ en sennombre estontaj vivoj."

"Sen scio, ke ĉiuj malbonaj kondutoj kaŭzos suferon al la farantoj, iuj daŭre mortigas kaj akumulas pli da sufero al si mem en la estonteco. Ĉiufoje kiam ili mortigas, parto de ili devas ankaŭ perdi la nunan vivon, kaj ilia sufero daŭros eĉ per renaskiĝo en la inferaj mondoj!"

Aŭdinte la feon, ili opiniis, ke ili estas fortunaj. Ili rezignis la malsaĝan mortigadon, kaj ekĝuis feliĉon tiel en kuranta vivo kiel en estontaj.

La moralinstruo estas: Eĉ religio eble estas fonto de malsaĝo.

## 19. FEO EN BANJANO



### [Malbona Promeso]

Antaŭe, kaj eĉ hodiaŭ, homoj estas superstiĉaj en iuj regionoj. Unu el la superstiĉoj estas, ke arba feo aŭ alia spirito loĝas en dika aŭ neordinara arbo. Ili opinias, ke ili povas preĝi kaj fari promeson al la arba feo por ke li helpu realigi ilian deziron iamaniere. Ili devas plenumi sian promeson, kiam ili opinias, ke la feo jam faris la helpon.

Iam viro hazarde renkontis dikan banjanon en Urbo Kasio de Norda Hindio. Li tuj ekpensis, ke feo loĝas tie. Do li faris

preĝon kaj promesis al la arba feo, ke li oferos bestojn al la feo, se la lasta realigos lian deziron.

Hazarde realiĝis lia deziro, sed neniu sciis, ĉu pro la helpo de feo aŭ spirito, aŭ pro aliaj kaŭzoj. La viro certigis al si mem, ke la arba feo jam respondis lian preĝon, do li volis plenumi sian promeson.

Li decidis fari grandan oferon pro la realigita dezirego. Li alportis multe da kaproj, muloj, kokoj kaj ŝafoj. Li kolektis brullignon kaj pretis bruligi la senhelpajn bestojn kiel oferaĵon.

Spirito vivanta en Banjano aperis kaj diris: "Ho, amiko, vi faris promeson, kaj nun vi estas ligita per la promeso. Vi opiniis, ke vi devas plenumi la promeson

por vin liberigi. Sed se vi faros tiel teruran mortigon kvankam laŭ via promeso, la malfeliĉa rezulto puŝos vin en pli grandan malliberecon, ĉar vi suferos pro mortigo al aliaj vivestaĵoj, kaj eĉ renaskiĝos en la infero. La nura metodo por liberigi vin de la estonta kondamno estas rezigni vian malbonan konduton malgraŭ ĉio."

"Kaj krome, vi pensis, ke mi vere estas feo. Do, kiel vi opiniis, ke mi manĝas viandon? Ĉu vi ne aŭdis, ke ni feoj prenas pli bonajn manĝaĵojn kiaj ambrozio, stelroso kaj sunlumo? Mi bezonas nek viandan nek alian manĝeblan oferaĵojn." Poste li malaperis.

La malsaĝulo konsciigis pri sia eraro. Anstataŭ fari la malbonan konduton

kaŭzantan suferan destinon al li en postaj vivoj, li tutkore ekfaris bonan konduton favoran al li kaj aliaj.

La moralinstruo estas: Estas pli malbone plenumi malbonan promeson ol fari ĝin.

## 20. SIMIA REĜO KAJ AKVA DEMONO



[Singardemo]

Iam antaŭ longa tempo en malproksima kaj profunda arbaro estis regno de 80000 simioj. Ili havis reĝon tiel grandan kiel cervidon. Li estis granda ne nur korpe, sed ankaŭ anime. Fakte, li estis Bodisatvo, la iluminiĝinto.

Iutage li avertis siajn regnantojn, dirante: "Miaj popolanoj, estas venenaj fruktoj en tiu ĉi profunda arbaro, kaj ankaŭ lagetoj posedataj de demonoj. Se vi vidos neordinaran frukton aŭ ne konatan

laĝeton, ne manĝu aŭ trinku sen demandi min unue." Estante atentaj al sia saĝa reĝo, la simioj konsentis obei la ordonon.

Poste ili venis al nekonata laĝeto. Neniu el ili volis trinki akvon antaŭ ol demandi la reĝon, kvankam ili suferis de grandaj laceco kaj soifo pro serĉado de manĝaĵo. Do ili nur sidis sur arboj kaj sur la tero ĉirkaŭ la laĝeto.

Veninte al siaj popolanoj, la reĝo demandis: "Ĉu iu el vi trinkis la akvon?" Ili respondis: "Ne, Via Reĝa Moŝto. Ni obeis vian ordonon." Li diris: "Bonege."

Poste li paŝis laŭ la bordo ĉirkaŭ la laĝeto. Li ekzamenis la piedsignojn de bestoj irintaj en la akvon, sed vidis neniun piedsignon revenintan el la akvo! Do

li konsciis, ke la lageton posedas akva demono. Li diris al la 80000 simioj: "La lageton posedas akva demono. Neniu eniru."

Post nelonge, la akva demono vidis, ke neniu el la simioj iris en la akvon por trinki. Do en formo de timiga monstro li sin montris el la mezo de la lageto. Li havis grandan bluan ventron, ruĝajn ungegojn kaj piedojn, kaj blankan vizaĝon kun elstaraj verdaj okuloj. Li diris: "Kial vi nur sidas ĉirkaŭe? Tuj venu en la lageton kaj trinku akvon."

La simia reĝo demandis al la terura monstro: "Ĉu vi estas la akva demono posedanta la lageton?" Li respondis: "Jes. Mi estas." La simia reĝo demandis: "Ĉu



vi manĝas ĉiujn, kiuj iris en la akvon?" Li respondis: "Jes. Prave, inkluzive de birdoj. Mi manĝas ilin ĉiujn. Kaj kiam via soifego pelos vin en la laĝeton por trinki, mi des pli ĝuoplene manĝos vin, la plej grandan simion el ĉiuj." Li grimacis kaj salivo gutadis de lia harplena mentono.

Sed la reĝo restis trankvila kun bone trejnita menso. Li diris: "Mi ne lasos vin manĝi min aŭ eĉ unu el miaj sekvantoj. Kaj krome, ni trinkos akvon laŭplaĉe!" La akva demono gruntis: "Tute ne eble! Kiel vi povus tion fari?" La simia reĝo respondis: "Ĉiu el ni 80000 simioj trinkos per bambueto kiel suĉtubo. Kaj vi neniel kapablos atingi nin."

Kompreneble, ĉiuj, kiuj vidis bambuon,

scias bone, ke estas malfacile trinki per bambueto. Bambuoj kreskas ŝalmo-post-ŝalme kaj inter du ŝalmoj estas nodo. Se simioj uzas unu ŝalmon por trinki akvon, la tubo estas tiel mallonga, ke la demono povas kapti ilin, treni ilin sub la akvon kaj engluti ilin. Sed pro la nodoj, estas neeble suĉi akvon tra pli ol unu ŝalmo.

La simia reĝo estis eksterordinara. Jen la kaŭzo, kial tiel multaj simioj sekvis lin. En la pasinteco li faris bonon kaj trejnis sian menson kun tiel grandaj peno kaj atentemo, ke li disvolvis sian mensan kvaliton tre bone, kaj tial oni diris, ke li havas "grandan menson", sed ne simple tiel, ke li havas "grandan cerbon".

La Iluminiĝinto kapablis teni la

bonan kvaliton en sia menso, kaj faris eksterordinaran miraklon. Unue, li prenis freŝan bambueton, trablovis por sennodigi ĝin, kaj suĉis akvon per ĝi el la lageto. Poste, eble estis pli mirinde, ke li svingis sian manon kaj ĉiuj bambuoj kreskantaj ĉirkaŭ la lageto perdis siajn nodojn. Ili fariĝis novspeca bambuo.

Poste, ĉiu el liaj 80000 sekvantoj prenis bambueton kaj tute facile trinkis akvon ĝiskontente. La akva demono tute ne povis kredi siajn okulojn. Grumblante, li enmerĝiĝis lasante gluglantajn vezikojn malantaŭ si.

La moralinstruo estas: Esploru antaŭ ol salti en akvon.

## 21. ARBO KAJ ĈASISTO



### [Malpacienco]

Iam antilopo vivis en profundo de arbaro. Ĝi manĝis fruktojn falintajn el arboj. Ĝi precipe ŝatis fruktojn de unu arbo.

En la sama regiono vivis ĉasisto, kiu kaptis kaj mortigis antilopojn kaj cervojn. Li metis fruktojn kiel allogaĵon sub arbo. Poste, li atendis kaŝe en la supraj branĉoj. Li tenis ŝnuran maŝon pendigitan de la arbo sur la tero ĉirkaŭ la fruktoj. Kiam besto manĝis la frukton, la ĉasisto streĉigis la maŝon kaj kaptis ĝin.

Frumatene la antilopo venis al la plej plaĉa arbo por serĉi fruktojn. Ĝi tute ne vidis la ĉasiston kaŝiĝantan sur la arbo kun maŝo pretigita. La antilopo estis singardema malgraŭ malsatego. Ĝi atentis pri la eventuala danĝero. Ĝi vidis la bongustajn kaj maturajn fruktojn sub la plej plaĉa arbo kaj pensis, kial neniu el ili estis manĝita de bestoj. Do ĝi timis, ke entio estas ia intrigo.

La ĉasisto vidis, ke la antilopo alvenis de malproksimo. Vidinte, ke ĝi haltis kaj aspektis singardema, li timis, ke li ne povos kapti ĝin. Li tiel maltrankviliĝis, ke li ekĵetis fruktojn en la direkton de la antilopo por logi ĝin veni pli proksimen.

Sed la antilopo estis tre saĝa. Ĝi sciis,

ke la fruktoj nur falis de la arboj vertikale. Ĝi ekkonsciis, ke estas danĝero, ĉar la fruktoj flugis al ĝi. Ĝi do atente esploris la arbon, kaj vidis la ĉasiston inter la branĉoj. Sed ĝi ŝajnigis ne vidi lin.

Ĝi diris al la direkto de la arbo: "Ho, mia kara fruktoarbo, vi kutime donis viajn fruktojn al mi tiel, ke vi lasis ilin fali vertikale sur la teron. Nun ĵetante la fruktojn al mi, vi tute ne kondutas kiel arbo! Vi ŝanĝis vian kutimon, do ankaŭ mi ŝanĝu la mian. Ekde nun mi nur manĝos fruktojn de alia arbo kiu ankoraŭ kondutas kiel arbo."

La ĉasisto ekkonsciis pri sia eraro kaj vidis, ke la antilopo estas pli saĝa ol li. Li koleriĝis kaj kriegis: "Vi sukcesis forfuĝi

de mi ĉifoje, saĝa antilopo, sed mi certe kaptos vin alifoje!"

La antilopo konsciis, ke la ĉasisto sin montris pro kolero, do ĝi diris al la direkto de la arbo. "Vi ne nur neniel kondutas kiel arbo, sed ankaŭ kondutas kiel ĉasisto! Vi malsaĝulo vivanta per mortigado al bestoj! Vi ne komprenis, ke mortigi senkulpajn vivestaĵojn ankaŭ suferigos vin kaj en tiu ĉi vivo kaj en la estontaj vivoj renaskiĝonte en la infera mondo. Estas klare, ke ni antilopoj estas pli saĝaj ol vi. Ĉar ni manĝas fruktojn, ni ne kulpas pro mortigado kaj suferigo al aliaj vivestaĵoj."

Tion dirinte, la atentema antilopo kuris en densan arbaron kaj ne plu vidiĝis.

La moralinstruo estas: Saĝulo restas  
senkulpa.



## 22. LA HUNDA REĜO ARGËNTO



[Justeco]

Iam antaŭe la reĝo de Benareso iris al sia plezura ĝardeno en la ĉaro ornamita per valorajoj. Li ŝategis sian ĉaron ĉefe pro la ledaj rimenoj valoraj kaj delikate manfaritaj.

Foje li restis en la plezura ĝardeno tutan tagon ĝis la vespero. Estis jam malfrue kiam li revenis en la palacon, do li lasis sian ĉaron ekstere en la korto anstataŭ konvene ŝlosi ĝin en la ĉarejo.

Pluvegis dum la nokto. La ledaĵo malsekiĝis, ŝveliĝis, moliĝis kaj eligis

ledan odoron. La tro dorlotitaj palacaj hundoj flaris la ledan odoron kaj iris en la korton. Ili mordis kaj maĉis la molan kaj malsekan ledaĵon de la ĉaro. Antaŭ tagiĝo ili revenis nerimarkite al sia loko en la palaco.

Kiam la reĝo vekiĝis kaj eliris en la korton, li vidis, ke la ledaĵo estis jam dismaĉita kaj formanĝita de hundoj. Li alvenigis la servistojn kaj demandis ilin pri la okazaĵo.

La servistoj, kiuj respondecis flegi la palacajn hundojn, timis, ke la reĝo kulpigos ilin. Do ili mensogis, ke sovaĝaj hundoj en la urbo eniris tra la akvaj kanaloj kaj formanĝis la valoran ledaĵon.

La reĝo eksplodis de kolero. Li tiel

koleriĝis, ke li volis sin venĝi kontraŭ ĉiuj hundoj, do li dekretis tuj mortigi la hundojn, kiam ajn oni vidas ilin en la urbo.

La popolanoj ekmortigis hundojn. La hundoj ne povis kompreni, La hundoj ne povis kompreni, kial homoj subite volas ilin mortigi. Iom malfrue de tiu tago ili informiĝis pri la dekreto de la reĝo. Ili teruriĝis kaj fuĝis en la tombejon ekster la urbo. Tie loĝis ilia estro, la Hunda Reĝo Arĝento.

Arĝento fariĝis la reĝo ne pro la plejaj grandeco, fortenco aŭ decidemo. Ĝi estis mezalta en staturado kun arĝentaj haroj glataj, nigraj okuloj brilaj kaj suprenlevitaj oreloj atentemaj. Ĝi piediris kun digno.

Tio gajnis la admiron kaj respekton de homoj kaj hundoj. En sia longa vivo ĝi lernis multe, kaj povis koncentri sian menson sur la plej gravan aferon. Do ĝi fariĝis la plej saĝa el ĉiuj hundoj kaj la plej prizorgema al la aliaj. Jen la kaŭzo, kial ĝi fariĝis la reĝo de hundoj.

La hundoj dronis en granda tumulto en la tombejo. Ili teruriĝis morte. La Hunda Reĝo Arĝento demandis ilin pri la kaŭzo. Ili informis al ĝi ĉion pri la rimenoj de la ĉaro, kaj la dekreto de la reĝo, ke oni mortigu ĉiujn hundojn viditajn kiam ajn.

La Reĝo Arĝento sciis, ke estis tute neeble trudiĝi en la bone garditan palacon. Do ĝi konkludis, ke la ledajon formanĝis la hundoj vivantaj en la palaco.

Ĝi pensis: "Ni hundoj scias bone, ke ni ĉiuj havas sangan rilaton inter ni, malgraŭ niaj malsamaj aspektoj. Do nun mi devas laŭeble klopodi por savi la vivon de ĉiuj kompatindaj hundoj, miaj parencoj. Neniu kapablas savi ilin krom mi."

Ĝi konsolis ilin, dirante: "Ne timu. Mi savos vin ĉiujn. Restu en la tombejo kaj ne iru en la urbon. Mi diros al la reĝo de Benareso, kiuj estas ŝtelistoj kaj kiuj estas senkulpaj. La vero savos nin ĉiujn."

Antaŭ la ekvojaĝo, ĝi iris al alia parto de la tombejo por resti sola. Farinte bonon kaj sin kulturinte dum la tuta vivo, tiam ĝi koncentris sian penson, kaj plenigis sian menson per kompatemo. Ĝi preĝis: "Ĉiuj hundoj estu bonfartaj kaj feliĉaj. Ĉiuj

hundoj estu sekuraj. Mi iros al la palaco por favoro al hundoj kaj ankaŭ homoj. Neniu ataku min kaj faru malutilon al mi."

Poste, la Hunda Reĝo Arĝento ekpaŝis malrapide tra la stratoj de Benareso. Pro la mensa koncentriĝo, ĝi sentis neniom da timo. Pro sia bonfarado en multaj jaroj, ĝi iris kun respektinde trankvila digno. Kaj pro la favora influo de ĝia kompatemo perceptebla por ĉiuj homoj, neniu sentis koleron aŭ intencon atenci ĝin kiam ili vidis ĝin. Anstataŭe, kiam preterpasis la Granda Hundo, ili miregis, kial tio povus okazi.

La tuta urbo estis kvazaŭ sorĉita. Sen ajna malhelpo, la Hunda Reĝo Arĝento paŝis preter la palacaj gardistoj, rekte iris

en la kortegan halon de justeco kaj sidiĝis kviete sub la sidejo de la reĝo. La reĝo de Benareso admiris ĝiajn kuraĝon kaj dignon. Do kiam la servistoj venis por forpeli ĝin, la reĝo ordonis, ke ili lasu ĝin resti.

La Hunda Reĝo Arĝento iris antaŭ la majestan reĝon de Benareso el sub la sidejo. Ĝi respekte riverencis kaj demandis: "Via Reĝa Moŝto, ĉu vi ordonis, ke oni mortigu ĉiujn hundojn en la urbo?" La reĝo respondis: "Jes. Mi faris la ordonon." La hunda reĝo demandis: "Kian kulpon faris la hundoj?" La reĝo respondis: "Hundoj formanĝis mian belan kaj valoran ledajon." Reĝo Arĝento demandis: "Ĉu vi scias, kiuj hundoj tion faris?" La reĝo de

Benareso respondis: "Neniu scias."

"Via Reĝa Moŝto," diris la hundo, "Por reĝo tiel saĝa kiel vi, kiu tenas justecon, ĉu estas prave mortigi ĉiujn hundojn anstataŭ nur kelkajn kulpajn? Ĉu tio estas justa al la senkulpaj hundoj?" Konsciinte pri sia manko, la reĝo respondis: "Ĉar mi ne scias, kiuj hundoj damaĝis mian ledajon, do nur per la ordono mortigi ĉiujn hundojn mi povos puni la kulpulojn. La reĝo devas esti justa!"

La Hunda Reĝo Arĝento paŭzis momenton antaŭ ol refuti la reĝon per serioza demando: "Via Reĝa Moŝto, ĉu estas la fakto, ke vi ordonis mortigi ĉiujn aliajn hundojn, aŭ vi lasos nur kelkajn ne mortigitaj?" La reĝo subite embarasiĝis



kiam li devis agnoski antaŭ ĉiuj siaj korteganoj: "Vere, plejparto de la hundoj estos mortigita, sed ne ĉiuj. La bonaj purrasaj hundoj en mia palaco estos ŝparitaj."

Tiam la hunda reĝo diris: "Via Reĝa Moŝto, antaŭe vi diris, ke ĉiujn hundojn oni mortigos por certigi, ke la kulpaj hundoj estos punitaj. Nun vi diris, ke viaj palacaj hundoj estos ŝparitaj. Tio montras, ke vi faras eraron pro la antaŭjuĝo. Por reĝo, kiu volas esti justa, estas erare favori al iuj, sed ne al la aliaj. La reĝa justeco devas esti ekvilibra kiel honesta pesilo. Kvankam vi jam dekretis sendistingan mortigon al ĉiuj hundoj, tamen fakte tio nur celas la malriĉajn hundojn. Viaj riĉaj

palacaj hundoj estos ŝparitaj dum la malriĉaj hundoj estos maljuste traktitaj kaj erare mortigitaj!"

Konsciinte la veron diritan de la hunda reĝo, la reĝo de Benareso demandis: "Ĉu vi estas sufiĉe saĝa por scii, kiuj hundoj formanĝis miajn ledajn rimenojn?" Ĝi respondis: "Jes, Via Reĝa Moŝto. Mi scias pri tio. Ili estas nur la palacaj hundoj favorataj de vi. Mi povas pruvi tion." La reĝo petis: "Do faru tion."

La hunda reĝo petis, ke oni alkonduku la palacajn favoratojn en la halon de justeco kaj bredu ilin per miksaĵo de butero, lakto kaj herbo. Tion manĝinte, la hundoj elvomis parte digestitajn pecetojn de la reĝaj ledaĵoj!

Poste, la Hunda Reĝo Arĝento diris: "Via Reĝa Moŝto, neniu el la malriĉaj hundoj en la urbo povas eniri la bone garditan palacon. Vi estas blindigita de antaŭjuĝo. Nur viaj palacaj hundoj estas kulpaj. Krome, mortigi vivestaĵojn estas malbona konduto. Tion scias ni hundoj, por ne paroli pri homoj. Ĉiuj vivestaĵoj rilatas unu al alia, do ni devas respekti ĉiujn vivestaĵojn kiel parencojn!"

La tuta kortego miris pri la okazaĵo. La reĝon de Benareso regis malofte humila sento. Li riverencis antaŭ la hunda reĝo kaj diris: "Ho, Granda Reĝo de hundoj, mi neniam vidis iun ajn kiel vin, kiu kombinas perfektan saĝon kaj grandan kompatemon. Vere, via justeco estas la

plej supera. Mi oferos miajn tronon kaj regnon de Benareso al vi!"

La Iluminiĝinto respondis: "Stariĝu, Via Reĝa Moŝto. Mi ne deziras homan kronon. Se vi volas montri vian respekton al mi, estu reganto justa kaj kompatema. Tio helpos, se vi ekpurigos vian menson per praktiko de kvinŝtupa trejnado. Tio helpas forigi kvin malbonajn kondutojn, kiuj estas: mortigado, ŝtelado, seksa miskonduto, mensogo kaj drinkado de alkoholaĵo."

La reĝo sekvis la instruon de la saĝa hunda reĝo. Li regis la landon kun granda respekto al ĉiuj vivestaĵoj. Li ordonis, ke oni nutru hundojn en la palaco kaj en la urbo kiam ajn ili manĝas. Tio estis la

komenco de amikeco inter hundoj kaj homoj, kiu daŭras ĝis hodiaŭ.

La moralinstruo estas: Antaŭjuĝo kondukas al maljusteco, dum saĝo al justeco.

## 23. LA GRANDA ĈEVALO ĈIOSCIO



[Kuraĝo]

Iam Reĝo Brahmadata regis Benareson en Norda Hindio. Li havis potencan ĉevalon, kiu naskiĝis en Regno Sindho situanta en Hindia Rivervalo de Okcidenta Hindio. Fakte, La ĉevalo estis luminiĝinto.

La ĉevalo estis ne nur granda kaj forta, sed ankaŭ saĝa kaj inteligenta. Kiam ĝi estis ankoraŭ juna, oni rimarkis, ke ĝi ĉiam anticipe komprenas la deziron de la rajdanto. Do oni nomis ĝin Ĉioscio.

Oni opiniis, ke ĝi estas la plej bona

el la reĝaj ĉevaloj, do ili bredis ĝin per plej bona rimedo. Ĝia ornamita stalo estis ĉiam pura kaj bela. Ĉevaloj estas fidelaj al siaj mastroj. Ĉioscio estis precipe lojala kaj dankema al la reĝo pro la bona prizorgiteco. Ĉioscio estis la plej kuraĝa el ĉiuj reĝaj ĉevaloj, do la reĝo respektis kaj fidis ĝin.

Foje, sep najbaraj reĝoj kunagis por militi kontraŭ la reĝo Brahmadata. Ĉiu el la reĝoj kondukis kvar grandajn armeojn: elefantan kavalerion, ĉevalan kavalerion, ĉaran kavalerion kaj armeon de piedirantaj soldatoj. La sep reĝoj kune ĉirkaŭis la urbon de Benareso kun siaj armeoj.

La reĝo Brahmadata kunvenigis siajn ministrojn kaj konsilantojn por fari planon

defendi la regnon. Ili proponis: "Ne cedu. Ni devas batali por defendi nian altan pozicion. Sed komence vi ne rajtas riski vian regantecon partopreni en la milito. Anstataŭe, elsendu la ĉampionon de ĉiuj kavaliroj al la milito kiel via delegito. Vi nur devos eliri se li malvenkos."

Do la reĝo alvenigis la kavalaran ĉampionon kaj demandis lin: "Ĉu vi kapablas venki la sep reĝojn?" La ĉampiono respondis: "Se vi permesos, ke mi elrajdu grandan ĉevalon Ĉioscion, la plej kuraĝan, saĝan kaj fortan, nur tiam mi povos venki en la milito." La reĝo konsentis kaj diris: "Mia ĉampiono, en la tempo de danĝero mi konfidas la sekurecon de la regno al vi kaj Ĉioscio.



Prenu ĉion, kion vi bezonas."

La ĉampiono iris al la reĝa ĉevalejo. Li ordonis, ke oni nutru Ĉioscion bone kaj armu ĝin per kiraso bele ornamita. Poste li respekte riverencis al la ĉevalo kaj grimpis sur la belan selon.

Ĉioscio sciis pri la situacio. Ĝi pensis: "La sep reĝoj venis ataki mian regnon kaj mian reĝon, kiu bredas, prizorgas kaj fidas min tiel bone. Ne nur la sep reĝoj, sed ankaŭ iliaj pli grandaj kaj potencaj armeoj minacas mian reĝon kaj ĉiujn homojn en Benareso. Mi ne lasos ilin venki, nek permesos la kavaliran ĉampionon mortigi tiujn reĝojn. Alie ankaŭ mi dividos la malbonan konduton forrabi vivon de aliaj por gajni ordinaran venkon. Anstataŭe, mi

instruos al ili novan metodon. Mi kaptos ĉiujn sep reĝojn sen mortigo. Tio estos vere granda venko."

Ĉioscio diris al la rajdanto: "Sinjoro Kavaliro, ni gajnu la militon per nova metodo mortigi neniun. Vi kaptu nur unu reĝon ĉiufoje, kaj restu firme sur mia dorso. Mi trovu la taŭgan vojon tra la malamikoj. Rigardu min dum vi rajdos. Mi montros al vi la kuraĝon superi malnovan metodon, la metodon de mortigado."

Kiam la nobla ĉevalo parolis pri la "nova metodo", "la taŭga vojo" kaj "la supera kuraĝo", ŝajne ĝi fariĝis pli granda ol sia staturo. Ĝi sin levis majeste kun la fortaj postaj kruroj sur la tero, kaj suben rigardis ĉiujn malamikojn ĉirkaŭ la

urbo. Ĉiuj koncentris sian rigardon sur la majestan ĉevalon. La tero tremis kiam ĝiaj antaŭaj hufoj refalis sur la teron kaj ĝi tuj sturmis en la mezon de la kvar armeoj de la unua reĝo. Ŝajne ĝi havis rapidecon de fulmo, forton de cent elefantoj kaj gloran memfidon de bravulo el alia mondo.

En la memoro de la elefantoj ili neniam vidis tian ĉevalon kia Ĉioscio, do la elefanta kavalerio retiriĝis pro timo. La ĉevaloj sciis, ke tiu ĉi parenco estas la vera kompetenta estro de ili, do la ĉevala kavalerio kaj ĉara kavalerio staris kviete kaj klinis sian kapon kiam la Grandulo preterpasis. La soldatoj de la infanterio diskuris kiel muŝoj pelataj de forta vento.

Apenaŭ la unua reĝo komprenis, kio

okazis, li jam estis kaptita kaj portita en la urbon de Benareso. Kaj tio same okazis al la dua, tria, kvara kaj kvina reĝoj.

La sesa reĝo estis kaptita en la sama maniero, sed unu el liaj lojalaj korpogardistoj saltis el la kaŝejo, kaj pikis sian spadon en la korpoflankon de la brava Ĉioscio. Kun sango fluanta el la vundo, ĝi portis la ĉampionon kaj la kaptitan sesan reĝon en la urbon.

Kiam la ĉampiono vidis la seriozan vundon de la ĉevalo, li ne plu kuraĝis rajdi la malfortiĝantan Ĉioscion por kontraŭbatali la sepan reĝon. Do per kiraso li ekarmis alian potencan militan ĉevalon, kiu estis ĝuste tiel granda kiel Ĉioscio.

Vidinte tion, Ĉioscio pensis kvankam en granda doloro pro la mortiga vundo: "La ĉampiono jam perdis sian kuraĝon tiel rapide. Li ankoraŭ ne komprenis, ke la vera naturo de mia potenco estas la saĝo gajni la veran pacon nur per pacaj metodoj. Li klopodos venki la sepan reĝon kaj liajn armeojn en ordinara maniero, rajdante ordinaran ĉevalon."

"Post la unua paŝo abstini de mortigado al vivestaĵoj, mi ne rajtas ĉesi duonvoje. Alie mia granda klopodo por instrui novan metodon vaniĝos kiel fadeno falinta en akvon!"

La granda ĉevalo Ĉioscio diris al la ĉampiono: "Sinjoro Kavaliro, la sepa reĝo kaj liaj armeoj estas la plej potencaj el ĉiuj.

Rajdante ordinaran ĉevalon, vi ne povos venki eĉ se vi mortigos milojn da soldatoj kaj bestoj. Mi, el potenca raso de Sindhaj ĉevaloj, estas nomata Ĉioscio. Nur mi povas trairi ilin kaj kapti la sepan reĝon viva sen damaĝo al ili!"

La ĉampiono rekolektis sian kuraĝon. La brava ĉevalo perforte sin starigis malgraŭ la granda doloro. Kun la fluanta sango, ĝi henis kaj sin trudis tra la kvar armeojn. La ĉampiono alportis la lastan el la sep militemaj reĝoj. Ĉiuj sur la vojo denove sin tiris por eviti vundiĝon. Vidinte, ke iliaj sep reĝoj estis kaptitaj, ĉiuj soldatoj demetis siajn armilojn kaj petis paciĝon.

Konsciinte, ke la granda ĉevalo

Ĉioscio ne povos travivi la nokton, Reĝo Brahmadato iris al ĝi. Li bredis la ĉevalon ekde ĝia ideco, do li amis ĝin treege. Kiam li vidis, ke la ĉevalo estas mortanta, liaj okuloj plenis de larmoj.

Ĉioscio diris: "Via Reĝa Moŝto. Mi servis al vi sufiĉe bone. Mi jam penegis ĝis ekstremo kaj montris novan metodon. Nun vi devas garantii mian lastan peton. Vi devas ne mortigi tiujn sep reĝojn eĉ se ili faris eraron kontraŭ vi, ĉar sanga venko semos alian militon. Indulgu ilin pri la atako al vi. Lasu ilin reiri al sia regno, tiel ke vi vivos en paco ekde nun."

"Kian ajn rekompencon vi donos al mi, donu tion al la kavalira ĉampiono anstataŭe. Nur faru bonon, estu ankaŭ

malavara, honoru la veron, kaj ne plu mortigu vivestaĵojn. Regu nian regnon per justeco kaj kompatemo."

Poste ĝi fermis la okulojn kaj faris la lastan elspiron. La reĝo eksplodis de ploro, kaj ĉiuj funebris pro ĝia forpaso. Kun granda estimo ili bruligis la korpon de la granda ĉevalo Ĉioscio, la luminiĝinto.

Reĝo Brahmato liberigis la sep reĝojn. Ankaŭ ili honoris la Grandulon, kiu venkis iliajn fortajn armeojn sen verŝi sangon krom la sian. Kiel memoro al ĝi, ili ĵuris pri eterna paco. Tiuj sep reĝoj kaj la reĝo Brahmato neniam konfliktis plue.

La moralinstruo estas: Paco estas akirebla nur per pacaj metodoj.



## 24. MALPURA BANAKVO



[Pureco]

Iam antaŭe en regno de Hindio, oni kutime kondukis la plej bonan el la kortegaj ĉevaloj al la rivero por ĝin bani. Foje, la ĉevalistoj kondukis ĝin al sama malprofunda lageto, kie ili ĉiam ĝin banis.

Sed antaŭ ilia alveno, oni banis ĉevalon malbonan kaj malpuran en la sama loko. La ĉevalo estis kaptita en la kamparo, kaj ĝi neniam baniĝis antaŭe en sia tuta vivo.

La bona reĝa ĉevalo snufis en la aero. Ĝi tuj sensis, ke malpura sovaĝa ĉevalo

sin banis en la sama loko kaj malpurigis la akvon. Tio malplaĉis al ĝi, do ĝi rifuzis baniĝi en la lageto.

La ĉevalistoj provis ĝin enakvigi laŭeble, sed neniel sukcesis. Do ili iris al la reĝo kaj plendis, ke la bone trejnita ĉevalo subite fariĝis obstina kaj malobeema.

La reĝo havis inteligentan ministron konatan pro kompreno al bestoj. Do la reĝo alvenigis lin kaj ordonis: "Bonvolu iri por rigardi, kio okazis al mia plej bona ĉevalo. Esploru, ĉu ĝi rifuzas baniĝi pro malsano aŭ aliaj kaŭzoj. El ĉiuj miaj ĉevaloj, mi opinias, ke tiu ĉi estas tiel bonkvalita, ke ĝi neniam lasas sin malpura. Certe okazis problemo."

La ministro iris sur la bordon de la

lageto senprokraste. Li tuj trovis, ke la reĝa ĉevalo estis ne malbonfarta, sed perfekte sana. Li ankaŭ rimarkis, ke la ĉevalo spiris laŭeble plej malrapide. Do li snufis en la aero, kaj flaris iom da fiodoro. Post atenta esplorado li trovis, ke la fiodoro venis de la malpura akvo en la lageto. Do li supozis, ke alia ĉevalo malpura baniĝis tie, tiel ke la reĝa ĉevalo rifuzis baniĝi en la malpura akvo pro sia ŝato al pureco.

La ministro demandis la ĉevalistojn: "Ĉu alia ĉevalo baniĝis en la lageto hodiaŭ?" Ili respondis: "Jes. Antaŭ nia alveno, oni banis malpuran sovaĝan ĉevalon ĉi tie." La ministro diris al ili: "Miaj karaj ĉevalistoj, jen estas la plej

bona ĉevalo de la reĝo. Ĝi amas purecon kaj ne volas baniĝi en malpura akvo. Do la nura afero, kion vi povas fari, estas nur konduki ĝin al la rivero, en kiu la akvo estas freŝa kaj pura, kaj banu ĝin."

Ili sekvis la proponon, kaj la reĝa ĉevalo plezure baniĝis en la nova loko.

La ministro revenis al la reĝo kaj raportis pri la okazaĵo. Li diris: "Vi estis prava, Via Reĝa Moŝto. Tiu ĉi ĉevalo vere estas tiel bonkvalita, ke ĝi neniel sin lasas malpuriĝi."

La reĝo admiris, ke lia ministro kapablas scii la intencon de ĉevalo. Do li rekompencis lin laŭmerite.

La moralinstruo estas: Pureco plaĉas eĉ al la besto.

## 25. VIRINA VIZAĜO



### [Influo]

Iam antaŭe la reĝo de Benareso havis elefanton bonkoran, paciencan, kaj mildan. Krom la milda karaktero, ĝi havis ankaŭ aminde ĝentilan vizaĝon. Do oni ameme nomis ĝin Virina Vizaĝo.

Iunokte, kelkaj rabistoj amasiĝis ekster la elefantejo. Ili interbabilis pri siaj planoj de prirabado en la mallumo. Ili parolis pri batado kaj mortigado. Ili ankaŭ fanfaronis, ke ili jam rezignis ordinaran bonecon, do ili ne plu kompatas siajn viktimojn. Ili uzis lingvaĵon de kruduloj kaj krimuloj

speciale por montri sian kruelecon al la aliaj.

Estas kviete en la nokto. Virina Vizaĝo havis nenion alian por fari ol aŭskulti la timigajn planojn kaj krudajn vortojn de la rabistoj. Ĝi aŭskultis atenteme, kaj parkeris ĉion en la maniero de elefantoj. Ĝi edukiĝis obei kaj respekti homojn, do ĝi opiniis, ke ĝi devas obei kaj respekti tiujn homojn, eĉ kiel instruistojn.

Poste pasis kelkaj noktoj. Virina Vizaĝo pensis, ke estas prave fariĝi kruda kaj kruela. Tio kutime okazis al tiu, kiu vivas kun nature kruelaj homoj, kaj ankaŭ precipe al tiu, kiu volas plaĉi al la aliaj.

Indianoj nomas specialan dresiston kaj brediston de elefantoj elefantisto. Frue en

iu mateno, la elefantisto de Virina Vizaĝo iris al ĝi kiel kutime. Lin subite atakis la elefanto, kies cerbo ankoraŭ plenis de la noktaj interbabiloj de la rabistoj. Ĝi kaptis lin per sia rostro, firme premis lin, ĵetis lin sur la teron kaj tuj mortigis lin. Poste, ĝi kaptis aliajn du helpantojn, mortigis ilin same feroce unu post la alia.

Post nelonge tra la tuta urbo cirkulis la informo, ke la iama adorata Virina Vizaĝo subite freneziĝis kaj fariĝis timiga mortiganto de homoj. Oni kuris al la reĝo por peti helpon.

La reĝo hazarde havis intelligentan ministron faman pro sia kompreno pri bestoj. Do la reĝo alvenigis lin kaj ordonis lin esplori, kiu malsano aŭ alia kaŭzo tiel

krudigis lian favoratan elefanton.

La ministro estis Bodisatvo, la luminiĝinto. Irinte en la elefantejon, li diris ĝentile mildajn vortojn al Virina Vizaĝo por trankviligi ĝin. Li ekzamenis ĝin kaj trovis, ke ĝi estas perfekte sana. Kiam li parolis afable al Virina Vizaĝo, li rimarkis, ke ĝi suprenlevis la orelojn kaj aŭskultis lin atenteme. Evidente la kompatinda besto avidis aŭskulti la ĝentilajn vortojn. Do la komprenema ministro konjektis, ke la elefanto aŭdis krudajn vortojn aŭ vidis kruelajn agojn de tiuj, kiujn ĝi erare prenis kiel siajn instruistojn.

Li demandis la gardistojn de la elefanto: "Ĉu vi vidis iujn vagantaj ĉe la



elefantejo dum nokto aŭ en alia tempo?" Ili respondis: "Jes, Ministro. Dum lastaj semajnoj kelkaj rabistoj kunvenis ĉi tie. Ni kuraĝis fari nenion kontraŭ ili, ĉar ili estas tre krudaj kaj kruelaj. Eble Virina Vizaĝo povis aŭdi ĉiun vorton de ili."

La ministro tuj revenis al la reĝo. Li raportis: "Via Reĝa Moŝto, mi trovis, ke Virina Vizaĝo, via favorata elefanto, estas en perfekte bona sanstato. Mi trovis, ke ĝi lernis ferocecon kaj kruelecon aŭdinte la vulgarajn kaj ofendajn vortojn de rabistoj dum multaj noktoj. Kontaktado kun malbonaj homoj ofte alkondukas malbonajn pensojn kaj agojn."

La reĝo demandis: "Kion fari?" La ministro proponis: "Nun mi devas

agi kontraŭe. Ni invitu saĝajn virojn kaj eminentajn monaĥojn kun nobla menso kaj bonkora naturo pasigi same multajn noktojn ekster la elefantejo. Tie ili interparolu pri la valoro de ordinaraj bonkonduto kaj pacienco alkondukantaj kompatemon, bonkoron kaj toleremon."

Do ĉio okazis bonorde. Dum pluraj noktoj la bonkoraj saĝuloj interparolis pri la bonaj kvalitoj. Ili uzis nur ĝentilan kaj belan lingvaĵon kun intenco pacigi kaj konsoli la aliajn.

Aŭdinte la plezurajn interparolojn dum multaj noktoj, Virina Vizaĝo fariĝis eĉ pli pacama kaj plaĉa ol antaŭe!

Vidinte la tutan ŝanĝiĝon, la ministro raportis al la reĝo: "Via Reĝa Moŝto,

Virina Vizaĝo estas eĉ pli pacama kaj plaĉa ol antaŭe. Nun ĝi estas tiel milda kiel ŝafido!"

La reĝo diris: "Estas vere mirinde, ke tia freneze feroce elefanto povas ŝanĝi sian naturon pro la influo de saĝaj homoj kaj eminentaj monaĥoj." Li admiris sian ministron pri la kapablo kompreni la intencon de elefanto. Do li rekompencis lin laŭmerite.

La moralinstruo: Krudaj vortoj malbone influas, dum la ĝentilaj kuracas per favoro.

## 26. PLEJ INTIMAJ AMIKOJ



### [Forto de Amikeco]

Antaŭ tempo de nia rakonto, la azianoj kutime opiniis, ke la elefantoj kaj hundoj neniam povas fariĝi amikoj. La elefantoj malŝatas hundojn, dum la hundoj timas elefantojn.

Kiam la hundoj estas timigitaj de la bestoj pli grandaj ol ili, ili ofte bojas laŭte por kaŝi sian timon. La hundoj kutime tiel agas kiam ili vidas elefantojn, dum la elefantoj koleriĝas pri tio kaj ĉasas ilin. La elefantoj estas malpaciencaj je la renkontiĝo kun hundoj, kaj eĉ se hundo

estas kvieta kaj senmova, ĉiu proksima elefanto atakos ĝin pretervole. Tio estas la kaŭzo de la opinio, ke elefantoj kaj hundoj estas "naturaj malamikoj" simile al la aferoj inter leonoj kaj tigroj, kaj inter katoj kaj musoj.

Iam estis reĝa elefanto bone bredita kaj prizorgita. Najbare de la elefantejo vivis migra hundo osteca pro malsato. Altirita de bonodoro el la dolĉa rizaĵo por la elefanto, ĝi ekglitadis en la elefantejon por manĝi la bongustajn rizerojn falintajn el la elefanta buŝo. Ĝi tiel ŝatis la mangaĵon, ke post nelonge ĝi ne plu volis manĝi en alia loko. Dum ĝuado de la mangaĵo, la granda elefanto ne rimarkis la migran hundon timeman kaj honteman.

Pro la abunda manĝaĵo, la iama malsata hundo fariĝis pli kaj pli granda, forta kaj bela. La bonhumora elefanto ekrimarkis ĝin. Ĉar la hundo jam kutimiĝis al kunestado kun la elefanto, ĝi ne plu timis, do ĝi ne bojis kontraŭ la elefanto. Ne ĝenite de la amikema hundo, la elefanto konatiĝis kun ĝi iom post iom.

Ili pli kaj pli intimiĝis unu al la alia. Post nelonge, neniu volis manĝi sen la alia, kaj ili ĝuis la komunan amuziĝon. Kiam ili sin amuzis, la hundo kutime perbuŝe kaptis la longan rostron de la elefanto, dum la elefanto svingis ĝin antaŭen kaj malantaŭen, supren kaj malsupren, de unu flanko al la alia, kaj eĉ en cirklo. Ili fariĝis "plej intimaj amikoj", kaj neniam volis

apartiĝi unu de la alia.

Iutage, viro el malproksima vilaĝo preterpasis la elefantejon dum sia vojirado al la urbo. Li vidis la hundon gajan, fortan kaj belan. Li do aĉetis ĝin de la elefantisto, kvankam la hundo tute ne apartenis al la lasta. La viro prenis la hundon al sia hejmvilaĝo, kiun neniu scias.

Kompreneble, la reĝa elefanto ege malĝojiĝis pro sopiremo al sia plej intima amiko, la hundo. Ĝi estis tiel trista, ke ĝi ne plu volis manĝi, trinki kaj sin bani. Do la elefantisto raportis tion al la reĝo sen mencii la vendon de la amikema hundo.

Okazis, ke la reĝo havis inteligentan ministron, kiu estis fama pro sia kompreno al la bestoj. Do li ordonis lin iri por trovi

la kaŭzon de la okazaĵo.

La saĝa ministro iris al la elefantejo. Li tuj vidis, ke la elefanto estas malĝoja. Li pensis: "La iama feliĉa elefanto tute ne aspektas malsana. Sed mi jam vidis la samajn okazaĵojn al homoj kaj bestoj. La elefanto estas malĝoja, eble pro perdo de sia tre intima amiko."

Do li diris al la gardistoj kaj prizorgantoj: "Mi trovis nenian malsanon de la elefanto. Ŝajnas, ke ĝi malĝojas pro perdo de intimulo. Ĉu la elefanto havis intiman amikecon kun iu ajn laŭ via scio?"

Ili informis lin, kiel la elefanto kaj migra hundo fariĝis tre bonaj amikoj. La ministro demandis: "Kio okazis al la migra hundo?" Ili respondis: "Lin



forprenis nekonatulo, kaj ni ne scias, kie li estas nun."

La ministro revenis al la reĝo kaj raportis: "Via Reĝa Moŝto, mi ĝojas, ke via elefanto ne suferas de malsano. Sed eble sonas strange, ke ĝi intime amikiĝis kun migra hundo. La hundon oni forprenis, do la elefanto ne volas manĝi, trinki kaj sin bani pro malĝojo kaj sopiremo. Jen mia opinio pri tio."

La reĝo diris: "Amikeco estas plej mirinda afero en la vivo. Mia ministro, kiel ni povos trovi la amikon de mia elefanto por denove ĝojigi ĝin?"

"Via Reĝa Moŝto," respondis la ministro, "mi proponas doni publikan anoncon, ke oni punos tiun, kiu havigis

al si la hundon iam loĝantan en la reĝa elefantejo."

La reĝo agis laŭ la propono de la ministro. La vilaĝano informiĝis pri tio kaj tuj liberigis la hundon el la hejmo. La hundo ĝojplene kuregis laŭeble plej rapide al sia intima amiko, la reĝa elefanto.

La elefanto tiel ekzaltiĝis ke ĝi levis sian amikon per la rostro kaj metis ĝin sur sian kapon. La feliĉa hundo svingis la voston, dum la elefantaj okuloj brilis de ĝojo. Ambaŭ intimuloj kune vivis feliĉe post tio.

La reĝo plezuriĝis pri la bonfartiĝo de sia elefanto. Li admiris sian ministron pri kompreno al la intenco de elefanto. Do li premiis lin laŭmerite.

La moralinstruo estas: Eĉ "naturaj kontraŭuloj" povas fariĝi "plej bonaj amikoj".

## 27. BOVO PLAÇO



### [Ĉiuj estas respektindaj]

Iam antaŭe estis urbo nomata Takasilo en la regiono Gandharo de norda Hindio. La Iluminiĝinto naskiĝis kiel bovo en la urbo. Tre bone bredite por fortiĝi, ĝi estis aĉetita de riĉulo el alta klaso. La riĉulo tre ŝatis la mildan beston kaj nomis ĝin "Plaĉo". Li flegis ĝin zorgeme kaj nutris ĝin nur per la plej bona manĝaĵo.

Plenkreskinte kiel bovo granda kaj forta, Plaĉo pensis: "Mia bonkora mastro bredas min malavare. Li nutras min per tiel bona manĝaĵo kaj konstante prizorgas

min ameme eĉ en malfacila tempo. Nun mi jam estas plenaĝa, kaj povas tiri pli pezan ŝarĝon ol aliaj bovoj, do mi volas rekompenci mian mastron per mia propra forto."

Ĝi proponis al li: "Sinjoro, bonvolu trovi riĉan komerciston, kiu fieras pri posedo de multaj fortaj bovoj. Defiu lin, ke via bovo povas tiri cent plensarĝitajn bovĉarojn."

La altklasa riĉulo iris al tia komercisto laŭ la propono kaj komencis babili kun li. Momenton poste, li turnis paroltemon al tio, kiu havas la plej fortan bovon en la tuta urbo.

La komercisto diris: "Multaj homoj havas bovojn, tamen neniu havas tiel

fortajn kiel mi." La riĉulo respondis: "Sinjoro, mi havas bovon, kiu povas tiri cent plenŝargitajn bovĉarojn." "Tute ne eble, mia amiko. Kiel povus esti tiel forta bovo? Tute ne kredeble!" diris la komercisto. La riĉulo respondis: "Mi havas tiel fortan bovon, kaj mi volas veti kun vi."

La komercisto diris: "Mi vetos je mil oraj moneroj, ke via bovo tute ne kapablas tiri cent plenŝargitajn bovĉarojn." Do ili interkonsentis pri la veto kaj tempo por tio.

La komercisto kunligis cent grandajn bovĉarojn. Li ŝargis ilin per sablo kaj gruzo por fari ilin tre pezaj.

La altklasa riĉulo nutris bovon Plaĉo per plej bona rizo. Li banis kaj ornamis

ĝin per bela florkrono ĉirkaŭ ĝia kolo.

Poste, li jungis la bovon al la unua ĉaro kaj suprengrimpis la ĉaron. El tiel alta klaso, li ne povis rezisti la emon montri sian superecon. Li klakigis vipon en la aero, kaj kriis al la bovo: "Tiru, muta besto! Mi ordonas, ke vi movu la ĉarojn, granda mutulo!"

La bovo Plaĉo pensis: "La vetado okazas laŭ mia propono. Mi faris nenion malbonan al mia mastro, sed li insultis min per vortoj tiel krudaj kaj orelpikaj!" Do ĝi restis senmove kaj rifuzis tiri la ĉarojn.

La komercisto eksplodis de ridego kaj postulis sian gajnitan veton. La riĉulo povis fari nenion alian ol doni al li mil

orajn monerojn. Reveninte hejmen, la riĉulo sidiĝis malĝoja pro sia perdo kaj embarasita pro bato al sia fiereco.

Bovo Plaĉo sin paŝtis trankvile sur la vojo al hejmo. Atinginte hejmen, ĝi vidis sian mastron malĝoje kuŝanta sur la flanko. Ĝi demandis: "Sinjoro, kial vi tiel kuŝas tie? Ĉu vi endormiĝis? Vi aspektas malĝoja." La riĉulo respondis: "Mi perdis mil orajn monerojn pro vi. Kiel mi povus endormiĝi kun tiel granda perdo?"

La bovo respondis: "Sinjoro, vi nomis min 'muta besto', kaj eĉ klakigis vicon en la aero super mia kapo. Ĉu mi rompis ion, distretis sur ion, fuŝis ian aferon aŭ kondutis iel kiel 'muta besto' dum mia vivo?" Li respondis: "Ne, mia favorato."



La bovo diris: "Do sinjoro, kial vi nomis min 'muta besto', kaj insultis min eĉ je la ĉeesto de aliaj homoj? Tio estas via kulpo. Mi faris nenion malbonan. Tamen mi sentas bedaŭron por vi, do reiru al la komercisto kaj faru saman veton je du mil oraj moneroj. Memoru, ke vi nur uzu favorajn vortojn, kiuj estas decaj al mi."

Do la altklasa riĉulo reiris al la komercisto kaj prezentis veton je du mil oraj moneroj. La komercisto prenis tion kiel metodon de tre facila enspezado. Li denove kunligis cent peze ŝarĝitajn bovĉarojn. Post bona nutrado kaj banado al la bovo, la riĉulo metis florkronon ĉirkaŭ ĝian kolon.

Kiam ĉio pretiĝis, la riĉulo tenere

tuŝis la bovon je la frunto per lotusa floro anstataŭ vipo. Prenante ĝin kiel sian amatan infanon, li diris: "Mia filo, bonvolu favori min movante la cent ĉarojn."

La forta bovo kolektis sian tutan forton kaj movis la pezajn ĉarojn ĝis la lasta ĉaro haltis sur la loko de la unua.

La komercisto pagis du mil orajn monerojn gapante pro mirego. La apudspektantoj tiel emociiĝis, ke ili honoris la bovon Plaĉo per donacoj. Sed al la altklasa riĉulo pli gravas la valora leciono pri modesteco kaj afableco.

La moralinstruo estas: Afablaj vortoj alportos honoron, dum la krudaj nenian rekompencan.

## 28. NIGRULO DE AVINO



[Favorkoreco]

Iam antaŭe vivis maljunulino, kiam Reĝo Brahmadata regis en Benareso. Ŝi havis bovidon noble nigran. Fakte, la bovido estis tute nigra sen iomete da blanko. Ĝi estis Bodisatvo, la luminiĝinto.

La maljunulino bredis la malgrandan bovidon kvazaŭ sian propran filon. Ŝi nutris ĝin nur per tre bonaj rizo kaj rizkaĉo. Ŝi kutime karesis ĝiajn kapon kaj kolon dum ĝi lekis ŝian manon. Ĉar ili estis tiel amikaj reciproke, oni nomis la bovidon "Nigrulo de Avino".

Nigrulo de Avino restis tre ĝentila kaj milda eĉ post kiam ĝi elkreskis kaj fariĝis forta bovo. La vilaĝaj infanoj ofte ludis kun ĝi, sidante sur ĝia kolo kaj tenante ĝiajn orelojn kaj kornojn. Ili tenis ĝian voston por vipi je ĝia dorso dum la rajdado. Ĝi neniam plendis pro tio, ĉar ĝi tre ŝatis la infanojn.

La amema bovo pensis: "La aminda maljunulino flegas min ĉiutage tute kiel mia amema patrino. Ŝi vartas min kvazaŭ sian propran filon. Kvankam ŝi estas malriĉa kaj senrimeda, ŝi estas tro modesta por peti de mi helpon. Ŝi tro ĝentilas por laborigi min. Mi deziregas liberigi ŝin el malriĉeco ĉar ankaŭ mi amas ŝin." Do ĝi ekserĉis laboron.

Iutage karavano de 500 ĉaroj iris preter la vilaĝo. Trapasante la riveron, ili estis kaptitaj en marĉo. La bovoj ne kapablis tiri la ĉarojn tra la rivero. La estro de la karavano jungis ĉiujn 500 parojn da bovoj al la unua ĉaro, sed la riverfundo estis tiel malebena, ke ili ne povis movi eĉ tiun ĉaron.

Frontante al la problemo, la estro devis havigi al si pliajn bovojn por tio. Kiel fama juĝanto pri la kvalito de bovoj, li esploris la vagantajn bovojn en la vilaĝo kaj rimarkis Nigrulon de Avino. Li tuj ekpensis: "Tiu ĉi nobla bovo verŝajne havas forton movi mian ĉaron tra la rivero."

Li demandis al apudaj vilaĝanoj:

"Kies bovo tiu ĉi estas? Mi volas uzi ĝin por movi miajn ĉarojn tra la rivero, kaj mi volantas pagi al ĝia posedanto por la servo." La homoj diris: "Ne grave! Prenu ĝin laŭvole. Ĝia mastrino ne estas ĉi tie."

Do li ligis ŝnuron tra la nazo de Nigrulo de Avino. Sed kiam li tiris ĝin, ĝi staris senmove. La bovo pensis: "Mi ne moviĝos ĝis tiu ĉi viro promesos pagi por mia helpo."

Estante bona juĝanto pri bovoj, la estro de karavano komprenis ĝian intencon. Li do diris: "Mia kara bovo, post kiam vi tiros miajn 500 ĉarojn tra la rivero, mi pagos al vi ne nur unu, sed du ormonerojn por ĉiu ĉaro." Aŭdinte tion, la bovo tuj ekiris kun li.

La viro jungis la fortan nigran bovon al la unua ĉaro. Li kondukis ĝin tra la rivero. Tion ne kapablis fari ĉiuj 1000 bovoj antaŭe. Tiel, ĝi sukcesis eltiri ĉiujn aliajn 499 ĉarojn unu post alia, sen iometa malrapidiĝo.

Kiam ĉio estis plenumita, la estro faris pakon, en kiu estis entute 500 ormoneroj, nur unu ormonero por ĉiu ĉaro. Li pendigis ĝin al la kolo de la potenca bovo. La bovo pensis: "Tiu viro promesis du monerojn por ĉiu ĉaro, sed la mono pendigita de li sur mian kolon ne estas tiom, kiom li promesis antaŭe. Mi ne lasos lin foriri!" Ĝi do iris antaŭ la karavanon kaj baris la vojon.

La gvidanto klopodis forpuŝi ĝin de

la vojo, sed ĝi rifuzis moviĝi. Li provis veturigi la ĉarojn kaj ĉirkaŭiri ĝin, sed vidinte la bovon tiel fortan, ĉiuj aliaj bovoj ne audacis sin movi.

La viro pensis: "Sendube ĝi estas bovo tre inteligenta kaj scias bone, ke mi pagis al ĝi nur duonon." Do li faris novan pakon en kiu estis mil oraj moneroj, kaj alligis ĝin al la kolo de la bovo anstataŭe.

Tiam Nigrulo de Avino returne trapasis la riveron kaj iris rekte al la maljunulino, sia "patrino". Sur la vojo la infanoj provis kapti la moneran pakon por amuziĝo, sed ĝi sukcese eskapis de ili.

La maljunulino surpriziĝis kiam ŝi vidis la pezan pakon. La infanoj informis ŝin pri la okazaĵo ĉe la rivero. Ŝi malfermis



la pakon kaj trovis mil orajn monerojn.

La maljunulino ankaŭ legis la lacecon en la okuloj de sia "infano". Ŝi diris: "Ho, mia filo, ĉu vi opinias, ke mi deziras vivi per mono gajnita de vi? Kial vi laboris tiel pene kaj suferplene? Mi ĉiam prizorgos vin malgraŭ malfacilaĵoj."

La bonkora maljunulino banis la amindan bovon kaj masaĝis ĝian lacan muskolon per oleo. Ŝi nutris ĝin per bona manĝaĵo kaj prizorgis ĝin ĝis la fino de ilia feliĉa vivo.

La moralinstruo estas: Favorkoreco riĉigas la malplej riĉan familion.

## 29. DU BOVOJ KAJ PORKIDO



[Envio]

Iam du bovidoj Granda Ruĝo kaj Eta Ruĝo estis membroj de kamparana familio. En la sama familio vivis ankaŭ knabino kaj porkido. La porkido neniam gruntis, do oni nomis ĝin Negruntulo.

La mastroj de la familio flegis la porkidon tre bone. Ili bredis ĝin abunde per la plej bona rizo, kaj eĉ rizkaĉo kun bruna sukero.

La bovidoj rimarkis tion. Ili laboris diligente tirante plugilojn en la kampoj aŭ ĉarojn sur la vojoj. Eta Ruĝo diris al

Granda Ruĝo: "Fraĉjo, en tiu ĉi familio ni ambaŭ faras ĉiujn penigajn laborojn. Ni gajnas riĉaĵon por la familio. Sed ili bredas nin nur per herbo kaj fojno. La porkido Negruntulo nenion faras por vivteni la familion, sed ili nutras ĝin per manĝaĵoj plej bonaj kaj frandaj. Kial ĝi ĝuas tiel specialan prizorgon?"

La saĝa pliaĝa frato respondis: "Eta fraĉjo. Envio estas granda danĝero. Ne plu enviu la porkidon pro la bona stato. Ĝi ja ĝuas 'manĝaĵon al morto!'."

"Baldaŭ okazos la edziniĝa ceremonio por la juna filino de la mastro. La malgranda Negruntulo fariĝos frandaĵo por la festeno! Jen kial oni grasigas ĝin per tiel bona frandaĵo."

"Post kelkaj tagoj alvenos la gastoj. Oni eltrenos la porkidon je la kruroj, kaj mortigos ĝin por fari frandajn pladojn."

Vere, nur post kelkaj tagoj alvenis gastoj. Oni eltrenis la porkidon kaj mortigis ĝin. Ĝuste kiel diris Granda Ruĝo, el la porkido oni kuiris diversajn manĝaĵojn por regali gastojn.

Granda Ruĝo diris: "Mia eta fraĉjo, ĉu vi vidis, kio okazis al la porkido?" "Jes, fraĉjo," respondis Eta Ruĝo, "Nun mi komprenas."

Granda Ruĝo daŭrigis: "Jen la rezulto de ĝia bona stato. Niaj sengustaj herbo kaj fojno estas centoble pli bonaj ol ĝiaj franda rizaĵo kaj bruna sukero. Ĉar nia manĝaĵo donas al ni neniun malbonon, kaj

anstataŭe, promesas nian longan vivon!"

La moralinstruo estas: Ne enŭiu la fortunulojn antaŭ ol scii, kian koston ili pagos.

## 30. ĈIELO 33



### [Ĉapitro 1. Kunlaboro]

Iam antaŭe, kiam Reĝo Magadho regis en la lando, estis nobla junulo nomata "Magho la bonulo". Li vivis en malproksima vilaĝo de nur tridek familioj. Kiam li estis juna, liaj gepatroj edzinigis al li knabinon, kiu havis bonan konduton kiel li. Ili vivis feliĉe, kaj havis plurajn infanojn.

La vilaĝanoj respektis lin, ĉar li ĉiam helpis plibonigi la vilaĝon por favori al ĉiuj. Pro ilia respekto al li, li povis instrui al ili kvin ŝtupojn de trejnado por purigi

iliajn mensojn, vortojn kaj kondutojn.

La instrumetodo de Magho la bonulo estis efektiva praktikado. Ekzemple, iutage kiam la vilaĝanoj kolektiĝis por fari manlaboron. Magho la bonulo purigis lokon por sidi, sed antaŭ ol li pretis sidiĝi, iu alia sidiĝis tien. Do li pacience purigis alian lokon. Sed ankaŭ la lokon okupis alia najbaro. Tio okazis foje kaj refoje, ĝis li pacience purigis sidejojn por ĉiuj. Nur tiam li sidiĝis sur la lastan lokon.

Per ekzemploj de pacienco, Magho la bonulo instruis al vilaĝanoj kiel harmonie kunlabori kun aliaj. Do laborante kune, ili konstruis plurajn konstruaĵojn kaj faris aliajn laborojn favorajn al la tuta vilaĝo.

Vidinte la brilan rezulton de pacienco

kaj kunlaboro sur la bazo sekvi la ĝentilajn metodojn de kvin trejnaj ŝtupoj, ĉiuj vilaĝanoj fariĝis pli pacemaj kaj harmoniaj. La antaŭaj eraroj kaj konfliktoj de la vilaĝanoj tute malaperis.

Eble vi opinias, ke tio pli feliĉigis al ĉiuj, tamen iu tute ne ŝatis la novan situacion. Li estis la vilaĝestro, politikistaĉo, kiu zorgis nur pri sia propra pozicio.

Antaŭe, kiam estis murdistoj kaj ŝtelistoj, li kutime punis ilin. Tio pliigis lian aŭtoritatan pozicion kaj timigis la vilaĝanojn. Kiam iu el la geedzoj faris malĉastaĵon, la vilaĝestro kutime monpunis tiun. Same, Se troviĝis kalumniato, aŭ ies kontrakto ne



plenumiĝis, li ankaŭ postulis monon portio. Li eĉ kolektis imposton el profito en vendado de alkoholaĵo anstataŭ zorgi, ke ebrieco kaŭzas multajn krimojn.

Do estis facile vidi, kial la vilaĝestro tiel maltrankviliĝis pri perdo de siaj honoro, potenco kaj mono pro paca vivo de la vilaĝanoj. Fine, li iris al la reĝo kaj raportis: "Via Reĝa Moŝto, iuj malproksimaj vilaĝoj estis prirabitaj de banditoj. Ni bezonas vian helpon."

La reĝo respondis: "Eskortu la krimulojn al mi."

La malhonesta politikistaĉo kunvenigis la mastrojn de ĉiuj tridek familioj kaj eskortis ilin al la reĝo kiel krimulojn. Anstataŭ esplori la kazon, la reĝo ordonis,

ke ili estu ekzekutitaj piedpremite de elefantoj.

Ĉiuj tridek viroj kuŝis en la palaca korto laŭ la ordono, kaj oni elkondukis elefantojn. Nur tiam ili ekkonsciis, ke ili estos mortigitaj de la elefantoj. Magho la bonulo diris al ili: "Memoru, ke vi koncentru vian menson sur pacon kaj puron el praktikado de la kvin trejnaj ŝtupoj, kaj vi sentos kompaton al ĉiuj. Ne koleru kontraŭ la maljusta reĝo, mensogema oficisto aŭ malfeliĉaj elefantoj."

Elefantisto alkondukis la unuan elefanton. Sed kiam li ordonis ĝin piedpremi la senkulpajn vilaĝanojn, la elefanto rifuzis. Kun fiereco, ĝi foriris.

Mirinde, tion ripetis ĉiuj elefantoj de la reĝo, kaj neniuj piedpremis ilin.

La elefantistoj raportis al la reĝo, ke tio ne estas ilia kulpo. "Eble," ili diris: "tiuj viroj posedas drogon, kiu konfuzis la elefantojn."

La reĝo ordonis traserĉi la vilaĝanojn, sed trovis nenion. Do liaj konsilantoj diris: "Eble ili estas sorĉistoj, kiuj povas apliki malicajn sorĉvortojn sur grandajn elefantojn!"

Oni demandis la vilaĝanojn: "Ĉu vi havas tiajn sorĉvortojn?" Magho la bonulo respondis: "Jes. Ni havas." La reĝo tre scivolis pri tio. Do li mem demandis al Magho la bonulo: "Kio estas la sorĉvortoj, kaj kiel ili funkcias?"

Magho la bonulo respondis: "Via Reĝa Moŝto, ni ne aplikas la samajn sorĉvortojn, kiujn aplikas aliuloj. Ni aplikas la kompatemajn sorĉvortojn kun purigita menso laŭ la kvin trejnaj ŝtupoj."

"Kio estas la kvin trejnaj ŝtupoj?" demandis la reĝo mirigite. Magho la bonulo respondis: "Ni ĉiuj sindetenas de kvin malbonaj kondutoj, kiuj estas: mortigo, ŝtelo, malĉasto, mensogo kaj alkoholaĵo."

"Tiel ni fariĝas ne malutilaj kaj povas doni sentimecon al ĉiuj. Pro tio la elefantoj perdis timon al la trejnistoj kaj ne plu volas vundi nin. Ili forlasis trumpetante triumfon. Tio estas niaj protektaj metodoj, kiujn vi nomas 'sorĉvortoj!'."

Fine, konsciinte pri la saĝo kaj bona konduto de la vilaĝanoj, la reĝo demandis ilin kaj detale informiĝis pri la vero. Li do konfiskis ĉiujn havaĵojn de la malhonesta vilaĝestro kaj dividis ilin inter la vilaĝanoj.

La vilaĝanoj denove liberiĝis por fari pli bonan laboron favoran al la tuta vilaĝo. Ili baldaŭ ekkonstruis hotelon ĉe vojkruciĝo.

Tio estis la plej granda projekto, kiun ili akceptis. La viroj estis memfidaj ĉar ili lernis tre bone kiel kunlabori kun aliaj por la komuna celo. Sed ili ne lernis kiel kunlabori kun virinoj en la laboro. Ili opiniis, ke tio estas laboro nur de viroj.

Tiam Magho la bonulo havis kvar edzinojn. Iliaj nomoj estis Bonfaro, Belo,

Feliĉo kaj Bonnaskiĝo. La unua edzino Bonfaro estis la plej saĝa. Ŝi volis trovi metodon por ke virinoj sin profitu de kunlaboro en la bona afero. Do ŝi iom post iom amikiĝis kun la estro de la hotela projekto.

Ŝi volis fari grandan kontribuon, do ŝi sendis donacon al la estro. Ŝi demandis lin: "Ĉu vi povas elpensi metodon, ke mi fariĝu la plej granda kontribuanto de la projekto?"

La estro respondis: "Mi scias bonan metodon por tio!" Tiam li sekrete prilaboris trabon, la plej gravan parton de la konstruaĵo por subteni la supron. Li pakis ĝin kaj kaŝis ĝin ĉe Bonfaro por ke ŝi sekiĝu kaj fariĝu rekta kaj fortika antaŭ

la utiligo.

Samtempe, ĉiuj viroj en la vilaĝo ĝojplene daŭrigis la konstruadon. Je la fino kiam ili bezonis instali trabon, ili komencis prilabori ĝin. Sed la estro haltigis ilin. Li diris: "Miaj amikoj, ni ne uzos la freŝan bluan lignon kiel la trabon por la supro. Ĝi kurbiĝos kaj falos. Ni devas trovi malfreŝan kaj sekan trabon. Iru kaj serĉu ĝin!"

Ili serĉis tra la tuta vilaĝo, kaj fine trovis, ke Bonfaro hazarde havas taŭgan trabon. Ankaŭ ĝiaj longeco kaj dikeco estas tre konvenaj. Kiam ili demandis, ĉu ili povas aĉeti ĝin de ŝi, ŝi respondis: "Mi ne vendos ĝin je ajna prezo. Mi volas donaci la trabon senpage nur se vi

permesas min partopreni la konstruadon de la hotelo."

La viroj ne kuraĝis ŝanĝi la kutimon. Do ili respondis: "Virinoj neniam partoprenis en tia laboro. Tio estas neebla."

Poste ili revenis al la estro kaj raportis lin pri la okazaĵo. Li diris: "Kial vi rifuzis ŝian proponon? Virino ankaŭ estas parto en la homa mondo. Ni estu grandanimaj kaj dividu la harmonion kaj unuanimecon de tiu ĉi laboro kun virinoj. Tiam la projekto kaj nia vilaĝo estos des pli sukcesplenaj."

Do ili akceptis la trabon de Bonfaro, kaj ŝi helpis fini la konstruadon de la hotelo. Tiam Belo havis belegan ĝardenon ĉe la hotelo kaj ĝin ŝi donacis. En la



ĝardeno estis diversaj floroj kaj fruktarboj. Feliĉo havis ĉarman lageton, kaj en ĝi kreskis belaj lotusoj. Sed Bonnaskiĝo, la plej juna kaj dorlotita, nenion kontribuis por la hotelo.

En la nokto, Magho la bonulo okazigis kunvenon en la ĉevoja hotelo. Li instruis la vilaĝanojn helpi al la gepatroj kaj aĝuloj, kaj sin deteni de avaro, krudaj vortoj kaj klaĉoj.

Laŭ onidiro, la plej malsupra ĉielo konsistas el feoj de kvar direktoj: Nordo, Oriento, Sudo kaj Okcidento. Sekvante sian propran instruadon, Magho la bonulo forpasis kun bona menso. Li renaskiĝis kiel Sakao, la reĝo de la ĉielo super la plej malsupra.

Poste forpasis Bonfaro, Belo, Feliço kaj ankaŭ ĉiuj mastroj de la familioj en la vilaĝo. Ili renaskiĝis sub Reĝo Sakao. Tio fariĝis famkonata "Ĉielo 33."

## [Ĉapitro 2. Kompato]

Antaŭ longa tempo, estis mizere malbelegaj dioj nomataj "aŝuroj". Ili vivis en la ĉielo super la plej malsupra.

La viro, kiu iam estis Magho la bonulo en la antaŭa vivo, nun estis Sakao, la reĝo de Ĉielo 33. Li pensis: "Kial ni, anoj de Ĉielo 33, vivas kun tiuj malbelegaj aŝuroj? Jen estas nia propra mondo, do ni vivu feliĉe sen ili."

Li invitis la aŝurojn al la festeno, kaj

ebriigis ilin per forta alkoholaĵo. Ŝajne, pro la renaskiĝo Reĝo Sakao forgesis la instruojn kiujn li donis al aliaj kiam li estis en la antaŭa vivo kiel Magho la bonulo. Post kiam la aŝuroj ebriiĝis, li movis ilin en la malsupran mondon, same grandan kiel Ĉielo 33.

Kiam la aŝuroj sobriĝis kaj ekkonsciis, ke ili trompiĝis en la malsupran ĉielon, ili eksplodis de kolero. Ilituj iris en la supran ĉielon kaj militis kontraŭ Sakao. Post nelonge, ili venkis, kaj Sakao povis fari nenion alian ol forfuĝi.

Dum la retiriĝo en potenca militĉaro, Reĝo Sakao iris en vastan arbaron, kie la garuloj havas siajn nestojn. Tiuj malfeliĉaj feoj havis nenian potencon. Ili povis fari

nenion alian ol disflugi ĉirkaŭen, frapante siajn grandajnflugilojn.

Kiam la ĉaro de Reĝo Sakao veturis tra la arbaro, la nestoj detruigis kaj la garulidoj falis surteren. Ili ploregis pro timo kaj doloro. Aŭdinte tion, Sakao demandis, de kie venas la korŝiraj ploroj. La ĉaristo respondis: "Jen ploroj de timigitaj garulidoj, kies nestoj kaj arboj estas detruitaj de via potenca ĉaro."

Informiginte pri tio, Reĝo Sakao ekkonsciis, ke tre efemeraj ĉiuj vivoj, inkluzive de la lia. Aŭdinte pri sufero de la garulidoj, li rememoris pri la kompatado de la Grandulo, kiu pasis de vivo al vivo. Li diris: "Ne plu timigu la etulojn. La unuan

trejnan ŝtupon mi rompis senkonscie. Mi ne plu domaĝos eĉ mian vivon por la ĉiela regno, kiu detruigis iutage. Anstataŭe, mi dediĉos mian vivon al malicaj aŝuroj. Returnu la ĉaron!"

Do la ĉaro revenis al la direkto de Ĉielo 33. Vidinte, ke Reĝo Sakao revenis, la aŝuroj opiniis, ke li akiris helpon de aliaj mondoj. Do ili forkuris en la malsupran mondon eĉ sen retrorigardi.

### [Ĉapitro 3. Merito]

Reĝo Sakao revenis al sia palaco en Ĉielo 33. Ĉe la palaco staris etaĝdomo de lia unua edzino, la renaskiĝinta Bonfaro. Ekster la etaĝdomo estis ĝardeno de lia

dua edzino, la renaskiĝinta Belo. Kaj ankaŭ estis ĉiela lageto de lia tria edzino, la renaskiĝinta Feliĉo.

Ankaŭ Bonnaskiĝo mortis, kaj renaskiĝis kiel malforta grupo en la arbaro. Pro sopiro al ŝi, Sakao trovis ŝin kaj portis ŝin en Ĉielon 33 por vizito. Li montris al ŝi la etaĝdomon, ĝardenon kaj lageton de siaj tri edzinoj. Li informis ŝin, ke la aliaj tri edzinoj gajnis meriton pro la bonfaro. La merito alportis feliĉon al ili kaj en la antaŭaj vivoj kaj en la renaskiĝoj.

Li diris: "Mia kara grupo, en via antaŭa vivo kiel Bonnaskiĝo, vi faris neniun bonan aferon. Do vi ne gajnis meriton por feliĉo, tiel ke vi renaskiĝis kiel arbara grupo. Mi proponas, ke vi purigu vian

menson sekvante la kvin trejnajn ŝtupojn." Lerninte pri la kvin trejnaj ŝtupoj, la aminda grupo decidis sekvi ilin. Poste, ŝi revenis al la arbaro.

Post nelonge, la Reĝo Sakao volis scii, kiel kondukas la grupo. Do li aliformiĝis en fiŝon kuŝantan antaŭ ŝi. La grupo prenis ĝin je la kapo, sed apenaŭ ŝi pretis engluti la reĝon de Ĉielo 33, kiam la fiŝo svingis la voston.

La grupo tuj pensis: "La fiŝo vivas!" Rememorinte pri la unua trejna ŝtupo, ŝi metis la vivan fiŝon en rojon. Stariĝinte el la akvo, Reĝo Sakao montris sian antaŭan formon kaj diris: "Bonege, mia kara grupo, vi sekvas la kvin trejnajn ŝtupojn." Poste, li revenis en sian ĉielon.

Trapasinte sian vivon, la grupo mortis. Sekvante la kvin trejnajn ŝtupojn, ŝi gajnis kaj meriton kaj pacan menson. Do ŝi renaskiĝis kiel knabino en familio de metiisto en norda Hindio.

Reĝo Sakao denove volis trovi, kie naskiĝis la iama Bonnaskiĝo kaj posta grupo. Li trovis ŝin en la familio de metiisto, kaj volis helpi ŝin gajni meriton kaj feliĉon.

Do li sin ŝajnigis maljunulo, kaj puŝis ĉaron plenan de oraj kukumoj. Li iris en Benareson kaj kriis: "Kukumojn! Kukumojn! Orajn kukumojn mi havas!"

Kiam oni venis por aĉeti la mirindajn kukumojn, li diris: "La orajn kukumojn mi ne vendos, sed nur donacos, al tiu, kiu



kondutas bone kaj sekvas la kvin trejnajn ŝtupojn."

Oni diris: "Ni neniam aŭdis pri la kvin trejnaj ŝtupoj. Sed ni nur volas aĉeti viajn orajn kukumojn. Diru al ni la prezon!" Li respondis refoje: "Miaj kukumoj tute ne vendiĝos. Mi donacos ilin al iu ajn, kiu praktikas la kvin trejnajn ŝtupojn." Oni diris: "Tiu ĉi viro venis nur por mistifiki nin." Do ili forlasis lin sola.

Bonnaskiĝo baldaŭ aŭdis pri la stranga maljunulo. Kvankam ŝi jam renaskiĝis, tamen ŝi ankoraŭ havis kutimon praktiki la kvin trejnajn ŝtupojn. Do ŝi pensis: "Eble tiu ĉi viro venas por serĉi min."

Do ŝi iris al li kaj petis la orajn kukumojn. Li demandis: "Ĉu vi sekvas la

kvin trejnajn ŝtupojn? Ĉu vi vere detenas vin de mortigo, ŝtelo, malĉasto, mensogo kaj alkoholaĵo?" Ŝi respondis: "Jes, Sinjoro. Mi sekvas la ŝtupojn, kaj estas tre pacema kaj feliĉa."

La maljunulo diris: "Mi alportis la kukumojn speciale al vi por kuraĝigi vin gajni pli da merito kaj estonta feliĉo." Li lasis la orajn kukumojn ĉe ŝi, kaj revenis al Ĉielo 33.

En sia resta vivo, la virino ĉiam estis malavara pri oro. Ŝi donacis sian feliĉon al ĉiuj aliaj kaj gajnis grandan meriton. Post sia morto, ŝi renaskiĝis kiel filino de aŝura reĝo kaj aspektis kiel ĉarma feino. Tio estis miraklo, ĉar aliaj aŝuroj estis la plej malbelaj el ĉiuj feoj.

La reĝo de aŝuroj plezuriĝis pro la feineco kaj eksterordinara ĉarmo de sia filino. Li kolektis ĉiujn aŝurajn virojn por ke ŝi prenu edzon el ili laŭ sia volo.

Sakao, la reĝo de Ĉielo 33 bone sciis, ke la renaskiĝinta reĝidino estis lia estinta edzino Bonnaskiĝo, kiu antaŭe estis la gruo kaj poste filino de metiisto. Do li subiris en la malsupran ĉielan mondon kaj sin aliformigis en malbelan aŝuron. Li pensis: "Se Bonnaskiĝo prenos edzon, kies interna kvalito de konduto estas same bona kiel la ŝia, ni certe rekuniĝos finfine!"

Pro sia antaŭa rilato kun Magho la bonulo renaskiĝinta kiel Reĝo Sakao, kiu nun aliformiĝis kiel ordinara aŝuro, la bela

reĝidino tuj allogiĝis de li. Do ŝi elektis lin el ĉiuj kandidatoj.

Reĝo Sakao kondukis ŝin al Ĉielo 33 kiel sian kvaran edzinon, kaj poste ili vivis feliĉe.

La moralinstruo estas: Praktiko de kvin trejnaj ŝtupoj estas komenco de bona konduto. Bona konduto estas komenco de paco kaj feliĉo.

## 31. DANCANTA PAVO



### [Fiero kaj Modesto]

Iam antaŭ longa tempo la kvarpiedaj bestoj elektis leonon kiel sian reĝon. En la oceano naĝis giganta fiŝo kaj la fiŝoj honoris lin kiel reĝon. La birdoj estis allogitaj de beleco de Ora Cigno, do ili faris lin reĝo.

Reĝo Ora Cigno havis belan orkoloran filinon. Kiam ŝi estis ankoraŭ tre juna, li promesis al ŝi unu deziron. Ŝi deziris, ke ŝi povu elekti la edzon per si mem kiam ŝi plenaĝiĝos."

Kiam la reĝidino plenkreskis, Reĝo

Ora Cigno venigis ĉiujn virbirdojn vivantajn en la vasta Himalaja Montaro de centra Azio, por ke lia filino elektu taŭgan edzon. La birdoj venis de malproksime, kaj eĉ el alta Tibeto. Alvenis anseroj, cignoj, agloj, paseroj, kolibroj, kukoloj, strigoj, kaj multaj aliaj birdoj.

La kunveno okazis sur alta kaj larĝa ŝtonplato en bela verda lando de Nepalo. Reĝo Ora Cigno diris al sia aminda filino, ke ŝi rajtas elekti iun ajn birdon laŭ sia deziro.

Ŝi pririgardis tiel multajn birdojn. Ŝiaj okuloj allogiĝis de smeralda pavo kun longa kolo kaj belegaj vostplumoj.

Informiĝinte, ke la pavo estas la plej bonŝanca, ĉiuj aliaj birdoj proksimiĝis

al li por esprimi sian gratulon. Ili diris: "Vin elektis la ora cigna reĝidino eĉ el tiel multaj belaj birdoj. Ni gratulas vin por via fortuno."

La pavo ekzaltiĝis pro fiero, kaj komencis montri siajn belajn plumojn en mirige parada danco. Li ventumadis siajn ĉarmajn vostplumojn kaj dancadis en cirklo por vidigi sian voston. Tro memfida, li levis la kapon al la ĉielo kaj forgesis modestecon, do pro tio li elvidigis siajn plej privatajn partojn al la publiko.

Subridis aliaj birdoj, precipe la junaj. Sed Reĝo Ora Cigno sentis nenian amuziĝon. Li embarasiĝis vidinte, ke la elektito de lia filino tiel kondutas senhonte. Li pensis: "Tiu ĉi pavo havas nek internan

hontemon por agi modeste nek eksteran timon por eviti maldecan konduton. Kiel mia filino povus esti humiligita de tiel senhonta kunulo?"

Starante en mezo de la birdoj, la reĝo diris: "Sinjoro Pavo, via voĉo dolĉas, viaj plumoj belas, via kolo smeralde brilas, kaj via vosto similas al bela ventumilo, sed vi dancas kiel tiu, kiu ne havas siajn proprajn timon kaj hontemon. Mi ne permesas mian naivan filinon edziniĝi al tia malsaĝulo kia vi!"

Reĝo Ora Cigno edzinigis sian oran filinon al reĝa nevo. La malsaĝa pavo forflugis, perdinte la belan edzinon.

La moralinstruo estas: Se vi fieras en la koro, vi montriĝos kiel malsaĝulo.



## 32. KOTURNA REĜO KAJ ĈASISTO



[Unuiĝo]

Antaŭ longa tempo, iu koturna reĝo regis mil koturnojn.

Estis saĝa ĉasisto de koturnoj. Li bone sciis kiel imiti koturnan pepadon. Lia imito sonis kiel vera koturno petanta helpon, do li neniam malsukcesis allogi birdojn. Poste la ĉasisto ilin kovris per reto, metis en korbojn kaj vendis por sin vivteni.

La koturna reĝo ĉiam zorgis pri la sekureco de sia regatoj, kaj ili tre estimis lin. Kiam li gardis la birdaron kontraŭ

eventuala danĝero, li hazarde renkontis la ĉasiston kaj vidis lian konduton. Li pensis: "La koturna ĉasisto havas efikan rimedon por ruinigi miajn parencojn. Mi devas trovi pli bonan rimedon kontraŭ tio."

Do li alvenigis ĉiujn siajn regnantojn, kaj ankaŭ invitis aliajn koturnojn al la kunveno. Li diris: "Saluton al vi, miaj regnantoj, kaj bonvenon al vi, kara gastoj. Nun ni estas antaŭ granda danĝero. Saĝa ĉasisto kaptis kaj vendis multajn el niaj parencoj. Poste oni mortigis kaj manĝis ilin. Mi havas rimedon por savi nin ĉiujn. Kiam la ĉasisto kovras nin per sia reto, ĉiu el ni levu la kolon je la sama tempo. Ni flugu kune kun la reto kaj ĵetu ĝin en dornan arbuston. Tio embarasos lin, kaj

profite de tio ni povos eskapi de la reto."  
Ĉiuj konsentis sekvi la sagacan rimedon.

En la sekva tago, la ĉasisto tentis la koturnojn imitante koturnan pepon kiel kutime. Sed kiam li ĵetis la reton super la koturnoj, ĉiuj el ili senprokraste levis la kolon, flugis kun la reto kaj faligis ĝin en dornan arbuston. Li kaptis neniun el la koturnoj! Krome, li devis elspezi tutan restan tagon por preni sian reton de la dornoj. Do li tute ne havis tempon por kapti birdojn alifoje.

La sama afero okazis en la sekva tago. Li denove elspezis tutan tagon dekroĉante la reton de akraj dornoj. Tuj kiam li revenis hejmen, lia edzino salutis lin per pikaj vortoj. Ŝi plendis: "Vi kutime

alportis koturnojn hejmen por manĝi kaj vendi por gajni monon. Nun vi revenas nur kun malplenaj manoj. Kion vi faris tutajn tagojn? Eble vi havas alian edzinon, kiu ĝuas koturnaĵon ĝuste en tiu ĉi momento!"

La ĉasisto respondis: "Ne tiel pensu, mia kara. Ĉi lastajn tagojn la koturnoj unuiĝis. Ili kunlaboris kiel unu, levis la kolon kaj portis mian reton en dornan arbuston. Sed pro vi, mia ununura edzino, mi scias kion fari! Ĝuste kiel vi kvereladas kun mi, iutage ili ankaŭ kverelos. Tio ofte okazas inter parencoj. Kiam ili okupiĝos pri la kverelo kaj konflikto, mi kaptos kaj portos ilin al vi. Tiam vi denove plezuriĝos pri mi. Mi devas pacience atendi ĝis tiam."

La ĉasisto devigite eltenis la

plendadojn de la edzino dum pluraj tagoj. Iumatene, allogite de la koturna pepado, iu koturnino alflugis kaj hazarde piedpremis la kapon de alia, kaj la lasta tuj koleriĝis kaj protestis kontraŭ ŝi. Ŝi formovis sian piedon de lia kapo kaj petis: "Bonvolu ne koleri kontraŭ mi. Pardonu min pro la eraro." Sed li ne aŭdis. Baldaŭ ili kvereladis kaj la konflikto pli kaj pli intensiĝis.

Aŭdinte, ke la kverelado pli kaj pli laŭtiĝis, la koturna reĝo diris: "Ne estas profito en la konflikto. Daŭra konflikto kaŭzos al ni danĝeron!" Sed ili ne obeis lin.

Tiam la koturna reĝo pensis: "Mi timas, ke la malsaĝa konflikto detenos

ilin de la kunlaboro levi la reton." Do li ordonis, ke ĉiuj eskapu. Sekve de tio, lia propra koturnaro senprokraste forflugis.

Ĝuste tiam, la koturna ĉasisto subite ĵetis sian reton super la restajn koturnojn. Ambaŭ kverelantaj koturnoj diris unu al la alia: "Mi ne levos la reton por vi." Aŭdinte tion, eĉ iuj aliaj diris: "Kial ni levos la reton por aliaj?"

Do la konflikto disvastiĝis kiel senbrida fajro. La ĉasisto kaptis ĉiujn koturnojn en la reto, ilin metis en korbojn kaj portis hejmen al sia edzino. Ŝi vere plezuriĝis de tio, kaj ili invitis ĉiujn siajn amikojn al la granda koturna festeno.

La moralinstruo estas: Sekureco kuŝas en unueco, dum danĝero en konflikto.

### 33. FORTUNA FIŜO



[Revo]

Iam Reĝo Brahmadata havis tre saĝan konsilanton, kiu komprenas parolon de bestoj. Li ne nur komprenis, kion ili diras, sed ankaŭ kapablis paroli kun ili en iliaj lingvoj.

Iutage la konsilanto promenis laŭ riverbordo kun siaj sekvantoj. Ili renkontis kelkajn fiŝistojn, kiuj metis grandan reton en la riveron. Rigardante en la akvon, ili rimarkis grandan kaj belan fiŝon sekvanta sian ĉarman edzinon.

Ŝiaj glimbrilaj skvamoj reflektis la

matenlumon en ĉiujn kolorojn de ĉielarko. Ŝiaj ledsimilaj naĝiloj moviĝis kiel delikataj flugiloj de feino kiam ŝi naĝis en la akvo. Evidente, ŝia edzo raviĝis de ŝiaj aspekto kaj movo, ne plu zorgante pri aliaj aferoj.

Kiam ili proksimiĝis al la reto, la edzino eksentis la danĝeron. Kiam ŝi ekvidis ĝin, ŝi sprite evitis ĝin je la lasta momento. Sed la edzo tiel dronis en sia revo al ŝi, ke li tute ne povis sin turni sufiĉe rapide. Anstataŭe, li naĝis rekte en la reton kaj estis kaptita!

La fiŝistoj eltiris la reton kaj ĵetis la grandan fiŝon sur la bordon. Ili bruligis fajron kaj pretis rosti ĝin.

Kuŝante sur la tero, la fiŝo baraktis



kaj ĝemadis en granda agonio. La konsilanto komprenis la fiŝajn vortojn, li do interpretis al aliuloj. Li diris: "Tiu ĉi kompatinda fiŝo freneze ripetis foje kaj refoje:

'Mia edzino! Mia edzino! Mi devas esti ĉe mia edzino! Mi pli zorgas pri ŝi ol pri mia propra vivo!

'Mia edzino! Mia edzino! Mi devas esti ĉe mia edzino! Mi pli zorgas pri ŝi ol pri mia propra vivo!'"

La konsilanto pensis: "Tiu ĉi fiŝo estas vere freneza. Li dronis en terura situacio ĉar li fariĝis sklavo de sia propra revo. Estas klare, ke li lernis neniom el la rezultoj de siaj antaŭaj kondutoj. Se li mortos en agonio kaj interna revo, kiu

kaŭzis lian agonion, li daŭre suferos en sia venonta renaskiĝo en la infera mondo. Do mi devas savi ĝin!"

La bonkora konsilanto iris al la fiŝistoj kaj diris: "Miaj amikoj, la lojalaj popolanoj de nia reĝo. Vi ankoraŭ ne donis fiŝon kiel manĝaĵon al mi kaj miaj sekvantoj. Ĉu vi bonvolas doni al ni nun?"

La fiŝistoj respondis: "Ho, Nia Reĝa Konsilanto, bonvolu akcepti iun ajn fiŝon laŭ via plaĉo." "Tiu ĉi granda fiŝo sur la bordo ŝajnas bongusta," diris la konsilanto. "Bonvolu preni ĝin, Sinjoro," ili respondis.

Sidiĝinte sur la bordon, la konsilanto portis la ĝemantan fiŝon per ambaŭ manoj kaj parolis al li en lingvo komprenebla nur al la fiŝoj. Li diris:

"Vi malsaĝa fiŝo! Se mi ne vidus vin hodiaŭ, vi perdus vian vivon. Via blinda revo gvidis vin al konstanta sufero. Ekde nun, ne lasu vin kateniĝi de via propra revo!"

Tiam la fiŝo ekkonsciis, kiel fortuna li estas havante tiel bonan amikon. Li dankis la konsilanton por lia saĝa admono. La konsilanto liberigis la fortunan fiŝon en la riveron, kaj daŭrigis sian vojon.

La moralinstruo estas: Malsaĝuloj estas katenitaj de siaj propraj revoj.

## 34. KOTURNIDO ANKORAŬ NE FLUGPOVA



**[Potenco de Vero, Virto kaj Kompato]**

Iam en unu el siaj reenkarniĝoj, la Iluminiĝinto naskiĝis kiel malgranda koturnido. Kvankam li havis malgrandajn piedojn kaj flugilojn, tamen li ankoraŭ ne scipovis piediri kaj flugi. Liaj gepatroj laboris diligente por porti manĝaĵon al la nesto kaj nutri lin per sia beko.

Ĉiujare kutime okazis fajrego en tiu parto de la mondo. Do fajro okazis en tiu jaro. Ĉiuj flugpovaj birdoj forflugis vidinte la fumon. La fajro disvolviĝis pli kaj pli

proksimen al la nesto de la koturnido, dum liaj gepatroj restis kun li. Fine kiam la fajro estis tre proksima, ili povis fari nenion alian ol forflugi solaj por sin savi.

Ĉiuj arboj grandaj kaj malgrandaj brulis kaj krakis en granda bruo. La malgranda koturnido vidis, ke ĉio detruigis de la ne haltigebla fajro. Li povis fari nenion alian por sin savi. Ĝuste tiam, sento de senhelpeco plenigis lian menson.

Subite li pensis: "Miaj gepatroj tre amas min. Ili sindoneme konstruis neston por mi kaj vartis min malavare. Kiam okazis la fajro, ili restis ĉe mi ĝis la lasta momento dum la aliaj flugpovaj birdoj jam forflugis antaŭ longa tempo.

"Kiel granda estas la amo de miaj

gepatroj al mi, ke ili restis kaj riskis sian vivon, sed ili montris sian senrimedecon por min savi.

"Ĉar ili ne povis porti min, ili forflugis solaj devigite. Kie ajn ili estas, mi dankas ilin pro ilia sindonema amo al mi. Mi tutkore bondeziras, ke ili estu sekuraj, bonfartaj kaj feliĉaj.

"Nun mi estas tute sola. Al neniu mi povas iri por peti helpon. Mi havas flugilojn, tamen mi ne kapablas forflugi. Mi havas piedojn, tamen mi ne povas forkuri. Sed almenaŭ mi ankoraŭ povas mediti. Ĉio, kion mi povas uzi, estas mia menso ankoraŭ pura. La nuraj konatoj en mia mallonga vivo estas miaj gepatroj kaj mia menso pleniĝis de amo al ili. Al neniu

mi faris malbonon. Mi estas plena de pura honesteco de novnaskito."

Tiam miraklo okazis. La pura honesteco des pli kreskis ĝis ĝi fariĝis pli granda ol la malgranda birdido. La scio de vero disvastiĝis tra tiu vivperiodo, kaj li eksciis multe pri siaj antaŭaj vivoj. En unu el siaj antaŭaj vivoj li konis budhon, la perfekte iluminiĝintan ĉiosciulon, kiu havas potencon de vero, purecon de virto kaj celon de kompatato.

Tiam la grandulo en la malgranda birdido pensis: "La nuna pura honesteco unuiĝu kun la antikva pureco de virto kaj potenco de vero. Saviĝu ĉiuj birdoj kaj aliaj vivestaĵoj ankoraŭ suferantaj en la fajro. Tiu ĉi loko estu sekura de fajro por

milionoj da jaroj!"

Ĉio vere okazis laŭ lia deziro.

La moralinstruo estas: Vero, virto kaj kompatato povas savi la mondon.



## 35. BIRDOJ SAĜAJ KAJ MALSAĜAJ



[Bona Averta]

Iam estis giganta arbo en arbaro. Multaj birdoj vivis sur la arbo, kaj ilia estro estis la plej saĝa el ili.

Iutage, la estro vidis du branĉojn frotantaj unu kontraŭ la alia. Tio faligis lignerojn sur la teron. Tiam li rimarkis fumeton leviĝantan de la reciproke frotantaj branĉoj. Li pensis: "Sendube okazos fajro, kiu bruligos la tutan arbaron."

Do la saĝa maljuna birdo kunvenigis ĉiujn birdojn vivantaj sur la giganta arbo.

Li sincere avertis al ili: "Miaj karaj amikoj, brulos la arbo, sur kiu ni vivas. La fajro detruos la tutan arbaron. Do estos danĝere resti ĉi tie. Ni tuj forlasu la arbaron!"

Saĝaj birdoj konsentis pri lia averto. Do ili flugis al alia arbaro en malsama lando. Sed la birdoj ne tiel saĝaj diris: "La maljuna estro estas timema. Li eĉ imagis krokodilojn el guto da akvo! Kial ni forlasu niajn nestojn komfortajn kaj ĉiam sekurajn? Lasu la timemulojn forflugi. Ni fidu nian arbon kuraĝe!"

Post nelonge, vere okazis fatalaĵo kiel avertis la saĝa gvidanto. La reciproke frotantaj branĉoj estigis fajreron, kiu falis en sekajn foliojn sub la arbo. La fajreroj fariĝis fajro pli kaj pli granda.

Post nelonge, la giganta arbo ekbrulis. La restantaj malsaĝaj birdoj blindiĝis kaj sufokiĝis en fumo. Multaj ne eskapintaj birdoj pereis en la fajro.

La moralinstruo estas: Oni riskas sian vivon, se ignorante la admonon de saĝuloj.

## 36. NASKIĜO DE BANJANO



### [Respekto al Maljunuloj]

Iam sub la altega Himalajo kreskis granda banjano. Ĉe la banjano vivis tri intimaj amikoj. Ili estis koturno, simio kaj elefanto. Ili ĉiuj estis tre saĝaj.

Ili ekhavis malsamajn opiniojn de tempo al tempo. Kiam tio okazis, neniu el ili konsideris la opinion de aliaj pli valora. Kiom ajn unu spertis pri io, lia opinio neniom pli valoras ol tiu de la aliaj du senspertuloj. Do ili devis elspezi longan tempon por atingi komunan konsenton.

Iom poste, ili ekkonsciis, ke ili

ŝparos tempon kaj pliigos amikecon se ili mallongigos konflikton. Do ili konkludis, ke tio pli helpas, se ili konsideros la plej valoran opinion unue. Tiel, ili ne plu perdos tempon kaj malutilos al amikeco pro disputado.

Feliĉe, ili ĉiuj opiniis, ke la plej valora opinio baziĝas sur riĉaj spertoj. Do ili povos vivi eĉ pli harmonie se ili respektos la plejaĝan el ili. Ili konsideros la opiniojn de aliaj nur se tiu de la plejaĝulo estos vere evidente malvera.

Malfeliĉe, la elefanto, simio kaj koturno tute ne sciis, kiu estas la plej aĝa, ĉar tiutempe oni ankoraŭ ne kutimis doni respekton al la pliaĝaj kaj ili ne bezonis memori siajn naskiĝdaton aŭ aĝon.

Iutage, kiam ili ripozis en la ombro de la granda banjano, la koturno kaj simio demandis la elefanton: "Kiom granda estis tiu ĉi arbo, laŭ via plej frua rememoro?"

La elefanto respondis: "Mi memoris tiun ĉi arbon dum tre longa tempo. Kiam mi estis malgranda bebo, mi kutime senjukigis mian ventron frotante ĝin kontraŭ la molaj ŝosoj de la arbopinto."

La simio diris: "Kiam mi estis scivolema bebo, mi kutime sidis kaj fiksrigardis la malgrandan plantidon de la arbo. Iam mi eĉ klinis min por mordi la molajn foliojn."

La simio kaj elefanto demandis la koturnon: "Laŭ via plej frua memoro, kiom granda estis tiu ĉi banjanarbo?"

La koturno diris:" Kiam mi estis juna, mi serĉis manĝaĵon en proksima arbaro. En la arbaro estis banjanarbo granda kaj maljuna, plena de maturaj beroj. Foje mi manĝis iom da beroj kaj en la sekva tago mi fekis ĉi tie. Semoj en la fekaĵo elĝermis kaj fariĝis tiu ĉi arbo."

La simio kaj elefanto diris: "Ha! Sinjoro koturno, vi estas la plej aĝa el ni. Vi estas plej respektinda kaj honorinda por ni. Ekde nun ni turnos grandan atenton al viaj vortoj. Laŭ viaj saĝo kaj sperto, admonu nin kiam ni faros erarojn. Kiam okazos malkonkordo, ni pli alte taksos vian opinion. Ni nur petas, ke vi estu honesta kaj justa."

La koturno respondis: "Mi dankas

por viaj respektoj, kaj mi promesas ĉiam esti taŭga por tio laŭeble." La saĝa malgranda koturno fakte estis Bodisatvo, la luminiĝinto.

La moralinstruo estas: Respekto al la saĝo de maljunuloj kondukas al harmonio.



## 37. GRUO KAJ KRABO



[Trompo]

Iam gruo vivis ĉe lageto. Ĉe la lageto kreskis granda arbo, en kiu loĝis feo. La feo sciis multe per observado al diversaj bestoj.

En la lageto estis multaj malgrandaj fiŝoj. La gruo kutime kaptis fiŝojn per sia beko kaj manĝis ilin. Okazis serioza sekeco, kaj akvo en la lageto pli kaj pli malprofundiĝis. La gruo kaptis fiŝojn pli facile kaj fariĝis pli dika.

Sed la gruo neniam kontentiĝis, kiel ajn facile li kaptis fiŝojn kaj kiom multe

li manĝis ilin. Li neniom lernis el tio, anstataŭe, li supozis, ke li trovos la veran feliĉon, se li manĝos ĉiujn fiŝojn en la lageto. "Ju pli multe, des pli agrable!" li diris al si mem.

Por kapti ĉiujn fiŝojn en la lageto la grupo ekhavis saĝan ideon, ke li povos trompi ilin por akiri ilian fidon, kaj kiam ili plej fidus lin, li povos kapti ilin ĉiujn. Li raviĝis de sia ideo.

Komence, la grupo sidis sur la bordo kviete kaj senmove, kvazaŭ sanktulo meditus en la arbaro. Li tion faris nur por akiri al si fidon de la fiŝoj.

Fiŝoj venis al li kaj demandis: "Pri kio vi pensas, Sinjoro Grupo?" Respondis la grupo, sin ŝajnigante sanktulo: "Miaj

karaj fiŝoj, mi malĝojas pensante pri via estonteco. Mi pensas pri la mizera katastrofo baldaŭ okazonta al vi."

Ili demandis: "Kia fatalaĵo okazos al ni, estimata sinjoro?" La gruo respondis: "Rigardu ĉirkaŭen! Jam estas tre malmulta akvo en la lago. Vi havos nenion por manĝi. La serioza sekeco estas tre danĝera al vi, malgrandaj estuloj."

Do la fiŝoj demandis: "Kion ni faru por nin savi, Kara Onklo Gruo?" "Miaj kompatindaj idoj," respondis la gruo: "vi devas fidi min kaj agi laŭ mia propono. Se vi permesas, ke mi prenu vin per mia beko, mi portos vin unu post alia al alia lago. Tiu lago estas multe pli granda ol ĉi tiu. Ĝi estas plena de akvo kaj kovrita de

belaj lotusfloroj. Ĝi estos paradizo por vi!"

Kiam la fiŝoj aŭdis la vorton "beko", ili eksuspektis. Ili diris: "Sinjoro Gruo, kiel ni povas fidi vin? Ekde la komenco de la mondo, neniu gruo volas nin helpi. Ili kutime kaptas nin per la beko nur por manĝi. Tio certe estas trompo aŭ ŝerco!"

La gruo levis la kapon kaj laŭeble sin ŝajnis majesta. Li diris: "Bonvolu ne tiel pensi. Ĉu vi ne elvidis, ke mi estas gruo tre speciala? Vi devas fidi min. Sed se vi ne kredas min, sendu fiŝon al mi, ke mi montru al li la belan lageton. Kiam mi revenigos lin, vi komprenos, ke mi estas fidinda."

La fiŝoj interkonsiliĝis: "La gruo ŝajnas majesta. Li parolas kiel honestulo. Eĉ se

tio estas trompo, ni sendu al li fiŝeton senutilan kaj abomenindan por provi la verecon." Do ili trovis junan petoleman fiŝon forglitintan el la lernejo, kaj puŝis lin al la bordo.

La gruo mallevis la kapon kaj prenis la malgrandan fiŝon per sia beko. Li etendis laflugilojn kaj flugis al granda arbo sur la bordo de la bela lago. Ĝuste kiel li diris, la lago estis kovrita de belaj lotusfloroj. La fiŝo surpriziĝis de tiel bela loko. Poste, la gruo reportis lin al la malgranda lago laŭ la promeso.

Atinginte hejmen, la fiŝeto priskribis la belecon de la granda lago. Aŭdinte tion, ĉiuj aliaj fiŝoj ekscitiĝis kaj konkuris por iri la unua.

La unua fortuna pasaĝero estis sama petolulo senutila. La gruo denove prenis lin per sia beko kaj flugis al la granda arbo sur la bordo de la bela lago. La malgranda fiŝo kredis, ke la helpema gruo metos lin en la belan lagon, sed male, la gruo subite mortigis lin, ŝiris lin kaj lasis la ostojn fali sur la teron.

La gruo reflugis al la antaŭa lago, prenis la duan malgrandan fiŝon al la sama arbo kaj manĝis lin en la sama maniero. Tiel li englutis eĉ la lastan fishon de la lageto

Plenigita de fiŝoj, li revenis al la malgranda lago tre malfacile. Li vidis, ke restas neniu fiŝo por li allogi kaj manĝi. Tiam li rimarkis amindan krabon

rampanta laŭ kota bordo. Li trovis, ke li ankoraŭ ne kontentiĝis.

Do li iris al la krabo kaj diris: "Mia kara krabo, mi jam bonfare portis ĉiujn fiŝojn al la belega granda lago proksime. Kial vi restas sola? Se vi volas agi kiel la fiŝoj, lasu min porti vin per mia beko. Mi ĝojplene portos vin tien. Tio estas bona al vi. Bonvolu min fidi."

La krabo pensis: "Sendube la tro satiĝinta gruo jam manĝis ĉiujn tiujn fiŝojn. Lia ventro estas tiel plenplena, ke li apenaŭ povas stari rekte. Certe li ne estas fidinda! Estos pli bone se mi lasos lin porti min al la nova lago kaj meti en la akvon. Tamen se li provos min manĝi, mi tranĉos lian kapon per miaj akraj pinĉiloj."

La krabo diris: "Mia kara gruo, mi timas, ke mi estas tro peza por vi porti en via beko. Eble vi faligus min sur la vojo. Anstataŭe, mi kaptu vian kolon per miaj ok piedoj, kaj tiel vi povos sekure porti min al mia nova hejmo."

La gruo kutimis trompi aliajn, do li neniel imagis, ke li mem estos en danĝero, se la krabo kaptos lin je la gorgo. Anstataŭe, li pensis: "Bonege. Tio donos al mi bonŝancon manĝi la dolĉan karnon de tiu ĉi krabo stulta kaj kredema."

Do la gruo permesis la krabon kapti lian kolon per siaj piedoj. Krome, la krabo kaptis la gorgon de la gruo per siaj akraj pinĉiloj. Li diris: "Nun bonvolu porti min al la nova lago."



La stulta gruo, kun la kolo kaptita de la krabo, flugis al la sama granda arbo ĉe la nova lago.

Tiam la krabo diris: "He, vi stulta gruo! Ĉu vi perdis la vojon? Vi ne portis min al la lago. Kial vi ne portu min al la bordo kaj metu min en la lagon?"

La gruo diris: "Kiun vi nomas stulta? Mi ne akceptos tion de vi. Vi ne estas mia parenco. Mi supozas, ke vi volas trompi min por senpaga vojaĝo. Sed mi estas saĝulo. Nur rigardu la fiŝostojn sub la arbo. Mi jam elmanĝis ĉiujn fiŝojn. Nun mi manĝos ankaŭ vin, stultan krabon!"

La krabo respondis: "La fiŝoj estis manĝitaj ĉar ili estis sufiĉe stultaj pro sia fido al vi. Sed nun neniu plue kredas

vin. Vi jam trompis fiŝojn, do vi opinias, ke vi povas trompi ĉiujn aliajn. Sed vi ne kapablas trompi min. Mi jam kaptis vian gorgon. Se mortos iu el ni, mortu ni ambaŭ!"

Tiam la grupo konsciis pri sia danĝero. Li petis la krabon: "Mia estimata krabo, bonvolu lasi min libera. Mi jam lernis la bonan lecionon. KREDU min. Mi ne plu deziras manĝi krabon tiom belan kiom vi."

Poste, li flugis suben al la bordo kaj daŭrigis: "Nun bonvolu liberigi min. Bonvolu fidi min por via propra bono."

Sed la maljuna krabo jam estis ĉe la bordo. Li konsciis, ke la grupo estas ne fidinda, kion ajn li diris. Li sciis, ke se li ellasos la grupon, tiu certe manĝos lin.

Do li tranĉis lian kolon per siaj pinĉiloj kvazaŭ li tranĉus buteron. La kapo de la gruo falis sur la teron kaj tiam la krabo rampis sekure en la belegan lagon.

Samtempe ankaŭ la scivolema feo venis al la nova lago kaj vidis la tutan okazaĵon. Sidante sur la supro de la granda arbo, li diris por ke ĉiuj feoj aŭdu: "Tiu, kiu vivis per trompo neniam kredis, kiel li mortas nun."

La moralinstruo estas: La ne fidita trompisto faris sian lastan trompon.

## 38. KAŜITAJ TREZOROJ



### [Aroganteco de Povo]

Iam vivis maljunulo en Benareso. Li havis tre bonan amikon faman pro saĝo. Feliĉe, aŭ eble malfeliĉe, li havis ankaŭ edzinon belan kaj junan.

La maljunulo kaj lia edzino havis filon, kiun li amegis. Iutage venis al li ideo: "Mi opinias, ke mia bela juna edzino ne ĉiam estas fidinda. Mi certas, ke ŝi edziniĝos al alia viro post mia morto, kaj ili elspezos ĉiujn trezorojn pene gajnitajn de mi. Plie, mia filo heredos neniom de sia patrino. Do mi faru ion por garantii la heredaĵon al

mia kara filo. La trezorojn mi enterigos kaj protektos por li."

Li alvenigis Nanda, sian plej fidelan serviston. Ili kune portis ĉiujn liajn trezorojn en profundan arbaron kaj enterigis ilin. Li diris: "Mia kara Nanda, mi scias, ke vi estas obeema kaj fidela. Donu la trezorojn al mia filo post mia morto. Kaŝu la sekreton ĝis tiam. Kiam vi donos la trezorojn al li, konsilu lin uzi la havaĵon saĝe kaj malavare."

Post nelonge la maljunulo mortis. Lia filo finis sian lernadon post kelkaj jaroj. Li revenis hejmen por esti mastro de la familo. Lia patrino diris: "Via patro estis homo suspektema, Mia filo. Li kaŝis ĉiujn siajn trezorojn. Mi certas, ke lia fidela

servisto Nanda scias la lokon de la kaŝitaj trezoroj. Petu lin montri la trezorojn al vi. Tiam vi povos edziĝi kaj vivteni la tutan familion."

Do la filo iris al Nanda kaj demandis, ĉu li scias, kie lia patro kaŝis siajn trezorojn. Nanda respondis al li, ke la trezoroj estas kaŝitaj en la arbaro kaj li scias la precizan lokon.

Ili ambaŭ iris en la arbaron kun korbo kaj fosilo. Kiam ili atingis la lokon de la kaŝitaj trezoroj, Nanda subite arogantiĝis pri sia graveco. Kvankam li estis nur servisto, li havis la povon sole scii la sekreton. Do li malmodestiĝis je la penso, ke li estas pli grava ol la filo. Li diris: "Vi, filo de servknabino! De kie vi povus

heredi la trezorojn?"

La pacienca filo ne refutis la serviston. Li eltenis lian insultadon kvankam ege surprizite. Post nelonge ili revenis hejmen kun malplenaj manoj.

La stranga agmaniero de la servisto ripetiĝis kelkajn fojojn. La filo pensis: "En la hejmo Nanda volontis malkaŝi al mi la sekreton de la trezoroj. Sed post kiam ni iris en la arbaron kun korbo kaj fosilo, li ne plu volis tion fari. Mi volas scii, kial li ŝanĝis sian decidon ĉiufoje."

Li decidis viziti la saĝan amikon de sia patro por solvi la enigmon. Li iris kaj rakontis al li pri la okazaĵo.

La maljuna saĝulo proponis: "Iru refoje kun Nanda en la arbaron. Rigardu,

kie li staros kiam li insultos vin. Li certe tion faros. Poste forpelu lin dirante, 'Vi ne rajtas paroli al mi tiamaniere. Foriru!'

""Kaj tiam vi fosu la teron je la loko kaj vi trovos vian heredaĵon. Nanda estas humilega homo. Do li nur kuraĝas insulti vin kiam li proksimiĝas al sia malgranda povo."

La filo sekvis la proponon precize. Vere li trovis la kaŝitajn trezorojn. Li malavare uzis la trezorojn por helpi aliajn homojn laŭ la espero de sia patro.

La moralinstruo estas: Humilegaj homoj facile arogantiĝas je malgranda povo.



## 39. SILENTA BUDHO



### [Malavareco]

Iam riĉega viro vivis en Benareso de norda Hindio. Li heredis multe da havaĵoj de sia patro. Li pensis: "Kial mi rajtas ĝui la trezorojn sola? Ankaŭ miaj homoj profitu de la riĉaĵo."

Li do konstruis manĝejojn ĉe la kvar pordoj norda, orienta, suda kaj okcidenta de la urbo. En la manĝejoj li senpage donacis manĝaĵon al ĉiuj laŭ la bezono. Li famiĝis pro sia malavareco, kaj kiel oni sciis, li kaj liaj subuloj ankaŭ estis praktikantoj de la kvin trejnaj ŝtupoj.

Tiam vivis Silenta Budho praktikanta meditado en la arbaro ĉe Benareso.

Li nomiĝis Budho, ĉar li estis luminiĝinta. Tio signifas, ke li ne plu vivis en sperto de si mem, la tiel nomata "li", kiu estas diferenca de ĉiuj aliaj vivoj. Do li havis vivon de la realo en iu ajn momento.

En ĉiuj siaj vivoj li plenis de kompatemo kaj favoro al ĉiuj malfeliĉaj vivestaĵoj. Li deziris instrui kaj helpi ilin luminiĝi kiel li, sed la tempo de nia rakonto estis plej maloportuna kaj malĝojiga. La Budho bone sciis pri tio, do li povis fari nenion krom sin teni silenta.

Meditante en la arbaro, Silenta Budho sin dronis en altegan animstaton. Li tiel

profundiĝis en la meditado, ke li sidis senmove dum sep tagoj kaj noktoj sen manĝi kaj trinki.

Kiam li revenis al la ordinara stato, li estis ĉe morto de malsato. Je la kutima tempo en la tago, li iris al la domo de riĉulo en Benareso por peti manĝaĵon.

Apenaŭ la riĉulo sidiĝis por tagmanĝi, li ekvidis Silentan Budhon alvenanta kun almozbovlo. Li tuj stariĝis de la sidejo respektoplene, kaj ordonis sian serviston donaci almozon.

Samtempe tion vidis Marao, la dio de morto. Marao estis plena de avidemo al povo super ĉiuj vivestaĵoj. Li nur povis havi tiun povon pro la terura morto.

Ĉar Silenta Budho vivis en perfekteco

ĉiumomente, li havis nek sopiron al la estonta vivo, nek timon al la estonta morto. Sen povo super Silenta Budho, Marao deziregis detrui lin. Kiam li vidis, ke Silenta Budho proksimiĝas al morto pro malsato, li sciis, ke li havos bonan ŝancon por sukceso.

Antaŭ ol la servisto metis manĝaĵon en la almozbovlon de Silenta Budho, Marao estigis profundan fosaĵon kun ruĝe kaj arde brulantaj karboj interne, kvazaŭ ĝi estus enirejo de la infero.

Vidinte tion, la servisto ektimis morte. Li tuj kuregis al la mastro. La riĉulo demandis, kial li revenis sen almozdoni. Li respondis: "Mia Mastro, estas profunda fosaĵo kun ruĝe kaj arde brulantaj karboj

antaŭ Silenta Budho."

La riĉulo pensis: "Eble ion vidis tiu ĉi viro." Do li sendis alian serviston kun manĝajo por almozdono. Ankaŭ tiu lasta ektimis je la sama fosaĵo de fajro. Li sendis kelkajn servistojn, sed ili ĉiuj revenis pro la sama kaŭzo.

La mastro pensis: "Sendube tiu Marao, la dio de morto, provas malhelpi min de bonfaro donaci manĝaĵon al Silenta Budho. Ĉar la bonfaro estas la komenco de la vojo al perfekta luminiĝo, tiu ĉi Marao ĉiam volas haltigi min per diversaj klopodoj. Sed li tute ne komprenas mian fidon al Silenta Budho kaj firmvolon por almozdono."

Do li mem portis manĝaĵon al Silenta

Budho. Ankaŭ li vidis la fajron leviĝantan el la timinda fosaĵo. Li levis la kapon, kaj vidis la teruran dion de morto starantan en la ĉielo. Li demandis: "Kiu vi estas?" Marao respondis: "Mi estas la dio de morto."

"Ĉu vi estigis la fajran fosaĵon?" demandis la viro. "Jes," respondis la dio. "Kial vi tion faris?" "Por malhelpi vin de la almozdono, kaŭzi la morton al Silenta Budho kaj ankaŭ malhelpi vian bonfaron kondukantan al la vojo de luminiĝo. Tiel vi restos ĉiam sub mia regado!"

La riĉulo de Benareso diris: "Marao, dio de morto, la malbonulo, vi tute ne povas mortigi Silentan Budhon, kaj vi ne povas malhelpi mian almozdonon! Ni

vidu, kies firmvolo estas pli forta!"

Poste li rigardis tra la fajro kaj diris al la iluminiĝinto kvieta kaj ĝentila: "Silenta Budho, lasu la lumon de la vero daŭre brili por ni. Bonvolu akcepti la donacon de vivo!"

Tion dirante, li tute forgesis pri si mem kaj neniom timis pri la morto en tiu momento. Kiam li iris en la brulantan fosaĵon, li trovis, ke lin supren levis lotusfloro bela kaj malvarmeta. La poleno de la mirakla lotusfloro ŝutiĝis en la aeron, kaj kovris lin per brila orkoloro. Starante en la mezo de la lotusfloro, la grandulo metis la manĝaĵon en la bovlon de Silenta Budho. Marao, la dio de morto, estis tute venkita.

Admirante la raran donacon, Silenta Budho levis siajn manojn kaj ekbenis lin. La riĉulo esprimis sian estimon kun manoj alpremataj super la kapo. Tiam Silenta Budho forlasis Benareson kaj iris en arbaron de Himalajo.

Starante sur la mirinda lotusfloro brilanta en orkoloro, la malavara mastro instruis siajn subulojn, ke ili povas purigi sian menson per praktikado de la kvin trejnaj ŝtupoj, kaj per la pura menso ili povas gajni grandan meriton en almozdono. Tio estas vera donaco de homa vivo.

Kiam li finis la paroladon, tute malaperis la fajra fosaĵo kaj la bela malvarmeta lotusfloro.



La moralinstruo estas: Nenion timu  
dum farado de bonaj aferoj.

## 40. LA MALBENO DE MITAVINDO



### [Ĉapitro 1. Ĵaluzo]

Iam monaĥo vivis en la monaĥejo de malgranda vilaĝo. Li estis tre fortuna, ĉar riĉulo en la vilaĝo vivtenis lin en la monaĥejo. Li neniam maltrankviliĝis pri la mondaj zorgoj. La riĉulo ĉiam provizis lin per manĝaĵo.

Do la monaĥo estis kvieta kaj paca en la menso. Li nek timis pri perdo de siaj komforto kaj ĉiutagaj manĝaĵoj, nek deziris pli grandajn komfortojn kaj plezurojn en la mondo. Anstataŭe, li senĝene praktikis la ĝustan konduton de

monaĥo, ĉiam korektante sian eraron kaj farante nur bonajn aferojn. Sed tamen, li tute ne sciis kiel fortuna li estas.

Iutage pliaĝa monaĥo venis al la malgranda vilaĝo. Li sekvis la vojon de la Vero ĝis kiam li fariĝis perfekta kaj senmanka.

Kiam la vilaĝa riĉulo vidis la fremdan monaĥon, li ekplezuris pro liaj ĝentila maniero kaj kvieta sinteno. Do li invitis lin hejmen. Li regalis lin per manĝaĵo kaj opiniis, ke estas tre fortune aŭdi instruon de li. Li invitis lin loĝi en la vilaĝa monaĥejo. Li diris: "Mi vizitos vin ĉivespere por min certigi, ke ĉio estas bone aranĝita por vi."

Kiam la perfekta monaĥo atingis

la monaĥejon, li renkontis la vilaĝan monaĥon. Ili reciprokis saluton plezure. Poste la vilaĝa monaĥo demandis: "Ĉu vi jam tagmanĝis hodiaŭ?" La pliaĝulo respondis: "Jes. La patrono de la monaĥejo donis manĝaĵon al mi. Li ankaŭ invitis min loĝi ĉi tie."

La vilaĝa monaĥo gvidis lin en la ĉambbron kaj lasis lin tie. La perfekta monaĥo pasigis sian tempon en meditado.

Malfrue en la vespero, la vilaĝa riĉulo alvenis. Li alportis fruktan sukron, florojn kaj lampan oleon por honori la sanktan monaĥon. Li demandis la vilaĝan monaĥon: "Kie estas nia gasto?" La monaĥo informis lin pri la loĝejo de la gasto.

La riĉulo iris en la ĉambron, kaj riverence salutis la perfektan monaĥon. Li denove aprezis la aŭskultadon al la vera instruo de tiu rara sanktulo.

Poste, kiam nokto proksimiĝis, li lumigis la lampon kaj oferis florojn en la bela halo de la monaĥejo. Li invitis ambaŭ monaĥojn tagmanĝi en lia hejmo la sekvan tagon. Poste li forlasis la monaĥejon por reveni hejmen.

Dum nokto okazis io terura. La vilaĝa monaĥo, kiu iam sentis kontentecon, naskis venenan ĵaluzon en la koro. Li pensis: "La vilaĝa riĉulo faciligas mian vivon ĉi tie. Li donas al mi loĝejon nokte kaj plenigas mian ventron fojon ĉiutage. Sed mi timas, ke tio ŝanĝiĝos, ĉar li tiom

respektas la novan alveninton. Se tiu lasta restos en la monaĥejo, mia patrono eble ne plu zorgos pri mi. Do mi ne lasu lin resti ĉi tie."

Tiel pensante, li perdis sian antaŭan mensan kvieton. Lia menso perturbiĝis pro liaj ĵaluzo kaj timo perdi komforton kaj tagajn manĝaĵojn. Lia koro plidoloriĝis pro lia malamo kontraŭ la sankta monaĥo. Li ekcerbumis por trovi metodon foririgi lin.

En la malfrua nokto la monaĥoj kolektiĝis por la tagfina kunveno laŭ rutino. La perfektulo parolis amike kiel kutime, sed la vilaĝa monaĥo tute ne parolis kun li.

Do la saĝa monaĥo komprenis, ke la

vilaĝa monaĥo estas ĵaluza kaj kolera. Li pensis: "La monaĥo ne komprenas mian liberigon de kroĉigo al familioj, homoj kaj komfortoj. Mi estas libera de ĉia deziro por resti ĉi tie aŭ foriri. Tio estas tute egala por mi. Ŝajnas, ke li ne povas kompreni senzorgecon. Mi bedaŭras por li, kiu devas pagi grandan koston pro sia senscieco."

Li revenis al sia ĉambro, fermis la pordon kaj meditis en alta mensa stato dum la tuta nokto.

Sekvan tagon je la tempo por peti manĝaĵon ĉe la patrono de la monaĥejo, la vilaĝa monaĥo devis bati la templan gongon. Sed li faris tion per sia ungo tiel malpeze, ke eĉ birdoj en la korto ne povus

aŭdi la mallaŭtan sonon.

Poste li iris al la ĉambro de la gasto por frapi je la pordo. Li denove frapetis malpeze per sia ungo, ke eĉ malgrandaj musoj en la ĉambro ne povus aŭdi la frapeton.

Post la kutima devo en tiel malsincera maniero, li iris al la domo de la riĉulo. La riĉulo riverencis al li respektoplene, akceptis lian almozbovlon kaj demandis: "Kie estas nia gasto?"

La vilaĝa monaĥo respondis: "Mi ne vidis lin. Mi batis la gongon kaj frapis je lia pordo, sed li ne aperis. Eble li ne kutimiĝis al tiel abundaj manĝaĵoj donacitaj de vi hieraŭ. Eble li ankoraŭ dormas, okupiĝante pri digestado de



manĝaĵoj kaj songante pri la sekva festeno!  
Eble li estas tia monaĥo, kia plaĉa al vi!"

Samtempe vekiĝis la perfekta monaĥo en la malantaŭo de la monaĥejo. Li sin purigis kaj surmetis sian robon. Poste li kviete forlasis la monaĥejon por kolekti manĝaĵon ie ajn, kie li povis. La riĉulo regalis la vilaĝan monaĥon per la plejriĉa manĝaĵo. La manĝaĵo bongusta kaj dolĉa konsistis el rizo, lakto, butero, sukero kaj mielo. Post kiam la monaĥo manĝis ĝissate, la riĉulo prenis lian bovlon, purigis ĝin kaj dolĉigis ĝin per parfumita akvo. Li plenigis la bovlon per sama bongusta manĝaĵo. Li donis ĝin al la monaĥo, dirante: "Honora majstro, nia sankta gasto eble laciĝis de la longa vojaĝo. Bonvolu

porti la modestan manĝaĵon al li." Nenion dirinte, la monaĥo akceptis la malavaran donacon por la alia kaj eliris.

Nun ĵaluza plano regis en la menso de la vilaĝa monaĥo. Li pensis: "Se la gastanta monaĥo manĝus la ambrozian manĝaĵon, li ne plu forirus eĉ se mi kaptus lin je la gorgo kaj piedbatus lin. Mi devas sekrete forigi la manĝaĵon. Se mi donos ĝin al fremdulo, oni scios kaj parolos pri tio. Se mi ĵetos ĝin en la lagon, la butero elflosos sur la surfacon kaj oni trovos tion. Se mi elverŝos ĝin sur la teron, la bovoj venos de malproksime por manĝi ĝin, kaj oni rimarkos tion. Kion mi faru?"

Tiam li vidis kampon fajrigitan de kamparanoj por fekundigi. Ĝi estis kovrita

de varme brilantaj karboj. Do li ŝutis la malavaran donacon de la riĉulo sur la karbojn. La manĝaĵo forbruliĝis senspure. Tiel revenis la paco en lia koro!

Reveninte al la monaĥejo, li trovis, ke la gasto jam foriris. Li pensis: "Tiu certe estas perfekte saĝa monaĥo. Li certe scias, ke mi ĵaluzis pro timo al perdo de mia favora pozicio, kaj ke mi klopodis forigi lin pro mia malamo al li. Mi malŝparis la manĝaĵon apartenantan al li. Ĉio estis farita por teni mian ventron plena! Mi timas, ke io terura okazos al mi! Kion mi faru?" Do pro timo perdi siajn facilajn tagajn manĝaĵojn, li forĵetis la mensan pacon.

Dum la resta tempo de lia vivo, la

riĉulo daŭre vivtenis lin. Sed lia menso plenis de turmentiĝo kaj sufero. Li sentis la kondamnon kiel iranta kadavro aŭ malsata demono.

Eĉ post sia morto li ankoraŭ havis tian turmentiĝon. Li renaskiĝis en infera mondo, kie li suferis cent milojn da jaroj.

Poste li reenkariniĝis kaj mortis ankaŭ kiel aliaj vivestaĵoj. Sed tamen, tio nur kvitigis lin iom el la rezultoj de liaj antaŭaj fikondutoj. Do li renaskiĝis kiel demono 500 fojojn. Dum tiuj 500 vivoj li manĝis sate nur en unu tago, kaj tio, kion li manĝis tiutage, estis nur postnaskaĵo lasita de cervino en arbaro!

Poste li renaskiĝis kiel malsata vaganta hundo aliajn 500 fojojn! Pro la pleneco

de la ventro en lia monaĥa vivo, ĉiuj 500 vivoj estis plenaj de suferado kaj luktado por la manĝaĵoj. Nur unu fojon li trovis sufiĉan por manĝi, kaj tio estis elvomaĵo, kiun li trovis en kloako.

Poste la konsekvencaj rezultoj de liaj antaŭaj kondutoj finiĝis, kaj nur tiam li fortunate reenkarniĝis kiel homo. Li naskiĝis en la familio de la plej mizera almozulo en la urbo Kasio de norda Hindio. Li estis nomita Mitavindo.

Ekde lia naskiĝo, la malriĉa familio fariĝis eĉ des pli povra kaj mizera. Kelkajn jarojn poste, la doloro de malsato tiel fortiĝis, ke liaj gepatroj batis kaj elpelis lin. Ili kriis: "Foriru! Vi estas nenio alia ol malbeno!"

Vere malfeliĉa estis Mitavindo! Antaŭ tre longe li tute ne sciis, kiel feliĉa li estas. Li estis kontenta kiel modesta monaĥo en la vilaĝo. Sed en lia menso ekregis venena ĵaluzo kaj timo pri perdo de liaj facile akiritaj manĝaĵoj. Tio suferigis lin pro malamo kontraŭ sankta monaĥo, kaj pro miskonduto por senigi tiun de la almoza manĝaĵo. Kaj pro tio li pasigis mil kaj unu vivojn sen plenaj komfortoj kaj tagaj manĝaĵoj. Liaj propraj kondutoj kaŭzis tion, kion li timis antaŭe.

## [Ĉapitro 2. Avideco]

La malgranda Mitavindo apenaŭ sciis, ke liaj vivoj de konstanta malsato baldaŭ

finiĝos. Post longa vagado, lia suferado finiĝis en Benareso.

Tiam la Iluminiĝinto vivis kiel mondfama instruisto en Benareso. Li havis 500 lernantojn. La popolanoj en la urbo helpis la malriĉajn lernantojn per manĝaĵoj kiel bonfaro de filantropio. Ili ankaŭ pagis la instruiston por ties instruado.

Oni permesis al Mitavindo partopreni en la lernado. Li eklernis ĉe la granda instruisto, kaj finfine, ekhavis regulajn manĝojn.

Sed li tute ne atentis la instruon de la saĝa instruisto. Li estis malobeema kaj sovaĝa. Dum liaj antaŭaj 500 vivoj kiel malsataj hundoj, kverelado jam fariĝis lia kutimo. Do li konstante interbatis kun

aliaj lernantoj.

Li kaŭzis tiel grandan ĝenadon, ke multaj lernantoj ĉesigis la lernadon. La enspezo de la mondfama instruisto malaltiĝis ĝis preskaŭ neniom. Oni fine pelis Mitavindon el Benareso.

Mitavindo venis al malproksima vilaĝeto. Li vivis tie kiel diligenta laboranto, geedziĝis kun tre malriĉa virino kaj havis du infanojn.

Aŭdinte, ke li iam lernis ĉe la mondfama instruisto de Benareso, la malriĉaj vilaĝanoj elektis lin kiel konsilanton por peti lian helpon kiam okazis problemo. Ili provizis al li loĝejon ĉe la enirejo de la vilaĝo kaj ekakceptis liajn konsilojn.



Sed la aferoj iris malbone. La vilaĝanoj estis monpunitaj sepfoje de la reĝo; iliaj domoj estis bruligitaj sepfoje, kaj la vilaĝa lageto sekiĝis sepfoje.

Oni ekkonsciis, ke ĉiuj iliaj fatalaĵoj komenciĝis de kiam ili ekakceptis la konsilojn de Mitavindo. Do ili pelis lin kaj liajn familianojn el la vilaĝo. La furiozaj vilaĝanoj kriis: "For por ĉiam! Vi estas nenio alia krom malbeno!"

Dum sia fuĝado ili trapasis arbaron hantatan de demono. Demono iris el la ombro kaj mortigis liajn edzinon kaj infanojn. Nur li eskapis sola.

Li venis al ĉemara urbo. Li estis soleca, mizera kaj senmona. Okazis, ke en la urbo vivis riĉa komercisto bonkora

kaj malavara. Li aŭdis pri la malfeliĉa travivaĵo de Mitavindo, kaj kun sia edzino adoptis Mitavindon ĉar ili havis neniun propran infanon. Ĉu bone aŭ malbone, ili prenis lin kiel sian propran filon.

Liaj novaj gepatroj estis tre piaj je religio. Ili ĉiam klopodis fari bonajn aferojn. Sed Mitavindo ankoraŭ lernis nenion de sia pasinta leciono. Li akceptis nenian religion, do li ofte faris malbonajn aferojn.

Nelonge post la morto de lia patro, lia patrino decidis laŭeble helpi lin eniri religian vivon. Ŝi diris: "Ekzistas tiu ĉi mondo kaj la mondo, kiu sekvas en estonteco. Se vi faros malbonajn aferojn, vi suferos en ambaŭ mondoj."

Sed la malsaĝa Mitavindo respondis:  
"Mi faros tion, kio plaĉas al mi kaj  
plifeliĉigas min. Tute ne necesas pripensi,  
ĉu mia konduto estas bona aŭ malbona.  
Mi tute ne zorgas pri tiaj aferoj!"

En la sekva plenluna sankta tago, la  
patrino de Mitavindo konsilis al li iri al  
monaĥejo kaj tutnokte aŭskulti la saĝajn  
instruojn de la monaĥoj. Li diris: "Mi ne  
malŝparos mian tempon por tio!" Do ŝi  
promesis: "Kiam vi revenos, mi donos al  
vi mil ormonerojn."

Mitavindo pensis, ke li povos  
konstante sin amuzi kaj resti ĉiam feliĉa  
se li havos sufiĉan monon. Do li iris en  
la monaĥejon. Sed sidante ĉe angulo, li  
dormis kaj nenion atentis dum la tuta

nokto. Frue en la mateno li hejmen revenis por postuli la promesitan pagon.

Samtempe lia patrino supozis, ke li aprezos la saĝajn instruojn, kaj poste alkondukos la plej eminentan monaĥon hejmen. Do ŝi preparis bongustajn manĝaĵojn por la honora gasto. Kiam ŝi vidis lin revenanta sole, ŝi demandis: "Ho, mia filo, kial vi ne invitis la eminentan monaĥon reveni kun vi por matenmanĝo?"

Li respondis: "Mi iris al la monaĥejo ne por aŭskulti la monaĥojn aŭ inviti ilin hejmen, sed nur por gajni viajn mil ormonerojn!" La malespera patrino diris: "Ne plu zorgu pri la mono. Estas multaj bongustaĵoj jam preparitaj. Nur manĝu kaj poste dormu!" Li respondis: "Mi rifuzas

manĝi ĝis vi donos la monon al mi!" Do ŝi donis mil ormonerojn al li. Nur tiam li ekenglutegis la manĝaĵon ĝis dormo lin atakis.

Mitavindo opiniis, ke mil ormoneroj tute ne sufiĉas por lia konstanta amuziĝo. Do li faris negocon per la mono. Post nelonge li fariĝis tre riĉa. Iutage li revenis hejmen kaj diris: "Panjo, nun mi havas 120,000 orajn monerojn. Sed mi ankoraŭ ne kontentas pri tio. Mi vojaĝos eksterlanden per la sekva ŝipo kaj gajnos pli multe da mono!"

Ŝi respondis: "Mia filo, kial vi volas iri eksterlanden? La oceano estas danĝera kaj estos tre riske fari komercon en fremda lando. Mi havas 80,000 ormonerojn en

la domo. Tio estas sufiĉa por vi. Bonvolu resti, mia sola filo!"

Ŝi kaptis lin por deteni lin de la foriro. Sed Mitavindo freneziĝis de la avido. Li forpuŝis la manon de la patrino kaj frapis ŝin je la vizaĝo. Ŝi falis sur la plankon. Kun doloro kaj kolero, ŝi kriis al li: "Foriru por ĉiam! Vi estas nenio alia krom malbeno!"

Sen rigardi malantaŭen, Mitavindo kuris al la kajo kaj suriris la unuan ŝipon forirontan.

### [Ĉapitro 3. Plezuro]

Post sep tagoj en Hindia Oceano, ĉiuj ventoj kaj fluoj tute ĉesis. La ŝipo estis

haltigita. Retenate sur la akvo dum sep tagoj, ĉiuj homoj sur la ŝipo ektimis, ke ili perdos sian vivon.

Do ili ektiris pajlojn por eltrovi, kiu estas la kaŭzo de la malfeliĉo kaj timinda fatalaĵo. Sep fojojn la mallonga pajlo estis eltirita de Mitavindo.

Ili pelis lin sur bambuan floseton, kaj lasis lin flosi sur maro. Ili kriis: "Foriru por ĉiam! Vi estas nenio alia krom malbeno!" Subite forta vento ekblovis, kaj la ŝipo forveturis.

Sed la vivo de Mitavindo saviĝis refoje. Tion kaŭzis lia bona konduto kiel monaĥo antaŭ multaj vivoj. Kiom ajn da tempo povus pasi, viaj iamaj kondutoj estigos siajn rezultojn.

Kelktempe unu konduto kaŭzas pliajn rezultojn, kelkajn agrablajn kaj kelkajn malagrablajn. Laŭdire aŝuroj vivas en tiel miksaj rezultoj laŭ neordinara maniero.

Aŝuroj estas malfeliĉe malbelaj spiritoj. Iuj el ili estas sufiĉe fortunaj por transformiĝi en dancistinan diinon belan kaj junan. Ili nomiĝas Apsaroj.

Ili ĝuas la plej grandajn plezurojn en sep tagoj. Sed poste ili devas iri al infera mondo kaj suferi je turmentoj kiel malsataj demonoj por sep tagoj. Post la septaga suferado, ili denove fariĝas Apsaraj diinoj. Tio okazas foje kaj refoje, ĝis la finiĝo de iliaj rezultoj bonaj kaj malbonaj.

Flosante sur la bambua floseto, Mitavindo hazarde venis al aminda



Vitra Palaco. Tie li renkontis kvar tre belajn Apsarojn. Do li plene ĝuis ĉielajn plezurojn kune kun ili dum sep tagoj.

Poste venis la tempo por la diinoj fariĝi malsataj demonoj. Ili diris al Mitavindo: "Atendu nin por nur sep tagoj mallongaj. Ni revenos kaj daŭrigos nian plezuron."

Malaperis la Vitra Palaco kune kun la kvar Apsaroj. Sed Mitavindo ankoraŭ ne trovis al si la internan pacon de la vilaĝa monaĥo antaŭ tiel longa tempo. Sep tagoj da plezurego ne kontentigis lin. Li ne povis atendi la revenon de la amindaj diinoj. Li deziris pli kaj pli multe. Do li daŭrigis la veturon sur la bambua floseto.

Li venis al brila Arĝenta Palaco, en

kiu loĝas ok Apsaraj diinoj. Denove li ĝuis septagajn plezuregojn kun ili. La Apsaroj ankaŭ petis lin atendi sekvajn sep tagojn, kaj foriris al la infera mondo.

Mirinde, la avida Mitavindo ĝuis septagajn plezurojn en la brila Gema Palaco kun 16 Apsaroj. Sed ankaŭ tiuj malaperis. Poste li pasigis sep tagojn en la brila Ora Palaco kun 32 plej belaj el ĉiuj Apsaroj.

Sed li ankoraŭ ne estis kontenta. Kiam ĉiuj 32 Apsaroj petis lin atendi sep tagojn, li denove forlasis la lokon per la floseto.

Post nelonge li venis al la enirejo de la infera mondo plena de sufero torturataj vivestaĵoj. Ili vivis tie nur pro la teruraj rezultoj de siaj propraj fikondutoj. Sed

la avido de Mitavindo al pli da plezuro estis tiel forta, ke en liaj okuloj li vidis belan urbon ĉirkaŭitan de muro kun kvar fabelecaj pordoj. Li pensis: "Mi eniru por fariĝi la reĝo!"

Enirinte, li vidis unu el la viktimoj de la infero. Ĉirkaŭ sia kolo li surportis kolumon turniĝantan, kiu similas al rado kun kvin akraj klingoj tranĉantaj la vizaĝon, kapon, bruston kaj dorson. Sed Mitavindo ankoraŭ tiel avidis la plezuron, ke li ne povis vidi la suferon ĝuste antaŭ siaj okuloj. Anstataŭe li vidis la turniĝantan kolumon kun tranĉantaj klingoj kiel belan lotusfloron. Li vidis la falantan sangon kiel ruĝan pudron de parfumita santala ligno. Kaj la doloraj

vekrioj de la malfeliĉa viktimo aŭdiĝis al li kvazaŭ plej dolĉaj kantoj!

Li diris al la kompatinda suferanto: "Vi havas belan lotusan kronon por sufiĉe longa tempo! Donu ĝin al mi. Mi estas pli taŭga por tio." La kondamnito atentigis lin: "Tio estas tranĉa kolumo, rado de klingoj." Sed Mitavindo diris: "Vi tiel diras nur ĉar vi ne volas doni ĝin al mi."

La viktimo pensis: "Finfine la rezultoj de miaj antaŭaj fikondutoj venas al sia fino. Tiu ĉi malfeliĉa stultulo devas resti ĉi tie pro batado al sia patrino, kiel mi faris antaŭe. Mi donos al li la suferigan radon." Do li diris: "Prenu la lotusan kronon se vi tiel deziras ĝin!"

Je la vortoj, la rado de klingoj turne

forlasis la kolon de la antaŭa viktimo kaj ektorniĝis ĉirkaŭ la kapo de Mitavindo. Lia iluzio subite malaperis, kaj li eksentis, ke tio ne estas lotusa krono, sed tranĉa rado kun klingoj, kaj ke li ne estas reĝo, sed malliberulo. Ĝemante pro la dolorego li kriis seniluziiginte: "Reprenu vian radon! Reprenu vian radon!" Sed la alia jam malaperis.

Ĝuste tiam venis la reĝo de dioj por instrua vizito al la infera mondo. Mitavindo petis lin: "Reĝo de dioj, kion mi faris antaŭe, ke mi suferas tiel grandan turmenton?" La dio respondis: "Vi rifuzis aŭskulti la instruojn de la monaĥoj, do vi ne posedas saĝon, sed nur monon. Vi kontentis nek pri miloj da ormoneroj, eĉ

nek pri 120,000 ormoneroj. Blindigite de via avido, vi batis vian patrinon por ĉasi pli multe da havaĵo.

"Poste vin ne kontentigis la plezuro de kvar Apsaroj en la Vitra Palaco, ok Apsaroj en la Arĝenta Palaco, 16 Apsaroj en la Gema Palaco, nek la 32 amindaj diinoj en la Ora Palaco estis sufiĉaj por vi. Blindigite de avido al plezuro vi deziras fariĝi reĝo. Nun je la fino vi vidis, ke via krono estas nur rado de torturo, kaj via regno estas nur infero.

"Sciu, Mitavindo, ke ĉiuj, kiuj sekvas sian avidon, estas malkontentaj. La naturo de homa avido estas ne kontentigebla pri kiom li havas, ĉu multe aŭ malmulte. Ju pli ili gajnas, des pli ili avidas ĝis la cirklo

de avido fariĝas la cirklo de doloro."

Tion dirinte, la dio revenis al sia ĉiela mondo. Je la sama tempo la rado disfalis de Mitavindo. Kun sia kapo en kirlanta doloro, li sin trovis flosanta sur la bambua floseto.

Baldaŭ li atingis insulon, sur kiu loĝis potenca demonino. Okazis, ke ŝi aliformiĝis en kapron. Malsata Mitavindo volis nenion alian ol kapti la kapron je malantaŭa kruro, sed la demonino kaŝita ene piedbatis lin tiel forte, ke li ĵetiĝis en la aeron. Fine li falis en dornejon ĉe la ĉirkaŭurbo de Benareso!

Post kiam li sin liberigis el la dornejo, li vidis kelkajn kaprojn sin paŝtantajn proksime. Li volegis reveni al la palacoj

kaj dancantaj Apsaroj. Ekmemorinte, ke kapro piede ĵetis lin ĉi tien, li kaptis kruron de unu el la kaproj kun espero, ke ĝi piedbatu lin ree al la insulo.

Anstataŭe, la kapro blekis laŭte. La paŝtistoj alvenis kaj kaptis Mitavindon pro ties provo ŝteli la reĝan kapron.

Kiam la paŝtistoj eskortis la kaptiton al la reĝo, ili pasis preter la mondfama instruisto de Benareso. La instruistoj rekonis sian antaŭan lernanton. Li demandis la paŝtistojn: "Kien vi eskortas lin?"

Ili respondis: "Li estas ŝtelisto de kaproj! Ni eskortas lin al la reĝo por puni!" La instruisto diris: "Bonvolu ne tiel agi. Li estas unu el miaj lernantoj. Bonvolu lasi



lin ĉe mi, tiel ke li povos fariĝi servanto en mia lernejo." Ili konsentis kaj liberigis lin.

La instruisto demandis Mitavindon: "Kio okazis al vi ekde via forlaso de mi?"

Li rakontis la historion, en kiu li unue estis respektita, kaj poste, malbenita de la homoj en la malproksima vilaĝo. Li diris pri sia edziĝo kaj du infanoj; pri tio, kiel ili estis mortigitaj kaj manĝitaj de demonoj en la arbaro; pri la bato al sia malavara patrino kiam li freneziĝis de avido al mono; pri la malbeno de la samŝipanoj kaj forpelo sur la bambuan floseton; pri la kvar palacoj kun la belaj diinoj, kaj kiel li restis ne kontenta kiam ĉiu el liaj plezuroj finiĝis. Li diris pri la tranĉa rado de

torturo, la rezulto de avideco en la infero, kaj pri sia avido al viando de kapro kaj pro ĝia piedbato li refalis en Benareson sen manĝi la viandon.

La mondfama instruisto diris: "Estas klare, ke viaj antaŭaj kondutoj bonaj kaj malbonaj kaŭzis aparte rezultojn kaj feliĉajn kaj malfeliĉajn, kaj tio ambaŭ efektive plenumiĝis. Sed vi ne povis kompreni, ke la plezuro ĉiam havas finon. Anstataŭe vi dediĉis vin al avideco por pliaj. Vi estis elĉerpita kaj malkontenta, tiel ke vi freneze kaptis la kruron de kapro. Estu trankvila, mia amiko, kaj sciu, ke vi ĉiam suferos soifegon se vi volas teni akvon per via firme pugnita mano!"

Aŭdinte tion, Mitavindo riverencis

respektoplene al la granda instruisto. Li petis, ke la instruisto akceptu lin kiel lernanton. La luminiĝinto bonvenigis lin kun malfermitaj brakoj.

La moralinstruo estas: Kun mensa paco oni nek gajnas nek perdas.

## 41. KOLOMBO KAJ KORVO



### [Danĝera Avido]

Iam en Benareso homoj ŝatis fari birdejojn. Tio estis konduto de malavaro kaj bonkoro por komfortigi birdojn. La pepoj de amikaj birdoj ankaŭ amuzis la homojn.

La plej riĉa homo en la urbo havis kuiriston, kiu posedis tian birdejon ĉe la kuirejo. En la birdejo loĝis kolombo ĝentila kaj singardema. Li estis tiel ĝentila, ke li tute ne manĝis viandon kaj tiel singardema, ke li sin tenis malproksima de la kuiristo. Li sciis bone, ke la kuiristo

kutime kuiras kaj rostas mortintajn bestojn, eĉ inkluzive de birdoj.

La kolombo ĉiam forlasis la loĝejon frumatene. Serĉinte kaj manĝinte nutraĵon dum tuta tago, li revenis nokte por dormi en la loĝejo. Li estis tre kontenta pri sia vivo kvieta kaj sekura.

Proksime vivis korvo kun malsama karaktero. Unue, li ĉion manĝis. Oni sciis bone, ke li estas nek ĝentila, nek singardema. Anstataŭe, li ofte tro ekscitiĝis kaj agis senskrupule. Pro sia nekontenteco li ofte sin dronigis en ĝenaĵon.

Iutage la korvo flaris bongustan odoron de manĝaĵo kuirata en la kuirejo de la riĉulo. Li tiel allogiĝis de la bongusteco,

ke li neniel povis eltiri sin el ĝi. Li decidis havigi al si viandon de la riĉulo je ĉia kosto. Do li ekspionis la kuirejon por trovi ŝancon ŝteli iom el la viandoj kaj fiŝaĵoj.

Vespere la satiĝinta kolombo revenis kiel kutime kun sia malgranda stomako plena, kaj kontente iris en sian malgrandan loĝejon por tranokti. Vidinte tion, la malsata korvo pensis: "Ha, bonege. Mi povas utiligi la malsaĝan kolombon por rabi bongustan manĝaĵon el la kuirejo."

En la sekva mateno, la korvo sekvis la kolombon kiam tiu forlasis la hejmon por la taga aktivado. La kolombo demandis: "Kial vi sekvas min, mia amiko?" La korvo respondis: "Sinjoro, mi tre ŝatas vin kaj admiras vian vivmanieron kvietan kaj

regulan. Ekde nun, mi volas helpi vin kaj lerni de vi."

La kolombo diris: "Via vivstilo estas multe pli ekscita ol la mia, Amiko Korvo. Vi enuiĝos sekvi min ĉirkaŭen. Krome, vi eĉ ne manĝas la saman nutraĵon kiel la mian. Do kiel vi povas helpi min?"

La korvo respondis: "Kiam vi eliras ĉiutage por serĉi vian manĝaĵon, ni disiĝu kaj mi serĉu la mian. Vespere ni revenu kune al via nesto. Estante kune, ni povos interhelpi kaj protekti nin mem reciproke." La kolombo diris: "Tio sonas prave al mi. Nun iru kaj diligente serĉu vian manĝaĵon."

La kolombo pasigis sian kutiman tagon manĝante semojn de herboj. Li estis

kontenta kvankam li elspezadis tempon por pacienco serĉi manĝaĵon.

La korvo trapasis la tagon flugante ĉirkaŭ bova fekaĵo, do li povis engluti trovitajn vermojn kaj insektojn. Tio estis tre facila laboro, sed li senĉese pensis, ke estos des pli facile ŝteli el la kuirejo, kaj sendube la manĝaĵo estos des pli bongusta!

Satmanĝinte, li iris al la kolombo kaj diris: "Sinjoro Kolombo, vi elspezis tro multe da tempo por serĉi kaj manĝi. Estas ne bone pasigi la tutan tagon por tio. Ni iru hejmen." Sed la kolombo konstante manĝis semojn unu post alia. Li estis tre feliĉa vivante tiamaniere.

Je la fino de la tago, la malpacienca korvo sekvis la kolombon al lia loĝejo.



Ili kune dormis pace. Ili trapasis kelkajn tagojn kaj noktojn tiamaniere.

Iun tagon poste, la kuiristo preparis multajn specojn da viandoj kaj fiŝaĵoj por festeno. Li pendigis ilin sur la hokojn en la kuirejo por konservi.

La korvo vidis tion kaj sorĉiĝis je ekvido de tiel multaj manĝaĵoj. Lia deziro fariĝis tiel granda avido, ke li ekpensis metodon por havigi ĉiom al si mem. Li decidis sin ŝajnigi malsana. Do li pasigis tutan nokton ĝemante.

Matene, la kolombo pretis eliri por serĉi manĝaĵon kiel kutime. La korvo diris: "Iru sola, sinjoro Kolombo. Mi estas malsana je la stomako tutan nokton."

La kolombo respondis: "Tio sonas

stranga, kara Korvo. Mi neniam aŭdis, ke korvoj suferas de stomakdoloro. Anstataŭe, iam ili svenas pro malsato. Mi suspektas, ke vi volas engluti tiom da viando kaj fiŝaĵo en la kuirejo, kiom vi povas. Sed tio estas nur por homoj, ne por korvoj. Homoj ne manĝas nutraĵon de kolomboj. Kolomboj ne manĝas nutraĵon de korvoj. Kaj estas malsaĝe por vi manĝi nutraĵon de homoj. Eble tio estos danĝera! Do iru kun mi kiel kutime, kaj estu kontenta pri la korva manĝaĵo, sinjoro Korvo!"

La korvo diris: "Mi estas malsana, amiko Kolombo. Mi malsanas serioze. Iru sen mi."

"Tre bone," diris la kolombo, "sed viaj kondutoj parolas pli laŭte ol la vortoj. Mi

atentigas vin, ke vi ne risku vin por via avido. Restu pacienca ĝis mia reveno." Poste la kolombo forlasis por la taga aktivado.

Sed la korvo ne atentis pri tio. Li nur dronis en la revo ŝteli pecegon da fiŝo. Li ĝojiĝis pro foresto de la kolombo. "Li manĝadu herbsemojn!" li pensis.

Samtempe la kuiristo preparis la viandon kaj fiŝaĵon en granda kuirpoto. Li fojfoje levetis la kovrilon por ellasi vaporon dum la kuirado. La korvo flaris la bongustan odoron de la leviĝanta vapore. Rigardante de la kolombejo, li vidis, ke la kuiristo eliris por eviti varmecon.

La korvo opiniis, ke tio estas bona ŝanco atendita de li. Li tuj flugis en la

kuirejon kaj sidiĝis sur randon de la kuirpoto. Unue li laŭeble serĉis la plej grandan pecon de fiŝaĵo. Poste li etendis sian kapon enen por atingi ĝin. Sed tion farante, li senatente faligis la kovrilon. La sono tuj venigis la kuiriston en la kuirejon.

Li vidis, ke korvo sidas sur la rando de la kuirpoto, kaj trenas fiŝon pli grandan ol si mem per la beko! Li tuj fermis la pordon kaj fenestrojn de la kuirejo. Li pensis: "La manĝaĵo estas por la riĉulo. Mi laboras por li, sed ne por aĉa korvo! Mi donos al la korvo lecionon, kiun li neniam forgesos!"

La kompatinda korvo neniel povus trovi pli malican malamikon. La kuiristo estis tre kruda, do li neniel avaris je sia krueleco kiam li estis supera. Li tute ne

kompatis la avidan korvon.

Li kaptis lin kaj eltiris ĉiujn liajn plumojn. La kompatinda korvo aspektis tre komike sen brile nigraj plumoj. Poste, la venĝema kuiristo faris spicaĵon el zingibro, salo, kapsiketo kaj pipro, kaj ŝmiris ĝin sur la dolorantan haŭton rozkoloran de la korvo. Poste li metis la birdon sur la plankon de la kolombejo kaj ridaĉis senĉese.

La korvo ŝvitis kaj suferis de terure brula doloro. Li kriegis agonie tutan tagon.

Vespere la kolombo revenis de la kvieta serĉado kaj manĝado de herbsemoj. Li stuporiĝis, vidinte la teruran staton de sia amiko korvo. Li diris: "Evidente vi tute ne aŭskultis min, do via avido

tiel suferigas vin. Mi bedaŭregas, ke mi kapablas fari nenion por vin savi. Mi timas resti en la kolombejo tiel proksima al la kruela kuiristo. Mi devas foriri senprokraste!"

Do la singardema kolombo forflugis por serĉi loĝejon pli sekuran. La spicita korvo mortis nuda pro granda doloro.

La moralinstruo estas: Avidemulo turnas surdan orelon al bona admono.

## 42. PATRO DE BAMBUO



### [Vana Admono]

Iam estis instruisto, kiu meditis multe kaj disvolvis sian menson. Lia famo disvastiĝis iom post iom. Tiuj, kiuj volis ricevi instruon de la saĝulo, venis por aŭskulti lin. Opiniante, ke lia instruo estas tre saĝa, 500 homoj decidis fariĝi liaj lernantoj.

Unu el ili, kiuj opiniis la instruiston saĝa, estis amanto de dorlotataj bestoj. Fakte, li tiel ŝatis bestojn, ke neniun beston li ne volas preni kiel dorlotataĵon.

Iutage li ekvidis plaĉan kaj venenan

serpenteton, kiu serĉis manĝaĵon. Li decidis fari ĝin eksterordinara dorlotata besto. Do li faris malgrandan bambuan kaĝon por enteni ĝin kiam li forlasis ĝin sola. La aliaj lernantoj nomis la malgrandan serpenton "Bambuo", do ili nomis la amanton de favoratoj "Patro de Bambuo", ĉar li tre ŝatis la serpenton.

La instruisto informiĝis post nelonge, ke unu el liaj lernantoj tenas venenan serpenton kiel dorlotatan beston. Li alvenigis lin kaj demandis, ĉu la informo estas vera. La Patro de Bambuo diris: "Jes, Majstro. Mi amas ĝin kiel mian propran filon!"

La saĝa instruisto diris: "Estas ne sekure vivi kun venena serpento. Do mi



admonas, ke vi lasu ĝin foriri por via bono."

Sed la Patro de Bambuo pensis, ke li mem scias pli bone. Li respondis: "La etulo estas mia filo. Li ne mordos min. Mi ne povas forlasi ĝin kaj vivi sola!"

La instruisto atentigis lin: "Certe la malgranda estaĵo kaŭzos finon de via vivo!" Sed la lernanto tute ne zorgis pri la admono de la instruisto.

Poste, ĉiuj 500 lernantoj de la instruisto eliris por kolekti freŝajn fruktojn. La Patro de Bambuo lasis sian "filon" tenita en la bambua kaĝo.

Estis multe da fruktoj por kolekti, do ili revenis hejmen nur post kelkaj tagoj. La Patro de Bambuo ekkonsciis, ke la

kompatinda Bambuo manĝis nenion dum li forestis. Li tuj malfermis la kaĝon por ellasi kaj bredi lin.

Sed kiam li etendis manon en la kaĝon, lia "filo" subite mordis lin. Ignorate dum longa tempo, Bambuo estis tiom kolera kiom malsata. Li estis nur serpento, kiu sciis neniom pri veneno.

Sed lia "patro" devus scii pri tio pli bone. Fakte, lin jam atentigis la instruisto, kiun li opiniis saĝa.

Kelkajn minutojn post la mordo, la Patro de Bambuo falis morta.

La moralinstruo estas: Estas ne bono, se oni sekvas instruiston, sed ne akceptas, kion li diras.

## 43 DU MALSAĜAJ INFANOJ



### [Malsaĝo]

Iam estis ĉarpentisto maljuna kaj kalva. En la sunaj tagoj lia senhara kapo tiel brilis, ke oni devis permane ŝirmi siajn okulojn kontraŭ brilo kiam ili babilis kun li.

Iun sunan tagon, malsata moskito absorbiĝis de lia kapo brile kalva. Ĝi falis sur ĝin kaj ekpikis ĝin.

La ĉarpentisto estis okupita rabotante lignopecon. Kiam li trovis la moskiton pikanta lin, li klopodis forpeli ĝin. Sed la malsata moskito rifuzis forlasi la plaĉan

manĝaĵon. Do li venigis sian filon kaj ordonis al li forigi la obstinan insekton.

Malsame kiel la patro kun brila kapo, la filo ne estis tiel brila en saĝo, sed tamen, li estis laborema kaj obeema. Li diris: "Ne maltrankviliĝu, Paĉjo. Estu pacienca. Mi batmortigos la insekton!"

Li prenis tre akran hakilon, atente celis la moskiton, Senpense faligis la hakilon kaj dispartigis la insekton! Malfeliĉe, tranĉinte la moskiton, la hakilo ankaŭ dispartigis la brile kalvan kapon de la maljuna ĉarpentisto.

Tiumomente la reĝa konsilanto ĝuste preterpasis tie kun siaj sekvantoj. Kiam ili vidis la okazaĵon, ili surpriziĝis de la malsaĝa afero!

La reĝa konsilanto diris: "Ne surpriziĝu pri tia malsaĝo. Tio rememorigis min pri simila afero okazinta hieraŭ."

"En vilaĝo ne malproksima de ĉi tie, virino deŝeligis rizgrajnojn per pistilo. Kiam ŝi laboris ŝvitante, svarmo da muŝoj zumis ĉirkaŭ ŝia kapo. Ŝi klopodis forpeli ilin, sed la soifaj muŝoj ne volis cedi.

"Do ŝi venigis sian filinon kaj petis ŝin forpeli la naŭzajn insektojn. Kvankam malsaĝa, la filino ĉiam volis laŭeble plezurigi la patrinon.

"Ŝi stariĝis de sia propra pistujo, levis la pistilon kaj zorgeme celis la muŝon plej grandan kaj obstinan. Ŝi batis la muŝon senskrupule! Sed kompreneble, tio

mortigis la muŝon, kaj ankaŭ ruinigis la vivon de la patrino."

"Vi ĉiuj scias la onidiron," la konsilanto diris, kaj finis sian rakonton per jenaj vortoj, "oni preferas saĝajn malamikojn ol malsaĝaj amikoj."

La moralinstruo estas: Malsaĝa amiko estas pli danĝera ol malamiko.

## 44. AKVUMI ĜARDENON



[Malsaĝo]

Ĝuste antaŭ la Novjara Tago en Benareso de norda Hindio, ĉiuj inkluzive de la ĝardenisto de la reĝa plezura ĝardeno estis pretaj fari tritagan celebradon.

Aro da simioj vivis en la plezura ĝardeno. Ili ne bezonis pensi tro multe, ĉiam obeante la konsilon de sia simia reĝo.

La reĝa ĝardenisto deziris celebri la novjaran feston kiel ĉiuj aliaj, do li decidis transdoni sian laboron al la simioj.

Li iris al la simia reĝo kaj diris: "Ĉu vi bonvolus fari iom da favoro por mi,

mia honora amiko? Venas la novjara festo kaj ankaŭ mi volas partopreni en la celebrado. Do mi forestos dum tri tagoj. Estas abundaj fruktoj, beroj kaj nuksoj por manĝi en la ĝardeno. Vi kaj viaj subuloj estas miaj gastoj, do manĝu tiom, kiom vi povas laŭ via plaĉo. Bonvolu akvumi la junajn arbojn kaj plantojn rekompence dum mia foresto."

La simia reĝo respondis: "Ne maltrankviliĝu pri tio, mia amiko. Ni faros la penigan laboron. Ĉion bonan al vi!"

La ĝardenisto montris al la simioj, kie estas la akvositeloj. Li foriris por celebri la festotagojn fidoplene. La simioj kriis malantaŭ li: "Feliĉan Novjaron al vi!"

En la sekva tago, la simioj plenigis la



sitelojn, kaj ekakvumis la junajn arbojn kaj plantojn. Tiam la simia reĝo diris: "Miaj regnanoj! Estas nebone malŝpari akvon. Do elradikigu ĉiujn junajn arbojn kaj plantojn antaŭ la akvumado. Esploru, kiom longaj estas la radikoj. Poste donu pli da akvo al tiuj kun longaj radikoj kaj malpli al tiuj kun la mallongaj. Tiel ni ne malŝparos akvon, kaj la ĝardenisto certe plezuriĝos pro tio!"

Pensante pri nenio plia, la obeemaj simioj akceptis la ordonon de la reĝo.

Ĝuste tiam saĝa homo ekstere preteriris la enirejon de la ĝardeno. Vidinte, ke la simioj elradikigas la junajn arbojn kaj plantojn, mezuras la radikojn kaj zorgeme verŝas akvon en la kavojn

sur la tero, li demandis: "Kion vi faras en la bela ĝardeno de la reĝo laŭ via opinio, stultaj simioj?"

Ili respondis: "Ni akvumas la arbojn kaj plantojn ŝpareme! Tion ordonis nia majesta reĝo."

La viro diris: "Se tia estas la saĝo de via plej inteligenta reĝo, kian saĝon posedas vi, la subuloj? Kun intenco fari bonan aferon, vi kaŭzas fatalaĵon pro malsaĝo!"

La moralinstruo estas: Nur malsaĝuloj povas turni bonajn aferojn en la malbonajn.

## 45. SALA VINO



[Malsaĝo]

Iam en Benareso estis taverno. La mastro havis diligentan kelneron, kiu ĉiam volis doni helpon per invento de novaj labormanieroj.

En iu varmega tago, la mastro volis sin bani en proksima rivero. Do li lasis la kelneron mastrumi dum lia foresto.

La kelnero ĉiam volis scii, kial plej multaj klientoj manĝas iom da salo post trinko de vino. Ne volante montri sian sensciecon, li ne kuraĝis demandi, kial ili tion faras. Li tute ne sciis, ke ili manĝas

salon nur por forigi la vinan odoron en sia buŝo. Li opiniis, ke ili bezonas salon por bongusteco.

Li pensis, "Kial la mastro de la taverno ne aldonu salon en la vinon." Li supozis, ke la komerco donos pli da profito, kaj la mastro plezuregos pri tio se li tion faros. Do li aldonis salon en ĉiujn vinojn.

Sed ekster lia atendo, kiam la klientoj venis en la drinkejon kaj ektrinkis la salan vinon, ili tuj elsputis ĝin kaj iris al alia drinkejo.

Reveninte de la rivero, la mastro trovis, ke restas neniu kliento en la taverno, kaj krome, ĉiuj vinoj estas ruinigitaj.

Do li rakontis la okazaĵon al sia amiko, konsilanto de la reĝo. La konsilanto diris:

"Sensciulo ne povas eviti malbonan rezulton eĉ kun intenco fari la bonon."

La moralinstruo estas: Bona intenco ne povas fariĝi preteksto de senscieco.

## 46. MGIA PASTRO KAJ KIDNAPANTAJ GANGSTEROJ



**[Potenco kaj Avido]**

Iam en Benareso estis reĝo nomata Brahmadato. En malproksima vilaĝo de la regno vivis pastro kun magia povo. Li scipovis specialan magian sorĉon sekrete inicitan de sia instruisto.

La magian sorĉon oni rajtis uzi nur unu fojon ĉiujare kiam la steloj sin dispoziciis en certa maniero. Nur tiam, la pastro diris la sekretajn magiajn vortojn al siaj malfermitaj manplatoj. Poste fiksrigardante al la ĉielo, li kunfrapis siajn

manojn. Je tio pluvis al li valoraj juveloj.

La magia pastro ankaŭ estis instruisto. Li havis bonegan lernanton, kiu estis diligenta kaj povis kompreni plej malfacilajn ideojn. Li estis obeema kaj fidinda, ĉiam dezirante honori kaj protekti sian instruiston.

Iutage la pastro devis vojaĝi al malproksima vilaĝo por prezidi bestoferan ceremonion. Li devis preni danĝeran vojon, do la bona lernanto akompanis lin.

Okazis, ke estas 500 banditoj laŭ la vojo. Ili estis el bando de kidnapantaj gangsteroj. Ili kaptis homojn kaj postulis elaĉetan monon por lasi ilin vivaj.

Malfeliĉe, la magia pastro kaj lia bona lernanto estis kaptitaj de la gangstera

bando. Ili postulis 5000 orajn monerojn kaj sendis la lernanton hejmen por ke li prenu monon por elaĉeti sian instruiston.

Antaŭ la forlaso, la lernanto genuiĝis antaŭ la instruisto kaj riverencis lin estimoplene. Li diris al li mallaŭte, por ke la gangsteroj ne aŭdu: "Instruisto, hodiaŭ estas la nura nokto kiam la steloj sin aranĝos perfekte ĉijare. Nur tiam via magia povo pluvigos juvelojn el la ĉielo. Sed tamen, mi devas atentigi vin, mia instruisto amata kaj estimata. Estos tro danĝere uzi tian povon por savi vin de tiaj aviduloj. Tiel facile akiri grandan trezoron kaŭzos fatalaĵon al la homoj kiaj ili estas. Kaj se vi pensos nur pri via propra sekureco, vi kaŭzos danĝeron al ili, kaj



ankaŭ al vi mem.

"Do mi atentigas, ke vi ne cedu al la deziro pluvigi juvelojn per magio. Lasu ĉijaran feliĉan nokton forpasi. Eĉ se la banditoj faros malbonon al vi, kredu, ke via fidela lernanto savos vin sen pliigi vian danĝeron." Tiel dirinte, li forlasis la instruiston.

Tiuvespere, la gangsteroj firme ligis la magian pastron, kaj restigis lin ekster kaverno por tranokti. Ili donis al li neniom por manĝi kaj trinki.

Post kiam la luno leviĝis, la pastro vidis, ke la steloj viciĝas tiamaniere, ke lia sorĉo povos labori. Li pensis: "Kial mi devas tiel suferi? Mi povas kontentigi ilian postulon per mia magia povo. Mi

estas magia pastro. Mia vivo estas multe pli valora ol iliaj. Mi zorgu nur pri mi mem. Kaj krome, la feliĉa nokto okazas nur fojon ĉiujare. Mi ne malŝparu la bonŝancon por apliki mian grandan povon!"

Decidinte ignori la admonon de la bona lernanto, li alvokis la gangsterojn kaj diris: "Bravuloj Majestaj, kial vi volas min ligi kaj suferigi?"

Ili respondis: "Honora pastro, ni bezonas monon. Ni havas multajn buŝojn por nutri. Ni devas havi monon, multe da mono!"

La magia pastro diris: "Ĉu vi tion faras nur por mono? Ĉu tio estas ĉio, kion vi volas? Tiukaze, mi riĉigos vin ekster

via imago en sonĝo! Mi estas sankta pastro granda, potenca kaj fidinda. Vi devas liberigi min. Lavu miajn kapon kaj vizaĝon, vestu min per novaj vestaĵoj, kaj kovru min per floroj. Post tia honorado al mi, lasu min sola por apliki mian magian povon."

La gangsteroj sekvis lian instruon, sed ili ne tute fidis lin, do ili sin kaŝis en herbaro kaj ŝtele gvatis lin.

Jen ĉio, kion ili vidis. La pastro lavita kaj flore kovrita suprenrigardis al la ĉielo. Vidinte, ke la steloj viciĝis en specialan fortunan signon, li mallevis sian kapon kaj murmuris la magian sorĉon en siajn manojn. Tio sonis ne kompreneble. Iuj sonis kiel "Na Ŭa Ŝe Na. El Nea Medrak.

Go Ba Mil Neaj".

Poste li najlis sian rigardon al la ĉielo kaj kunfrapis siajn manojn. Subite li estis duŝita de la plej belaj juveloj!

La gangsteroj kuris el la kaŝejo kaj rabis ĉiujn valorajn juvelojn. Ili volvis ilin en pakojn kaj ekiris laŭ la vojo, kun la magia pastro sekvanta malantaŭe.

Sur la vojo ili estis barita de alia bando el 500 rabistoj. Ili demandis: "Kial vi baras nin?" "Donu al ni ĉiujn viajn trezorojn." la aliaj ordonis.

La gangsteroj diris: "Lasu nin for. Vi povos akiri ĉiujn deziratajn riĉaĵojn de la magia pastro tiel, kiel ni havigis al ni la nian. Li diros magian sorĉon, rigardos al la ĉielo, kunfrapos siajn manojn, kaj sekve

de tio, falados la plej fabelecaj juveloj!"

Do la rabistoj lasis la gangsterojn foriri, sed ĉirkauis la pastron. Ili postulis, ke li same pluvigu valorajn juvelojn por ili.

Li diris: "Mi certe povas doni al vi ĉiujn deziratajn juvelojn. Sed vi devas paciencie atendi unu jaron. La feliĉa tempo, kiam la steloj viciĝas konvene, jam forpasis ĉijare. Ĝi ne okazos ĝis la sekva jaro. Tiam venu al mi, kaj mi estos ĝoja riĉigi vin!"

Kiel konate, rabistoj tute ne havis paciencon. Ili tuj furioziĝis kaj kriegis al li: "Vi estas pastro ruza kaj mensogema! Vi riĉigis la gangsterojn, sed nun rifuzas fari la samon por ni. Ni donos al vi lecionon pro via malestimo al ni!" Tion

dirinte, ili hakis lin duparte per akra spado, kaj lasis ambaŭ korpopartojn en la mezo de la vojo.

La rabistoj kuratingis la gangsterojn. Tie okazis terure sanga batalo. Post horoj da luktado, ili mortigis ĉiujn 500 gangsterojn kaj forprenis la valorajn juvelojn.

Tuj forlasinte la batalejon, la 500 rabistoj ekkverelis pri la valoraĵo. Ili formis du rivalajn grupojn 250-personajn. Ili okazigis alian batalon ĝis restis nur du vivaj, respektive de ambaŭ grupoj.

Ili ambaŭ kolektis kaj kaŝis ĉiujn valorajn juvelojn en la arbaro. Ili estis malsataj. Do unu gardis la trezoron dum la alia kuiris rizon.

La gardanto pensis: "Kiam la alia finos la kuiradon, mi mortigos lin por havigi ĉiujn rabaĵojn al mi mem!"

Samtempe, la kuiranto pensis: "Se ni dividos tiujn juvelojn en du partojn, mi gajnos malpli multe. Do mi miksos venenon en la manĝaĵon por mortigi la alian kaj tenos ĉiujn juvelojn ĉe mi. Kial mi dividos kun li? Ĉion mi posedos!"

Do li manĝis iom el la rizo pro malsatego, kaj venenis la restan. Li portis la manĝaĵon al la alia kaj donis ĝin al li, sed la alia tuj svingis sian spadon kaj dehakis lian kapon.

La malsata mortiginto ekenglutegis la venenan rizon kaj post kelkaj minutoj li falis morta en la sama loko!

Post kelkaj tagoj, la bona lernanto revenis kun mono. Li trovis nek sian instruiston nek la gangsteran bandon. Anstataŭe li trovis nur senvalorajn havaĵojn, kiujn oni forĵetis, akirinte la juvelojn.

Daŭre irante laŭ la vojo, li renkontis la korpopartojn de sia instruisto. Ekkonsciinte, ke la magia pastro ignoris lian atentigon, li bedaŭregis pri la instruisto en tiel mizera morto. Li faris funebran bruligejon, kovris ĝin per sovaĝaj floroj, kaj kremaciis la korpon de sia estimata instruisto.

Irinte iom da distanco laŭ la vojo, la bona lernanto vidis 500 kadavrojn de la gangstera bando. Iom poste, li vidis la



mortintajn rabistojn, kiuj nombris 498.

Dum plua irado li ekvidis piedsignojn de la restantaj du homoj irintaj en la arbaron. Konsciinte, ke ili ankaŭ batalos por la trezoro, li sekvis ilin. Fine li trovis mortinton kuŝantan sur rizpoto, kaj alian senkapan ĉe la pakoj de valoraj juveloj. Li tuj komprenis, kio okazis.

Li pensis: "Estas tiel malfeliĉe, ke mia instruisto posedis grandan saĝon, sed ne sufiĉan ordinaran konsciencan. Li nur uzis sian magian povon sen konsideri la rezulton. Kaŭzinte morton de mil avidaj gangsteroj, li mem perdis sian vivon!"

La bona lernanto portis la trezoron al la vilaĝo kaj uzis ĝin malavare por profitigi multajn homojn.

La moralinstruo estas: Se potenco ne  
havas konsciencan kaj avido ne limon,  
mortigo ne havos finon.

## 47. PERDO DE NOVEDZINO PRO STELOJ



### [Astrologio]

Iam riĉa familio vivis en Benareso de norda Hindio. Ili aranĝis, ke ilia filo edziĝu al bona kaj honesta fraŭlino en proksima vilaĝo. Ankaŭ la fraŭlino estis tre ĉarma, do ili certis, ke ili ne povos trovi pli bonan edzinon por sia filo.

La familio de la fraŭlo difinis la daton por la geedziĝo. La familio de la fraŭlino konsentis bonvenigi ilin en la vilaĝo je la geedziĝa tago.

Tiam la riĉa familio havis ankaŭ

pastron speciale lertan pri astrologio. Li koleriĝis kiam li trovis, ke ili elektis la geedziĝan daton sen peti lin por fari horoskopon. Li decidis sin venĝi kontraŭ ili.

Kiam venis la geedziĝa tago, la astrologia pastro en la plej bonaj vestaĵoj kunvenigis la familianojn. Li riverencis al ili ĉiuj, kaj serioze pririgardis sian diagramon de stelaro. Li diris al ili, ke ĉi tiu stelo estas tro proksima al la horizonto, tiu planedo estas en la mezo de la malfortuna konstelacio kaj la luno estas en danĝera fazo por geedziĝo. Li asertis, ke sen peti lian konsilon, ili elektis la plej malbonaŭguran tagon por la nupto, kio nur kondukos al fatalaĵo.

La timigita familio restis hejme en Benareso, forgesante ĉiujn bonajn kvalitojn de la dezirata novedzino.

Samtempe la fraŭlina familio jam aranĝis ĉion por geedziĝa ceremonio en la vilaĝo. Kiam venis la difinita tempo, ili atendis kaj atendegis la novedzon kaj lian familion. Fine ili konsciis, ke ili ne venos. Ili pensis: "La urbanoj elektis la daton kaj tempon, tamen nun neniu el ili sin montris. Kia humiligo tio estas! Kial ni atendu ilin plue? Edzinigu nian filinon al vilaĝano honora kaj diligenta." Do ili rapide aranĝis novan geedziĝon kaj celebris la feston.

La astrologia pastro diris en la sekva tago, ke la steloj, planedoj kaj luno subite estas en perfekta pozicio por la geedziĝo!

Do la familio en Benareso iris al la vilaĝo kaj petis okazigi la geedziĝan ceremonion. Sed la vilaĝanoj diris: "Vi elektis la daton kaj tempon, sed humiligis nin per via malĉeesto!"

La urbanoj respondis: "Nia familia pastro diris al ni, ke la steloj, planedoj kaj luno estis en teruraj pozicioj hieraŭ, kaj pro tio la dato estis tre malfortuna por la geedziĝo. Sed li certigis nin, ke hodiaŭ estas la plej bonaŭgura tago. Do bonvolu tuj sendi al ni la novedzinon!"

La vilaĝa familio diris: "Vi havas nenian honoron. Vi opiniis, ke pli gravas elekti daton ol edzinon. Vi malfruiĝis! Nia filino jam edziniĝis al aliulo." Do okazis kverelado inter ambaŭ familioj.

Saĝulo preterpasis ilin. Vidinte la kvereladon, li volis repacigi ilin.

La urba familio sciigis al li, ke ili respektis la averton de sia astrologia pastro, kaj ili ne kuraĝis veni por preni la novedzinon nur pro la malfavoraj pozicioj de la steloj, planedoj kaj luno.

La saĝulo diris: "La bona fortuno venos de la novedzino, sed tute ne de la steloj. Vi malsaĝuloj sekvis la stelojn sed perdis la novedzinon. Sen via malsaĝo, la malproksimaj steloj povos fari nenion!"

La moralinstruo estas: La fortuno venas de homaj kondutoj anstataŭ de steloj.

## 48. REĜIDO KUN BONA PLANO



### [Potenco de Superstiĉo]

Iam Reĝo Brahmadata regis en Benareso de norda Hindio. La luminiĝinto naskiĝis kiel reĝido, lia filo. La reĝido estis tre inteligenta, kaj finis sian tutan lernadon je la aĝo de dek ses jaroj, do laŭ la aranĝo de la reĝo li fariĝis vicreganto en sia juna aĝo.

Tiam la plejparto de homoj en Benareso adoris diojn. Ili estis tre superstiĉaj. Ili pensis, ke ĉion kaŭzas la dioj, anstataŭ la rezultoj de iliaj propraj kondutoj. Ili preferis preĝi al tiuj dioj



kaj petis specialan favoraĵon. Ili kutime petis de la dioj feliĉan geedziĝon, infanonaskiĝon, riĉaĵon aŭ famon.

Ili kutime faris promeson al la dioj, ke ili donos rekompenco se iliaj deziroj realiĝos. Krom floroj kaj parfumoj, ili imagis, ke dioj ŝatas bestoferiĵojn. Kiam ili opiniis, ke la dioj jam helpis ilin, ili mortigis multe da bestoj, kiaj kaproj, ŝafoj, kokidoj, porkoj kaj aliaj.

La reĝido vidis tion kaj pensis: "Ankaŭ tiuj senhelpaj bestoj estas regnantoj de la reĝo, do mi devas protekti ilin. Oni faras malbonajn kondutojn pro siaj senscienco kaj superstiĉo. Tio ne estas vera religio, ĉar vera religio protektas vivon kontraŭ mortigado kaj donas mensan pacon

anstataŭ kruelecon.

"Mi timas, ke tiuj homoj ne rezignos sian superstiĉon pro la tro forta kredo. Tio estas doloriga, sed eble iliaj kredoj almenaŭ estas utilaj. Mi fariĝos reĝo iutage, kaj mi devas ekfari planon, por ke ilia superstiĉo helpu ilin. Se ili devas fari oferon, ili mortigu siajn proprajn avidon kaj malamon, anstataŭ senhelpajn bestojn! Tio profitigos la tutan regionon."

Do la saĝa reĝido faris eksterordinaran planon longtempan. Per granda ĉaro li tre ofte iris al populara Banjano ekster la urbo. Ĝi estis granda arbo, kie oni kutime preĝis kaj faris oferon al la dio, kiu vivis tie laŭ ilia imago. La reĝido paŝis el la ĉaro kaj faris saman oferon kiel la aliaj per

incenso, floroj, parfumoj kaj akvo sed sen bestoferajo.

Tio kaŭzis grandan sensacion kaj vaste disvastigis la informon pri liaj oferoj. Post nelonge ĉiuj opiniis, ke li estas vera kredanto je la granda dio de Banjano.

Poste la Reĝo Brahmadato forpasis kaj la reĝido fariĝis reĝo. La nova reĝo regis juste kaj profitigis la popolon. Ĉiuj liaj regnantoj fidis kaj respektis lin kiel justan kaj honoran reĝon.

Iutage, li pensis, ke estas taŭga tempo por plenumi lian planon. Li venigis ĉiujn estrojn de regnantoj en Benareso al la reĝa kunveno kaj demandis: "Eminentaj ministroj kaj lojalaj regnantoj, ĉu vi scias, kiel mi certigis min, ke mi fariĝos la

reĝo?" Neniu povis respondi.

Li demandis: "Ĉu vi memoras, ke mi ofte donis oferaĵojn eksterordinare abundajn al la granda dio de Banjano?"

"Jes, Via Reĝa Moŝto," ili respondis.

La reĝo daŭrigis: "Tiam ĉiufoje mi promesis al la potenca dio de la arbo. Mi preĝis, 'Majesta dio, se vi faros min reĝo de Benareso, mi donos specialan oferon, multe pli grandan ol florojn kaj parfumojn.' "

"Ĉar mi jam fariĝis reĝo, vi ĉiuj povas vidi per viaj propraj okuloj, ke dio jam realigis mian deziron. Do nun mi devas plenumi mian promeson kaj faros la specialan oferon."

Ĉiuj en la kunvenejo konsentis.

Ili diris: "Ni devas prepari la oferaĵon senprokraste. Kiajn bestojn vi volas mortigi?"

La reĝo diris: "Miaj karaj regnanoj, mi ĝojas, ke vi estas tiel kunlaboremaj. Mi promesis al la granda dio de Banjano, ke mi oferos ĉiun, kiu ne praktikas la kvin trejnajn ŝtupojn. Tiuj estas personoj, kiuj mortigas vivon, priŝtelas aliajn, faras malĉastaĵon, diras mensogon kaj trinkas alkoholaĵon. Mi promesis, ke mi oferos iliajn internaĵon, karnon kaj sangon sur la altaro de la granda dio se ili faros iun el la supraĵ malbonaj kondutoj!"

Estante tiel superstiĉaj, ĉiuj en la halo konsentis, ke tio estas vere farenda, alie, la dio punos la reĝon kaj regnon.

La reĝo pensis: "Ah, kiel superstiĉaj tiuj homoj estas, ke ili eĉ perdis la ordinaran konsciencon! Ili ne povas vidi, ke la unua trejna ŝtupo estas ne mortigi, kaj ke mi estusla sekvanta oferaĵo sur la altaro se mi oferos iun el miaj regnanoj. Pro ilia potenca superstiĉo mi povas fari tian promeson, kiun mi neniam povos plenumi."

Fidante la potencon de la superstiĉo, la reĝo ordonis la ĉefajn regnanojn: "Iru tra la tuta regno kaj anoncu la promeson, kiun mi faris al la dio. Poste proklamu, ke la unua milo da krimuloj kontraŭ iu ajn el la trejnaj ŝtupoj havos la honoroj esti oferitaj por plenumi la reĝan promeson."

Ekde tiam la regnanoj de Benareso

famiĝis pro la zorgema praktikado de la kvin trejnaj ŝtupoj, kaj neniun oferis la bona reĝo, kiu tiel bone konas siajn regnantojn.

La moralinstruo estas: Oferu vian propran miskonduton, sed neniun senhelpan beston.

## 49. REĜO BONO LA GRANDA



[Firmvolo]

Iam la Iluminiĝinto naskiĝis en reĝa familio de Benareso en norda Hindio. Kiam li fariĝis reĝo, li estis nomata Bono la Granda. Li gajnis la titolon pro sia ĉiama bonfaro, kiun li faris eĉ se li ne profitis el la rezulto. Ekzemple li elspezis multe da reĝa trezoro por konstruigi kaj funkciigi ses domojn de filantropio. En tiuj domoj oni senpage liveris vivbezonaĵojn kaj helpojn al ĉiuj malriĉuloj, bezonantoj, kaj eĉ fremdaj vojaĝantoj. Baldaŭ Reĝo Bono la Granda famiĝis pro siaj pacienco,



bonkoreco kaj kompatemo. Laŭdire li amis ĉiujn vivestaĵojn kiel patro amas siajn infanojn.

Kompreneble Reĝo Bono la Granda ankaŭ fastis en la sanktaj tagoj. Kaj nature li praktikis kvin maksimumojn kaj abstinis de la kvin malbonaj kondutoj, kiuj estas mortigi vivestaĵon, ŝteli, fari malĉastaĵon, mensogi, kaj trinki alkoholaĵon. Do lia ĝentila bonkoreco pli kaj pli puriĝis.

Reĝo Bono la Granda neniam volis fari malutilon al aliaj, do li rifuzis malliberigi kaj puni krimulojn. Informiĝinte pri konduto de la reĝo, unu el liaj plej altaj ministroj volis profiti de tio. Li faris planon trompi iujn virinojn en la reĝa haremo. Poste la afero estis malkaŝita kaj

oni raportis tion al la reĝo.

La reĝo alvenigis la malbonan ministron kaj diris: "Post enketo mi trovis, ke vi kulpis. Oni informiĝis pri tio, kaj vi jam malhonoris vin mem ĉi tie en Benareso. Do estus pli bone por vi forlasi kaj loĝi aliloke. Vi rajtas forporti ĉiujn viajn havaĵojn kune kun via familio. Iru kien ajn laŭ via plaĉo kaj vivu tie feliĉe. Lerne de tiu ĉi leciono."

Kune kun sia familio la ministro portis ĉiujn siajn posedaĵojn al la urbo de Kosalo. Lia afero prosperis kaj li fariĝis ministro de tiea reĝo ĉar li estis tre saĝa. Baldaŭ la reĝo de Kosalo rigardis lin kiel fidelan konsilanton. Iutage li raportis: "Via Reĝa Moŝto. Mi venis ĉi tien de Benareso. La

urbo de Benareso similas al abelujo, kie la abeloj ne havas pikilojn! La reganta reĝo estas tre malpotenca kaj malforta. Nur per malgranda trupo vi povas facile konkeri la urbon kaj ekposedi ĝin."

La reĝo dubis pri tio kaj diris: "Vi estas mia ministro, sed vi parolas kiel spiono, kiu tentas min en kaptilon!" Li respondis: "Ne, Via Reĝa Moŝto. Se vi ne fidas min, sendu viajn plej bonajn spionojn esplori pri mia raporto. Mi ne mensogas. Kiam rabistoj estas kondukitaj al la reĝo de Benareso, li kutime donas monon al ili, admonas ilin ne plu ŝteli, kaj poste liberigas ilin."

La reĝo decidis trovi, ĉu tio estas vera. Do li sendis kelkajn rabistojn prirabi

malproksiman landliman vilaĝon de Benareso. La vilaĝanoj kaptis la rabistojn kaj kondukis ilin al Reĝo Bono la Granda. Li demandis ilin: "Kial vi faris tian kulpon?"

La rabistoj respondis: "Via Reĝa Moŝto. Ni estas malriĉaj. Ni trovis nenian rimedon por nin vivteni. Ni ne povas trovi laboron por nin vivteni ĉar en via regno estas sufiĉaj laborantoj. Do ni povas fari nenion alian ol prirabi vian regnon por vivteni nin." Aŭdinte tion, la reĝo donacis monon al ili, admonis ilin ŝanĝi sian vivmanieron, kaj liberigis ilin.

Informiĝinte pri tio, la reĝo de Kosalo sendis alian bandon de banditoj al stratoj de Benareso. Ili prirabis vendejojn kaj eĉ

mortigis kelkajn homojn. Kiam oni kaptis kaj eskortis ilin al Reĝo Bono la Granda, li traktis ilin same ĝentile kiel la unuajn rabistojn.

Informiĝinte pri tio, la reĝo de Kosalo tuj kondukis siajn trupojn kaj elefantojn al Benareso.

Tiam la reĝo de Benareso havis grandan armeon kun tre bravaj elefantoj. Estis multaj eksterordinaraj soldatoj, iuj el kiuj estis tiel grandaj kiel gigantoj. Oni sciis bone, ke ili havas kapablon konkeri la tutan Hindion.

La gigantaj soldatoj raportis Reĝon Bono la Granda pri la malgranda agresanta armeo de Kosalo. Ili petis permeson ataki kaj mortigi ĉiujn agresantojn.

Sed Reĝo Bono la Granda ne volis sendi ilin al milito. Li diris: "Miaj infanoj, ne batalu por ke mi restu kiel reĝo. Se ni detruas vivojn de aliaj, ni detruas ankaŭ nian mensan pacon. Kiel ni povos mortigi aliajn? Lasu ilin havi la regnon, se ili vere volas. Mi ne volas kontraŭbatali."

La lojalaj ministroj petis: "Via Reĝa Moŝto. Ni batalos ilin per ni mem. Ne maltrankviliĝu pri vi mem. Nur faru la ordonon al ni." Sed la reĝo denove malhelpis ilin.

Samtempe la Reĝo de Kosalo sendis al li averton, ke tiu milito aŭ cedu la regnon. Reĝo Bono la Granda faris sian respondon: "Mi ne volas, ke vi militu kun mi, kaj vi ne volas, ke mi militu kontraŭ

vi. Vi rajtas posedi la regnon se vi deziras ĝin. Kiel ni rajtas mortigi homojn nur por decidi la nomon de la reĝo? Kio gravas eĉ se ŝanĝiĝos la nomo de la regno?"

Aŭdinte tion, la ministroj alvenis kaj petis: "Via Reĝa Moŝto, lasu nin eliri kun nia granda armeo. Ni batos ilin per niaj armiloj kaj kaptos ilin ĉiujn. Ni estas multe pli fortaj ol ili kaj ni promesas mortigi neniun el ili. Krome, se ni cedos la urbon, la malamika armeo nepre mortigos nin ĉiujn!"

Sed Reĝo Bono la Granda ne estis persvadita. Li rifuzis kaŭzi malutilon al aliaj homoj. Li respondis: "Eĉ se vi ne volas mortigi, multaj homoj vundiĝos pro la batalo, kaj multaj homoj perdos

sian vivon pro hazardaj kaŭzoj. Neniu scias, ĉu la agresantoj vere mortigos nin, sed ni scias bone, ĉu nia nuna konduto estas prava aŭ ne. Do mi ne damaĝos nek damaĝigos iun ajn vivestaĵon!"

Do Reĝo Bono la Granda ordonis, ke oni malfermu la urbajn pordojn por la agresantoj. Li kondukis siajn ministrojn al la supra etaĝo de la palaco kaj ordonis ilin: "Diru nenion kaj pene tenu vin kvietaj."

La Reĝo de Kosalo eniris la urbon de Benareso, kaj trovis neniun kontraŭstari. Do li kaj liaj soldatoj eniris kaj atingis la plej supran etaĝon. Ili kaptis la senkulpan Reĝon Bono la Granda. La soldatoj ligis la manojn de la venkita reĝo kaj ĉiuj liaj ministroj.



Poste oni kondukis Reĝon Bono la Granda kaj liajn ministrojn al la tombejo ekster la urbo kaj enterigis ilin en staranta pozo ĝis la kolo nur kun la kapo super la tersurfaco. Eĉ kiam oni preme malmoligis koton ĉirkaŭ lia kolo, la granda reĝo restis senmalama en la menso kaj diris nenion.

Neniu el la ministroj diris ion kontraŭan pro granda obeemo al Reĝo Bono la Granda kaj al disciplino. Sed la Reĝo de Kosalo tute ne havis kompatemon. Li diris krude: "Venas nokto, kaj la ŝakaloj agu laŭ sia plaĉo!"

Ĉe noktomezo, granda gregoj da ŝakaloj vagis en la tombejon. Eble ili flaris la homkarnan festenon pretan por ili.

Vidinte la ŝakalojn, Reĝo Bono la

Granda kaj ĉiuj liaj ministroj kriegis senprokraste kaj fortimigis ilin. Tio okazis dufoje. Poste la saĝaj ŝakaloj eksciis: "Tiuj viroj estis lasitaj ĉitie nur por ke ni mortigu kaj manĝu." Ne plu sentante timon, ili ignoris la kriojn. La ŝakala reĝo iris rekte al la vizaĝo de Reĝo Bono la Granda.

La reĝo oferis sian gorgon al la besto. Sed antaŭ ol la ŝakala reĝo ekmordis ĝin, la reĝo tuj kaptis la mentonon de la ŝakalo per siaj dentoj. Ne vundante lin, Reĝo Bono la Granda nur tenis lin firme, tiel ke la ŝakala reĝo hurlegis pro teruro. Tio timigis aliajn ŝakalojn kaj ili ĉiuj forkuris.

Samtempe la ŝakala reĝo sin ĵetis tien kaj reen, freneze baraktante por sin

liberigi de la fortaj makzeloj de la homa reĝo. Tion farante, li malkompaktigis la teron ĉirkaŭ la kolo kaj ŝultroj de la reĝo. Reĝo Bono la Granda delasis la vekriantan ŝakalon, sukcesis sin elŝovi el la malkompaktigita tero kaj sin eltiri sur la teron. Poste li liberigis ĉiujn siajn timigitajn ministrojn.

Okazis, ke estis kadavro de mortinto proksime. Ĝi hazarde kuŝis sur limo de regnoj poseditaj de du rivalaj demonoj. La demonoj kvereladis pri divido de la kadavro, insultante unu la alian en la demonia maniero.

Poste unu diris al la alia: "Kial ni senĉese kvereladas anstataŭ ekmanĝi? Tie estas Reĝo Bono la Granda de Benareso.

Li estas fama en la mondo pro sia justeco.  
Li dividu la mortinton inter ni."

Ili trenis la kadavron al la reĝo kaj petis lin dividi ĝin por ili egale. La reĝo diris: "Mi ĝojos dividi ĝin por vi, miaj amikoj. Sed mi estas malhonora kaj malpura. Mi devas purigi min unue."

Ambaŭ demonoj uzis siajn magiajn povojn kaj alportis parfumitan akvon, parfumon, vestaĵon, ornamaĵon kaj florojn el la reĝa palaco de Benareso. La reĝo sin banis, parfumis, vestis kaj kovris per ornamaĵoj kaj floraj girlandoj.

La demonoj demandis al Reĝo Bono la Granda, ĉu estas io ajn, kion ili povas fari. Li respondis, ke li estas malsata. Do la demonoj alportis ankaŭ la plej bongustan

rizaĵon per ora bovlo kaj parfumitan akvon per ora taso el la reĝa palaco de Benareso per siaj magiaj povoj.

Poste, Reĝo Bono la Granda petis, ke ili alportu la reĝan spadon el sub la kapkuseno de la kosala Reĝo, kiu dormis en la palaco de Benareso. Per magio la demonoj plenumis tion tre facile. La reĝo disigis la kadavron ĝuste laŭ la spino per la spado. Li lavis la reĝan spadon kaj pendigis ĝin ĉe sia flanko.

La malsataj demonoj ĝojplene englutis la egale dividitan kadavron. Poste ili dankis al Reĝo Bono la Granda: "Nun niaj ventroj estas plenplenaj. Ĉu estas io alia, per kio ni povas plezurigi vin?"

Li respondis: "Metu min ĉe la reĝon

de Kosalo en mia propra dormĉambro de la palaco per via magio kaj krome, portu ĉiujn miajn ministrojn en iliajn hejmojn." Dirinte nenion, la demonoj tuj faris tion laŭ peto de la reĝo.

Tiam la Reĝo de Kosalo dormis profunde en la reĝa dormoĉambro. Reĝo Bono la Granda tenere tuŝis la ventron de la dormanta reĝo per la reĝa spado. La reĝo vekigis ege surprizite. En la malhela lamplumo li terurigis, vidinte Reĝon Bono la Granda sinklininta al li kun spado en la mano. Li viŝis al si la okulojn kaj certigis al si, ke tio ne estas koŝmaro.

Li demandis la grandan reĝon: "Via Reĝa Moŝto, kiel vi venis ĉitien spite ĉiujn miajn gardistojn? Vi estis enterigita

ĝis la kolo en la tombejo, do kiel vi estas senmakule pura, dolĉe parfuma, en via propra reĝa robo, kaj ornamita per valoraj juveloj kaj belegaj floroj?"

Reĝo Bono la Granda informis lin pri la okazaĵo de sia liberiĝo el grego da ŝakaloj. Li rakontis pri la demonoj, kiuj venis al li por ĉesigi la kvereladon, kaj kiel ili dankeme helpis lin per siaj magiaj povoj.

Aŭdinte tion, la reĝo de Kosalo venkiĝis de sia propra honto. Li riverence klinis sian kapon al Reĝo Bono la Granda kaj ekploregis: "Ho, granda reĝo, vian plej subliman bonkorecon konas eĉ la malsaĝaj ferocaj demonoj, kiuj vivas per manĝado de karno kaj trinkado de sango. Sed mi,

kiu feliĉe naskiĝis kiel inteligenta kaj civilizita homo, estis tro malsaĝa por scii, kiel granda estas via pura bono.

"Mi promesas ne plu kontraŭi vin, mian mastron, kiu jam gajnis tiel perfektan nemalutilecon. Kaj mi promesas servi al vi ĉiam kiel via vera amiko. Bonvolu pardoni min, granda reĝo." Tion dirinte, la reĝo de Kosalo kuŝigis Reĝon Bono la Granda sur la reĝan liton dum li kuŝiĝis sur malgrandan liton kiel servisto.

En la sekva tago la Reĝo de Kosalo venigis ĉiujn siajn soldatojn en la palacan korton. Tie li publike laŭdis la reĝon de Benareso kaj refoje petis pardonon de li. Li redonis la regnon kaj promesis, ke li por ĉiam protektu Reĝon Bono. Poste li punis



sian konsilanton, la kulpan ministron, kaj revenis al Kosalo kun ĉiuj siaj trupoj kaj elefantoj.

Reĝo Bono la Granda sidis majeste sur sia ora trono, kies kruroj forme similas tiujn de antilopo. Oni ŝirmis lin kontraŭ la suno per pure blanka reĝa ombrelo. Li instruis al siaj regnantoj: "Popolanoj de Benareso, la bonaj kondutoj ĉiam komenciĝas per abstinado de la kvin fikondutoj. La plej altaj kvalitoj de Bonulo, ĉu reganto aŭ regato, estas kompatemo kaj bonkoreco. Kun tiuj kvalitoj oni ne malutilas al aliaj pro ia ajn kaŭzo aŭ kosto. Kiel ajn minacas danĝero, oni devas sin teni tolerema ĝis la grandeco de bonkoreco venkos en la fino."

Tra lia resta regperiodo la regnantoj de Benareso vivis pace kaj feliĉe. Reĝo Bono la Granda daŭre plenumis la bonfarajn laborojn. Poste li forpasis kaj renaskiĝis laŭ sia merito.

La moralinstruo estas: La bonkoreco venkos ĉion sen damaĝi aliajn.

## 50. REĜO FRUKABUNDULO KAJ REĜIDO SIVALI



### [Ĉapitro I. Renaskiĝo de la Bodisatvo]

Iam estis reĝo en la urbo de Mitila. Li havis du filojn. La pliĝa filo nomiĝis Malbona Frukto, kaj la alia Povra Frukto.

Kiam ili estis tre junaj, la reĝo faris la pliĝan filon krona reĝido, kiu estis vicreganto proksima al la reĝa trono. Reĝido Povra Frukto fariĝis komandanto de armeo.

Fine la maljuna reĝo forpasis. Do Reĝido Malbona Frukto fariĝis nova reĝo, kaj lia frato krona reĝido.

Post nelonge iu servanto ekmalŝatis kronan reĝidon Povra Frukto. Li iris al Reĝo Malbona Frukto kaj mensogis, ke lia frato komplotas por mortigi lin. Komence la reĝo ne kredis je li. Sed poste la servanto senĉese ripetadis la mensogon ĝis la reĝo sentis ektimon. Oni ligis Reĝidon Povra Frukto per ĉenoj kaj malliberigis lin en la subtera malliberejo de la palaco.

La reĝido pensis: "Mi estas justulo, kaj al mi ne decas tiuj ĉenoj. Mi neniam intencis mortigi mian fraton, kaj mi eĉ ne koleris kontraŭ li. Do nun mi vokas la povon de Vero. Se mia diro estas vera, disfalu la ĉenoj kaj malfermiĝu la pordo de la subtera malliberejo!" Vere okazis miraklo, ke la ĉenoj dispeciĝis kaj la

pordo malfermiĝis per si mem. La reĝido forfuĝis en vilaĝon ekster la urbo. La lokanoj rekonis lin. Ili ĉiuj respektis kaj helpis lin, do la reĝo ne sukcesis kapti lin.

Kvankam la krona reĝido vivis kaŝe, li fariĝis reganto de la tuta regiono malproksima. Baldaŭ li starigis grandan armeon. Li pensis: "Kvankam antaŭe mi ne estis malamiko de mia frato, nun mi estas malamika al li." Do li kondukis sian armeon kaj ĉirkaŭis la urbon de Mitila.

Li sendis mesaĝon al Reĝo Malbona Frukto: "Mi ne estis via malamiko, sed vi faris min tia, do mi venis por lanĉi militon kontraŭ vi. Mi donas al vi rajton elekti, ĉu militi kun mi aŭ cedi al mi la kronon kaj regnon." Informiĝinte pri tio, la plejparto

de urbanoj eliris kaj aliĝis al la armeo de la reĝido.

Reĝo Malbona Frukto decidis kontraŭbatali. Li volontis ĉion fari por reteni sian regadon. Antaŭ ol eliri kun sia armeo, li iris por adiaŭi sian unuan reĝinon. Ŝi estis naskonta bebon baldaŭ. Li diris al ŝi: "Neniu scias, kiu venkos en la milito, mia karulino, do vi devas protekti la bebon en vi se mi mortos." Poste li iris al la milito kuraĝe kaj baldaŭ mortis en batalo kontraŭ soldatoj de sia malamika frato.

La informo pri morto de la reĝo cirkulis tra la tuta regno. La reĝino ŝajnigis, ke ŝi estas senhejmulino malriĉa kaj malpura. Ŝi sin vestis per malnovaj

vestaĵoj kaj ŝmiris malpuraĵon sur sian korpon. Ŝi metis en korbon iom da oro de la reĝo kaj la plej valorajn juvelojn de si mem. Ŝi kovris la valoraĵojn per malpura rizo, por ke neniu priŝtelu ŝin. Poste ŝi forlasis la urbon tra la norda pordo. La reĝino ĉiam vivis en la urbo, do ŝi ne sciis, kien iri. Ŝi sidiĝis ĉe la vojo kaj komencis demandi, ĉu iu iros al Urbo Kampao, ĉar ŝi iam aŭdis pri la nomo de la urbo.

Okazis hazardo, ke la naskiĝonta bebo ne estos ordinarulo kaj tio ne estos lia unua vivo aŭ renaskiĝo. Antaŭ milionoj da jaroj, li estis disĉiplo de longe forgesita instruanta Budho, la perfekta Iliminiĝinto. Li tutkore deziris fariĝi budho kiel lia estimata instruisto.

Li renaskiĝis en multaj vivoj. Iam li naskiĝis kiel kompatindaj bestoj, iam kiel longvivaj feoj kaj iam kiel homoj. Li ĉiam klopodis lerni de siaj eraroj kaj disvolvi la "dek perfektojn" por ke li purigu sian menson kaj forigu la tri radikalajn kaŭzojn de malbonaj kondutoj, kiuj estas la venenoj el avido, kolero kaj iluzio de falsa memo. Uzante perfektojn li iutage povos anstataŭigi la venenojn per tri purecoj, kiuj estas neavido, amo kaj saĝo.

La grandulo iam estis modesta disĉiplo de la forgesita Budho. Lia celo estis atingi la saman luminiĝon de Budho, travivaĵo de kompleta Vero. Do oni nomis lin Bodisatvo, kiu signifas "Illumini vivestaĵojn". Neniu vere scias pri la



milionoj da vivoj travivitaj de tiu ĉi granda heroo, sed en multaj historioj oni rakontas pri tio, inkluzive de la graveda reĝino, kiu estis baldaŭ naskonta lin. Post multaj pliaj vivoj li fariĝis budho, kiu estas memorata kaj adorata eĉ en la nuna mondo.

Je la tempo de nia rakonto la Iluminiĝinto jam atingis la Dek perfektojn. Do la gloro de lia naskiĝo kaŭzis tertremon en ĉiuj ĉielaj mondoj, inkluzive de Ĉielo 33 regata de Reĝo Sakao. Kiam la ĉiela reĝo sentis la tertremon, kiel dio, li sciis bone, ke tion kaŭzas baldaŭ naskiĝonta bebo de la alivestita Reĝino el Mitila. Kaj li sciis, ke la bebo estos homo kun granda merito, do li decidis eliri por helpi la reĝinon.

Reĝo Sakao faris kovritan ĉaron kun lito en ĝi, kaj aperis sur la vojo antaŭ la graveda reĝino. Li ŝajnis, ke li estas ordinara maljunulo. Li kriis: "Ĉu iu volas veturi al Kampao?" La senhejma reĝino respondis: "Mi deziras iri tien, bonkora sinjoro." "Do iru kun mi," la maljunulo diris.

Estante baldaŭ naskonta, la graveda reĝino estis tre dika. Ŝi diris: "Mi ne kapablas grimpi en vian ĉaron. Simple portu mian korbon kaj mi sekvu vin malantaŭe." La maljunulo, reĝo de la dioj, respondis: "Ne maltrankviliĝu! Ne maltrankviliĝu! Mi estas plej saĝa ĉaristo. Do estu trankvila. Nur suriru mian ĉaron!"

Kiam ŝi levis sian piedon, Reĝo Sakao

magie levis la teron sub ŝi! Do ŝi facile suriris en la ĉaron. Ŝi sciis, ke tiu eble estas dio, kaj tuj dronis en profundan dormon.

Sakao kondukis la ĉaron ĝis rivero. Li vekis la reĝidino kaj diris: "Vekiĝu, filino. Banu vin en la rivero, kaj vestu vin per tiu bona vestaĵo, kiun mi alportis por vi. Poste manĝu iom da rizo." Ŝi obeis. Post la manĝo ŝi kuŝiĝis kaj dormis iom pli longe.

Vespere ŝi vekiĝis kaj vidis altajn domojn kaj murojn. Ŝi demandis: "Kio estas tiu ĉi urbo, Patro?" Reĝo Sakao respondis: "Tio estas Kampao. Mi prenis plej mallongan vojon. Nun ni estas ĉe la suda pordo de la urbo, kaj vi povas

eniri sekure. Mi devas reveni al mia malproksima vilaĝo." Do ili adiaŭis unu de la alia kaj Sakao malaperis en malproksimo, revenante al sia ĉiela mondo.

La reĝino iris en la urbon kaj sidiĝis en manĝejo. Tie hazarde estis saĝulo vivanta en Kampao. Li recitis mantrojn kaj donis konsilojn por helpi homojn, kiuj estis malsanaj kaj malfortunaj. Kiam li iris sur la vojo por sin bani en la rivero kune kun 500 sekvantoj, li vidis la belan reĝinon de malproksime. La granda merito de la naskiĝonto en ŝi donis al ŝi mildan varman lumon, kiun nur la saĝulo povis rimarki. Li tuj sentis bonkorecon kaj mildan ŝaton al ŝi, kvazaŭ ŝi estus lia propra plijuna fratino. Do li lasis siajn sekvantojn ekstere

kaj iris rekte en la manĝejon.

Li demandis ŝin: "De kiu vilaĝo vi venis, Fratino?" Ŝi respondis: "Mi estas la unua reĝino de Reĝo Malbona Frukto de Mitila."

Li demandis: "Do kial vi venis ĉi tien?" "Mia edzo estis mortigita de la armeo de sia frato, Reĝido Povra Frukto," ŝi diris, "mi timis, do mi forkuris por protekti la bebon en mi." La saĝulo demandis: "Ĉu vi havas parencojn en la urbo?" Ŝi respondis: "Neniun, sinjoro." Do li diris: "Tute ne maltrankviliĝu. Mi naskiĝis en riĉa familio kaj mi mem estas tre bonhava. Mi prizorgos vin kiel mian propran fratinnon. Nun nomu min frato, kaptu miajn piedojn kaj ekploru."

Kiam ŝi faris tion, la sekvantoj eniris. La saĝulo klarigis al ili, ke ŝi estas lia plijuna fratino longe perdita. Li ordonis al siaj plej intimaj servantoj konduki ŝin en lian hejmon per kovrita ĉaro kaj informi lian edzinon, ke tiu estas lia fratino, kiun ŝi devas bone prizorgi.

Ili sekvis lian ordonon. La edzino bonvenigis ŝin, aranĝis al ŝi varman banon kaj ripozon en lito.

Sin baninte en la rivero, la saĝulo revenis hejmen. Je la tempo por vespermanĝo, li petis sian fratinton manĝi kun ili. Post la manĝo li invitis ŝin resti en lia hejmo.

Post nur kelkaj tagoj la reĝino naskis belan knabeton. Ŝi nomis lin Fruktabundulo. Ŝi

diris al la saĝulo, ke tio estas la nomo de ŝia bopatro, kiu iam estis la reĝo de Mitila.

## [Ĉapitro 2. Gajni Povon]

La bebo kreskis kaj fariĝis malgranda knabo. Liaj amiketoj ofte mokis lin pro tio, ke li naskiĝis ne en tiel alta klaso kiel ili. Do li revenis hejmen kaj demandis al sia patrino, kiu estas lia patro. Ŝi admonis lin ne atenti, kion la aliaj diris. Ŝi informis lin, ke lia patro estis mortinta Reĝo Malbona Frukto de Mitila, kies trono estis forrabita de lia frato Reĝido Povra Frukto. Poste, lin ne plu ĝenis tio, kiam la aliaj nomis lin "filo de vidvino."

Antaŭ ol li estis 16-jara, la brile juna

Fruktabundulo ellernis ĉiujn sciojn pri religio, literaturo kaj artifikoj de militado. Li kreskiĝis kiel tre bela junulo.

Li opiniis, ke estas ĝusta tempo por repreni sian justan kronon, kiun lia onklo forrabis. Do li iris al sia patrino kaj demandis: "Ĉu vi havas trezoron de mia patro?" Ŝi respondis: "Kompreneble jes! Mi ne elfuĝis kun malplenaj manoj. Pensinte pri vi, mi prenis perlojn, juvelojn kaj diamantojn. Do vi ne bezonas perlabori. Iru rekte por repreni vian regnon."

Sed li diris: "Mi prenos nur duonon, Panjo. Mi veturos boate al Birmo, la lando de oro, kaj tie mi perlaboros monon." Lia patrino diris: "Ne, mia filo. La vojaĝo



al la eksterlando estas tro danĝera. Ni havas sufiĉe da valoraĵoj ĉi tie!" Li diris: "Mi devas lasi duonon ĉe vi, Panjo, tiel vi povas vivi komforte kiel reĝino." Tion dirinte, li forlasis per ŝipo al Birmo.

En la sama tago kiam Reĝido Fruktabundulo ekvojaĝis, lian onklon Reĝo Povra Frukto trafis serioza malsano. Li estis tiel malsana, ke li ne plu kapablis forlasi la liton.

Samtempe sur la ŝipo estis 350 vojaĝantoj al Birmo. Ili veturis sep tagojn, kiam okazis fortega ŝtormo, kiu difektis kaj detruis la ŝipon. Ĉiuj ploris pro timo kaj preĝis al diversaj dioj por helpo krom la reĝido. La Bodisatvo neniel ploris en timo. La iluminiginto ne preĝis al dioj por

helpo, anstataŭe, li estis preta helpi sin mem.

Li plenigis sian stomakon per kondensita butero miksitita kun sukero, ĉar li ne sciis kiom longe daŭros ĝis lia sekva manĝo. Li trempis siajn vestaĵojn en oleo por sin protekti kontraŭ malvarma oceanakvo kaj helpi sin flosi sur la oceano. Poste, kiam la ŝipo sinkis, li supreniris kaj tenis la maston, ĉar ĝi estis la plej alta parto de la ŝipo. Kiam la ferdeko subakviĝis, li sin tiris sur la maston.

Dume, liaj samŝipanoj tremantaj kaj preĝantaj dronis en akvo kaj estis englutitaj de malsataj fiŝoj kaj grandaj testudoj. La akvo baldaŭ ruĝiĝis de sango.

Kiam la ŝipo subakviĝis, Reĝido

Fruktabundulo atingis la supron de la masto. Por eviti dronon en la akvo de sango, li saltis forte de la la mastsupro al la direkto de Regno Mitila. Dum la reĝido sin savis de la maĉantaj faŭkoj de la fiŝoj kaj testudoj, Reĝo Povra Frukto mortis sur la lito.

Post la forta eksalto de la mastsupro, la reĝido falis en smeraldan maron. Lia korpo brilis kiel oro kiam li naĝis dum sep tagoj kaj sep noktoj. Vidinte, ke estas fastotago de plena luno, li purigis sian buŝon per sala akvo kaj observis la Ok maksimumojn, kiuj estas unutagaj abstinadoj de mortigo, ŝtelo, seksumo, mensogo, alkoholaĵo, ornamado, luksaj mebloj kaj aliaj manĝoj krom tagmanĝo

Iam antaŭe dioj en kvar direktoj asignis diinon kiel protektanton de oceanoj. Ili informis ŝin, ke ŝia devo estas protekti precipe tiujn, kiuj honoras kaj respektas siajn gepatrojn kaj aliajn pliagulojn. Do ĉiuj, kiuj ne estis destinitaj droni en la oceano, estis protektindaj por ŝi.

Fruktabundulo ĝuste estis unu el la protektindaj homoj de la oceana diino. Sed dum sep tagoj kaj noktoj li naĝadis tra la maro, la diino preteratentis sian devon kaj ne rimarkis lin. Ŝi okupiĝis ĝui ĉielan plezuron anstataŭ observi la oceanojn.

Fine ŝi ekmemoris sian devon kaj ekrigardis la oceanojn. Tiam ŝi vidis la oran reĝidon baraktanta en

la smeralda maro post naĝado de septagnoj. Ŝi pensis: "Se mi lasus reĝidon Fruktabundulon morti en la oceano, mi estos ne plu bonvena en la ĉiela mondo. Fakte, li estas la Iluminiĝinto!"

Do ŝi sin aliformigis bele kaj flugis en la aero proksime al li. Dezirante lerni la Veron de li, ŝi demandis: "Sen vidi la bordon, kial vi klopodas por atingi la finon de la oceano?"

Aŭdinte la vortojn, la reĝido pensis: "Mi vidis neniun dum la septaga naĝado. Kiu tiu estas?" Kiam li vidis la diinon super si, li diris: "Ho, aminda diino, mi scias, ke klopodo estas la vojo de la mondo. Do nur se mi estas en la mondo, mi senĉese klopodos, eĉ en oceano sen

videbla bordo."

Dezirante scii pli multe de li, ŝi provis lin dirante: "Tiu vasta oceano etendiĝas multe pli malproksimen ol vi povas imagi. Via klopodo estas senutila ĉar vi devas morti ĉi tie!"

La reĝido respondis: "Kara diino, kiel mia klopodo estus senutila? Tiu, kiu neniam rezignas sian klopodadon, ne estos kulpigita de siaj parencoj vivantaj sube kaj de la dioj vivantaj supre. Mi ne pentas. Kiel ajn verŝajne neeble, se mi ĉesigas la klopodadon, tio kaŭzos mian dronon."

Plezuriĝinte pro liaj respondoj, la protektanta diino provis lin lastafoje. Ŝi demandis: "Kial vi daŭre klopodas, kiam vere ne estos rezulto por atingi la bordon

krom viaj sufero kaj morto?"

Li respondis al ŝi denove, kiel instruisto al lernanto: "Estas metodo en la mondo, ke oni faras planon kaj klopodas por atingi la celon. Eble la plano estos destinita al malsukceso, nur tempo povas atesti pri tio, sed la valoro kuŝas en la nuna klopodo."

"Kaj krome, ho diino, ĉu vi ne vidis, ke mia ago jam donis rezultojn? Miaj samŝipanoj nur preĝis kaj ili ĉiuj perdis la vivon, sed mi jam naĝis sep tagnoktojn. Nun vi flugas super mi! Do mi naĝos per mia forto eĉ tra la tuta oceano por atingi la bordon. Nur se mi havos iom da forto, mi senĉese penados."

Ege kontente, la oceana diino

protektanta bonulojn diris: "Vi brave batalas la grandan oceanon kontraŭ senesperaj malfacilaĵoj, kaj rifuzas forkuri de la malfacilaĵo antaŭ vi. Iru kien ajn laŭ via deziro! Vi havos mian protektadon kaj neniu povas haltigi vin. Nur diru al mi, kien mi portu vin."

La reĝido informis ŝin, ke li deziras iri al Mitila. La diino tenere levis lin kiel faskon da floroj kaj portis lin ĉe sia brusto kiel amema patrino kun novnaskita bebo. Ŝi flugis tra la aero dum la Iluminiĝinto dormis lulate en ŝia ĉielula sino.

Atinginte regnon Mitila, ŝi metis lin sur sanktan ŝtonon en mangĝardeno kaj petis al la ĝardena diino prizorgi lin. Poste, la prokteka diino de la oceanoj



revenis al sia hejmo en la ĉiela mondo.

La mortinta Reĝo Povra Frukto lasis post si nur filinon, sed ne filojn. Ŝi estis saĝa kaj bone edukita. Ŝia nomo estis Reĝidino Sivali.

Kiam la reĝo estis mortanta, la ministroj demandis lin: "Kiu estos la nova reĝo?" Reĝo Povra Frukto diris: "Tiu, kiu ajn povas kontentigi mian filinon Sivali, kiu ajn rekonas la kapon de la reĝa lito, kiu ajn povas tiri la pafarkon, kion nur mil homoj povas kune fari, aŭ kiu ajn povas trovi la 16 kaŝitajn trezorojn, povos fariĝi la nova reĝo."

Post la funebrado pri la reĝo, la ministroj ekserĉis la novan reĝon. Unue ili volis trovi tiun, kiu povas kontentigi la

reĝidinon. Ili venigis la generalon de la armeo.

Reĝidino Sivali volis provi lin, por ke Mitila estu regata de potenca reĝo. Ŝi alvenigis lin al si. Senprokraste li kuregis supren laŭ la palaca ŝtuparo. Ŝi diris: "Por provi vian fortecon, kuru tien kaj reen en la palaco." Klopodante nur por plezurigi ŝin, la generalo kuradis tien kaj reen senĉese ĝis ŝi signis, ke li ĉesu. Poste, ŝi diris: "eksaltu!" La generalo tion faris senpripense. Poste, la reĝidino diris al li: "Venu ĉitien por masaĝi al mi la piedojn." Li do sidiĝis antaŭ ŝi kaj ekmasaĝis ŝiajn piedojn.

Ŝi subite piedbatis lin je la brusto kaj faligis lin de sur la ŝtuparo. Ŝi sin turnis

al la servantaj sinjorinoj kaj diris: "Saĝo mankas al tiu ĉi stultulo. Li opinias, ke la forto nur kuŝas en la kurado kaj saltado, kaj sekvas ordonojn senpripense. Li havas neniun potencon de sia karaktero. Mankas al li potenco bezonata por regi la regnon. Do tuj forĵetu lin de ĉi tie!"

Poste, oni demandis la generalon pri lia renkontiĝo kun Reĝidino Sivali. Li diris: "Mi ne volas diri pri tio. Ŝi ne estas homo."

La sama afero okazis al la trezoristo, kasisto, gardisto de reĝa sigelilo, kaj la kortega glavisto. La reĝidino trovis, ke ili ĉiuj estas sentaŭgaj malsaĝuloj.

Do la ministroj decidis ĉesigi la provadon fare de la reĝidino, kaj ekserĉis

tiun, kiu povis streĉi pafarkon tireblan nur por mil homoj kune, sed ili denove malsukcesis. Same, ili trovis neniun, kiu sciis la kapon de la reĝa kvardrata lito, kaj kiu povis trovi la 16 trezorojn.

La ministroj pli kaj pli maltrankviliĝis, ke ili ne povos trovi la taŭgan reĝon. Do ili konsultis la ĉefpastron de la reĝa familio. Li proponis al ili: "Ne maltrankviliĝu, miaj amikoj. Ni sendos ĉaron de kortega ceremonio. Tiu, antaŭ kiu la ĉaro haltos, povos regi la tutan Hindion."

Do ili ornamis la ĉaron kaj jungis al ĝi kvar plej belajn ĉevalojn de la kortego. La honora ĉefpastro aspergis la ĉaron per sankta akvo el la sankta orkruĉo. Li proklamis: "Nun iru antaŭen, ĉaro sen

ĉaristo. Trovu la taŭgulon, kiu havas  
sufiĉan meriton por regi la regionon."

La ĉevaloj tiris la ĉaron ĉirkaŭ la  
palaco kaj poste sur la ĉefan vojon de  
Mitila. Ilin sekvis kvar armeoj el la  
elefantoj, ĉaristoj, kavaliroj kaj soldatoj.

Ĉiuj plej potencaj politikistoj de la  
urbo esperis, ke la procesio haltu antaŭ  
iliaj domoj. Sed anstataŭe ĝi forlasis la  
urbon tra la orienta pordo kaj iris rekte en  
la mangĝardenon. Ĝi haltis antaŭ la sankta  
ŝtono, sur kiu Reĝido Fruktabundulo  
dormis.

La ĉefpastro diris: "Provu la  
dormanton por vidi, ĉu li konvenas por  
fariĝi nia reĝo. Se li vere estas taŭga, li  
ne timos la bruon de tamburoj kaj armiloj

de ĉiuj kvar armeoj." Do ili faris grandan bruon, sed la reĝido nur sin turnis sur alian flankon kaj daŭre dormis. Ili faris bruon denove, eĉ pli laŭtan, sed la reĝido nur simple sin turnis de flanko al la alia.

La ĉefpastro ekzamenis la plandojn de la dormanto. Li diris: "Li povas regi ne nur la Regnon Mitila, sed ankaŭ la tutan mondon en ĉiuj kvar direktoj." Li vekis la reĝidon kaj diris: "Vekiĝu, Via Moŝto. Ni petas, ke vi estu nia reĝo."

Reĝido Fruktabundulo demandis: "Kio okazis al via reĝo?" "Li forpasis," respondis la pastro. "Ĉu li havas infanojn?" demandis la reĝido. "Nur filinon Reĝidino Sivali," respondis la pastro. Tiam Reĝido Fruktabundulo konsentis fariĝi la nova

reĝo.

La ĉefpastro ŝutis juvelojn sur la sanktan ŝtonon. Sin baninte, la reĝido sidiĝis inter la juvelojn. Li estis aspergita per parfumita akvo el orumita bovlo. Poste li fariĝis kronita Reĝo Fruktabundulo. La nova reĝo veturis en la reĝa ĉaro al la urbo de Mitila kaj la palaco, sekvata de la majesta procesio.

Reĝidino Sivali ankoraŭ deziris provi la reĝon. Do ŝi sendis serviston por informi lin, ke ŝi deziras lin iri al ŝi senprokraste. Sed Reĝo Fruktabundulo ignoris la alvokon, simple daŭre inspektante la palacon kun ĝiaj mebloj kaj artaĵoj. La sendinto raportis tion al la reĝino, kaj ŝi resendadis lin fojfoje, sed li

revenis kun la samaj rezultoj. La servisto diris al ŝi: "La viro estas persono, kiu scias sian propran menson kaj estas ne facile ŝanceligebla. Li ne zorgas pri viaj vortoj kiel ni ne zorgas herbon kiam ni iras sur ĝi."

La reĝo atingis la tronon ĉambron, kie la reĝidino atendis. Li iris aplombe supren laŭ la palaca ŝtuparo, nek haste, nek malrapide, majeste kiel leono juna kaj forta. La reĝidino tiel emociiĝis de lia sinteno, ke ŝi tuj iris al li, respekte donis manon al li, kaj gvidis lin al la trono. Li gracie sidiĝis sur la tronon.

Li demandis la kortegajn ministrojn: "Ĉu la antaŭa reĝo lasis proponon por provi la novan reĝon?" "Jes, Via Reĝa



Moŝto," ili respondis, "'kiu ajn povas kontentigi mian filinon Sivali.'" La reĝo respondis: "Vi jam vidis, ke la Reĝidino donis sian manon al mi. Ĉu estas alia provo?"

Ili respondis: "'Kiu ajn rekonas la kapon de la reĝa kvadrata lito.'" La reĝo prenis oran harpinglon de sia kapo kaj donis ĝin al Reĝidino Sivali, dirante: "Formetu ĝin por mi." Senpripense, ŝi metis ĝin ĉe la litkapo. Li petis al la ministroj ripeti la demandon kvazaŭ li ne aŭdus unuafoje. Post kiam ili ripetis la saman demandon, li montris la oran harpinglon.

"Ĉu estas alia provo?" demandis la reĝo. "Jes, Via Reĝa Moŝto," respondis la

ministroj, "kiu ajn povas streĉi la pafarkon tireblan nur por mil viroj kune." Kiam oni alportis la pafarkon, la reĝo tiris ĝin sen leviĝi de la trono. Li faris tion tiel facile kiel virino kurbigis bastoneton, per kiu ŝi fadenigas kotonon por ŝpinado.

"Ĉu estas pliaj provoj?" Li demandis. La ministroj respondis: "Kiu ajn povas trovi 16 kaŝitajn trezorojn! Tio estas la lasta provo."

"Kio estas la unua en la listo?" Li demandis. Ili respondis: "La unua estas la trezoro de la leviĝanta suno." Reĝo Fruktabundulo konsciis, ke troviĝas artifiko en trovado de ĉiu trezoro. Li sciis, ke Silenta Budho ofte estas komparata kiel la gloro de la suno. Do li demandis: "Kien

la reĝo iris renkonti kaj nutriĝi Silentajn Budhojn?" Kiam ili montris al li la lokon, li ordonis ilin elfosi la unuan trezoron.

La dua estas trezoro de malleviĝanta suno. Reĝo Fruktabundulo sciis, ke tio estas la loko, kie la estinta reĝo adiaŭis la Silentajn Budhojn. Per la sama rimedo li trovis ĉiujn kaŝitajn trezorojn.

La regnantoj ĝojegis, ke li trapasis ĉiujn provojn. Kiel la unua oficiala aktivado, li konstruigis domojn filantropiajn en la centro de la urbo, kaj ĉiu domo havis kvar pordojn. Li donacis ĉiujn 16 trezorojn por helpi malriĉulojn kaj bezonantojn.

Poste li sendis por bonvenigi sian patrinon, reĝinon de mortinta Reĝo Malbona Fruko, kaj ankaŭ la bonkoran

saĝulon de Kampao. Li donis la honorojn konvenajn al ili ambaŭ.

Ĉiuj regnanoj de la regno venis al Mitila por celebri lian reĝiĝon. Ili ornamis la urbon per parfumaj florkronoj kaj incensoj, kaj preparis molajn kusenojn por la vizitantoj. Ĉie estis fruktoj, sukeroj, trinkaĵoj kaj kuiritaj manĝaĵoj. La ministroj kaj la riĉuloj alkondukis muzikistojn kaj dancistinojn por regali la reĝon. Saĝuloj ankaŭ recitis belajn poemojn kaj sanktuloj ĉantis benojn.

La iluminiĝinta Reĝo Fruktabundulo sidis sur trono sub reĝa baldakeno blanka. Dum la granda celebrado li aspektis majesta kiel la ĉiela reĝo Sakao. Li rememoris pri sia granda peno baraktanta

en la oceano kontraŭ ĉiuj malfacilaĵoj, kiam la oceana diino ignoris lin. Nur per tiu preskaŭ senespera klopodado, li nun fariĝis tiel majesta kiel dio. Lin plenigis tiel granda ĝojo, ke li diris verse:

"Aferoj okazas neatendite, kaj preĝoj ne helpas iomete, sed nur klopodoj alportas rezultojn, kiujn nek penso nek preĝo atingas komplete."

Post la grandioza ceremonio, Reĝo Fruktabundulo regis en Mitila per perfektaj justecoj. Li estimoplene donis honoron kaj manĝaĵon al Silentaj Budhoj, kiuj luminiĝinte vivis en la periodo, kiam oni ne povis kompreni iliajn instruojn. En plena tempo Reĝino Sivali naskis filon. Ĉar la saĝuloj de la kortego vidis la

signojn de lia longa kaj honora vivo antaŭ lia naskiĝo, li estis nomita Reĝido Longa Vivo. Kiam li elkreskiĝis, la reĝo faris lin vicreganto.

### [Ĉapitro 3. Rezigni Povon]

La rakonto okazis antaŭ longa tempo, kiam oni havis pli longan vivon. Tiam iuj eĉ vivis 10,000 jarojn. Post kiam Reĝo Fruktabundulo regis 7,000 jarojn, la kortega ĝardenisto portis al li eksterordinare belajn fruktojn kaj florojn. La reĝo tiel ŝatis ilin, ke li volis pririgardi la ĝardenon. Do la ĝardenisto aranĝis kaj ornamis la ĝardenon, kaj invitis lian viziton.

La reĝo eliris rajdante sur reĝa elefanto, sekvate de ĉiuj korteganoj kaj multaj ordinaraj homoj de Mitila. Kiam li trapasis la ĝardenan pordon, li vidis du belajn mangarbojn. Unu estis plena de maturaj mangoj, dum la alia senfrukta. Li prenis unu el la fruktoj kaj ĝuis la dolĉan bongustecon. Li decidis manĝi pli multe kiam li revenis poste.

Kiam oni vidis, ke la reĝo manĝis la unuan frukton, ili sciis, ke ankaŭ ili rajtas manĝi. Dum momento ĉiuj mangoj estis formanĝitaj. Post kiam oni elmanĝis ĉiujn fruktojn, iuj eĉ rompis branĉojn kaj ŝiris foliojn por serĉi pliajn.

Kiam Reĝo Fruktabundulo revenis, li vidis, ke la arbo estis nudigita kaj preskaŭ

detruita. Dume la senfrukta arbo restis tiel bela kiel antaŭe. Ĝiaj brile verdaj folioj glimis en la sunlumo.

La reĝo demandis siajn ministrojn: "kio okazis ĉi tie?" Ili respondis: "Ĉar via Reĝa Moŝto manĝis la unuan frukton, oni libere formanĝis la restajn. Por serĉi pli multajn fruktojn ili eĉ detruis foliojn kaj branĉojn de la arbo. La senfrukta arbo restas sekura kaj bela, ĉar ĝi ne havas fruktojn."

Tio malĝojigis la reĝon. Li pensis: "La fruktoplana arbo detruigis, sed la senfrukta arbo restas bonstata. Mia regado similas al la fruktoplana arbo. Ju pli da povo kaj havaĵo mi posedas, des pli mi timas perdi ilin. Sen povo kaj havaĵo, la



sankta vivo de simpla monaĥo similas al senfrukta arbo kondukanta al sentimeco."

Do la grandulo decidis rezigni siajn riĉaĵon kaj povon, forlasi la gloron de la reĝo kaj senigi sin je la devo protekti sian pozicion. Sekve de tio, li decidis uzi sian tutan forton por pasigi la puran vivon de simpla monaĥo. Nur tiam li povis malkovri la daŭran profundan feliĉon, kiu povis disvolviĝi al aliaj.

Li revenis al la urbo. Starante ĉe la palaca pordo, li venigis la komandanton de la armeo. Li diris: "Ekde nun, neniu vidu mian vizaĝon krom la servanto, kiu portas al mi manĝaĵon kaj la alia, kiu portas al mi akvon kaj dentbroŝon. Vi kaj la ministroj regu la regionon laŭ la malnova

leĝo. Mi vivos kiel simpla monaĥo en la supra etaĝo de la palaco."

Post kiam li vivis dum mallonga tempo tiamaniere, la regnantoj ekmiris pri lia ŝanĝiĝo. Iutage amaso da homoj kolektiĝis en la palaca korto. Ili diris: "Nia reĝo ne estas tia, kia li estis antaŭe. Li volas nek rigardi dancojn, nek aŭskulti kantojn, nek rigardi bovbatalojn kaj elefantbatalojn, nek iri al sia plezura ĝardeno, nek rigardi la cignojn sur la lagoj. Kial li ne plu parolas al ni?" Ili demandis la servantojn, kiuj portas manĝaĵon kaj akvon al la reĝo, "Ĉu li diris ion al vi?"

Ili diris: "Li penas deteni sian menson de dezirataĵoj, do lia menso estas tiel paca kaj nobla kiel tiuj de siaj malnovaj amikoj,

la Silentaj Budhoj. Li klopodas disvolvi la purecon de tiuj, kiuj posedas nenion krom bona merito. Iam ni eĉ aŭdis lin diranta laŭte: "Mi pensas nur pri la Silentaj Budhoj, liberaj de ĉasado al ordinaraj plezuroj. Ilia libereco vere feliĉigas ilin. Kiu povas porti min al la loko, kie ili loĝas?"

Reĝo Fruktabundulo loĝis en la supra etaĝo de la palaco, klopodante esti simpla monaĥo dum nur kvar monatoj. Tiam li konsciis, ke estas tro multe da distraĵoj en la bela regno de Mitila. Li prenis ilin nur kiel eksteran fenomenon tentanta lin ĉesigi la serĉadon de internaj paco kaj vero. Do li decidis rezigni ĉion, fariĝi arbara monaĥo kaj loĝi en Himalaja Montaro.

Li havis flavajn robojn kaj almozbovlon donacitajn de monaĥo. Li ordonis la reĝan barbiron razi al li la harojn kaj barbon. Poste en frua mateno li ekiris malsupren laŭ la palacaj ŝtuparoj.

Samtempe Reĝino Sivali informiĝis pri lia decido. Ŝi kolektis 700 plej belajn reĝinojn de la reĝa haremo kaj gvidis ilin sur la ŝtuparon. Ili pasis preter Reĝo Fruktabundulo iranta malsuperen, sed ne rekonis lin vestitan kiel monaĥon. Kiam ili atingis la supran etaĝon, Reĝino Sivali trovis, ke ĝi estas malplena, kaj en ĝi restis nur la razitaj haroj kaj barbo de la reĝo. Ŝi tuj konsciis, ke la nekonata monaĥo estas ŝia edzo.

Ĉiuj 701 reĝinoj kuris malsupren laŭ

la ŝtuparoj al la palaca korto. Tie ili sekvis la reĝodevenan monaĥon. Laŭ instruo de Reĝino Sivali, ili delasis siajn harojn kaj provis tenti la reĝon por restigi lin. Ili ploris kaj ploregis, petante: "Kial vi faras tion?" Tiam ĉiuj homoj en la urbo maltrankviliĝis kaj eksekvis lin. Ili kriis plorante: "Ni jam aŭdis, ke nia reĝo fariĝis simpla monaĥo. Kiel ni povos denove trovi reganton tiel bonan kaj justan?"

Ĉiuj haremaj reĝinoj en belaj vualoj kaj riĉaj juveloj kriis kaj petis, sed tio ne ŝanĝis la menson de la iluminiĝinto, ĉar li jam faris sian decidon kaj persistis en la klopodo. Li jam rezignis la sanktan aspergan orbovlon de la ŝtato, kiu transdonis la potencon de la reĝa familio

al li. Anstataŭe li tenis la simplan argilan almozbovlon de modesta monaĥo, serĉanto de Vero.

Fine Reĝino Sivali ĉesigis ploradon. Ŝi vidis, ke la belaj reĝinoj de la haremo ne povis haltigi sian edzon. Do ŝi iris al la komandanto de la armeo. Ŝi ordonis al li estigi fajron inter la domaĉoj kaj dezertaj konstruaĵoj sur la vojo de la reĝo, kaj ankaŭ fajrigi arbetojn kaj malsekajn foliojn en malsamaj regionoj de la urbo por estigi abunde da fumo.

Kiam ĉio estis farita, ŝi falis sur la teron ĉe la piedoj de la reĝo kaj ploregis: "La tuta Mitila estas brulanta, Via Reĝa Moŝto! La belaj konstruaĵoj kun valoraj artaĵoj, valoraj metaloj, juveloj kaj

trezoroj estas detruataj. Revenu, Via Reĝa Moŝto, por savi vian riĉaĵon antaŭ ol tro malfruas!"

Sed la Iluminiĝinto respondis: "Ĉio ĉi apartenas al la aliaj, kaj mi havas neniom. Nun nenion mi timas perdi. La perdaĵoj ne povas malĝojigi min. Mia menso restas en paco."

Poste li forlasis la urbon tra la norda pordo, ankoraŭ sekvate de ĉiuj 701 reĝinoj. Laŭ la instruo de Reĝino Sivali, ili montris al li la vilaĝojn prirabitajn kaj detruitajn. Tie armitaj viroj atakis, dum aliaj ŝajnigis sin vunditaj aŭ mortigitaj. Sed la ŝajna sango estis farita el ruĝa tinkturo kaj la mortintoj estis afektaj. La reĝo sciis bone, ke tio estas trompo, ĉar ne estis veraj

rabistoj kaj murdantoj en la regno de Mitila.

Piedirinte ankoraŭ pli malproksimen, la reĝo haltis kaj demandis siajn ministrojn: "Kies regno ĝi estas?" "Via, Via Reĝa Moŝto," ili respondis. "Do punu iun ajn, kiu trapasos la linion," li ordonis, kiam li faris linion trans la vojo. Neniu inkuzive de Reĝino Sivali kuraĝis trapasi la linion. Sed kiam ŝi vidis, ke la reĝo daŭre iras laŭ la vojo kun sia dorso al ŝi, ŝin trafis neeltenebla dolorego. Batante sian bruston, ŝi falis trans la linion. Tuj kiam la linio estis transigita, ĉiuj homoj perdis sian timon kaj sekvis ŝin.

Reĝino Sivali restigis la armeon ĉe si dum la tuta homamaso sekvis Reĝon



Fruktabundulo. Li senĉese iris multajn mejlojn direkte al la Himalajo en la nordo.

Samtempe estis sankta monaĥo nomata Naradao, kiu vivis en ora kaverno de Himalajo. Li estis tre saĝa. Per granda mensa klopodo li gajnis supernaturan povon, kiun laŭdire posedis nur la plej superaj sankuloj. Meditante en la eksterordinara mensstato dum tuta semajno, li subite kriis: "Kia feliĉo! Ho, kia feliĉo!"

Poste, uzante sian specialan povon, li superrigardis tutan Hindion por vidi, ĉu iu ajn sincere serĉas la saman feliĉon, spite ĉiujn logaĵojn en la mondo. Li vidis nur Reĝon Fruktabundulo, la Bodisatvon, kiu iutage fariĝos Budho. Li vidis, ke li jam

rezignis ĉiujn siajn mondajn povojn, sed ankoraŭ estas malhelpata de la sekvanta homamaso ekde sia antaŭa sekulara vivo. Por helpi kaj kuraĝigi lin, li magie flugis tra la aero kaj flosis antaŭ la reĝo.

Li demandis Reĝon Fruktabundulo: "Ho, monaĥo, kial la homamaso brue sekvas vin?" La reĝo diris: "Mi jam forrezignis la povon de regado kaj forlasis la sekularan vivon por bono. Jen la kaŭzo, kial miaj antaŭaj subuloj sekvas min, kvankam mi forlasas ilin feliĉe."

La sankta monaĥo diris: "Ne tro memfidu, monaĥo. Vi ankoraŭ ne sukcesis forlasi la sekularan mondon, ĉar ankaŭ restas obstakloj en vi. Tiuj estas "kvin obstakloj", kiuj estas la avido je ordinaraj

plezuroj vida, aŭda kaj aliaj; la avido damaĝi aliajn; maldiligenteco; mensaj maltrankviliĝoj; kaj neraciaj duboj. Praktiku la perfektojn, estu pacienca kaj pensu nek tro multe nek tro malmulte pri vi."

Li finis: "Mi benos, ke vin protektu bono, scio kaj saĝo sur via vojo." Poste li malaperis kaj revenis en sian oran kavernon.

Pro la saĝa admono, Reĝo Fruktabundulo malpli zorgis pri la ekstera homamaso, konsciante, ke la plej grandaj malhelpoj aŭ obstakloj estas en lia interna menso.

Samtempe Reĝino Sivali alifoje falis ĉe liajn piedojn. Ŝi petegis: "Ho, Reĝo,

aŭskultu la vekriojn de viaj regatoj. Antaŭ ol forlasi ilin por via bono, konsolu ilin per kronado al via filo por regi anstataŭ vi."

Li respondis: "Mi jam forlasis miajn subulojn, amikojn, parencojn kaj landon. Ne maltrankviliĝu pri tio. La nobeloj de Mitila jam bone trejnis la reĝidon Longa Vivo kaj ili protektos kaj subtenos vin ambaŭ."

Ŝi daŭrigis: "Ho, reĝo, estante monaĥo, vi lasos min senedza. Kia honto! Kion mi faru?"

Li diris: "Nur zorgeme instruu al la reĝido eviti ĉiajn malbonajn ideojn, vortojn kaj kondutojn. Alie vi kaŭzos dolorigajn rezultojn al vi mem."

Ĉe sunsubiro, la reĝino starigis

tendon, dum la reĝo iris en la arbaron por dormi sub arbo. La sekvan tagon ŝi daŭre sekvis lin, kondukante la armeon kun si. Ili proksimiĝis al malgranda urbo.

Estis hazardo, ke viro en la urbo aĉetis pecon da freŝa viando de buĉisto. Apenaŭ li kuiris kaj metis ĝin sur tablon por malvarmigi, kiam vaganta hundo kaptis ĝin kaj forkuris. La viro postkuris la hundon ĝis la suda pordo de la urbo. Tie li ĉesis, ĉar li estis tro laca por daŭrigi.

La fuĝanta hundo trapasis la vojjon de Reĝo Fruktabundulo kaj Reĝino Sivali. Timigite de ili, ĝi perdis la viandon sur la teron. La reĝo vidis, ke ĝi estas peco da bona viando kaj oni ne scias, kiu estas ĝia posedanto. Do li purigis la viandon, metis

ĝin en sian bovlon kaj ekmanĝis.

Reĝino Sivali, kiu kutime manĝis bongustaĵojn en la palaco, abomenis tion. Ŝi diris: "Eĉ ĉe la rando de morto altklasa sinjoro ne manĝus postlasitaĵon de hundo! Manĝi tiel naŭzan manĝaĵon montras, ke vi estas tute sentaŭga!" Sed li respondis: "Estas via propra vanteco, kiu detenas vin vidi la valoron de tiu ĉi viando. Akirite juste, ĉiuj manĝaĵoj estas puraj kaj bonaj!"

Dum ili daŭre proksimiĝis al la urbo, Reĝo Fruktabundulo pensis: "Reĝino Sivali daŭre sekvas min. Tio estas malbona por monaĥo. Oni dirus, 'Li forrezignis sian regnon, sed ne povas liberiĝi de sia edzino!' Mi devas trovi metodon por instrui ŝin, ke ŝi foriru."

Ĝuste tiam ili renkontis kelkajn infanojn ludantajn. Inter ili estis knabino kun unu braceleto ĉirkaŭ brako kaj du ĉirkaŭ la alia. Opiniante, ke ŝi estas saĝa knabino, la reĝo demandis ŝin: "Mia infano, kial unu el viaj brakoj bruas, dum la alia ne?"

La malgranda knabino respondis: "Ho, monaĥo, ĉar ĉirkaŭ unu brako estas du braceletoj, dum ĉirkaŭ la alia nur unu. Kie estas du, unu certe frapas la alian kaj eligas bruon. La brako kun nur unu restas silenta. Do se vi deziras feliĉon, vi devas lerni kontentecon de via soleco."

La Bodisatvo diris al la reĝino: "Ĉu vi aŭdis la saĝajn vortojn de tiu ĉi infano? Kiel monaĥo mi hontas lasi vin resti ĉe mi

antaŭ ŝi. Do iru vian vojon kaj mi iros la mian. Ni ne plu estas geedzoj. Adiaŭ!"

La reĝino konsentis kaj ili prenis apartajn vojojn. Sed ŝi denove estis trafita de kordoloro kaj revenis por daŭrigi la sekvadon. Ili kune iris en la urbon, do li povis kolekti almozan manĝaĵon.

Ili iris al la domo de sagofaranto. Ili vidis, ke li malsekigis la ruĝe ardan sagon kaj rektigis ĝin okulmezurante la sagotigon nur per unu okulo malfermita. La reĝo demandis lin: "Amiko, por fari la sagon perfekte rekta, kial vi rigardas ĝin kun okulo malfermita dum la alia fermita?"

La faranto de sagoj respondis: "Per du malfermitaj okuloj, la vido de la dua okulo



ĝenas tiun de la unua. Nur koncentrate mian vidon per unu okulo mi povas vere vidi la rektecon de la sago. Do se vi volas esti feliĉa, vi devas lerni kontentecon pri soleco."

La reĝo kolektis almozan manĝaĵon kiam ili forlasis la urbon. Li diris al la reĝino: "Ĉu vi denove aŭdis la same saĝajn vortojn de la metiisto? Kiel monaĥo mi hontas lasi vin resti kun mi antaŭ li. Do iru vian vojon kaj mi iros la mian. Ni ne plu estas geedzoj nun. Adiaŭ!" Sed ŝi daŭre sekvis lin.

La grandulo detranĉis tigon de alta herbo. Li diris al Reĝino Sivali: "Nur kiel du pecoj de la herba tigo ne povas unuiĝi denove, mi ne kuniĝos kun vi

en la geedziĝa lito. Ni neniam kuniĝos denove. Vivu sola kiel la perfekta tigo de netranĉita herbo, mia eksedzino Sivali."

Aŭdinte tion, la reĝino preskaŭ freneziĝis de la kordoloro kaj malĝojo. Ŝi sin bategis per ambaŭ manoj ĝis ŝi falis sur la teron, tute perdinte sian konscion. Vidinte tion, la Bodisatvo rapide forlasis la vojon. Li forviŝis siajn piedsignojn kaj malaperis en ĝangalo.

Unue li rezignis la potencon kaj riĉaĵon de reĝo. Nun li rezignis la potencon kaj deziron de edzo. Fine li akiris liberecon por sekvi la vojon de vaganta monaĥo serĉanta veron. Li iris al Himalajo kaj en nur unu semajno li sukcesis disvolvi specialan mensan povon. Li neniam

revenis al la sekulara mondo.

Dume la reĝaj ministroj, kiuj sekvis longan distancon, atingis la svenintan reĝinon. Ili ŝprucis akvon sur ŝin kaj revivigis ŝin. Ŝi demandis: "Kie estas mia edzo, la reĝo?" Ili respondis: "Ni ne scias. Ĉu vi ne scias?" En timo ŝi ordonis: "Serĉu lin!" Ili serĉis kaj serĉadis, sed kompreneble, li forfuĝis sukcese.

Post kiam Reĝino Sivali sobriĝis el siaj timo kaj malĝojo, ŝi ekkonsciis, ke ŝi ne plu sentas koleron, ĵaluzon kaj venĝemon kontraŭ monaĥo Fruktabundulo. Anstataŭe, ŝi admiris lin pli ol iam ajn ekde ilia renkontiĝo, kiam ŝi donis sian manon al li kaj gvidis lin al la trono.

Laŭ ŝia ordono oni starigis

monumentojn por honori la kuraĝan Reĝon Fruktabundulo en kvar lokoj, kie li parolis kun la flosanta sanktulo Naradao, kie li manĝis la viandon perditan de hundo, kie li demandis la knabinton kaj ankaŭ kie li demandis la sagofaranton.

Ĉe la du mangarboj en la reĝa ĝardeno la reĝino kronis la reĝidon Longa Vivo kiel novan reĝon. Kune kun armeoj kaj sekvantaj homoj ili revenis al la urbo de Mitila.

Kvankam per si mem, Reĝino Sivali jam lernis ion sekvinte kaj perdinte sian edzon Fruktabundulo. Ankaŭ ŝi gustumis liberecon!

La saĝa reĝino rezignis la kortegan devon. Ŝi retiriĝis por mediti en la ĝardeno

ĉe la mangarboj. Kun granda strebo ŝi gajnis altan mensstaton por renaskiĝi en ĉiela mondo.

La moralinstruo estas: Estas pli facile gajni potencon ol rezigni ĝin.

## 51. BANDO DE DRINKEMULOJ



[Sobreco]

Iam kiam Brahmadata estis reĝo, la Iluminiĝinto renaskiĝis en riĉa familio. Li fariĝis la plej riĉa homo en Benareso.

Harzarde estis bando da drinkemuloj vagantaj sur stratoj. Ĉio, kion ili ĉiam pripensis, estis trovi metodon por akiri alkoholaĵon kaj drogon, sen kiuj ili ne povis vivi laŭ sia opinio.

Iutage, kiam ili elspezis ĉiujn monerojn kiel kutime, ili elkovis planon por prirabi la plej grandan riĉulon en Benareso. Sed ili ne sciis, ke li estas renaskiĝinta Bodisatvo,

kaj li ne estis tiel facile trompebla.

Ili decidis fari "dormigan alkoholaĵon", en kiu estis sekrete miksitaj dormiga medikamento. Ilia plano estis inviti la riĉulon trinki la alkoholaĵon. Kiam li endormiĝos profunde, ili forŝtelos ĉiujn liajn monon, juvelojn kaj eĉ la valorajn vestaĵojn surportatajn de li. Do ili starigis portempan drinkejon apud la vojo. Ili metis sian laste restantan alkoholaĵon en botelon, kaj miksis en ĝin kelkajn fortajn dormig-pilolojn.

Poste, la riĉulo iris sur la vojo al la palaco. Unu el la drinkemuloj vokis lin: "Honora sinjoro, kial vi ne ekĝuu vian tagan rajton kaj iom drinku kun ni? La unua kliento drinkas senpage!" Dirinte, li

elverŝis la falsan likvoron.

La Iluminiĝinto neniam prenis alkoholaĵon, sed li estis scivola, kial tiuj drinkemuloj tiel malavaras je sia favorata alkoholaĵo. Tio tute ne similas al ilia kutima konduto.

Li ekkonsciis, ke tio eble estas ia trompo. Do li decidis doni al ili lecionon. Li diris: "Estas kulpo aperi antaŭ la reĝo ebrie, kaj eĉ kun iomete da fiodoro en mia spiro. Bonvolu afable atendi min ĉi tie. Mi venos al vi kiam mi revenos el la palaco."

La drinkemuloj senesperigis. Ili ne povis drinki tiel frue kiel ili deziris. Sed ili decidis atendi pacience.

Malfrue en tiu tago la riĉulo revenis al la ĉevoja drinkejo. La drinkemuloj jam



deziregis ekdrinki. Ili tuj alvokis lin kaj diris:

"Honora sinjoro, kial vi ne celebru vian viziton al la reĝo? Ĝuu la bonan likvoron. La unua venanto drinkos senpage, sciu!"

Sed la riĉulo daŭre rigardis la vinajn botelon kaj glason. Li diris: "Mi ne fidus vin. La botelo kaj glaso de la vino estas precize samaj kiel matene. Se ĝi estus tiel bona kiel vi diris, vi jam almenaŭ gustumus iom. Fakte vi ne povus deteni vin de eldrinko. Mi ne estas malsaĝulo. Vi certe aldonis ion dubindan en la alkoholaĵon."

La riĉulo eliris, kaj la drinkemuloj povis fari nenion alian ol ellabori novan komploton.

La moralinstruo estas: Tenu vin sobra  
kaj gardu vian klaran konon.

## 52. LA SENNOMA ARBO



[Prudento]

Iam estis estro de karavano. Li vojaĝis de unu lando al alia vendante diversajn varojn. Lia karavano kutime havis almenaŭ 500 bovĉarojn.

Dum unu el la vojaĝoj li devis trapasi densan arbaron. Antaŭ ol iri en la arbaron, li alvenigis ĉiujn membrojn de la karavano kaj avertis: "Miaj amikoj, kiam vi iros tra la arbaro, vin gardu kontraŭ venenaj arboj, fruktoj, folioj, floroj kaj eĉ mielĉelaroj.

"Do sen konsulti min unue, ne manĝu ion ajn, kion vi ne manĝis antaŭe, ĉu

fruktojn, foliojn, florojn aŭ ion alian." Ili ĉiuj respondis respektplene: "Jes, sinjoro."

Estis vilaĝo en la arbaro. Ĝuste ekster la vilaĝo staris arbo nomata "Sennoma Arbo". Ĝiaj trunko, branĉoj, folioj, floroj kaj fruktoj tre similis al tiuj de ordinara mangoarbo. Eĉ la koloro, formo,odoro kaj gusto ankaŭ tre similis al tiuj de mangoarbo. Sed malsame de mangoj, la sennomaj fruktoj estis mortige venenaj.

Kelkaj homoj irantaj antaŭe atingis la sennoman arbon. Ili ĉiuj suferis de malsato, dum la sennomaj fruktoj vidiĝis kiel bongustaj maturaj mangoj. Iuj el ili tuj ekmanĝis la fruktojn senpripense. Ili manĝegis antaŭ ol oni ekavertis ilin.

Aliaj rememoris la averton de la

estro, sed ili opiniis, ke tiu eble estas mangoarbo alispeca. Ili opiniis, ke ili estas fortunaj trovi maturajn mangojn ĝuste en la proksimo de la vilaĝo. Do ili decidis manĝi iom da fruktoj antaŭ ol la fruktoj elĉerpiĝis.

Estis ankaŭ kelkaj homoj pli saĝaj ol aliaj. Ili opiniis, ke estas pli sekure sekvi la averton de la estro kvankam ili ne sciis, ke hazarde li estas Iluminiĝinto.

Post kiam la estro atingis la arbon, homoj singardemaj kaj ne tuŝintaj la fruktojn demandis: "Sinjoro, kio estas tiu ĉi arbo? Ĉu la fruktoj estas manĝeblaj?"

Post la zorgema pririgardo li respondis: "Ne, tute ne. Ĝi aspektas kiel mangoarbo, sed fakte tio ne estas vera. Ĝi estas venena

sennoma arbo. Eĉ ne tuŝu ĝin!"

Ektimis tiuj, kiuj jam manĝis la sennomajn fruktojn. La estro ordonis al ili sin vomigi laŭeble plej rapide. Ili tion faris kaj oni manĝigis al ili kvar dolĉajn manĝaĵojn, kiuj estis sekaj vinberoj, kansukera pasto, dolĉaj jogurtoj kaj abela mielo. Tiamaniere iliaj gustorganoj refreŝiĝis post la elvomado.

Malfeliĉe, la plej avidaj kaj stultaj homoj ne sukcesis saviĝi el la morto. Ili estis tiuj, kiuj tuj ekmanĝis la venenajn fruktojn senpripense. Estis jam malfrue por savi ilin. La veneno jam efikis kaj mortigis ilin.

Antaŭe, kiam karavanoj venis al sennoma arbo, oni manĝis la venenajn

fruktojn kaj mortis en sia dormo dumnokte. En la sekva mateno la vilaĝanoj kutime venis al la kampadejo. Ili kaptis la mortintojn je la kruroj, tiris ilin al sekreta loko kaj enterigis ilin. Poste ili forprenis por si ĉiujn varojn kaj bovĉarojn de la karavanoj.

Ili atendis la saman okazaĵon ĉifoje. Je tagiĝo de la sekva mateno la vilaĝanoj kuris al la sennoma arbo. Ili diris inter si mem: "La bovoj apartenos al mi!" "Mi volas la ĉarumojn kaj ĉarojn!" "Mi forprenos la varojn!"

Sed kiam ili atingis la sennoman arbon, ili vidis, ke plej multe da vojaĝantoj de la karavano vivis bonfarte. Surprizite, ili demandis: "Kiel vi scias, ke tio ne estas

mangoarbo?" La vojaĝantoj respondis: "Ni ne sciis, sed nia estro avertis nin anticipe. Li eksciis kia arbo ĝi estas, tuj kiam li vidis ĝin."

La vilaĝanoj demandis la estron de la karavano: "Ho, saĝulo, kiel vi scias, ke tio ne estas mangoarbo?"

Li respondis: "Mi eksciis tion pro du kaŭzoj. Unue, la arbo estas facile grimpebla por homoj, kaj due, ĝi staras ĝuste ĉe la vilaĝo. Se la fruktojn sur tiu arbo oni ne manĝis, certe estas danĝere manĝi ilin!"

Ĉiuj miris, ke tiu vivsava saĝo baziĝas sur tiel simpla ĉiutaga scio. La karavano daŭrigis sian vojaĝon sekure.

La moralinstruo estas: La saĝuloj



estas kondukitaj de ĉiutaga saĝo, dum la  
malsaĝaj sekvas nur malsaton.

## 53. REĜIDO KVINARMILO KAJ MONSTRO GLUHARO



### [La diamanta Armilo]

Iam la Iluminiĝinto naskiĝis kiel filo de la Reĝo kaj Reĝino en Benareso. En la tago de lia nomiĝo, la reĝo invitis 800 aŭguristojn en la palacon, kaj por plezurigi ilin donacis al ili ĉion, kion ili deziris. Poste, la reĝo petis al ili aŭguri la sorton de la novnaskita reĝido. Tiel ili povis trovi bonan nomon por li.

Unu el la aŭguristoj estis spertulo pri legado de makuloj sur la korpo. Li diris: "Via Reĝa Moŝto, tiu ĉi estas homo kun

granda merito. Li estos la reĝo post vi."

La aŭguristoj estis tre saĝaj. Ili informis al la reĝo kaj reĝino tion, kion tiuj deziris aŭskulti. Ili diris: "Via filo lertos en uzado de kvin armiloj. Li fariĝos fama kaj granda majstro de ĉiuj kvin armiloj en la tuta Hindio." Pro tio, la reĝo kaj reĝino nomis la filon "Reĝido Kvinarmilo"

Kiam la reĝido estis 16-jara, la reĝo decidis sendi lin al altlernejo. Li diris: "Iru, mia filo, al la urbo de Takasila. Tie vi trovos mondfaman instruiston. Lernu de li ĉion, kion vi povas. Donu la monon al li kiel pagon." Li donis mil ormonerojn al la reĝido kaj sendis lin sur la vojon.

La reĝido iris al la mondfama

instruisto de Takasila. Li lernis tre diligente kaj fariĝis la plej bona lernanto. Post kiam la instruisto instruis al la reĝido ĉion, kion li sciis, li donacis al li kvin armilojn kiel specialan diplomiĝan premion. Poste li resendis lin al Benareso.

Sur la vojo hejmen Reĝido Kvinarmilo atingis arbaron hantatan de monstro. La lokanoj avertis lin: "Junulo, ne iru tra la arbaro. Tie vivas giganta monstro nomata Gluharo. Li mortigos ĉiujn, kiujn li vidas."

Sed la reĝido estis memfida kaj sentima kiel juna leono. Do li iris en la arbaron ĝis li renkontis la teruran monstron. La monstro estis tiel alta kiel arbo, kun la kapo tiel granda kiel tegmento kaj okuloj tiel grandaj kiel pladoj. La du

flavaj longaj dentoj etendiĝis el lia blanka fenda buŝo kun malbele brunaj dentoj. Li havis malbelan ventron kovritan per blankaj punktoj, kaj liaj manoj kaj piedoj estis bluaj.

La monstro blekis kaj hurlis al la reĝido: "Kien vi iras en mia arbaro, etulo? Vi servas nur kiel buŝpleno da manĝaĵo. Mi englutos vin!"

La reĝido ĵus diplomiĝinta de altlernejo jam gajnis la plej altan premion de sia instruisto. Do li opiniis, ke li ĉion scias, kaj kapablas ĉion fari. Li respondis: "Ho, feroĉa demono, mi estas Reĝido Kvinarmilo. Mi venis por serĉi vin. Mi kontraŭbatalos vian atakon! Mi mortigos vin facile per miaj unuaj du armiloj,

pafarko kaj venenaj sagoj."

Do li metis venenan sagon sur la pafarkon kaj pafis ĝin rekte al la monstro. Sed la sago tuj kroĉiĝis preme al lia hararo kiel gluita kaj tute ne vundis lin. La reĝido pafis ĉiujn restajn el la 50 venenaj sagoj unu post alia, sed ili ĉiuj gluiĝis al la hararo de la monstro nomata Gluharo.

La besto skuis sian korpon de la malbela tegmenteca kapo ĝis la bluaj piedoj, kaj ĉiuj sagoj falis sur la teron senefike.

Reĝido Kvinarmilo eltiris sian trian armilon, spadon longan je 33 coloj. Li pikis sian malamikon per ĝi. Sed ĝi firme gluiĝis en la dika tavolo de la glueca hararo. Li ĵetis al la monstro lancon, sian

kvaran armilon, sed ankaŭ ĝi sin kroĉis al lia hararo.

La reĝido atakis lin per bastono, sia lasta armilo. Tiu ankaŭ gluiĝis firme sur la glueca hararo.

Poste la reĝido kriis: "Ho, monstro, ĉu vi ne aŭdis pri mi, Reĝido Kvinarmilo? Mi havas pli ol miaj kvin armiloj. Mi havas la forton de mia juna korpo. Mi rompos vin en pecetojn!"

Li trafis Gluharon per sia dekstra pugno kiel boksisto. Sed ĝi ankaŭ gluiĝis al la hirta hararo kaj li ne plu kapablis movi ĝin. Li batis lin per sia maldekstra pugno, sed ĝi same gluiĝis firme. Li piedbatis lin per sia dekstra piedo, kaj poste la maldekstra, kiel mastro de

luktarto. Sed ili ambaŭ same algluiĝis kiel liaj pugnoj. Fine li frapis lin laŭeble plej forte per sia kapo kiel luktisto. Sed, ankaŭ lia kapo algluiĝis.

Eĉ gluite al la monstro je kvin partoj kaj pendante de sia vestaĵo, la reĝido neniom timis.

Gluharo pensis: "Vere strange. Li pli ŝajnas leono ol homo. Eĉ kaptite de feroca monstro kia mi, li ankoraŭ ne tremas de timo. Mi ĉiam mortigas homojn en tiu ĉi arbaro, sed neniam renkontis tiel bravan kiel tiun ĉi reĝidon. Kial li ne timas min?"

Ĉar Reĝido Kvinarmilo ne similis al ordinarulo, Gluharo ne volis rekte manĝi lin. Anstataŭe li demandis: "Kial vi ne timas morton, junulo?"



La reĝido respondis: "Kial mi devas timi morton? Sendube ĉiu, kiu naskiĝis, estas destinita al morto!"

Tiam la Iluminiĝinto pensis: "La kvin armiloj donitaj de la mondfama instruisto estas senutilaj, kaj eĉ la leoneca forto de mia juna korpo estas senutila. Mi devas uzi mian mensan armilon, la nuran armilon bezonatan por mi super mia instruisto kaj mia korpo."

La reĝido daŭrigis: "Estas malgranda sekreto, kiun mi ankoraŭ ne diris al vi, monstro. En mia ventro estas sekreta armilo. Ĝi estas diamanta armilo, kiun vi ne povas digesti. Ĝi tranĉus vian internaĵon en pecetojn se vi sufiĉe malsaĝe englutus min. Do se mi mortus, ankaŭ vi

ne povus vivi plue. Jen kial mi ne timas vin."

La reĝido tiel uzis sian grandan internan forton en la maniero facile komprenebla al Gluharo. Li sciis bone, ke tiu ĉi plej granda el ĉiuj armiloj en sia menso estas ĝuste lia propra diamanta inteligenteco.

Gluharo pensis: "Sendube tiu ĉi sentimulo diris la veron. Eĉ se mi manĝos tiun heroon tiel malgrandan kiel sojfabon, mi ne povos digesti lin. Do mi devas lasi lin foriri." Timante sian eventualan morton, li liberigis Reĝidon Kvinarmilo.

Li diris: "Vi estas grandulo. Mi liberigos vin anstataŭ manĝi vin. Kiel la luno reaperas post la eklipso, vi brilos

plezure inter ĉiuj viaj amikoj kaj parencoj."

La Iluminiĝinto lernis lecionon de la batalo kontraŭ Gluharo. Li trovis, ke la nura taŭga armilo estas neniu el materialaj armiloj krom la interna inteligenteco. Per la diamanta armilo li ankaŭ eksciis, ke mortigi vivon kondukos nur suferon al la mortiginto.

Kun dankemo, li instruis la malfeliĉan monstron: "Gluharo, vi naskiĝis kiel monstro murdema, sangsuĉa kaj karnovora nur pro viaj malbonaj kondutoj en la antaŭaj vivoj. Se vi ne ĉesigos mortigon, via fiago kondukos vin nur al suferado en tiu ĉi vivo kaj en la postaj. Vi iros nur de mallumo al mallumo.

"Nun vi jam lasis min libera, do ne

plu mortigu aliajn tiel libere. Aŭskultu min. Mortigi vivon kondukas vin al sufero en tiu ĉi mondo, kaj poste vi renaskiĝos en la infera mondo, kiel besto aŭ malsata spirito. Eĉ se vi hazarde renaskiĝos kiel homo, vi suferos de mallonga vivo!"

Reĝido Kvinarmilo daŭre instruis Gluharon. Finfine, la monstro konsentis sekvi la kvin trejnajn ŝtupojn. En sia maniero li konvertiĝis de monstro en amikan arbaran feon. Kiam la reĝido forlasis la arbaron, li raportis al la lokanoj pri la ŝanĝiĝo de la monstro. Ekde tiam oni donis al Gluharo manĝaĵon kaj ili vivis en paco.

Reĝido Kvinarmilo revenis al Benareso. Poste li fariĝis reĝo. Fine li

forpasis kaj renaskiĝis laŭ sia merito.

La moralinstruo estas: La nura armilo  
bezonata de vi estas kaŝita en vi mem.

## 54. GIGANTA ORPECEGO



[Modereco]

Iam estis riĉa vilaĝo. La plej riĉa homo en la vilaĝo decidis kaŝi grandan orpecegon por protekti ĝin kontraŭ banditoj kaj rabistoj. Do li enterigis ĝin en proksima rizkampo.

Multajn jarojn poste, la vilaĝo ne plu estis riĉa kaj la rizkampo dezertiĝis kaj ne plu estis utila. Malriĉa farmulo decidis plugi la kampon. Post iom da plugado la plugilo hazarde trafis la delonge forgesitan kaŝitan trezoron.

Unue li opiniis, ke ĝi eble estas

tre malmola arboradiko. Sed kiam li malkovris ĝin, li vidis eksteratende, ke ĝi estas bela brila oro. Li ne kuraĝis porti ĝin kun si en la tago, do li kovris ĝin denove kaj atendis ĝis la noktiĝo.

La malriĉa farmulo revenis al la kampo je la noktomezo. Li denove malkovris la oran trezoron. Li provis levi ĝin, sed ĝi estis tro peza por movi. Li ligis ĝin per ŝnuro kaj provis treni ĝin. Sed ĝi estis tiel granda, ke li neniel povis movi ĝin iomete. Li tristiĝis, pensante, ke li estas bonsorta trovi la trezoron, sed tro malbonsorta por preni ĝin kun si. Li eĉ provis piede puŝi la gigantan orpecegon, sed ĝi neniom movetiĝis.

Do li sidiĝis kaj komencis pripensi la

situacion. Li opiniis, ke la nura rimedo estas dividi ĝin en kvar malpli grandajn partojn kaj tiel li povos porti pecon da oro al hejmo ĉiufoje.

Li kalkulis: "La unuan parton mi uzos por ordinara ĉiutaga vivo. Alian mi konservos por eventualaj bezonoj. La trian mi investos en miaj kampaj aferoj. Kaj mi gajnos meriton per la kvara, almozdona al malriĉuloj kaj bezonantoj, kaj ankaŭ por aliaj bonfaraj kondutoj."

Kun kvietaj pensoj li sukcesis dividi la gigantan orpecon en kvar malpli grandajn pecojn, kaj facile portis ilin hejmen kvarfoje.

Poste li vivis feliĉe.

La moralinstruo estas: "Ne mordu tion,



kio estas pli granda ol vi povas maĉi."

## 55. SINJOROJ SIMIO KAJ KROKODILO



### [Bonaj Kondutoj]

Iam antaŭe sinjoro Simio vivis sola ĉe riverbordo. Li estis forta kaj plej granda saltisto.

En la mezo de la rivero estis bela insulo kovrita de arboj de mangoj, ananasoj kaj aliaj fruktoj. Estis hazarde, ke roko elŝoviĝis el la akvo inter la bordo kaj insulo. Kvankam ŝajne neeble, sinjoro Simio kutime saltis de la riverbordo al la roko, kaj de la roko al la insulo. Li manĝis fruktojn sur la insulo tuttage kaj revenis

hejmen per la sama vojo vespere.

Paro da geedzoj el alta klaso vivis en la rivero. Ili estis gesinjoroj Krokodilo. Ili atendis la naskiĝon de sia unua bebo. La graveda sinjorino Krokodilo de tempo al tempo deziris manĝi ion raran, do ŝi faradis ne ordinarajn postulojn al sia fidela edzo.

Kiel aliaj bestoj, sinjorino Krokodilo miris, kiel sinjoro Simio saltadis de la bordo al la insulo kaj inverse. Iutage venis al ŝi subita deziro manĝi la koron de sinjoro Simio. Por plezurigi ŝin, sinjoro Krokodilo promesis, ke li tuj akiros la koron de sinjoro Simio por vespermanĝo.

Sinjoro Krokodilo iris kaj kuŝis sur la roko inter la riverbordo kaj insulo. Li

atendis sinjoron Simion reveni vespere por kapti lin.

Kiel kutime sinjoro Simio pasigis tutan tagon sur la insulo. Kiam estis tempo por reveni al sia hejmo sur la bordo, li rimarkis, ke la roko evidente kreskiĝis. Ĝi estis pli alta ol antaŭe laŭ lia memoro. Li pririgardis kaj trovis, ke la rivera nivelo estas sama kiel matene. Sed la roko sendube plialtiĝis. Li tuj suspektis, ke ruza sinjoro Krokodilo volas trompi lin.

Por certiĝi pri tio, li kriis al la direkto de la roko. "Hoj, sinjoro Roko. Kiel vi fartas?" Li kriis trifoje. Poste li kriis: "Vi kutime respondis kiam mi parolis al vi. Sed hodiaŭ vi diris nenion. Kio okazis al vi, sinjoro Roko?"

Sinjoro Krokodilo pensis: "Sendube en aliaj tagoj tiu ĉi roko kutime parolis kun la simio. Mi ne povas atendi ĝis ekparolos la muta roko! Mi devas paroli kiel la roko por trompi lin." Do li kriis: "Mi fartas bone, sinjoro Simio. Kion vi volas?"

Sinjoro Simio demandis: "Kiu vi estas?"

La krokodilo respondis pretervole: "Mi estas sinjoro Krokodilo."

"Kial vi kuŝas tie?" demandis la simio.

Sinjoro Krokodilo respondis: "Mi atendas por preni vian koron. Vi ne povos forfuĝi de mi, sinjoro Simio."

La saĝa simio pensis: "Aha! li diris la veron. Ne troviĝas alia vojo por atingi la riverbordon. Do mi devas trompi lin."

Li do kriis: "Sinjoro Krokodilo, mia amiko. Verŝajne vi jam kaptos min. Do mi povos fari nenion ol doni mian koron al vi. Malfermegu vian faŭkon kaj kaptu ĝin tuj kiam mi preterpasos."

Sinjoro Krokodilo tiel malfermegis sian faŭkon, ke liaj okuloj fermiĝis. Vidinte tion, sinjoro Simio tuj sin ĵetis sur la ver-ton de sinjoro Krokodilo kaj de tie saltis al la riverbordo.

Kiam sinjoro Krokodilo konsciis, ke li estas venkita, li admiris la sukceson de sinjoro Simio. Kiel bona sportisto en la konkurso, li laŭdis la venkinton. Li diris: "Sinjoro Simio, mia intenco kontraŭ vi estis malbona. Mi volis mortigi vin kaj

preni vian koron nur por plezurigi mian edzinon dum vi nur deziris vin protekti sen damaĝi aliajn. Mi gratulas vin pro via sukceso!"

Sinjoro Krokodilo revenis al la sinjorino. Komence ŝi senesperigis, sed post kiam naskiĝis la malgranda bebo, ili portempe forgesis sian konflikton.

La moralinstruo estas: Bona venkito estas vera sinjoro.

## 56. SIMIA REĜIDO



[Singardemo]

Iam antaŭe vivis kruela Simia Reĝo en Himalajo. Ĉiuj simioj en lia regno estis liaj edzinoj kaj infanoj. Li timis, ke iu el liaj filoj elkreskos, fariĝos reĝo kaj transprenos la regadon, do li starigis regulon, ke li mordu ĉiun filon tuj kiam tiu naskiĝis. Tio faris la filojn tro malfortaj por defii sian patron.

Iu el la edzinoj de la reĝo gravediĝis, kaj la naskiĝonto estis knabo, do ŝi volis protekti lin kontraŭ la kruela regulo de sia edzo. Ŝi forkuris en arbaron ĉe la piedo de



malproksima monto. Tie ŝi naskis brilan simian bebon.

Post nelonge la bebo kreskis kaj fariĝis granda kaj forta. Iutage li demandis sian patrinon: "Kie estas mia patro?" Ŝi respondis: "Li estas la reĝo de simioj vivantaj ĉe malproksima montpiedo. Do vi estas reĝido!"

La simia reĝido petis: "Bonvolu konduki min al mia patro." Lia patrino respondis: "Ne, mia filo. Mi timas tion fari. Via patro morde vundas ĉiujn siajn filojn por dumvive malfortigi ilin. Li timas, ke iu el liaj filoj anstataŭos lin kiel reĝon." La reĝido diris: "Ne timu por mi, panjo. Mi povas prizorgi min mem." Tio donis al ŝi fidon, kaj ŝi konsentis konduki

lin al lia patro.

Kiam la kruela maljuna reĝo vidis sian filon junan kaj fortan, li tuj pensis: "Sendube mia filo ŝtelos la regnon de mi post kiam li pli fortiĝos. Mi devas mortigi lin kiam mi ankoraŭ povas tion fari. Mi ĉirkaŭprenos lin ŝajne pro amo. Sed efektive mi premos lin ĝismorte!"

La reĝo bonvenigis sian filon, dirante: "Ha, mia delonge perdita filo! Kie vi estis dum tiel longa tempo? Mi sopiregis al vi." Poste li tiris lin en sian sinon kaj ĉirkaŭprenis lin. Li premadis lin forte por mortigi lin. Sed la simia reĝido estis tiel forta kiel elefanto. Li ĉirkaŭprenis sian patron kontraŭstare. Li premis lin pli forte, ĝis li eksentis, ke krakis la riboj de la

maljuna reĝo!

Post la terura renkontiĝo, la simia reĝo des pli timis, ke li mortos pro sia filo iutage. Li pensis: "Proksime troviĝas lageto posedata de akva demono. Li povos manĝi mian filon tre facile, kaj poste solviĝos ĉiuj miaj problemoj!"

La simia reĝo diris: "Nun estas perfekta tempo por via reveno, mia kara filo. Mi estas tro maljuna kaj volas transdoni al vi mian simian bandon. Sed mi bezonas florojn por la krona ceremonio. Iru al la proksima lageto kaj prenu de tie du specojn da blankaj akvolilioj, tri specojn da bluaj akvolilioj kaj kvin specojn da lotusfloroj."

La simia reĝido respondis: "Jes, Paĉjo.

Mi iros por preni ilin."

Atinginte la lageton, la reĝido vidis, ke la lageto plenas de diversaj akvolilioj kaj lotusfloroj, sed anstataŭ rekte salti en la lageton por pluki ilin, li esploris singardeme. Li iris malrapide laŭ la bordo kaj rimarkis, ke estas piedsignoj irintaj en la lageton, sed neniuj elirinta. Post momenta pripenso, li komprenis, ke tio estas la signo de lageto posedata de akva demono. Li ankaŭ komprenis, ke lia patro sendis lin al la lageto nur por mortigi lin.

Li esploris plue ĝis li trovis mallarĝan parton de la lageto. Tie li kapablis salti de unu bordo al la alia per forto. Do li eksaltis trans la lageton, kaj dum sia transsalto, li sin klinis kaj prenis florojn sen tuŝi la

lagakvon. Poste li retrosaltis kaj plukis pli da floroj. Do li senĉese saltadis tien kaj reen, kaj kolektis multe da floroj.

La akva demono subite etendis sian kapon super la akvosurfacon. Li ekkriis: "Mi ĉiam vivas ĉi tie, sed vidis neniun homon aŭ beston, tiel saĝan kiel tiun ĉi simion. Li plukis ĉiujn deziratajn florojn sen tuŝi la sferon de mia povo en mia akva regno."

Do la feroĉa demono faris vojon tra la akvo por si kaj iris sur la bordon. Li diris: "Via Reĝa Moŝto de simioj, Per tri meritoj oni fariĝas nevenkebla por siaj malamikoj. Evidente vi posedas ĉiujn tri: sperto, kuraĝo kaj saĝo. Vi estas vere nevenkebla! Diru al mi, grandulo, pro kio vi kolektas

tiujn florojn?"

La simia reĝido respondis: "Mia patro volas fari min reĝo de la regno, do laŭ lia ordono mi kolektis florojn por la krona ceremonio."

La akva demono diris: "Vi estas tro honora por porti tiujn florojn per vi mem. Lasu min porti ilin por vi." Li do portis ĉiujn florojn kaj sekvis la reĝidon.

La simia reĝo vidis de malproksime, ke la reĝidon sekvas la akva demono portanta florojn. Li pensis: "Mi sendis lin kolekti florojn kun deziro, ke li estu manĝita de la demono. Sed anstataŭe, la akva demono fariĝis lia servanto. Mi malsukcesis!"

La simia reĝo timis, ke lin trafos ĉiuj rezultoj de liaj malbonaj kondutoj. Li

tiel teruriĝis, ke lia koro rompiĝis en sep pecojn. Kompreneble, pro tio li tuj mortis surloke!

La simia bando elektis la fortan junan reĝidon kiel la novan reĝon.

La moralinstruo estas: Singardemo kostas multe.

## 57. DU MANIEROJ DE TAMBURADO



### [Malmodereco]

Iam vivis tamburisto en malgranda kampara vilaĝo. Li aŭdis, ke okazas foiro en la urbo Benareso. Do li decidis iri tien por gajni monon per tamburado. Li prenis sian filon kun si, por ke tiu akompanu lin en la muziko speciale komponita por ludo de du tamburoj.

Ambaŭ tamburistoj, la patro kaj filo, iris al la foiro. Ili estis sukcesplenaj. Ĉiuj ŝatis ilian ludadon kaj donis monon al ili malavare. Post la foiro ili ekvojaĝis al sia hejmo en la malgranda vilaĝo.



Sur la vojo ili devis trapasi malluman arbaron. Estis tre danĝere, ĉar rabistoj kutime prirabis preterpasantojn.

La filo volis protekti sian patron kaj sin mem kontraŭ la rabistoj. Do li senĉese frapegis sian tamburon tiel laŭte kiel li povis. "Ju pli brue, des pli bone!" li pensis.

La tamburisto tiris sian filon flanken. Li klarigis al li, ke oni havas kutimon frapi tamburojn kiam preterpasas grandaj grupoj, precipe procesioj de la reĝo, sed ili faras tion intermite en majesta maniero, kvazaŭ ili neniun timas. Ili kutime tamburis dum kelka momento, restis silenta, denove tamburadis, kaj tiel plu. Li konsilis al sia filo fari la samon por mistifike pensigi la rabistojn, ke

preterpasas potenca sinjoro.

Sed la knabo ignoris la konsilon de la patro. Li opiniis, ke li scias plej bone. Li pensis: "Ju pli brue, des pli bone!"

Samtempe, bando da rabistoj aŭdis la tamburadon de la knabo. Unue ili pensis, ke potenca riĉa sinjoro alproksimiĝas kun granda sekureco. Sed poste ili aŭdis, ke la tamburado daŭris freneze senhalte. Ili komprenis, ke tio sonas manie, kvazaŭ timigita hundido bojus kontraŭ granda kvieta hundo.

Post esploro ili trovis nur la patron kaj filon. Ili bategis ilin, forrabis de ili la tutan monon malfacile gajnitan, kaj fuĝis en la arbaron.

La moralinstruo estas: Troa agado  
kondukas al malsukceso.

## 58. DU PATRINOJ



### [Rezignado]

Iam estis fama instruisto en la urbo Takasila de norda Hindio. Li instruis religion kaj ĉiujn aliajn studobjektojn. Lia erudicio estis granda, kaj lia instrua kapablo estis mondfama.

En tiu periodo knabo naskiĝis en riĉa familio de Benareso. Liaj gepatroj tenis sanktan fajron senĉese brulanta ekde lia naskiĝtago. Kiam li atingis 16-an jaron, ili proponis al li fari elekton. Ili diris: "Tiu ĉi sankta fajro bruladas ekde via naskiĝo. Se vi volas renaskiĝi en alta ĉiela mondo,

portu ĝin al la arbaro kaj adoru la fajran dion.

"Sed se vi volas havi ordinaran vivon kun familio, vi devas lerni kiel mastrumi la riĉaĵon de nia familio kaj ankaŭ pri la mondaj aferoj. Se vi faris tian elekton, iru kaj lernu ĉe la mondfama instruisto de Takasila."

La junulo diris: "Mi ne volas esti sanktulo. Mi preferas esti viro kun familio. Mi estos feliĉa dum la resta periodo de mia vivo." Do liaj gepatroj sendis lin al la mondfama instruisto. Ili donis al li mil orajn monerojn kiel pagon por lia lernado.

Post kelkaj jaroj la junulo diplomiĝis kun honoro kaj revenis al Benareso.

Samtempe liaj gepatroj pli deziris,

ke li fariĝu sanktulo en la arbaro. Tio estis ilia deziro ekde lia naskiĝtago. Lia patrino deziris la plej bonan vivon al sia filo. Ŝi pensis: "Mia filo volas edziĝi kaj vivteni familion. Li ne scias kiel danĝera estas malica virino al viro. Mi devas trovi metodon, por ke lia instruisto instruu tion al li."

Do la saĝa virino demandis sian filon: "Ĉu vi gajnis nur la Ordinaran Diplomon, sed ankoraŭ ne havis la pli superan Malfeliĉan Diplomon?" Ŝia filo respondis: "Jes, mi nur gajnis la Ordinaran Diplomon."

Lia patrino diris: "Kiel vi povas pretendi vin edukita en la mondaj aferoj se vi lernis nenion pri malfeliĉo? Reiru

al la granda instruisto kaj petu de li la Malfeliĉan Diplomon." La filo obeeme sekvis la konsilon de sia saĝa patrino kaj reiris al la urbo Takasila.

La mondfama instruisto havis 120-jaran patrinon. Ŝi estis blinda kaj malforta, do la instruisto banis, manĝigis kaj prizorgis ŝin per siaj propraj manoj. Ĉar tio bezonis pli da tempo, li devigite rezignis la instruadon. Li translokiĝis kun sia patrino en arbaran dometon, kie li prizorgis ŝin tagnokte.

Kiam la juna lernanto revenis de Benareso, li trovis, ke lia estinta instruisto ne plu estis en la altlernejo. Informiĝinte, ke li jam retiriĝis al arbaro, li tuj iris kaj trovis lin tie.

Reciprokinte saluton, la instruisto demandis lin: "Kial vi revenis al mi tiel rapide?" Li respondis: "Vi ankoraŭ ne donis al mi Malfeliĉan Diplomon, Honora Instruisto." "Kiu diris al vi pri tia diplomo?" demandis la instruisto. "Mia patrino, sinjoro," li respondis.

La instruisto pensis: "Mi neniam aŭdis pri tia diplomo. Sendube lia saĝa patrino volas, ke mi instruu al li kiel malicaj estas iuj virinoj ĉar ili kaŭzas grandan malfeliĉon al viroj."

Li diris: "Bone. Mi instruos vin, por ke vi gajnu la superan diplomon. La kurso estas praktika programo. Viaj lecionoj konsistas el prizorgado al mia maljuna patrino por mi. Banu, manĝigu kaj



prizorgu ŝin milde kaj zorgeme per viaj propraj manoj.

"Kiam vi banas ŝin kaj masaĝas ŝian korpon, vi devas diri, 'Kara sinjorino, eĉ en via maljuneco via haŭto restas tiel mola kaj bela.' Vi devas konstante laŭdi ŝin pri ŝia beleco tiamaniere, dirante, 'Kiam vi estis juna, vi certe estis des pli bela!' Kaj se ŝi diros ion ajn al vi, vi devas informi min senhonte. Kaŝu nenion, kio ĝi estas. Se vi faras tion senerare, vi gajnos la Malfeliĉan Diplomon. Tiam via patrino fieros pri via sukceso."

La lernanto konsentis kaj komencis prizorgi la 120-jaran maljunulinon. Li banis kaj vartis ŝin per siaj propraj manoj. Li masaĝis ŝiajn brakojn, krurojn,

dorson kaj kapon. Farante tion, li diradis: "Sinjorino, estas vere eksterordinare! Eĉ en tiel granda aĝo, viaj brakoj kaj kruroj estas tiel belaj! Mi eĉ ne povas imagi, kiel bela vi estis en via juneco!" En tiu ĉi maniero li laŭdis pri ŝia beleco foje kaj refoje por multaj tagoj.

Iom post iom forta deziro estiĝis en la menso de la maljunulino. Kvankam ŝi sciis bone, ke ŝi estas blinda, kaj ŝia korpo kadukiĝis pro maljuna aĝo, tamen ŝi pensis: "Sendube tiu ĉi junulo volas vivi kun mi kiel mia edzo." Do ŝi demandis lin: "Ĉu ni vivu kune kiel geedzoj?"

La junulo respondis: "Jes, certe, sinjorino. Mi volegas. Sed kiel mi povas tion fari? Via filo estas mia instruisto, kaj

li estas tre respektinda por mi. Tio kaŭzos al li hontindan skandalon. Mi ne povas hontigi mian instruiston."

Do la patrino de la instruisto diris: "Tiuokaze, mortigu mian filon se vi vere volas resti kun mi!"

La lernanto diris: "Kiel decas por mi mortigi lin kiam mi jam lernas ĉe li dum tiel longa tempo? Kiel mi rajtas mortigi lin nur pro mia deziro je vi?" Ŝi respondis: "Se vi restos kun mi kaj ne forlasos min, mi mem mortigos lin!"

Laŭ la interkonsento la lernanto iris al la mondfama instruisto kaj informis lin pri ĉio, kio okazis. Estis mirinde, ke la instruisto tute ne surpriziĝis. Li diris: "Vi faris tre bone pro via informiĝo, mia

lernanto. Mi aprecas vian bonan laboron."

Poste li esploris la horoskopon de sia patrino kaj trovis, ke tiu tago ĝuste estis tempo por ŝia morto. Li diris: "Mi aranĝos provon por ŝi."

La instruisto skulptis statuon el mola ligno de arbobranĉo. Li faris ĝin precize laŭ sia vera grandeco. Li kuŝigis la statuon en la liton kaj kovris ĝin per litkovrilo. Li ligis longan ŝnureton al ĝi kaj donis la ŝnureton al sia lernanto. Li diris: "Nun donu la ŝnureton kaj hakilon al mia patrino. Diru al ŝi, ke estas ĝusta tempo por la mortigo."

La lernanto obeeme revenis al la blinda maljunulino. Li diris: "Mia instruisto dormas en sia lito, sinjorino. Se

vi sekvos la ŝnureton, ĝi kondukos vin al li. Poste mortigu lin per tiu ĉi hakilo se vi vere povos tion fari!"

Ŝi respondis: "Se vi ne forlasos min, mi tion faros." Li diris: "Kiel mi povus forlasi vin?"

Ŝi do prenis la hakilon en siajn manojn. Ŝi tremis kiam ŝi stariĝis. Malrapide ŝi sekvis la ŝnureton al la lito de sia filo. Ŝi palpis la statuon kaj konstatis, ke ĝi vere estas ŝia filo. Ŝi tiris la litkovrilon de ĝia kapo kaj levis la hakilon. Kun intenco mortigi sian filon per unu hako, ŝi hakis ĝin je la kolo tiel forte kiel ŝi povis. Tio eligis grandan sonon, do ŝi sciis, ke la hakilo trafis lignon.

La instruisto demandis: "Kion vi

faris, panjo?" Ŝi subite eksciis, ke ŝi estis trompita kaj ŝia fiintenco malkovrita. Ŝin trafis tiel granda paniko, ke ŝi tuj falis morta sur la teron. La tempo por la horoskopoj estis preciza.

La mondfama instruisto respektive kremaciis la kadavron de sia patrino kaj oferis florojn al ŝia cindro.

Poste li diris al sia lernanto: "Mia filo, en realo efektive ne troviĝas tia objekto kiel 'Malfeliĉa Diplomo'. Malicaj virinoj kaŭzas malfeliĉojn. Vi estas bonŝanca havante patrinon tiel bonan kaj saĝan. Per la metodo sendi vin ĉi tien por la "Malfeliĉa Diplomo", ŝi volis, ke mi instruu al vi, kiel malicaj la virinoj povas esti.

"Vi jam propraokule vidis, kiel mia patrino pleniĝis de avideco kaj vanteco. Ŝi donis la lecionon al vi. Nun reiru al via saĝa patrino, kiu multe zorgas pri via bonfarto."

Kiam li revenis hejmen, lia patrino demandis: "Mia kara filo, ĉu vi finfine gajnis la superan Diplomon de Malfeliĉo?" Li respondis: "Jes, Panjo."

Ŝi do diris: "Mi demandu vin denove, mia filo. Ĉu vi deziras forlasi la laikan vivon kaj iri en la arbaron por adori la fajran dion? Aŭ ĉu vi volas edziĝi kaj havi familian vivon?"

Ŝia filo respondis: "Mi ne plu volas havi familian vivon. Mi jam vidis per miaj propraj okuloj, kiel malicaj iuj virinoj

estas. Iliaj avideco kaj vanteco estas senlimaj. Do mi volas nenion fari por la laika vivo. Mi serĉos pacon kiel monaĥo en arbaro."

Li respektoplene adiaŭis siajn gepatrojn. Post multjara kvieta meditado en la arbaro, li nature mortis kaj renaskiĝis en alta ĉiela mondo.

La moralinstruo estas: Malvirtaĵoj inter virinoj kaj viroj kaŭzas malfeliĉon al ili ambaŭ.



## 59. PASTRO VETLUDINTA PER VIVO



### [Miskondukita moraleco]

Iam antaŭe estis reĝo, kiu emis vetludi kun sia kortega pastro. Kiam li ĵetis kubon, li ĉiam recitis la fortunajn sorĉvortojn:

"Se allogite, ĉiuj virinoj nepre forĵetos sian fidelecon kaj kondutos malvirte."

Ŝajne estis mirinde, ke uzante la sorĉvortojn, la reĝo ĉiam gajnis. Post nelonge la kortega pastro perdis preskaŭ ĉiun sian moneron pene gajnitan.

Li pensis: "Mi perdis preskaŭ ĉiom el

miaj havaĵoj al la reĝo. Eble tion kaŭzas liaj sorĉvortoj. Mi devas trovi rimedon por rompi la sorĉvortojn kaj regajni mian monon. Mi trovos puran virinon, kiu neniam kontaktis viron. Tiam mi ŝlosos ŝin en mia etaĝdomo kaj devigos ŝin esti fidela al mi!"

Ŝajnis al li, ke tio estas bona ideo. Sed poste li ekhavis dubon. Li pensis: "Estas preskaŭ neeble teni virinon pura post kiam ŝi jam kutimiĝis al viro. Do mi devas laŭeble trovi la plej puran virinon, kiu neniam vidis viron!"

Ĝuste tiam li hazarde vidis gravedan malriĉulinon preterpasanta. La kortega pastro estas spertulo por legi makulojn sur la korpo. Li tuj certigis al si, ke la

naskiĝonta bebo estis insekse. Tuj venis al li nova ideo: "Aha! Nur nenaskiĝinta bebino neniam vidis viron!"

La kortega pastro volontis fari ĉion por venki la reĝon je la vetludo. Do li pagis monon por ke la malriĉa virino restu en lia domo kaj nasku la bebon tie. Kiam ĉarma knabineto naskiĝis, la kortega pastro aĉetis ŝin de ŝia patrino. Ŝi neniam vidis viron, kompreneble, krom la kortega pastro. Kiam ŝi elkreskis, li ankoraŭ tenis ŝin tute sub sia regado, kvazaŭ li posedus la kompatindan knabinon.

La kruela pastro faris tion nur por sia kutimo de vetludado. Antaŭ ol la knabino plenkreskis, li evitis vetludi kun la reĝo. Nun ŝi jam plenaĝiĝis, kaj ankoraŭ estis

lia malliberulino, li do denove proponis vetludon al la reĝo.

La reĝo konsentis. Post kiam ili faris sian veton, la reĝo skuis la ĵetkubon kaj ripetis siajn favoratajn sorĉvortojn:

"Se allogite, ĉiuj virinoj nepre forĵetos sian fidelecon kaj kondutos malvirte."

Sed tuj antaŭ ol li ĵetis la ĵetkubon, la pastro aldonis:

"Escepte de mia virino, kiu restas ĉiam fidela al mi!"

La sorĉvortoj de la reĝo ne efikis. Li perdis la veton kaj ekde tiam la pastro gajnis je ĉiu kubĵeto.

La reĝo miregis pro la subita ŝanĝiĝo. Post konsiderado, li pensis: "La pastro nepre havas puran virinon ŝlositan en la

domo kaj devigitan por esti fidela al li sola. Jen kial miaj sorĉvortoj ne plu efikas."

Li enketis kaj trovis, ke la kruela pastro vere tion faras. Do li alvenigis faman junan dandon kaj demandis lin, ĉu li povos sukcese delogi la virinon. La junulo respondis: "Sen problemo, Via Reĝa Moŝto!" La reĝo pagis al la junulo multe kaj ordonis lin tuj ekagi.

La junulo aĉetis abunde da plej bonaj parfumoj kaj kosmetikaĵoj. Li ekfunkciigis butikon ĝuste ekster la etaĝdomo de la kortega pastro. La etaĝdomo de la pastro altis je sep etaĝoj kun sep pordoj aparte en ĉiu etaĝo. Virinoj gardis ĉiun pordon, kaj neniu viro estis permesita eniri krom la pastro.

Nur unu servistino servis la virinon de la pastro. Ŝi portis ĉion enen kaj eksteren, inkluzive de parfumoj kaj kosmetikaĵoj. La pastro donis monon al ŝi por fari aĉetadon.

La juna dando vidis, ke la servistino iradis en kaj ekster la etaĝdomon de la pastro. Li tuj eksciis, ke ŝi estas la nura persono, kiu povis helpi lin eniri. Do li elpensis metodon kaj dungis kelkajn kunulojn por helpi lin.

La sekvan matenon, kiam la servistino eliris fari aĉeton kiel kutime, la junulo drame falis sur la teron antaŭ ŝi. Kaptinte ŝiajn krurojn, li ekploris larmoplene: "Ho, mia kara patrino, estas tiel bone, ke mi vidas vin denove post tiel longa tempo!"

Tiam liaj kunuloj ankaŭ intervenis: "Jes, tiu ĉi estas ŝi. Ŝi aspektas same kiel antaŭe per siaj manoj, piedoj, vizaĝo kaj eĉ la stilo de la vestaĵo. Jes, tiu ĉi vere estas ŝi!" Ili ĉiuj senĉese diris, kiel mirinde, ke ŝi ŝanĝiĝis tiel malmulte dum tiel longa tempo.

La kompatinda virino certe perdis sian filon delonge, ĉar baldaŭ ŝi konvinkiĝis, ke tiu ĉi estas ŝia perdita filo. Ŝi kaptis la saĝan dandon, kaj ili ambaŭ ploregis pro ĝojo je la mirakla rekuniĝo.

Dum la plorĝemo la junulo demandis ŝin: "Kie vi loĝas nun, kara patrino?" "Mi loĝas najbare," ŝi diris, "en la etaĝdomo de la pastro. Tagnokte mi servas lian junan virinon. Ŝia beleco estas senkompara,

kvazaŭ la marvirino ofte laŭdata de maristoj."

Li demandis: "Kien vi iras nun, panjo?" "Mi aĉetos por ŝi parfumojn kaj kosmetikaĵojn, mia filo." "Ne necese, panjo," li diris, "ekde nun mi donas al vi la plej bonajn parfumojn kaj kosmetikaĵojn tute senpage!" Do li donis al ŝi parfumojn kaj kosmetikaĵojn, kaj ankaŭ faskon da amindaj floroj aldone.

Kiam la juna virino de la pastro vidis ĉion multe pli bonkvalitan ol kutime, ŝi demandis, kial la pastro estas tiel korfavora al ŝi. "Ne," respondis la servistino, "tiuj ne venis de la pastro. Mi akiris ilin el la vendejo de mia filo." Ekde tiam ŝi akiris parfumojn kaj kosmetikaĵojn



el la vendejo de la dando, kaj tenis ĉe si la monon de la pastro.

Post nelonge, la dando komencis la sekvan paŝon de sia plano. Li sin ŝajnigis malsana kaj restis en la lito.

Kiam la servistino iris en la vendejon, ŝi demandis: "Kie estas mia filo?" Oni diris al ŝi, ke li estas tro malsana por labori, kaj kondukis ŝin por vidi lin. Ŝi ekmasaĝis lian dorson kaj demandis: "Kio okazis al vi, kara filo?" Li respondis: "Eĉ se mi mortus, mi ne povus diri al vi, Panjo."

Ŝi insistis: "Se vi ne povus diri al mi, al kiu vi povus diri?" Poste laŭ sia plano, la junulo ne plu povis sin deteni kaj konfesis al ŝi: "Mi fartis bone antaŭ ol vi

diris al mi pri via ĉarma sinjorino 'kvazaŭ marvirino laŭdata de maristoj'. Mi ekamis ŝin pro via priskribo. Mi devas peti ŝian manon. Mi ne povas vivi sen ŝi. Mi estas tro deprimita por daŭrigi mian vivon!"

La servistino diris: "Ne maltrankviliĝu, mia filo. Lasu tion al mi." Ŝi prenis eĉ pli da parfumoj kaj kosmetikaĵoj al la juna virino de la pastro. Ŝi diris al ŝi: "Mia mastrino, post kiam mia filo aŭdis de mi pri via beleco, li enamiĝis al vi. Mi ne scias kion fari plue!"

Ĉar la pastro estas la nura viro, kiun la juna virino vidis, do ŝi estis scivolema, kaj kompreneble ŝi kovis rankoron pro la perforta mallibereco. Do ŝi diris: "Se vi povos ŝtele venigi lin en mian ĉambron,

tio plaĉos al mi!"

La gardistinoj ĉe la sep pordoj kontrolis ĉion, kion la servistino portis enen kaj eksteren. Do ŝi elpensis metodon. Ŝi kolektis la malpuraĵon, kiun ŝi povis trovi en la tuta etaĝdomo. Poste ŝi elportis iom da malpuraĵo ĉiutage en granda kovrita florkorbo. Kiam la gardistinoj traserĉis ŝin, ŝi surŝmiris iom da malpuraĵo sur ilian vizaĝon. Tio faris ilin terni kaj tusi. Post nelonge ili ne plu kontrolis ŝin kiam ŝi trapasis la pordojn.

Fine en iu tago ŝi kaŝis la junulon en sian kovritan florkorbon. Li estis sana sed maldika kaj malpeza. Ŝi sukcese portis lin tra ĉiuj sep garditaj pordoj en la privatan ĉambron de la juna sinjorino. la

du geamantoj restis kune dum kelkaj tagoj kaj noktoj, do la juna dando detruis ŝian perfektan fidelecon, kiun la kruela pastro perforte altrudis al ŝi.

Fine ŝi diris, ke estas tempo por li foriri. Li diris: "Mi foriros, sed antaŭ tio lasu min bati la maljunan pastron je la kapo ĉar li estas tiel kruela kontraŭ vi!" Ŝi konsentis kaj kaŝis lin en ŝrankon. Tio ankaŭ estis parto de lia sekreta plano.

Kiam la pastro revenis, lia virino diris: "Via moŝto, mi estas tiel feliĉa hodiaŭ, ke mi volas danci dum vi ludos gitaron."

La pastro diris: "Bone, mia belulino." "Sed mi estas tro hontema danci antaŭ vi," ŝi aldonis, "do bonvolu surporti okulŝirmilon dum mia dancado." Li

denove konsentis ŝian postulon kaj ŝi metis okulŝirmilon ĉirkaŭ lian kapon.

La pastro ludis belan muzikon per la komplika hindia gitaro, dum lia virino dancis. Post momento ŝi diris: "Kiel parto de mia danco, ĉu vi volontus lasi min frapi vin je la kapo?" "Laŭ via plaĉo, mia kara," li diris.

Ŝi faris signon al la junulo. Li eliris de la ŝranko, alglitis de malantaŭe, kaj bategis la maljunan pastron je la kapo. Pro tio la okuloj de la pastro preskaŭ elstariĝis kaj tubero tuj aperis sur lia kapo. Li vekriis kaj la virino metis sian manon en la lian. Li diris: "Per tiel mola mano vi eĉ povas fari tiel fortan baton, mia kara!"

La junulo reiris en la ŝrankon. La

virino deprenis la okulŝirmilon de la pastro kaj ŝmiris unĝventon sur la ŝveliĝon de lia kapo. Kiam la pastro forlasis, la servistino kaŝis la junulon en sian florkorbon kaj ŝtele portis lin el la etaĝdomo. La junulo senprokraste iris al la reĝo kaj raportis al li la tutan historion, kompreneble en fanfaronana maniero.

En la sekva tago, la kortega pastro iris al la palaco kiel kutime. La reĝo diris: "Ĉu ni faru vetludon per kubo?" La pastro tuj konsentis, revante pri pli granda gajno. Ĝuste kiel antaŭe, la reĝo recitis siajn sorĉvortojn:

"Se allogite, ĉiuj virinoj nepre forĵetos sian fidelecon kaj kondutos malvirte."

Kiel kutime la pastro aldonis:

"Escepte de mia virino, kiu restas ĉiam fidela al mi!"

Sed la ĵetkubo falis en la maniero favora al la reĝo kaj tiu prenis la monon de la pastro.

La reĝo diris: "Ho, pastro, via virino ne plu estas escepta! Vera fideleco ne povas esti devigita. Via plano estis teni novnaskitan knabinon, ŝlosi ŝin post sep pordoj garditaj de sep gardistinoj, kaj devigi ŝin esti ĉasta. Sed vi malsukcesis. La granda deziro de ĉiu malliberulo estas libereco! Ŝi ŝirmis viajn okulojn kaj ŝia juna amato donis ŝvelaĵon per bato sur vian kapon maljunan kaj kalvan. Tio pruvas, ke viaj pordoj kaj gardistinoj estis tute senutilaj!"

La pastro revenis hejmen kaj akuzis sian virinon. Sed samtempe ŝi jam havis sian propran planon. Ŝi diris: "Ne, Via Moŝto. Mi estas tute fidela al vi. Neniu tuŝis min krom vi! Mi pruvos tion per juĝo de fajro. Mi iros en fajron senbruligite por pruvi, ke mi diris la veron."

Ŝi ordonis, ke la maljuna servistino trovu sian filon, la juna dando, kaj proponu al li kapti ŝin je la mano por preventi ŝin iri en la flamojn. La ordonon sekvis la servistino.

En la tago de la perfajra juĝo, la virino de la pastro diris al la rigardantoj: "Mi neniam estis tuŝita de alia viro krom tiu ĉi pastro, mia mastro. Laŭ tiu ĉi vero, la fajro ne havu potencon super mi."



Poste, apenaŭ ŝi eksaltis en la fajron, kiam la junulo sin trudis el la homamaso kaj kaptis ŝin je la mano. Li kriis: "Haltu! Haltu! Kiel la pastro estas tiel kruela por devigi malfortan junulinon iri en la furiozan fajron!"

Ŝi forte liberigis sian manon de li kaj diris al la pastro: "Via moŝto, tiu ĉi viro jam tuŝis mian manon, do la juĝo de fajro estas tute senutila. Sed vi povas elvidi mian bonan intencon!"

La pastro eksciis, ke li estis trompita. Li batis ŝin kaj elpelis ŝin por ĉiam. Je la fino la juna virino liberiĝis de la kruela pastro kaj malfeliĉa sorto.

La moralinstruo estas: Neniu povas devigi iun esti bonkondukta.

## 60. MALICULINO KAJ BUTERLAKTA SAĜULO



[Delogo]

Iam tre riĉa homo vivis en Benareso de norda Hindio. Li havis filinon, kiu estis la plej bela virino en la tuta urbo. Ŝia haŭto estis tiel mola kiel rozfloraj petaloj, ŝia vizaĝo koloris kiel lotusfloroj, kaj ŝiaj haroj nigris kiel meznokto. Sed malfeliĉe, ŝia beleco estis nur supraĵa, kaj ŝi estis tre kruela interne. Ŝi humiligadis siajn servistinojn kaj eĉ ofte bategis ilin. Oni nomis ŝin "Maliculino".

Iutage ŝi iris al rivero por sin bani.

Kiam ŝi sin banis, ŝiaj servistinoj ludis kaj plaŭdis en la akvo. Subite mallumiĝis kaj densa pluvŝtormo kovris la ĉielon super ili. Plej multe de la servistinoj kaj gardistoj forkuris. La servistinoj diris unuj al aliaj: "Nun estas perfekta tempo forigi la malican virinon por ĉiam." Do ili foriris kaj lasis sola en la rivero. La ŝtormo fariĝis pli kaj pli terure furioza je la sunsubiro.

Kiam la servistinoj reiris hejmen sen Maliculino, la riĉulo demandis ilin: "Kie estas mia kara filino?" Ili respondis: "Ni vidis ŝin elirinta el la rivero, sed ekde tiam ni ne plu vidis ŝin. Ni ne scias, kien ŝi iris." La riĉulo sendis siajn parencojn serĉi ŝin, sed nenie ili trovis ŝin. Samtempe

Maliculino drivis al malsupra parto de la rivero pro feroça inundo.

Hazarde okazis, ke sanktulo vivas en la arbaro ĉe la rivero. En la kvieta regiono li meditadis dum longa tempo ĝis li ekĝuis sian internan feliĉon de alta mensstato. Pro tiu feliĉo li certigis al si mem, ke li jam forlasis la ordinaran deziron de la mondo.

En la meznokto Maliculino drivis preter la kabano de la sanktulo en la furioza torento. Ŝi kriis kaj ploris por helpo. Tuj kiam la sanktulo aŭdis ŝin, li eksciis, ke virino estas en danĝero. Do li hastis al la rivero kun torĉo kaj vidis ŝin baraktanta. Li enakviĝis kaj elsavis ŝin. Li konsolis ŝin dirante: "Ne timu. Mi prizorgos vin."

Li portis ŝin en la kabanon kaj estigis fajron por ŝin sekigi kaj varmigi. Li donis fruktojn al ŝi por manĝi. Post kiam ŝi manĝis ĝissate, li demandis: "Kie vi loĝas? Kiel vi falis en la riveron?" Ŝi diris al li pri la ŝtormo kaj kiel ŝiaj servistinoj forlasis ŝin. Li kompatis ŝin kaj lasis ŝin dormi en lia kabano por kelkaj noktoj. Li mem tranoktis sub la steloj.

Post kiam ŝi resaniĝis, li diris al ŝi, ke estas tempo por ŝi hejmeniri. Sed ŝi sciis, ke li estas sanktulo, kiu ĵuris neniam vivi kun virino kiel geedzoj. Jen kial li tranoktis ekstere dum ŝi dormis en la kabano.

Por pruvi siajn proprajn povon kaj superecon al li, ŝi decidis delogi lin rompi

la religian ĵuron. Ŝi rifuzis forlasi ĝis ŝi tentis lin fali en amiĝon al ŝi.

Maliculino uzis pozojn, artifikojn kaj flatojn, pri kiuj virinoj lertas. La sanktulo ankoraŭ ne estis sufiĉe forta por rezisti kontraŭ ŝia tento. Post kelkaj tagoj ŝi sukcesis delogi lin rompi sian ĵuron. Ili ekvivis kune en la kvieta arbaro kvazaŭ geedzoj. Li perdis la internan feliĉon gajnitan post meditado por longaj jaroj.

Baldaŭ Maliculino tediĝis pri la arbara vivo. Ŝi sopiris al la bruo kaj ekscitiĝo de la homplena mondo. Do ŝi kveris kaj kaĵolis ĝis ŝi realigis sian deziron. Ili transloĝiĝis en najbaran vilaĝon.

En la komenco la sanktulo vivtenis ŝin per vendado de buterlakto. Poste la

vilaĝanoj venis kaj petis de li konsilon. Ili tuj eksciis, ke aŭskulti lin alportos al ili bonan sorton. Do ili eknomis lin "Buterlakta Saĝulo" kaj ankaŭ donis kabanon al li por loĝi.

Iutage bando da banditoj atakis la vilaĝon. Ili rabis ĉiujn valorajn objektojn kaj kidnapis kelkajn vilaĝanojn, inkluzive de Maliculino. Reveninte sian arbaran kaŝejon, ili dividis la prirabaĵojn. Kiam ili ekdividis la kaptitojn, la banditestro estis sorĉita de la beleco de Maliculino. Do li prenis ŝin kiel sian edzinon.

Ĉiuj aliaj kaptitoj estis liberigitaj. Kiam ili revenis al la vilaĝo, Buterlakta Saĝulo demandis, kio okazis al lia edzino. Ili informis lin, ke banditestro tenas

ŝin kiel edzinon. Li pensis: "Ŝi neniam povos vivi sen mi. Ŝi nepre trovos ŝancon por forfuĝi kaj reveni al mi." Ĉiuj aliaj vilaĝanoj forlasis la vilaĝon opiniante, ke ĝi estas malfortuna, sed Buterlakta Saĝulo restis en sia kabano kredante, ke lia edzino revenos iutage.

Maliculino ekĝuis plezuran vivon de banditoj. Sed ŝi maltrankviliĝis, ke ŝia edzo venus kaj forkondukus ŝin. Ŝi pensis: "Tiam mi perdus la ĵus trovitan luksaĵon. Mi estos sekura se mi forigos lin. Do mi sendos leteron al li kun preteksto, ke mi amas lin arde. Kiel antaŭe mi uzos mian delogan povon por subigi lin. Sed ĉifoje li renkontos sian finon, kaj mi restos bandita reĝino!"



Post kiam Buterlakta Saĝulo ricevis la leteron, li kredis ĉiujn vortojn de ŝi. Li tuj enarbariĝis kaj kuris al la kaŝejo de la banditoj. Kiam li vokis ŝin, Maliculino eliris kaj diris: "Ho, mia kara edzo kaj mastro. Mi estas tre feliĉa revidi vin. Mi ne plu povis atendi por forfuĝi kun vi. Sed nun ne estas bona tempo, la banditestro facile sekvos nin kaj mortigos nin ambaŭ se ni foriros nun. Do ni atendu ĝis la nokto." Ŝi kondukis lin en la ĉambron, lin manĝigis kaj kaŝis en ŝrankon.

Post kiam la banditestro revenis ebrie en la vespero, Maliculino demandis lin: "Via Moŝto, kion vi faros se vi vidos mian antaŭan edzon nun?" "Mi batfaligos lin kaj piedbatos lin de unu flanko de la ĉambro

al la alia!" li fanfaronis, "kaj kie li estas nun?" "Li estas multe pli proksima ol via imago," ŝi diris, "fakte li estas ĉi tie, en la ŝranko!"

Li malfermis la ŝrankon kaj eltiris Buterlaktan Saĝulon. Li batis lin pugne kaj piede tien kaj reen en la ĉambro kiel li fanfaronis. La kompatinda viktimo tute ne vekriis. Anstataŭe, li nur murmuris:

"Sendankema malamantino, mensoga perfidulino."

Tio estis ĉio, kion li diris. Ŝajne li fine lernis lecionon, sed tiel dolore!

Finfine la ebria bandito laciĝis de batado. Li ligis la viktimon, prenis vespermanĝon kaj tuj dronis en ebria dormo.

Post la ebria dormo, la banditestro vekigis pli sobriĝinte en la sekva mateno. Li denove bategis la ligitan viktimon per manoj kaj piedoj. Anstataŭ vekrii, Buterlakta Saĝulo ankoraŭ daŭre murmuris:

"Sendankema malamantino, mensoga perfidulino."

La bandito pensis: "Kial la viro senĉese diras la samajn vortojn foje kaj refoje kiam mi punas lin?" Vidinte, ke lia edzino ankoraŭ dormas profunde, li demandis al li, kion tio signifas.

Buterlakta Saĝulo respondis: "Aŭskultu, kaj mi diros al vi. Mi estis arbara sanktulo kaj pace ĝuis altan staton de mia menso. Iunokte mi aŭdis tiun

ĉi virinon krianta kiam ŝi drivis en la rivero dum ŝtormo. Mi savis ŝian vivon kaj resanigis ŝin. Samtempe ŝi delogis min kaj mi perdis ĉiujn miajn internajn trankvilecon kaj feliĉon. Ni transloĝiĝis en vilaĝon kaj havis tre ordinaran vivon. Tiam vi forkaptis ŝin. Poste ŝi sendis al mi leteron dirante, ke ŝi suferas vivi kun vi, kaj petas, ke mi savu ŝin. Do vi povas vidi, ke ŝi tentis min al tiu ĉi katastrofo. Ŝi transdonis min en vian manon. Jen kial mi diris:

'Sendankema malamantino, mensoga perfidulino.'

La banditestro ne estis malsaĝa. Li pensis: "Tiu viro estas tiel bona prizorganto por ŝi, tamen ŝi ankoraŭ

kondukis lin en tiun ĉi embarasiĝon. Kion ŝi povos fari kontraŭ mi? Estus pli bone forigi ŝin."

Li malligis Buterlaktan Saĝulon kaj konsolis lin dirante: "Ne maltrankviliĝu. Mi prizorgos vin." Li vekis Maliculinon kaj diris: "Mia kara, ni mortigu tiun ĉi viron ĉe lia propra vilaĝo." Li kondukis ilin al la dezertiĝinta vilaĝo. Li ordonis ŝin kapti sian antaŭan edzon. Poste li levis sian spadon kaj forte hakis, sed en la lasta momento, li splitis Maliculinon en du pecojn.

Eĉ iu tiel malbona kiel la murdema bandito povis ŝanĝi sian konduton. Li prizorgis la antaŭan rivalon ĝis tiu resaniĝis. Post kelkaj tagoj li demandis:

"Kion vi volas fari nun?"

La saĝulo respondis: "Mi ne plu volas la laikan vivon. Mi volas reiri al mia antaŭa arbaro por meditado."

La bandito diris: "Ankaŭ mi volas konvertiĝi kaj lerni meditadon en la arbaro." Disdoninte ĉiujn siajn ŝtelitajn havaĵojn, li iris kaj loĝis en la arbaro kune kun Buterlakta Saĝulo kiel ties lernanto. Post granda strebado ili ambaŭ atingis altan staton de interna feliĉo.

La moralinstruo estas: Seksa tento estas danĝera al ambaŭ viroj kaj virinoj.

## 61. VILAĜANO KAJ LIA EDZINO EL

### URBO



[Adulto]

Iam fama instruisto instruis en kaj ĉirkaŭ Benareso. Li havis pli ol 500 lernantojn. Unu el ili venis de malproksima vilaĝo. Sen multa scio pri kondutoj de urbanoj, li enamiĝis kun knabino de Benareso kaj edziĝis al ŝi. Post la geedziĝo li daŭrigis sian lernadon ĉe la instruisto. Sed li komencis malĉeesti en la kurso, iam eĉ restante du aŭ tri tagojn ekstere ĉiufoje.

Lia edzino senskrupule faris ĉion,

kion ŝi volis. Ŝi ne estis fidela kaj lojala kvankam ŝi edziniĝis al la lernanto. Ŝi eĉ havis sekretajn amatojn.

Post la kunesto kun siaj amatoj, ŝi kutime kondukis tre humile al sia edzo. Ŝi parolis milde kaj penis plezurigi lin. Sed en aliaj tagoj kiam ŝi faris nenion eraran, ŝi estis kruda kaj agresema. Ŝi kriis al sia edzo kaj ĉagrenis lin. Tio preskaŭ frenezigis lin. Li tute konfuziĝis de tio, ke ŝi kondukis varie de tempo al tempo.

La vilaĝano estis tiel ĉagrenita, ke li malĉeestis en siaj lecionoj. Kaj kiam li restis hejme, li trovis, ke la urbanino estas malĉasta. Li estis tiel malĝoja, ke li forestis de la lernejo por sep aŭ ok tagoj.

Kiam li finfine sin montris en la



lernejo, la fama instruisto demandis: "Junulo, kial vi malĉeestis dum tiel longa tempo? Kio okazis al vi?" Li respondis: "Sinjoro, mia edzino ege konfuzis min. En iuj tagoj ŝi kondutas kiel humila servistino, sed en la aliaj ŝi fariĝas aroganta, agresema, kruda kaj malica. Mi ne povas priskribi ŝin. Mi tute ne scias, kion fari kaj kie peti helpon. Jen kial mi ne ĉeestis en viaj lecionoj."

La instruisto diris: "Ne maltrankviliĝu, junulo. Riveroj toleras la banon de ĉiuj homoj, riĉaj kaj malriĉaj. Ŝoseoj ankaŭ malfermiĝas al ĉiuj veturiloj, grandaj kaj malgrandaj. Malavaraj homoj konstruas ĉevojajn domojn por gajni meritojn, kaj ĉiuj homoj rajtas dormi tie. Same, ĉiuj

estas bonvenaj preni akvon el la vilaĝa puto.

"Same, iuj virinoj ne fidelas al sia edzo kaj ŝatas teni sekretajn amatojn. Tio nur estas konduto de iuj homoj. Estas malfacile kompreni kial ili kondutas tiamaniere. Sed kial vi koleras pri tio, kion vi ne povas ŝanĝi?

"En la tagoj post kiam via edzino kunestis kun amato, ŝi kondukis milde kaj humile, sed en aliaj tagoj kiam ŝi faris nenion eraran, ŝi kondukis krude kaj senskrupule. Tio nur estas kutimo de iuj virinoj. Do kial vi koleras pri tio, kion vi ne povas ŝanĝi?

"Akceptu ŝin laŭ ŝia kutimo kaj traktu ŝin en la sama komprenema maniero, ĉu

ŝi estas bonkora aŭ malica al vi. Kial vi koleras pri tio, kion vi ne povas ŝanĝi?"

La vilaĝa lernanto sekvis la konsilon de la fama instruisto. La konduto de lia urba edzino ne plu ĝenis lin. Kiam ŝi eksciis, ke ŝia konduto estas ne plu sekreto, ŝi forlasis siajn amatojn kaj ŝanĝis sian konduton.

La moralinstruo estas: Komprenemo mildigas koleron.

## 62. LA SAĜO DE REĜINO

### MILDAKORO



[Avideco]

Iam la Iluminiĝinto naskiĝis en riĉa altklasa familio en la urbo Kasi de norda Hindio. Li jam finis sian lernadon kiam li estis juna. Poste li rezignis ordinarajn dezirojn kaj forlasis la ĉiutagan mondon. Li fariĝis ermito kaj loĝis sola en arbaro de Himalajo. Post longtempa meditado li atingis altan mensan povon kaj pleniĝis de internaj feliĉoj.

Iutage li venis al la urbo Benareso pro manko de salo. Li pasigis nokton en

la reĝa ĝardeno. Matene li sin lavis, ligis sian hararon en tuberon sur la kapo kaj sin vestis en nigra felo de antilopo. Li faldis la kutime vestitan robon faritan el ruĝa arbŝelo. Poste li iris al la urbo por kolekti manĝaĵon.

Kiam li atingis la palacan pordegon, Reĝo Brahmadata faris promenadon sur la teraso. Ekvidinte la modestan sanktulon, la reĝo tuj pensis, ke la sanktulo nepre jam atingis la perfektan trankvilecon. Li ordonis al siaj servistoj konduki lin en la palacon.

La reĝo petis la sanktulon sidiĝi sur luksan kuŝseĝon, kaj regalis lin per tre bonaj manĝaĵoj. Li dankis la reĝon. La reĝo diris: "Vi estas bonvena por ĉiam loĝi

en mia kortega ĝardeno. Mi provizos al vi la 'kvar vivbezonaĵojn', kiuj estas manĝaĵo, vestaĵo, loĝejo kaj medicinaĵo. Pro tio, mi povos gajni meriton por renaskiĝi en ĉiela mondo."

La sanktulo akceptis la bonkoran inviton. Li pasigis sekvajn 16 jarojn vivante en la reĝa ĝardeno de Benareso. Dume li instruis ĉiujn membrojn de la reĝa familio kaj ricevis la kvar vivbezonaĵojn de la reĝo.

Iutage Reĝo Brahmadata decidis iri al landlimo por subpremi ribelon. Antaŭ la forlaso li ordonis sian reĝinon prizorgi la sanktulon. Ŝia nomo estis Reĝino Mildakoro.

Ŝi preparis manĝaĵon ĉiutage por la

sanktulo. Iutage li ne atingis la palacon akurate por sia manĝo. Dum atendado, Reĝino Mildakoro sin refreŝigis per parfumita bano, sin vestis en belaj vestaĵoj kaj juveloj, kaj kuŝiĝis sur la kuŝseĝo.

Samtempe la Iluminiĝinto meditis en speciala plezura mensstato. Kiam li konsciis pri la malfrueco por tagmanĝo, li flugis al la palaco per magia povo de sia mensa pureco.

Aŭdinte la susuron de lia arbŝela robo, Reĝino Mildakoro subite leviĝis el la kuŝseĝo, kaj ŝia bluzo hazarde deglitis dum momento. La sanktulo ekvidis tion tra la fenestro kiam li eniris, kaj surpriziĝis je la nekutima vido al la belega reĝino.

Tuj leviĝis en la sanktulo deziro, kiun li jam subigis sed ankoraŭ ne forigis. Ĝi similis al tio, ke kobro kun plilarĝiganta nuko leviĝas el la korbo, en kiu ĝi restas. Lia deziro detruis lian trankvilecon, kaj li vundiĝis kiel korvo kun rompitaflugilo.

Li ne plu povis engluti sian manĝaĵon. Li portis ĝin al sia loĝejo situanta en la kortega ĝardeno kaj metis ĝin sub sian liton. Lia menso estis sklavigata de la vido al la bela Reĝino Mildakoro. Lia koro bruliĝis de avideco. Li restis sur la lito sen manĝi kaj trinki por sinsekvaj sep tagoj.

Fine la reĝo revenis hejmen. Li iris ĉirkaŭ la urbo kaj poste rekte en la ĝardenan monaĥejon por viziti la sanktulon. Vidinte lin kuŝanta sur



la lito, li pensis, ke li malsaniĝis. Li purigis la ĉambron kaj sidiĝis ĉe li. Li ekmasaĝis liajn piedojn kaj demandis: "Estimata majstro, kio okazis al vi? Ĉu vi malsaniĝis?"

La sanktulo respondis: "Ho, granda reĝo, mian malsanon kaŭzis tio, ke mi estas katenita en la ĉenoj de avideco." "Kio estas via avideco?" demandis la reĝo. "Reĝino Mildakoro, Via Reĝa Moŝto." "Estimata," diris la reĝo, "mi donos Reĝinon Mildakoro al vi. Venu kun mi."

Kiam ili atingis la palacon, Reĝo Brahmadato vestis sian reĝinon per plej bonaj vestaĵoj kaj ornamaĵoj. Poste li sekrete petis, ke ŝi helpu la malfeliĉan sanktulon reakiri sian purecon. Ŝi

respondis: "Mi scias kion fari, Via Moŝto. Mi savos lin." Poste la reĝo fordonis ŝin kaj ŝi forlasis la palacon kune kun la sanktulo.

Post kiam ili pasis tra la ĉefa pordo, ŝi diris: "Ni bezonas domon por vivi. Reiru kaj petu ĝin de la reĝo." Li reiris kaj petis domon de la reĝo. La reĝo donis al ili kadukan dometon ekster la palaco.

La sanktulo gvidis la reĝinon al ilia nova dometo, sed la reĝino rifuzis eniri. Li demandis ŝin pri la kialo. Ŝi diris: "Estas malpure ĉi tie. Reiru al la reĝo kaj prenu ŝovelilon kaj korbon." Li obeis kaj post kiam li revenis, ŝi ordonis lin fari ĉiujn purigojn. Li eĉ ŝmiris la murojn kaj plankon per freŝa bovfekaĵo.

Poste ŝi ordonis lin iri al la palaco kaj alporti ŝian liton, seĝon, lampon, littukon, kuirpoton kaj akvokruĉon sinsekve. Ŝi ordonis lin preni ĉiun el ĉio unufoje, kaj li obeis devoplene. Ŝi ordonis lin alporti akvon por ŝia bano kaj ankaŭ pretigi multajn aliajn objektojn. Li portis akvon por ŝia bano kaj poste aranĝis la liton. Fine ili sidiĝis ŝultro-ĉe-ŝultre sur la lito. Subite ŝi kaptis lin je la barbo kaj forte skuis lin tien kaj reen. Tirante lin al si, ŝi diris: "Ĉu vi memoras, ke vi estas sanktulo kaj pastro?"

Nur tiam li sin liberigis el la freneza enamiĝo kaj ekkonsciis, kiu li estas. Regajnte memkonsciencon, li pensis: "Ho, en kiel kompatindan situacion mi

falis! Mi blindiĝis pro mia avideco kaj fariĝis ĝia sklavo. Je la komenco de nura ekvido al virino, la freneza deziro povos konduki min en inferan mondon. Mia korpo estis brulanta, kiel sago de deziro trafis min je la koro, sed ne estiĝis sanganta vundo! Mi ne plu vidu ŝian korpon kiel realan. Mia propra malsaĝo kaŭzis al mi ĉiujn suferojn."

Poste li diris laŭte: "Hodiaŭ mi redonos la saĝan Reĝinon Mildakoro al la nobla Reĝo Brahmadata. Poste mi reflugos al mia arbara hejmo!"

Akompaninte ŝin en la palacon, li diris al la reĝo: "Mi ne plu deziras vian reĝinon. Antaŭ ol mi havis ŝin, ŝi estis mia nura deziro. Post kiam mi havis ŝin, unu deziro

kondukis al alia senfine, nur ĝis infero."

Per siaj inteligenteco kaj vivscio la saĝa Reĝino Mildakoro oferis grandan kontribuon al la sanktulo. Anstataŭ profiti de lia malforteco, ŝi repurigis lin.

En perfekta trankvileco la Iluminiĝinto leviĝis en la aeron, faris predikadon al la reĝo, kaj poste magie flugis al arbaro de Himalajo. Li neniam revenis en la ordinaran mondon. Post jaroj da meditado en paco kaj plezuro, li mortis kaj renaskiĝis en alta ĉiela mondo.

La moralinstruo estas: Avideco sklavigas kaj saĝo liberigas.

## 63. FRATINECO, EDZINECO KAJ PATRINECO



### [**Inteligenta Virino**]

Iam antaŭe kelkaj banditoj prirabis vilaĝon kaj fuĝis en densan arbaron. Pluraj vilaĝanoj postkuris, ĉirkaŭis la arbaron kaj serĉis la banditojn, sed trovis neniun.

Kiam la vilaĝanoj iris el la arbaro, ili vidis tri kampulojn plugantajn en la kampo. Ili do tuj kaptis la kampulojn kaj diris: "Aha! vi banditoj ŝajnigas vin senkulpaj kampuloj kaj eĉ interesiĝas pri plugado! Venu kun ni al la reĝo, rabistoj!" Ili ligis ilin kaj kondukis ilin kiel kaptitojn

al la reĝo. La reĝo ŝlisis la kampulojn en la palaca malliberejo.

Poste virino frekventis la palacan korton. Dum kelkaj tagoj ŝi venis kaj ploris kvazaŭ en funebrado.

Iutage la reĝo aŭdis ŝian ploradon kaj envenigis ŝin. Li demandis, kial ŝi ploris. Ŝi diris: "Mi aŭdis, ke ĉiuj el miaj edzo, filo kaj frato estas malliberigitaj de vi, Via Reĝa Moŝto."

La reĝo ordonis alvenigi la tri virojn el la malliberejo. Estante malavara reganto, li diris al la virino: "Mi donos al vi unu el la tri. Kiun vi elektos?"

La virino demandis: "Ĉu vi ne povas doni al mi ĉiujn tri, Via Reĝa Moŝto?" La reĝo respondis: "Ne, mi ne povas."

Post zorgema pripenso, ŝi diris: "Se vi ne donos al mi ĉiujn tri, donu mian fraton al mi, Via Reĝa Moŝto."

La reĝo surpriziĝis pri ŝia elekto. Li demandis: "Vi devus elekti vian edzon aŭ filon. Kial vi volas vian fraton anstataŭe?"

La saĝa virino respondis: "Ho, Via Reĝa Moŝto. Kiam mi eliros sur la vojon, mi povos facile trovi novan edzon. Kaj poste mi povos naski alian filon. Edzo kaj filo estas facile haveblaj por mi en tiu ĉi mondo. Sed miaj gepatroj jam mortis, do mi neniam povos havi alian fraton!"

La reĝo emociiĝis pro la inteligenteco kaj penskapablo de la simpla virino. Eĉ iuj el liaj ministroj ne havis tiel grandan saĝon kiel ŝi. Do li decidis rekompenci ŝin.



Li diris: "Mi redonos al vi ĉiujn tri, viajn fraton, edzon kaj filon."

La moralinstruo estas: Kiu havas saĝan fratinon, tiu estas fortuna frato.

## 64. 3000 NASKIĜOJ



### [Renaskiĝo]

Iam la iluminiĝinta Bodisatvo naskiĝis en ordinara familio. Estis hazarde, ke li havis la saman patron en siaj sekvaj 500 vivoj. Poste la patro renaskiĝis kiel lia onklo en la sekvaj 500 vivoj kaj kiel lia avo en aliaj sekvaj 500 vivoj.

En la sekvaj 500 vivoj li havis saman patrinon, kiu renaskiĝis kiel lia onklino en sekvaj 500 vivoj kaj fine kiel lia avino en aliaj sekvaj 500 vivoj.

Ŝajne mirinde, ke post 3000 renaskiĝoj la viro de 1500 vivoj kaj la virinoj de 1500

vivoj renaskiĝis kaj fariĝis geedzoj, sed la Bodisatvo renaskiĝis kun malsamaj gepatroj, do li saĝe respektis ĉiujn, ne nur la gepatrojn de sia ĉifoja renaskiĝo.

La moralinstruo estas: Ni ĉiuj rilatas iel unuj al aliaj.

## 65. OBSTINEMA SERPENTO



### [Firmvoleco]

Iam estis kuracisto, kiu lertis en kuracado de serpentmordo. Iutage lin invitis parenco de viro, kiu estis mordita de mortige venena serpento.

La kuracisto diris al ili: "Mi havas du metodojn por kuraci la mordvundon. La unua metodo estas kuraci ĝin per medicinaĵo. La alia estas kapti la serpenton, kiu mordis lin, kaj devigi ĝin elsuĉi sian propran venenon." La familianoj diris: "Ni trovos la serpenton kaj devigos ĝin elsuĉi la venenon."

Post kiam oni kaptis la serpenton, la kuracisto demandis ĝin: "Ĉu vi mordis tiun ĉi viron?" "Jes, mi mordis lin," respondis la serpento. "Bone," diris la kuracisto, "vi devas suĉi vian propran venenon el lia vundo." Sed la obstinema serpento respondis: "Elsuĉi mian venenon? Ne! Mi neniam tion faris kaj faros!"

La kuracisto estigis fajron el lignaĵo kaj diris al la serpento: "Se vi ne elsuĉos vian venenon, mi ĵetos vin en la fajron kaj forbruligos vin."

Sed la serpento jam faris firman decidon. Ĝi diris: "Mi preferas morti!" Kaj ĝi ekmoviĝis al la fajro.

La kuracisto lerta en kuracado de serpentmordo neniam vidis tian okazaĵon

antaŭe en sia vivo. Li ekkompatis la bravan serpenton kaj detenis ĝin iri en la fajron. Li forigis la venenon el la suferanta viro per siaj medicinaĵo kaj sorĉvortoj.

La kuracisto admiris firmvolecon de la serpento. Li sciis, ke se ĝi uzos sian firmvolecon en bona maniero, ĝi plibonigos sian konduton. Do li instruis al ĝi la Kvin Trejnajn Ŝtupojn por eviti malbonajn kondutojn. Poste li liberigis ĝin kaj diris: "Iru en paco kaj damaĝu neniun."

La moralinstruo estas: Firmvoleco gajnas respekton.

## 66. ŜOVELILA SAĜULO



[Rezignado]

Iam antaŭe, la Iluminiĝinto naskiĝis en familio de legomĝardenisto. Post kiam li elkreskis, li prilaboris parcelon da kampo per sia ŝovelilo. Li plantis herbojn, kukurbojn, melonojn, kukumojn kaj aliajn legomojn. Li vendis legomojn por teni sian simplan vivon.

La ŝovelilo estis lia nura posedaĵo en la tuta mondo. Li portis ĝin kiel arbara monaĥo portis sian irbastonon. Pro tio li famiĝis kiel "Ŝovelila Saĝulo".

Iutage li pensis: "Kian bonon al mi

kondukos la ordinara vivo de ĝardenisto? Mi rezignos tiun ĉi vivon kaj iros mediti en la arbaro. Tiam mi fariĝos trankvila kaj feliĉa." Do la Ŝovelila Saĝulo kaŝis sian ŝovelilon, la ununuran posedaĵon, kaj fariĝis arbara meditanto.

Post nelonge li eksopiris pri sia ununura posedaĵo, la ŝovelilo. Li tiel maltrankviliĝis pri sia ŝovelilo, ke li neniel povis forigi ĝin el sia menso, kiel ajn li klopodis! Ŝajnis, ke la praktikado de meditado estis senutila, li do rezignis ĝin. Li reprenis sian ŝovelilon kaj rekomencis sian ordinaran vivon kiel ĝardenisto de legomoj.

Post nelonge la Ŝovelila Saĝulo denove rezignis la ĉiutagan vivon, kaŝis sian



ŝovelilon kaj fariĝis arbara meditante. Li ne sukcesis forigi la ŝovelilon el sia menso, kaj denove vivis kiel ĝardenisto. Sume, tio ripetiĝis ses fojojn.

La Ŝovelila Saĝulo rezignis sian arbaran meditadojn en la lasta fojo. Li fine konsciis, ke ĝuste pro sia eluzita ŝovelilo li jam iris tien kaj reen sepfoje. Do li firmvole decidis forĵeti ĝin en profundan riveron kaj poste reiri al la arbaro kaj resti tie por ĉiam.

Li portis sian ŝovelilon al riverbordo. Li pensis: "Mi ne vidu, kien tiu ĉi ŝovelilo falos en la rivero. Alie, ĝi denove tentos min kaj detenos min de la meditado." Do ferminte siajn okulojn, li svingis la ŝovelilon cirkle super sia kapo trifoje, kaj

lasis ĝin flugi en la mezon de la rivero. Konsciinte, ke li ne plu povos trovi la ŝovelilon, li kriis kiel muĝis leono: "Mi jam venkis! Mi jam venkis! Mi jam venkis!"

Hazarde okazis, ke la reĝo de Benareso preterrajdis en tiu ĉi momento. Li revenis, subpremite ribelon en landlima vilaĝo.

Post kiam li sin banis en la rivero, li sidiĝis sur sian majestan kortegan elefanton por iri al Benareso en triumfa procesio.

Kiam li aŭdis la triumfan krion de la Iluminiĝinto, li diris al siaj ministroj: "Aŭskultu. Kiu krias kiel muĝas leono: 'Mi jam venkis'? Kiun li jam venkis? Konduku lin al mi!"

Kiam ili kondukis Ŝovelilan Saĝulon al li, la reĝo demandis: "Mi estas venkinto ĉar mi gajnis la militon. Vi diris, ke vi jam venkis. Kiun vi venkis?"

La Iluminiĝinto respondis: "Via Reĝa Moŝto, eĉ se vi venkis cent milojn da malamikoj, tiu venko estas sensignifa se vi ankoraŭ havas malbonajn pensojn kaj dezirojn en via menso. Sed venkinte la avidecon en mia menso, mi eksciis, ke mi jam gajnis la militon kontraŭ la malbonaj pensoj!"

Dum sia parolado, li koncentris sian menson sur la akvon en la rivero, poste sur la ideon pri akvo mem, kaj atingis altan mensstaton. En sidpozo li leviĝis en la aeron. Li predikis tiujn vortojn de la

Vero al la reĝo: "Venki malamikojn, kiuj revenadas batali kun vi foje kaj refoje, ne estas vera venko. Sed se vi venkas la malbonaĵon en via propra menso, neniu povas rabi la veran venkon de vi!"

Kiam la reĝo aŭdis tiujn vortojn, ĉiuj malbonaj pensoj forlasis lian menson. Tio estigis al li la deziron, ke li rezignu la ordinaran mondon kaj ekserĉu verajn pacon kaj feliĉon. Li demandis: "Kien vi iras, saĝulo?" La saĝulo respondis: "Mi iros al Himalajo por praktiki meditado." La reĝo diris: "Bonvolu preni min kune kun vi. Ankaŭ mi deziras rezigni la ordinaran vivon en la mondo." Kiam la reĝo turniĝis norden kaj ekvojaĝis kun la Ŝovelila Saĝulo, tion faris ankaŭ la

tuta armeo kaj ĉiuj kortegaj ministroj kaj servistoj.

Baldaŭ Benareson atingis la novaĵo, ke la reĝo kaj ĉiuj sekvantoj forlasis ordinaran mondon kaj sekvis Ŝovelilan Saĝulon al Himalajo. Ĉiuj en la tuta urbo Benareso sekvis ilin al la nordaj montaroj. Benareso vakiĝis!

La granda migrado de homoj vekis atenton de Dio Sakao, la reĝo de Ĉielo 33. Li neniam vidis, ke tiel multaj homoj rezignis siajn mondajn povojn samtempe. Li ordonis arkitektojn de la dioj konstrui loĝejojn en Himalajaj arbaroj por ĉiuj homoj.

Kiam ili atingis Himalajon, la Ŝovelila Saĝulo anoncis la unua, ke li jam rezignis

ordinaran mondon por ĉiam. Poste ĉiuj liaj sekvantoj faris la samon. Neniama antaŭe tiel multaj homoj rezignis la mondan povon.

La Ŝovelila Saĝulo disvolvis tion, kion sanktuloj nomis "Kvar sanktaj mensstatoj". La unua estas amo al ĉiuj; la dua estas kompatemo al ĉiuj suferantoj; la tria estas ĝojo por ĉies ĝojoj kaj la kvara estas trankvileco kaj paco eĉ antaŭ malfacilaĵoj aŭ fatalaĵoj.

Li instruis al la sekvantoj plialtan meditadon. Per granda strebo ili ĉiuj atingis la altan mensstaton, kiu kondukis ilin renaskiĝi en ĉielaj mondoj.

La moralinstruo estas: Nur unu posedaĵo sufiĉas deteni la menson de

sercado al libereco.

## 67. KOLEKTANTO DE MALSEKA BRULLIGNO



[Mallaboremo]

Iam antaŭe estis mondfama instruisto kaj sanktulo en urbo Takasila. Li havis ĉe si 500 lernantojn.

Iutage tiuj 500 lernantoj iris en arbaron por kolekti brullignon. Unu el ili renkontis senfolian arbon. Li pensis: "Kiel fortuna mi estas! Tiu ĉi arbo eble estas morta kaj seka, perfekta por la brulligno. Pro kio mi ankoraŭ urĝas? Mi dormetos dum aliaj okupiĝos serĉante la brullignon." Do li sternis sian jakon sur la teron, kuŝiĝis kaj



baldaŭ endormiĝis ronkante laŭte.

Poste ĉiuj aliaj lernantoj portis siajn brullignajn faskojn al Takasila kaj trapasis la ronkantan dormanton sur la vojo. Ili piedbate vekis lin kaj diris: "Vekiĝu! Estas tempo por reveni al nia instruisto."

La mallaborema lernanto subite vekigis kaj frotis al si la okulojn. Ankoraŭ kun dormemo, li grimpis sur la arbon. Li derompis la branĉojn kaj ektrovis, ke ili efektive estis verdaj, tute ne sekaj. Kiam li derompis branĉon, ĝi resaltis kaj trafis lin je la okulo. Li kolektis faskon da verda brulligno, kovrante sian okulon per unu mano. Poste li portis ĝin al Takasila, kuratingante la aliajn. Li revenis plej malfrue, kaj ĵetis sian brullignan faskon

sur la supron de brullignaĵa stako.

Samtempe al ili venis invito pri religia ceremonio, kiu okazis sekvan tagon en malproksima vilaĝo. La sanktulo diris al siaj 500 lernantoj: "Tio estas bona trejnado por vi. Matenmanĝu pli frue en la sekva mateno kaj iru al la vilaĝo por la religia servo. Kiam vi revenos, alportu mian porcion de oferaĵoj kune kun la viaj."

La lernantoj vekigis frue en la sekva mateno. Ili vekis la kuiristinon de la lernejo kaj petis ŝin kuiru kaĉon kiel matenmanĝon. Ŝi iris en mallumo al la stako de brullignaĵo. Ŝi prenis la plej supran faskon de la mallaboremulo. Ŝi portis ĝin en la kuirejon kaj klopodis estigi fajron por la kuirado. Sed kvankam

ŝi blovadis, ŝi ne sukcesis elfari fajron. La brulligno estis verda kaj malseka.

Kiam leviĝis la suno, ankoraŭ ne estiĝis la fajro por la kuirado. La lernantoj kriis: "Estos tro malfrue por ni iri al la vilaĝo." Do ili iris al la instruisto.

La instruisto demandis ilin: "Kial vi ankoraŭ restas ĉi tie? Kial vi ne foriris?" Ili diris al li: "Mallaborema sentaŭgulo dormis dum ni laboris. Li grimpis sur arbon kaj vundis sian okulon. Li kolektis nur verdan brullignon kaj ĵetis ĝin sur la supron de la brullignaĵa stako. La kuiristino prenis ĝin kaj ne sukcesis fari fajron, ĉar la brulligno estas verda kaj malseka. Nun estas tro malfrue por ni iri al la vilaĝo."

La mondfama instruisto diris:  
"Malsaĝa mallaboremulo kaŭzas  
malfacilaĵon al vi ĉiuj. Post kiam oni  
prokrastas hodiaŭ farendan laboron ĝis  
poste, ili baldaŭ ekpentos."

La moralinstruo estas: Ne prokrastu  
hodiaŭan laboron ĝis morgaŭ.

## 68. ELEFANTA REĜO BONECO



### [Malavareco kaj Sendankemo]

Iam antaŭe la Iluminiĝinto naskiĝis kiel elefanto. Li estis ĉarme blanka kaj glimbrila kiel polurita arĝento. Liaj piedoj estis tiel glataj kaj brilaj kiel la plej fajna lako. Lia buŝo estis tiel ruĝa kiel la plej delikata ruĝa tapiŝo. Kaj liaj mirindaj okuloj similis al valoraj juveloj brilantaj en kvin koloroj: blua, flava, ruĝa, blanka kaj karmezina.

La grandiozan belecon de la majesta elefanto montras la ekstera formo de la Iluminiĝinto. Sed tio estis nur pala reflekto

de lia interna beleco, ĉar dum multaj antaŭaj vivoj li pleniĝis de Dek Perfektoj: energio, decidemo, honesteco, boneco, rezignemo de kroĉiĝo al ordinara mondo, kvieteco, saĝo, pacienco, malavareco kaj certe, kompatemo.

Kiam li plenkreskis, ĉiuj aliaj elefantoj en Himalajaj arbaroj venis sekvi kaj servi lin. Post nelonge 80,000 elefantoj loĝis en lia regno. Tiel granda nacio densiĝis de loĝantoj kaj pleniĝis de distraĵoj. Por vivi pli kviete, li forlasis la aliajn kaj loĝis sola en sekreta parto de la arbaro. Li famiĝis kiel Elefanta Reĝo Boneco pro siaj bonkoreco kaj pureco facile videblaj de ĉiuj aliaj.

Samtempe arbaristo de Benareso

vojaĝis en Himalaja montaro. Li serĉis valoraĵojn, kiujn li povis vendi en Benareso. Post nelonge li perdis sian senson de orientiĝo. Li kuris tien kaj reen por trovi la ĝustan vojon, sed vane. Baldaŭ li laciĝis kaj ektimis morton. Li tutkorpe tremis kaj laŭte ploris pro timo.

La Elefanta Reĝo Boneco aŭdis la ploradon de la kompatinda viro. Li tuj pleniĝis de bedaŭro kaj kompatemo. Dezirante laŭeble helpi lin, li ekiris tra la arbaro al la viro.

Sed kiam la viro vidis, ke la giganta elefanto alproksimiĝis, li estis tiel timigita, ke li tuj ekkuregis. Kiam la saĝa elefanto vidis tion, li ĉesigis moviĝon. Vidinte tion, la arbaristo ankaŭ haltis. Poste, kiam Reĝo

Boneco ekiris al li, li denove ekkuris, kaj kiam la elefanto haltis, li ankaŭ haltis.

En tiu momento la viro pensis: "Tiu estas nobla elefanto. Kiam mi kuris, li haltis. Kaj kiam mi haltis, li iris al mi. Sendube li ne intencas damaĝi min. Eble li volas helpi min anstataŭe!" La ideo donis al li kuraĝon por resti kaj atendi.

La Elefanta Reĝo Boneco malrapide proksimiĝis al li kaj demandis: "Mia homa amiko, kial vi vagadis plorante en paniko?"

"Via Elefanta Moŝto," respondis la viro, "mi perdis senson de direktoj kaj devojiĝis. Mi timas, ke min trafos morto!"

Poste la Iluminiĝinto kondukis la arbariston al sia propra sekreta loĝejo.



Li konsolis kaj regalis lin per fruktoj kaj nuksoj plej bonaj en tuta Himalaja regiono. Post kelkaj tagoj li diris: "Ne timu, mia amiko. Mi kondukos vin al la loko, kie homoj vivas. Sidiĝu sur mian dorson." Poste li portis la viron al la regiono de homoj.

Rajdante komforte sur la honora estaĵo, la viro pensis: "Se oni demandas, kie mi estis, mi respondos al ili pri ĉio." Do li faris noton pri ĉiuj landmarkoj, portate sekure de la bonkora elefanta reĝo.

Kiam ili iris el la densa arbaro proksime al la vojo de Benareso, la Elefanta Reĝo Boneco diris: "Mia bona amiko, iru laŭ la vojo al Benareso. Bonvolu diri al neniuj, kie mi loĝas, ĉu oni

demandos aŭ ne." Adiaŭinte per tiuj vortoj, la ĝentila elefanto turniĝis kaj reiris al sia loĝejo sekura kaj sekreta.

La viro facile trovis sian vojon al Benareso. Iutage dum li vizitis bazaron, li iris al vendejoj de eburaj skulptistoj, kiuj skulptis eburon en delikatajn kaj belajn statuojn, pejzaĝojn kaj formojn. La arbaristo demandis ilin: "Ĉu vi aĉetas dentegojn de vivantaj elefantoj?"

La skulptistoj respondis: "Kian demandon vi faris! Ĉiuj scias bone, ke dentegoj de vivantaj elefantoj estas multe pli valoraj ol tiuj de la mortaj." "Do mi portos al vi iom da dentegoj de vivanta elefanto," diris la arbaristo.

La viro portis akran segilon kun aliaj

bezonajoj, kaj iris al la loĝejo de Reĝo Boneco pro la avidemo nur al mono, ignorante la sekurecon de la elefanta reĝo kaj la dankemon al tiu, kiu savis lian vivon.

Kiam li alvenis, la elefanta reĝo demandis: "Kial vi revenis, mia homa amiko?" Plektante rakonton, la viro respondis: "Via Elefanta Moŝto, mi estas malriĉulo vivanta tre mizere. Nun mi estas en granda malfacilaĵo, do mi venas por peti peceton da dentego de vi. Se vi voluntas doni ĝin al mi, mi portos ĝin hejmen kaj vendos ĝin. Tiam mi povos min vivteni dum iom pli longa tempo."

Pro kompato al la viro, la Elefanta Reĝo Boneco diris: "Kompreneble, mia

amiko, mi donos pecegon da dentego!  
Ĉu vi prenis segilon kun vi?" "Jes, Via  
Elefanta Moŝto," diris la arbaristo, "mi  
portas segilon kun mi." "Bone," diris la  
malavara Reĝo Boneco, "fortranĉu ambaŭ  
miajn dentegojn!"

Dirinte, la elefanto genuiĝis kaj oferis  
siajn speciale arĝentblankajn dentegojn.  
Sen ajna bedaŭro, la viro forsegis grandajn  
eburajn pecojn de ambaŭ dentegoj.

La Iluminiĝinto levis ambaŭ  
dentpecojn per sia rostro. Li diris:  
"Bona amiko, mi donas miajn amindajn  
dentojn ne pro tio, ke mi malŝatas ilin  
kaj volas forigi ilin, nek pro tio, ke ili  
estas senvaloraj al mi. Sed miloble kaj  
eĉ centmiloble amindas kaj valoras la

dentegoj de ĉioscia saĝo, kiu kondukas nin al realiĝo de ĉiu Vero."

Donaci la belajn dentegojn al la viro estis la deziro de la elefanto, ke lia perfekta malavareco povos konduki lin al la plej granda saĝo.

La viro revenis hejmen kaj forvendis ambaŭ eburajn pecojn. Sed post nelonge li forkonsumis la tutan monon. Do li denove revenis al la Elefanta Reĝo Boneco. Li petis lin: "Via Elefanta Moŝto, la mono gajnita de mi per vendo de via eburo nur sufiĉis por pagi miajn ŝuldojn. Mi ankoraŭ estas malriĉulo vivanta tre mizere. La vivo estas ankoraŭ tre malfacila en Benareso, do bonvolu doni al mi la restajn partojn de viaj dentegoj, malavarulo!"

Senhezite la elefanta reĝo oferis la restajn partojn de siaj dentegoj. La viro forsegis ĉion, kion li povis vidi, ĝis dentradiko en la kranio de la elefanto! Li forlasis sen vorto de dankemo. La bonkora elefanto estis nenio alia ol bankkonto por li. Li portis la eburon al Benareso, vendis ĝin kaj forkonsumis la monon kiel antaŭe.

La arbaristo denove revenis al la loĝejo de la Elefanta Reĝo Boneco. Li denove petis lin: "Honora elefanta reĝo, estas tre malfacile por vivi en Benareso. Kompatu min kaj lasu min havi la restaĵon de via eburo, la radikojn de viaj dentegoj."

Perfekta malavareco nenion retenas. Do la elefanta reĝo genuiĝis kaj oferis siajn restajn radikojn de eburo. La

sendankemulo neniom zorgis pri la elefanto. Li staris sur la majestan rostron similan al dika arĝenta ĉeno. Li grimpis supren kaj sidiĝis inter pure blankaj tempioj sur la granda kapo simila al neĝkovrita Himalaja kupolo. Poste li krude enfosis per sia tuta forto. Li frotis kaj forŝiris la molajn karnojn de la radikoj de la iamaj belaj dentegoj. Per sia malakra segilo li tranĉis kaj segis la eburajn radikojn el la kranio.

Laŭdire troviĝas multaj mondoj: la infera mondo de torturo, la mondoj de malsataj demonoj, de bestoj kaj de homoj. Ankaŭ estas multaj ĉielaj mondoj de la malplej supra ĝis la plej supra. En ĉiuj mondoj estas milionoj da vivestaĵoj, kiuj

iam aŭ en alia tempo naskiĝis kaj vivis kiel elefantoj. Rakontantoj de la historio diris, ke kvankam oni ne scias kial, ĉiuj elefantoj eksentis la doloregon de la grandulo, la Elefanta Reĝo Boneco.

La arbaristo forlasis portante la sangoplenajn eburajn radikojn. Pensante, ke estos neniuj motivoj revidi la elefanton, li ne sin ĝenis por montri al li la signon de dankemo kaj respekto.

La vasta kaj firma tero, kiu estas sufiĉe forta por facile subteni grandajn montojn kaj ankaŭ povas surporti la plej naŭzajn malpuraĵojn kaj fiodorojn, ne povus toleri kaj subteni la gigantan fikonduton de la kruelulo. Do kiam li iris el la vido de la suferanta elefanto, la granda tero fendiĝis



sub liaj piedoj. Fajro ŝprucis el la plej malalta infero, glutis lin en brile ruĝajn flamojn kaj tiris lin suben al la fino de lia sorto.

La moralinstruo estas: La nedankemuloj ĉion faras senskrupule, kaj pro tio li fosas sian propran tombon.

## 69. KVAROPO SUR LIGNOŜTIPO



### [Dankemo]

Antaŭe Reĝo Brahmadato de Benareso havis filon ege malbonan. Post kiam li plenkreskis, li fariĝis tre malica kaj kruela. Li ĉiam klopodis pruvi, ke li estas pli kruda ol ĉiuj aliaj. Kun manio torturi aliajn, li konstante molestis homojn kaj estigis batalojn. Li kutime parolis kun fiodoro de malpuraĵo kvazaŭ el defluilo. Li ĉiam facile furioziĝis, kvazaŭ siblanta serpento piedpremata.

Homoj en kaj ekster la palaco fuĝis de li kvazaŭ de homvora demono malsata. Ili

laŭeble evitis lin kiel eron de malpuraĵo en la okuloj. Malantaŭ lia dorso ĉiuj nomis lin "Malica Reĝido". Unuvorte li estis ege malbona homo!

Iutage la reĝido decidis eliri por naĝi. Li iris al rivero kune kun siaj servantoj kaj asistantoj. La ĉielo subite mallumiĝis kvazaŭ en la nokto. Forta ŝtormo okazis. Estante tiel kruda kaj senracia, la reĝido ĉiam provis montri sian sentimecon. Do li blekis al la servantoj: "Portu min en la mezon de la rivero kaj banu min. Poste reportu min al la riverbordo."

Ili portis lin en la riveron laŭ lia ordono. Poste, ili diris unuj al aliaj: "Nun estas nia ŝanco! La reĝo neniam povos eltrovi, kion ajn ni faris ĉi tie. Do ni

mortigu la Malbonan Reĝidon ĉeloke. Dronu en inundo, vi sentaŭgulo!" Tiel ili ĵetis lin en la ŝtorme torentan fluon.

Kiam ili revenis al la bordo, la aliaj demandis, kie estas la reĝido. Ili respondis: "Ni ne scias. Kiam ekpluvis, li naĝis pli rapide ol ni kaj certe jam reiris al Benareso."

Post kiam ili revenis en la palacon, la reĝo demandis: "Kie estas mia filo?" Ili respondis: "Ni ne scias, Via Reĝa Moŝto. Kiam okazis la ŝtormo, ni pensis, ke li jam reiris antaŭ ni." Reĝo Brahmadata venigis serĉistaron kaj komencis serĉi la reĝidon. Ili serĉadis zorgeme sur ĉiuj vojoj al la riverbordo, sed ne trovis lin.

Jen estis la okazaĵo. En la venta kaj

pluva mallumo la reĝido drivis en la torenta rivero. Feliĉe li ekkaptis flosantan arbotrunkon. Li tenis ĝin firme por protekti sian karan vivon. Flosante laŭ la rivero, la krudulo timis sian eventualan morton, do li ploregis kiel bebo timema kaj senpova.

Okazis hazardo, ke antaŭ nelonge, granda riĉulo mortis en Benareso. Li iam kaŝis trezoron de 40 milionoj da ormoneroj en la bordo de la sama rivero por konservi ĝin. Pro sia avido al la trezoro, li renaskiĝis kiel mizera serpento por gardi sian trezoron rampante sur la ventro.

En proksima loko sur la riverbordo estis alia riĉa avarulo, kiu kaŝis trezoron

de 30 milionoj da ormoneroj. Pro sia firma kroĉiĝo al la riĉaĵo, li renaskiĝis kiel akvorato por gardi sian kaŝitan trezoron.

Kiam la ŝtormo okazis, la serpento kaj akvorato estis pelitaj el siaj truoj kaj drivis en la torentan riveron. Por eviti dronon ankaŭ ili hazarde kaptis la saman arbotrunkon, sur kiu ploregis la timigita reĝido. La serpento grimpis sur unu flankon kaj la akvorato sur la alian.

Proksime estis alta kapokarbo, sur kiu loĝis juna papago. Kiam la riverakvo leviĝis pro la ŝtormo kaj inundo, la kapokarbo elradikiĝis kaj falis en la riveron. Apenaŭ la papago provis forflugi, kiam la vento kaj pluvo pelis lin sur la saman lignoŝtipon, al kiu alkroĉiĝis la

serpento, akvorato kaj Malbona Reĝido.

Nun la kvar vivestaĵoj sur la lignoŝtipo flosis al kurbiĝo de la rivero. Iu sanktulo loĝis trankvile en malgranda kabano proksime. Harzarde okazis, ke li estas la Bodisatvo, la Iluminiĝinto. Li naskiĝis en riĉa altklasa familio de Urbo Kasi. Kiam li plenkreskis, li rezignis siajn riĉecon kaj pozicion, kaj ekloĝis sola ĉe la rivero.

Kiam la sanktulo aŭdis la panikan kriadon de la malbona reĝido en la noktomezo, li pensis: "Tio aŭdiĝas kiel timigita homo. Pro mia kompatemo mi ne povas ignori lin. Mi devas savi lin."

Li kuregis al la rivero kaj kriis. "Ne timu! Mi savos vin!" Li saltis en la torentan riveron, kaptis la lignoŝtipon, kaj

tiris ĝin sur la bordon per sia tuta forto.

Li helpis la reĝidon surbordiĝi sekure. Rimarkinte la serpenton, akvoraton kaj papagon, li portis ilin kaj kondukis la reĝidon al sia komforta kabano. Li bruligis kuirfajron, kaj ĝentile varmigis la bestojn ĉe la fajro pensinte pri ilia malforteco. Post kiam ili varmiĝis kaj sekiĝis, li metis ilin apude, kaj petis la reĝidon sin varmigi. La sanktulo elprenis fruktojn kaj nuksojn, nutris la plej senpovajn bestojn unue, kaj poste regalis la atendantan reĝidon.

Estis ne mirinde, ke pro tio furiozis la Malbona Reĝido! Li pensis: "La stulta sanktulo ne zorgas pri mi, granda kortega princo. Anstataŭe, li donis pli altan pozicion al la tri sencerbaj bestoj!" Tiel



pensante, li ekhavis venĝeman malamon kontraŭ la milda Bodisatvo.

En la sekva tago la sanktulo sekigis la lignoŝtipon sub la suno. Poste li apartigis kaj bruligis ĝin, kuiris ilian manĝaĵon kaj tenis ilin varmetaj. Post kelkaj tagoj la kvar savitoj de tiu sama ŝtipo fariĝis fortaj kaj sanaj.

La serpento iris al la sanktulo adiaŭi lin. Ĝi volvis sian korpon sur la tero, arkigis sin supren, kaj kapklinis respektplene. Ĝi diris: "Estimata Majstro, vi faris grandan favoron al mi! Mi dankas vin. Mi ne estas malriĉa serpento. En certa loko mi enterigis trezoron de 40 milionoj da ormoneroj, kaj mi ĝojplene oferos ĝin al vi, ĉar por ĉiuj la vivo estas senpreza!

Kiam vi bezonos monon, nur iru al la riverbordo kaj kriiu, 'Serpento! Serpento!'"

Ankaŭ la akvorato iris al la sanktulo adiaŭi lin. Ĝi sin levis sur la postaj kruroj kaj riverence klinis sian kapon respektoplene. Li diris: "Estimata Majstro, vi faris grandan bonon por mi! Mi dankas vin por tio. Mi ne estas malriĉa akvorato. En certa loko mi enterigis trezoron de 30 milionoj da ormoneroj, kaj mi ĝojplene oferos ĝin al vi, ĉar por ĉiuj la vivo estas senpreza! Kiam vi bezonos monon, nur iru al la riverbordo kaj kriiu, 'Rato! Rato!'"

Tiaj dankemaj agoj de la serpento kaj akvorato estis tute malsamaj ol en iliaj antaŭaj avaraj vivoj!

Poste venis la papago adiaŭi la

sanktulon. Ĝi riverence klinis sian kapon respektoplene kaj diris: "Estimata Majstro, vi faris grandan helpon al mi! Mi estas dankema al vi, sed mi posedas nek oron nek arĝenton. Tamen, mi ne estas malriĉa papago. Kiam ajn vi bezonos la plej bonan rizon, nur iru al la riverbordo kaj krii 'Papago! Papago!' Tiam mi venigos ĉiujn miajn parencojn el ĉiuj arbaroj de Himalajo kaj ni alportos al vi ĉarojn da plej valora bonodora ruĝa rizo. Por ĉiuj la vivo estas senpreza!"

Fine la Malbona Reĝido venis al la sanktulo. Lia menso pleniĝis de venena venĝemo, do li pensis nur pri mortigo al la sanktulo se li denove vidos lin. Tamen li diris: "Estimata Majstro, kiam mi fariĝos

reĝo, bonvolu veni al mi kaj mi provizos al vi la 'Kvar Necesajojn por Vivo!'" Li reiris al Benareso kaj baldaŭ fariĝis la nova reĝo.

Post nelonge la sanktulo decidis vidi, ĉu la promeso de la kvar vivestaĵoj estas veraj. Unue li iris sur la riverbordon kaj kriis: "Serpento! Serpento!" Aŭdinte lian unuan vokon, la serpento elrampis el sia subtera hejmo. Ĝi riverencis respektoplene kaj diris: "Honorulo, sub ĉi tiu loko estas kaŝitaj 40 milionoj da oromoneroj. Elfosu kaj prenu ilin kun vi!" "Tre bone," diris la sanktulo, "mi venos denove kiam mi bezonos ilin."

Forlasinte la serpenton, li piediris laŭ la riverbordo kaj kriis: "Rato! Rato!" La

akvorato alkuris kaj ĉio okazis ĝuste kiel ĉe la serpento.

Poste, li ekkriis: "Papago! Papago!" La papago tuj flugis malsupren el sia arba hejmo. Ĝi riverencis respektoplene kaj diris: "Honorulo, ĉu vi bezonas ruĝan rizon? Mi alvokos miajn parencojn kaj ni portos al vi la plej bonan rizon el la tuta Himalajo." La sanktulo respondis: "Tre bone! Mi alvenos denove je mia bezono poste."

Fine li enurbiĝis por viziti la reĝon. Li piediris al la reĝa plezura ĝardeno kaj tranoktis tie. Matene, en ege modesta kaj majesta sinteno, li iris kolekti almozmanĝaĵon en la urbo Benareso.

En la sama mateno la maldankema

reĝo sidis sur impone ornamita kortega elefanto kaj gvidis grandan procesion ĉirkaŭ la urbo. Kiam li vidis la Iluminiĝinton de malproksime, li pensis: "Aha! Ĉi tiu mallaborema senhejma vagabondo venas por peti bonon de mi. Mi devas senkapigi lin antaŭ ol li fanfaronos al ĉiuj, kion li faris por mi!"

Do li ordonis siajn servantojn: "Tiu senvalora almozulo certe volas peti ion de mi. Ne lasu lin prokisimiĝi al mi. Tuj arestu lin, ligu liajn manojn malantaŭ la dorso kaj skurĝu lin ĉe ĉiu stratangulo. Konduku lin al la ekzekuttereno ekster la urbo kaj dehaku lian kapon. Poste levu lian korpon sur akrigitan kolonon kaj montru ĝin por ke ĉiuj vidu. Tiamaniere

faru finon al tiaj almozpetantoj!

La servantoj sekvis liajn kruelajn ordonojn. Ili ligis la senkulpan grandulon kiel ordinaran krimulon. Ili skurĝis lin senkompate ĉe ĉiu stratangulo survoje al la ekzekuttereno. Sed kiel ajn forte kaj profunde en lian karnon ili skurĝis lin, li tenis sin dignoplena. Post ĉiu skurĝo li simple diris por ke ĉiuj aŭdu: "Jen pruvo, ke ankoraŭ pravas la malnova onidiro: 'Estas pli da repago tiri mortan lignon el la rivero ol helpi maldankemulon!'"

Iuj spektantoj ekmiris, kial li nur diras tion ĉe ĉiu stratangulo. Ili diris unuj al aliaj: "Eble la suferon de la kompatinda viro kaŭzis maldankemulo." Do ili demandis lin: "Oh, sanktulo, ĉu vi faris

ion por helpi al maldankemulo?"

La sanktulo rakontis la tutan historion al ili, kaj konklude li diris: "Mi savis ĉi tiun reĝon el terura inundo, kaj tiel mi kaŭzis al mi mem la nunan suferon. Mi diras tion nur pro tio, ke mi malobservis la diron de maljunaj saĝuloj."

Aŭdinte la historion, la civitanoj de Benareso koleriĝis kaj diris inter si: "Tiu ĉi bonulo savis la vivon de la reĝo. Sed la reĝo estas tiel kruela, ke li neniel havas dankemon en si. Kiel li povus fari bonojn al ni? Li nur estas danĝero al ni. Ni forigu lin!"

La kolerego de civitanoj sin turnis en ribelon. Oni sin ĵetis al la reĝo kun sagoj, tranĉiloj, bastonoj kaj ŝtonoj. La reĝo



mortis sidante sur la kortega elefanto. Tiam ili ĵetis la kadavron de la iama Malbona Reĝido en fosajon apud la vojo.

Poste ili faris la sanktulon sia nova reĝo. Li regis Benareson tre bone. Iutage li decidis viziti siajn malnovajn amikojn. Do li elrajdis en granda procesio ĝis la riverbordo.

Li kriis: "Serpento! Serpento!" La serpento tuj aperis, esprimis sian estimon kaj diris: "Via Moŝto, vi estas bonvena se vi volas mian trezoron." La reĝo ordonis la servantojn elfosi la 40 milionojn da ormoneroj.

Li iris al la hejmo de la akvorato kaj kriis: "Rato! Rato!" Ankaŭ la rato tuj aperis, esprimis sian estimon kaj diris:

"Via Moŝto, bonvenon se vi volas mian trezoron." Do la servantoj de la reĝo elfosis la 30 milionojn da oromonejoj.

Poste la reĝo kriis "Papago! Papago!" La papago tuj flugis al la reĝo, riverencis respektoplene kaj diris: "Via Moŝto, se vi volas, mi kolektos la plej bonan ruĝan rizon por vi." Sed la reĝo respondis: "Ne nun, mia amiko. Mi petos de vi kiam ni bezonos rizon. Nun ni reiru al la urbo."

Reveninte al la kortega palaco en Benareso, la reĝo metis la 70 milionojn da oromonejoj en sekuran lokon. Li farigis oran bovlon kiel hejmon de la dankema serpento. Li farigis labirinton el la plej bonaj kristaloj por la donacema rato enloĝi. Kaj la bonkora papago transloĝiĝis

en oran kaĝon kun pordo, kiun ĝi povis fermi kaj malfermi de interne.

Ĉiutage la reĝo donis pufigitan rizaĵon kaj la plej dolĉan mielon per oraj teleroj al la serpento kaj papago. Kaj per alia ora telero li donis la plej aroman parfumitan rizon al la akvorato.

La reĝo famiĝis pro sia donacemo al la malriĉuloj. Li kaj liaj tri bestoamikoj kunvivis en perfekta harmonio dum multaj jaroj. Ili ĉiuj renaskiĝis laŭ siaj meritoj post la morto.

La moralinstruo estas: Dankemo estas repago, kiu mem estas rekompencita.

## 70. NOVAJ HEJMOJ DE ARBAJ

### FEOJ



### [Saĝa Konsilo]

Iam la Reĝo de Arbaĵ Feoj mortis kiel ĉiuj aliaj vivestaĵoj. Reĝo Sakao, la reganto de Ĉielo 33, nomumis novan reĝon de Arbaĵ Feoj. Kiel sia unua oficiala ago, la nova reĝo publikigis ordonon, ke ĉiu arba feo elektu arbon por enloĝi, kaj samtempe, ĉiu arbo plezuriĝu kun sia fea enloĝanto.

Vivis saĝa arba feo, kiu estis estro de granda klano. Li proponis al siaj membroj de la klano ne loĝi en la dise starantaj arboj. Anstataŭe estis pli sekure vivi en

densaj arboj ĉe li. La saĝaj arbaj feoj ekloĝis en la arbaro proksime al sia estro.

Sed iuj arbaj feoj estis malsaĝaj kaj arogantaj. Ili diris inter si: "Kial ni devas loĝi en grupo? Ni iru al vilaĝoj, urbetoj kaj urboj loĝataj de homoj. Arbaj feoj loĝantaj tie ricevas la plej bonajn oferaĵojn. Kaj ili eĉ ricevas adoradon de superstiĉaj lokanoj. Kian vivon ni ĝuos tie!"

Do ili iris al vilaĝoj, urbetoj kaj urboj, kaj transloĝiĝis en dise starantajn arbegojn prizorgatajn de homoj. Poste okazis granda ŝtormo en iu tago. La vento blovegis forte kaj furioze. La grandaj kaj pezaj arboj kun branĉoj maljunaj kaj malmolaj ne plu povis stari firme en la ŝtormo. La dikaj branĉoj disfalis, arbotrunkoj rompiĝis en

du partojn, kaj iuj arboj eĉ elradikiĝis. Sed la arboj en la arbaro interapogis unuj al aliaj, kaj povis kliniĝi kaj subteni reciploke en la forta vento. Do ili nek rompiĝis, nek falis.

Detruigi la hejmojn de la arbaj feoj en la vilaĝoj, urbetoj kaj urboj. Ili kunigis siajn infanojn kaj reiris al la arbaro. Ili plendis al la saĝa klanestro pri siaj malfeliĉoj sur la disaj arbegoj en la homa regiono. Li diris: "Tio okazis al la arogantuloj, kiuj ignoras la saĝan admonon kaj mem decidis foriri."

La moralinstruo estas: Malsaĝuloj surdas al saĝaj vortoj.

## 71. FIŜO FARINTA MIRAKLON



[Povo de Vero]

Iam antaŭe la Iluminiĝinto naskiĝis kiel fiŝo en lago de norda Hindio. Multspecaj fiŝoj grandaj kaj malgrandaj vivis kune kun la Bodisatvo en la lago.

Okazis severa sekeco. La pluva sezono ne venis kiel kutime. Mortis la plantaĵoj de homoj, kaj sekiĝis multaj lagoj, lagoj kaj riveroj.

La fiŝoj kaj testudoj sin ŝovis suben kaj penis sin kaŝi en koton, freneze klopodante teni sin malsekaj por eviti la fatalaĵon. La korvoj plezuriĝis de la

okazaĵo. Ili penetrigis siajn bekojn en koton, eltrenis la timigitajn fiŝetojn kaj englutis ilin.

La iluminiĝinto malĝojis pri la doloro kaj morto de aliaj fiŝoj kaj pleniĝis de bedaŭro kaj kompatemo al ili. Li ekkonsciis, ke li estas la sola, kiu povos savi ilin, sed tio estos miraklo.

La vero estis, ke li sin tenis senkulpaneniam damaĝinte vivon de la aliaj. Li decidis alvoki pluvon el la ĉielo por savi siajn parencojn el iliaj mizero kaj morto per la povo de sia bonkondata vero.

Li sin tiris el sub la nigra koto. Li estis granda fiŝo, kaj la koto faris lin tiel nigra kiel polurita ebono. Li malfermis siajn okulojn brilantajn kiel rubenoj, rigardis



supren en la ĉielon kaj vokis la pluvan dion Pajuna. Li kriis laŭte: "Ho, mia amiko Pajuna, dio de pluvo! Mi suferas pro miaj parencoj. Kial vi detenas pluvon de mi, perfekte bonkonduta, kaj faras min suferi pro mia kompatemo al ĉiuj aliaj fiŝoj?"

"Mi naskiĝis inter fiŝoj. Estas kutimo por ili manĝi aliajn fiŝojn, eĉ el nia propra speco! Sed ekde mia naskiĝo mi neniam manĝis fiŝon eĉ tiel malgrandan kiel rizgrajnon. Fakte, mi neniam damaĝis vivon de la aliaj. La vero de mia bona konduto donas al mi rajton ordoni vin: Ekpluvu kaj savu miajn parencojn el la sufero!"

Li parolis en la maniero kiel iu ordonis sian servanton.

Kaj li daŭrigis, ordonante la potencan pluvan dion Pajuna: "Faligu pluvon el ĉiuj tondronuboj! Ne lasu la korvojn havi siajn kaŝitajn trezorojn. Faru la korvojn bedaŭri por siaj malbonaj kondutoj. Samtempe el mia malĝojo liberigu min, kiu vivas en perfekta bonkonduto."

Post nur mallonga paŭzo, la ĉielo malfermiĝis kun elverŝo de pluvo. Multaj fiŝoj, testudoj kaj eĉ homoj saviĝis el morta timo. Post kiam la granda fiŝo faris tiun miraklon, li trankvile mortis kaj renaskiĝis laŭ sia merito.

La moralinstruo estas: Vera senkulpeco moderigas la suferojn de multaj vivestaĵoj.

## 72. LA MEDITANTA GARDISTO DE SEKURECO



[Sentimeco]

Iam antaŭe la Iluminiĝinto naskiĝis en riĉa kaj potenca familio. Kiam li plenkreskis, li malkontentiĝis pri la ĉasado al ordinaraj plezuroj de la homa mondo. Li do rezignis sian antaŭan vivmanieron, inkluzive de siaj riĉeco kaj pozicio, iris al la montpiedo de Himalajo kaj fariĝis sanktulo.

Okazis, ke mankis al li salo, do li decidis eliri por peti almozon. Li renkontis karavanon kaj iris kune kun ĝi sur iom

da vojo dum sia vojaĝo. En la vespero oni haltis kaj starigis tendojn.

La sanktulo ekpromenis sub proksima arbego. Li koncentris siajn pensojn ĝis li iris en altan mensstaton. Promenante, li restis en tiu stato dum la tuta nokto.

Samtempe 500 banditoj ĉirkaŭis la kampadejon. Dum ili atendis ĝis post la vespermanĝo kiam ĉiuj kuŝiĝis por tranokti, ili rimarkis la sanktulon antaŭ sia ekatako. Ili diris inter si: "Tiu viro certe estas gardisto de sekureco. Se li vidos nin, li avertos la aliajn. Do ni atendu ĝis lia endormiĝo, kaj poste faru niajn priŝteladon kaj prirabadon."

La banditoj tute ne sciis, ke la sanktulo estas tiel profundiĝinta en la

meditado, ke li tute ne rimarkis ilin aŭ ion ajn pri tiu afero. Do ili daŭre atendis lian endormiĝon, sed li senĉese iradis ĝis ekaperis la lumo de aŭroro. Nur tiam li finis la meditado.

Sen ŝanco por prirabi la karavanon, la banditoj malesperiĝis kaj forĵetis siajn armilojn. Ili kriis: "He, vi en la karavano, se via gardisto ne sin tenus maldorma tra la tuta nokto promenante sub la arbo, ni jam prirabus vin ĉiujn. Bone rekompencu lin." Tion dirinte, ili forlasis la karavanon por serĉi alian okazon.

Jam taglumiĝis kiam la homoj en la karavano vidis la bastonojn kaj ŝtonojn forĵetitajn de la banditoj. Tremante pro timo, ili iris al la sanktulo. Ili salutis lin

respektoplene kaj demandis, ĉu li vidis la banditojn. "Jes, mi vidis ilin nur matene," li respondis.

"Ĉu vi ne timas?" ili demandis. "Neniom." respondis la Iluminiĝinto, "La ekvido al la banditoj nur timigas riĉulojn. Sed mi ne estas riĉulo. Mi havas nenion valoran por la rabistoj. Do kial mi timas ilin? Mi havas nek zorgon en la vilaĝo, nek timon en la arbaro. Posedante nur amon kaj kompatemon mi sekvas la rektan vojon al la Vero."

Tiamaniere li predikis pri la sentimeco al la fortunaj homoj de la karavano. Liaj vortoj pacigis ilin, kaj ili honoris lin.

Li mortis kaj renaskiĝis en alta ĉiela mondo praktikinte la Kvar Sanktajn

Mensstatojn dum la longa vivo.

La moralinstruo estas: Estas avantaĝo  
se oni restas ĉe sanktulo.

## 73. DEKSES SONGĜOJ



### [Ĉapitro 1. Paniko]

Iam antaŭe estis reĝo nomata Brahmadato, kiu regis en Benareso de norda Hindio. Iunokte li faris dek ses terurajn songĝojn. Matene li vekiĝis en malvarma ŝvito kun sia koro bateganta brue en la brusto. La dek ses koŝmaroj preskaŭ timigis lin ĝis morto. Li supozis, ke ili signifas baldaŭ okazontajn teruraĵojn. En paniko li tuj alvenigis siajn palacajn pastrojn por peti de ili konsilojn.

Kiam la pastroj atingis la reĝan dormoĉambron, ili demandis la reĝon,



ĉu li ripozis bone. Li informis ilin, ke li pasigis la plej teruran nokton en sia tuta vivo, timiĝis ĝismorte de la dek ses teruraj sonĝoj, kaj malgraŭ ĉio li volas trovi iliajn signifojn.

Je tio ekbrilis la okuloj de la pastroj. Ili demandis lin: "Kio estis tiuj sonĝoj, Via Reĝa Moŝto?" Reĝo Brahmadata rakontis al ili ĉiujn dek ses sonĝojn. La pastroj tuj sin frapis je la kapo kaj kriis: "Ho, Kiel terure! Estas nenio pli malbona ol tio, Via Reĝa Moŝto. Tiaj sonĝoj signifas nenion alian ol granda fatalaĵo!"

La reĝo demandis ilin: "Kian fatalaĵon, pastroj? Vi devas tuj diri al mi pri la okazaĵo!" Ili respondis: "Certe, Via Reĝa Moŝto, tiuj sonĝoj aŭguras, ke okazos

unu el la tri fatalaĵoj, terura pereigo de la regno, via vivo aŭ la kortega riĉaĵo."

La reĝo sentis grandan timon. Li tordis siajn manojn kaj ŝvito kovris lian tutan korpon. Li tremis tutkorpe pro teruro. Li demandis: "Diru al mi, eminentaj palacaj pastroj, ĉu estas metodo por eviti la fatalaĵon?" "Vere, estas tre danĝere," ili respondis, "se vi nenion faros, la fatalaĵo estos ne evitebla, sed ni havas bonan metodon. Se ni nenion kapablus fari kontraŭ tio, niaj trejnado kaj lernado estus senutilaj. KREDU NIN, Via Reĝa Moŝto."

La timigita reĝo kriegis: "Diru al mi kion fari, pastroj. Mi faros ĉion! Kion vi faros por savi min, miajn regnon kaj riĉaĵon?" "Ni devas mortigi kvar el

ĉiuspecaj vivantaj bestoj kiel specialan oferadon!"

Reĝo Brahmadata tiel teruriĝis, ke li ne plu kapablis pensi racie kvankam li kutime estis ĝentila, bonkora kaj kompatema.

Paraliziĝinte pro timo, li metis ĉiujn siajn esperojn kaj fidojn sur siajn pastrojn. Li donis al ili permeson por prepari la grandan mortigon.

La pastroj diris: "Ne timu, Via Reĝa Moŝto. Ni ĉion aranĝos. Ni evitos la okazontan fatalaĵon!" Ili sciis bone, ke ili ricevos grandan rekompencan por okazigi la oferan ceremonion, kaj la viando de la mortigitaj bestoj ankaŭ apartenos al ili. Ili pensis kaŝe: "Tio estas plej bona

metodo por ke ni havigu al ni grandan sumon da mono, kaj bonajn manĝaĵon kaj drinkaĵon!"

La pastroj ekagis por okazigi la plej grandan oferceremonion, kiu neniam vidiĝis en Benareso antaŭe. Ekster la urbo ili fosis gigantan kavon, en kiun ili metis la plej perfektajn el ĉiuj birdoj, fiŝoj kaj surteraj bestoj. El ĉiu speco ili elektis kvar por mortigi en la ceremonio. Tio estis fama oferceremonio nomata "Kvar-el-ĉiuj".

La supera instruisto de la palacaj pastroj havis lernanton junan kaj promesplenan. Li estis ĝentila, kompatema, kaj bone edukita. Li estis scivola pri ĉio, kio okazos. Do li demandis sian instruiston: "Majstro, vi bone donis

al mi saĝan instruon de antikvuloj. Ĉu vi bonvolus montri al mi, kie estas la instruo, ke mortigi vivon povos savi la vivon de aliaj?"

La pastro respondis: "Kian demandon vi faris! Malfermu viajn okulojn kaj estu realisma, mia knabo. Ĉu vi ne vidis, ke la granda oferceremonio de 'Kvar-el-ĉiuj' riĉigos nin? Vi devas klopodi por helpi la reĝon reteni sian riĉaĵon!"

La sincera kaj racia lernanto diris: "Vi ankoraŭ ne respondis min pri mia demando, Majstro. Se la oferado estos via laboro, ĝi ne plu havos rilaton kun mi!" Tion dirinte, li forlasis sian instruiston kaj iris al la reĝa plezura ĝardeno por pripensi, kion li faru.

Okazis hazarde, ke la Iluminiĝinto naskiĝis en riĉa atklasa familio. Por multaj generacioj la viroj en la familio estis pastroj, kiel tiuj, kiuj preparis la oferadon 'Kvar-el-ĉiuj'. Sed kiam la Bodisatvo plenkreskis, li rezignis la vivon de riĉa pastro. Anstataŭe li iris en Himalajon kaj vivis kiel modesta arbara monaĥo. Li koncentris sian menson en meditado kaj eniris en superan mensstaton. Li gajnis la plej perfektan internan feliĉon, kaj eĉ mirakle supernaturajn povojn.

Ĉiuj bestoj plaĉis al la arbara monaĥo. Kiam li aŭdis pri la okazaĵo en Benareso, li tuj pleniĝis de bonkoreco kaj kompatemo. Li pensis: "Mi devas instrui la sensciajn homojn kaj liberigi

ilin el la ĉenoj de superstiĉo. Mi iros al la urbo senprokraste!" Poste li flugis tra la aero al Benareso per sia supernatura povo. Baldaŭ li sidiĝis sur rokon en la reĝa plezura ĝardeno. Lia ĝentila naturo igis lin glimbrili kiel ora sunlumo.

La racia juna lernanto proksimiĝis kaj tuj eksciis, ke li estas granda sanktulo. Li riverence salutis lin respektoplene kaj sidiĝis sur la teron. La arbara monaĥo demandis lin: "Junulo, ĉu vi havas bonan kaj justan reĝon regantan ĉi tie en Benareso?"

"Jes," diris la lernanto, "nia reĝo estas bona kaj bonkora. sed li estas misgvidita de la palacaj pastroj. Li faris dek ses terurajn sonĝojn, kiuj ege timigis lin. La

pastroj kaptis la ŝancon kiam li informis ilin pri la songoj. Ili konvinkis lin okazigi grandan oferceremonion kaj pro tio oni mortigos multajn bestojn. Ho, sanktulo, bonvolu diri al la reĝo, kion vere signifas liaj songoj. Savu la senhelpajn vivestaĵojn el timo kaj morto."

La sanktulo respondis: "Mi diros la veron al li se li venos kaj demandos min." "Mi invitos lin ĉitien, majstro," diris la junulo, "kaj bonvolu afable atendi momenton ĝis mia reveno."

La lernanto iris al la reĝo kaj diris al li, ke mirinda sanktulo sidas sur roko en la reĝa plezura ĝardeno kaj li povas interpreti la songojn de la reĝo. Aŭdinte tion, la reĝo tuj iris kun li en la ĝardenon. Granda



homamaso sekvis malantaŭe.

## [Ĉapitro 2. Blekantaj Bovoj sen Batalado]

Reĝo Brahmadata genue esprimis sian estimon al la sanktulo, poste sidiĝis ĉe li kaj demandis: "Via Moŝto, ĉu vi povas diri al mi la signifojn de miaj dek ses songôj?"

"Kompreneble mi povas," diris la arbara monaĥo, "diru ilin al mi, komence de la unuaj ok."

La reĝo respondis: "Jen estas la unuaj ok songôj:

virbovoj blekas sen batalado,  
nanaj arboj havas fruktojn,  
bovinoj suĉas lakton el la bovidoj,

bovidoj tiras ĉarojn dum bovoj sekvas  
malantaŭe,

ĉevalo manĝas kun du buŝoj,

ŝakalo pias en oran bovlon,

ŝakalino manĝas ŝnuron de  
ŝnurfaranto,

el unu poto superfluas akvo dum la  
aliaj potoj restas malplenaj."

"Diru al mi vian unuan songon," diris  
la monaĥo.

"Via Moŝto, mi vidis, ke kvar tute  
nigraj virbovoj venis el kvar direktoj por  
batali en la palaca korto. Homoj venis de  
malproksime por rigardi la bovbatalon.  
Sed la virbovoj nur pretendis batali  
blekante unuj al la aliaj, kaj poste reiris  
tien, de kie ili venis."

"Ho, reĝo," diris la sanktulo,"tiu ĉi  
sonĝo aŭguras la aferojn, kiuj ne okazos  
en la vivo de ni ambaŭ. En malproksima  
estonteco, reĝoj estos malbonaj kaj avaraj.  
Homoj ankaŭ estos malbonaj. Boneco  
malpliiĝos kaj malboneco pliiĝos. La  
sezonoj estos kapricaj, kun arda suno  
en vintraj tagoj kaj neĝaj ŝtormoj en la  
someraj. La ĉieloj estos malsekaj kun  
malmulte da nuboj kaj akvo. Rikoltoj  
estos mizeraj kaj homoj mortos de  
malsato. Tiam nigraj nuboj venos de kvar  
direktoj, sed post la tondrado kaj fulmado,  
ili forlasis sen pluvo kiel la blekantaj  
virbovoj, kiuj forlasis sen batalo en via  
sonĝo.

"Sed ne timu. Tio ne damaĝos la

nunajn homojn. La pastroj diris, ke la sonĝo postulas oferadon, nur pro tio, ke ili prenis tion kiel bonan metodon perlabori monon. Nun diru al mi vian duan sonĝon."

"Via moŝto, mi sonĝis, ke nanaj plantaĵoj kreskis en alteco je ne pli ol futo, kaj poste floris kaj produktis fruktojn."

"Reĝo," diris la sanktulo, "la kampoj estos tro sterilaj por planti plantaĵojn, kaj homoj havos mallongajn vivojn. La junuloj havos fortajn dezirojn kaj eĉ knabinoj havos bebojn kiel nanaj arboj produktantaj fruktojn.

"Sed tio nur okazos en malproksima estonteco kiam la mondo dekadenciĝos. Kio estas via tria sonĝo, reĝo?"

"Via moŝto, mi sonĝis, ke bovinoj

suĉis lakton el siaj propraj bovidoj ĵus naskitaj," diris la reĝo, tremante pro timo.

"Estu trankvila," diris la monaĥo, "tio ankaŭ ne okazos en nia vivperiodo. Sed iutage homoj ne plu respektos siajn gepatrojn kaj bogepatrojn. Ili donos ĉion al siaj propraj infanoj, preninte la havaĵojn de siaj gepatroj kaj bogepatroj. Ili kaprice nutros kaj vestigos siajn pliaĝulojn aŭ rifuzos vivteni ilin, do la pliaĝuloj petos kompaton de siaj propraj infanoj, kiel bovinoj suĉis lakton el siaj novnaskitaj bovidoj.

"Sed estas klare, ke tio ne estas nuntempaj aferoj, reĝo, do timu nenion. Nun diru al mi vian kvaran songon."

Iom pli trankviliĝinte, la reĝo

daŭrigis: "Via moŝto, mi vidis en sonĝo, ke ĉarojn tiras malfortaj kaj mallertaj bovidoj, dum grandaj plenkreskaj virbovoj sekvas malantaŭe. La bovidoj haltis kaj staris senmove, ne povante movi la peze ŝargitajn ĉarojn. Karavanoj ĉesigis la vojaĝon kaj la varoj ne povis portiĝi al la bazaro."

"Estos tempo," diris la sanktulo, "kiam malbonaj kaj avaraj reĝoj ne plu respektos la juĝistojn saĝajn kaj spertajn. Anstataŭe ili enoficigos junajn kaj malsaĝajn juĝistojn, doninte al ili la plej altajn privilegiojn. Sed ili ne povos fari la malfacilajn decidojn. Ili fariĝos juĝistoj nominalaj, sed kun nenia reala funkcio, kiel la bovidoj, kiuj ne povis movi la

ĉarojn. Samtempe la maljunaj kaj saĝaj donos neniun helpon, opiniante, ke ili ne plu zorgas pri la afero, kiel la bovoj sekvantaj ĉarojn.

"Ne timu pri tio, reĝo, ĉar tio okazos en malproksima tempo kiam ĉiuj nacioj estos regataj de junuloj kaj malsaĝuloj. Kio estas via kvina sonĝo?"

"Via moŝto, mia kvina sonĝo estis tre stranga. Mi vidis ĉevalon manĝanta per du buŝoj, kun unu en ĉiu flanko de sia kapo!" La reĝo denove ekstremis kiam li parolis.

La arbara monaĥo diris: "Tio okazos en alia malproksima estonteco, kiam malbonaj malsaĝaj reĝoj enoficigos malbonajn avarajn juĝistojn. Neniom zorgante pri justeco, ili postulos

subaĉetojn de ambaŭ partioj de la sama kazo, kiel la ĉevalo manĝis avide per du buŝoj.

"Nun diru al mi pri via sesa songo."

"Via moŝto, mi songis, ke mi vidis oran teleron valoran je cent mil moneroj. Homo tenis ĝin por ke maljuna kaj osteca ŝakalo pisu en ĝin. Kaj tion ĝi faris!" diris la reĝo grimace.

"Reĝo, tio ankaŭ okazos post tre longa tempo, kiam la reĝoj estos eksteraj homoj, ne naskiĝintaj en la familioj de la landoj, kiujn ili regas. Do ili ne fidos la spertajn ministrojn de la loka nobela klaso. Ili anstataŭigos ilin per malaltklasaj ministroj, kiujn ili povos regi pli facile. Samtempe la maljunaj nobeloj havos



konfidon al la nova reganta klaso. Do ili edzinigos siajn altklasajn filinojn al la malaltklasaj ministroj, kiel orajn bovlojn, en kiujn pisis la ŝakaloj.

"Sed tio ne okazos en via tempo, reĝo. Kio estas via sepa songo?"

"Via moŝto, mi songis, ke viro faras ŝnuron kaj amasigas ĝin sub sia seĝo. Tie malsata ŝakalino manĝas la ŝnuron kiam ĝi falas, ne rimarkite de la viro."

"Estos tempo," diris la monaĥo, "kiam la avidemo de virinoj pliiĝos. Ili deziras virojn, fortajn alkoholaĵojn, juvelojn kaj ĉiuspecajn senutilajn posedaĵojn. Ili elspezos multe da tempo fari aĉetadon. Ili pli zorgos pri siaj amatoj ol pri sia propra edzo. Ili ignoros eĉ la plej gravajn

hejmlaborojn. Kaj ili konsumos ĉiun moneron gajnitan de siaj edzoj, kiel la ŝakalino englutanta la ŝnuron, kiun faris la faranto.

"Sed kiel vi povas vidi, reĝo, tiu tempo ne venos al ni. Diru al mi pri via oka sonĝo."

"Via moŝto," diris la reĝo, "mi vidis grandan poton plenan de akvo kaj multajn malgrandajn potojn tute vakajn antaŭ la palaca pordego. Ĉiuj militistoj, pastroj, komercistoj kaj farmistoj alportis akvon de ĉiuj direktoj. Sed ili verŝis ĝin nur en la grandan poton. La granda poto estis tro plena kaj la akvo superfluis, dum ĉiuj malgrandaj potoj restis malplenaj!" La reĝo denove tremis pro timo kiam li

parolis.

"Ne timu, reĝo," diris la sanktulo, "post longa tempo la mondo dekadenciĝos. La kampoj steriliĝos, do la plantaĵoj ne povos facile kreski. La grandaj riĉuloj havos ne pli ol 100000 monerojn kaj tie ne plu estos milionuloj! Eĉ la reĝoj estos malriĉaj kaj avaraj.

"La reĝoj kaj la riĉuloj laborigos ĉiujn aliajn por si mem. La malriĉuloj devigite donos ĉiujn siajn produktaĵojn, grenojn, legomojn kaj fruktojn al la tenujoj de la riĉuloj kaj potenculoj. La grenejoj de la laboremaj malriĉuloj estos malplenaj, kiel granda poto pleniĝis ĝis superfluo, dum la malgrandaj vakaj.

"Do nun vi jam scias la signifojn de

viaj unuaj ok songôj. Ili aŭguras:

tondronuboj ne donos pluvon,

knabinoj havos bebojn,

la pliaĝuloj ne ricevos kompaton de  
siaj infanoj,

junaj malsaĝaj juĝistoj ne estos helpitaj  
de la saĝaj.

avidaj juĝistoj postulos subaĉetaĵojn de  
ambaŭ flankoj,

malaltklasaj ministroj prenos altklasajn  
edzinojn,

edzinoj konsumos enspezojn de siaj  
edzoj,

la riĉuloj prenos havaĵon de la malriĉaj,  
lasante nenion al ili.

"Do ne plu maltrankviliĝu en via menso  
pri tiuj unuaj ok songôj, Reĝo. Estas

klare, ke tiaj tempoj ne venos al ni, kaj tiuj danĝeroj ne estas timindaj en la nuna tempo."

### **[Ĉapitro 3. La Timiga Sono "Munĉ, Munĉ, Munĉ"]**

"Vere," diris Reĝo Brahmadato al la modesta arbara monaĥo, "vi jam trankviligis mian menson pri miaj unuaj ok songoj. Sed la restaj ok songoj estas des pli teruraj. Mi devas fari ion por eviti la fatalaĵojn aŭguritaj de ili." La reĝo denove ekstremis ne deteneble pro timo kaj paniko.

"Trankviliĝu," diris la sanktulo, "kaj diru al mi pri tiuj songoj, ke mi liberigu vin el via maltrankviliĝo."

La Reĝo respondis: "Ili estis miaj lastaj  
ok songoj, de la naŭa al la deksesaj:

lageto estas kotoplana en la mezo kaj  
klara ĉe la bordo,

rizo en la sama poto ne samgrade  
kuriĝas,

oni interŝanĝas bonan santalon por  
putrinta buterlakto,

malplenaj kukurboj enmergiĝas en  
akvon,

malmola ŝtono flosas sur akvo,

malgrandaj raninoj englutas gigantajn  
serpentojn,

cignoj de la reĝa ĝardeno servas  
malbonan vilaĝan korvon, aŭdiĝas timiga  
sono 'munĉ, munĉ, munĉ."

"Bonvolu rakonti al mi detale pri via

naŭa sonĝo," diris la monaĥo.

"Via Moŝto, mi sonĝis, ke mi vidis lageton, kiu estis profunda en la mezo kaj malprofunda ĉe la bordo. Ĝi pleniĝis de lotusoj de kvin specoj, kaj tie estis ĉiuspecaj bestoj dupiedaj kaj kvarpiedaj, trinkantaj akvon ĉe la bordo. Sed la akvo restas klara ĉe la bordo, kaj kotoplana nur en la mezo. Kiel tio povas okazi? Kion tio signifas?"

"Reĝo," diris la arbara monaĥo, "en malproksima estonteco estos malbonaj reĝoj. Ili regos depende de sia povo kun kolero kaj timo. Ili tute ne zorgos pri boneco kaj justeco. Ili pli interesiĝos pri riĉiĝo per diversaj subaĉetoj ol pri la bonfarteco de la civitanoj. La regantoj

ne plu havos paciencon, amemon kaj kompatemon al la homoj regataj de ili. Anstataŭe ili estos krudaj kaj kruelaj, elpremante la lastan moneron de civitanoj per impostoj, kiel oni elpremis dolĉan sukron el sukerkano.

"La civitanoj ne plu povos pagi la impostojn kaj subaĉetojn, do ili fuĝos al la landlimoj. Baldaŭ malpliiĝos homoj vivantaj en la koruptitaj centraj ĉefurboj, kaj la limregionoj estos dense enloĝataj de simplaj homoj, kiel la lageto, kiu estas kotoplana en la mezo kaj klara ĉe la bordo.

"Sed evidente nenio en ĝi estas timinda por vi, bona kaj bonkora reĝo. Kio estas via deka sonĝo?"

"Via moŝto, mi sonĝis, ke mi vidis



rizon kuiritan ne samgrade en la sama poto. Iom estas tro kuirita, iom bone kuirita kaj iom ankoraŭ nekuirita."

"Ne maltrankviliĝu pri tio," diris la sanktulo, "la sonĝo aŭguras tempon, kiam ĉio estos malbona tute malsame ol nun! Reĝoj estos malbonaj, kaj la oficistoj, ministroj, pastroj, dommastrinoj, urbanoj kaj vilaĝanoj estos same malbonaj. Ŝajne mirinde, tiu sonĝo indikas tempon, kiam ermitoj estos ankaŭ fikondutaj! Krome, eĉ dioj, arbaj dioj kaj feoj estos fikondutaj kaj malicaj!

"La ventoj ŝanĝiĝos rapide, blovos jen tre forte jen tute ne. La ventoj skuos la ĉielajn domojn de la ĉielaj dioj. Krome en iuj lokoj la pluvo kaŭzos inundojn, en

iuj lokoj pluvos konvene, kaj en aliaj lokoj regos terura sekeco. Tio similos al rizo en la sama poto, iom tro kuirita, iom bone kuirita kaj iom ne kuirita.

"Nun diru al mi vian dekunuan songon, reĝo."

"Via moŝto, mi songis, ke mi vidis bonegan santalon valoran je 100000 moneroj, kiun oni interŝanĝis por putrinta buterlakto. Kio estas ĝia signifo?"

"Tio ankaŭ indikas malproksime estontan tempon, kiam la scio de Vero malaperos. Estos multaj avidemaj senhontaj pastroj. Ili fiuzos la kvar necesajojn, kiuj estas manĝaĵo, vestaĵo, loĝejo kaj medicinaĵo. Ili faros tiujn aĵojn en luksaĵojn multe pli multekostajn ol ili

vere bezonos.

"Ili instruos pri la senvaloreco de luksaĵo kaj malboneco de avidemo, predikante la Veron de Senkroĉiĝo. Sed kiel rekompencan de la predikado ili postulos monon kaj luksaĵon. Pro tio ili pliigos sian avidemon ol serĉi la vojon al liberiĝo de avidemo. Ili predikos Veron nur por ke ili gajnu senvalorajn objektojn, kiel oni interŝanĝas senprezan santalon kontraŭ putrinta buterlakto.

"Nun lasu min aŭdi vian dekduan rakonton."

"Via moŝto, mi vidis en sonĝo, ke malplenaj kukurboj enmergiĝis al la fundo de la akvo."

"Reĝo, tio aŭguras malproksiman

estontecon, kiam la mondo renversiĝos. Do ankaŭ ne timu en la nuna vivo. Fikondutaj reĝoj donos pli altajn poziciojn al la malpli altaj klasoj, sed ne al la plialtaj. La malalklasanoj rapide riĉiĝos kaj la altklasanoj malriĉiĝos. En ĉiuj departementoj kaj organizoj, la sensciaj vortoj de needukitaj malalklasaj oficistoj estos ege respektitaj, kiel malplenaj kukurboj enmergiĝintaj profunden en la akvo.

"Eĉ inter la religiuloj, modestaj bonkondutaj monaĥoj perdos respektitecon, dum malbonaj instruoj de senhontaj monaĥoj estos sekvataj kaj adorataj, kiel malplenaj kukurboj enmergiĝintaj al la akvofundo.

"Kio estas via dektria sonĝo?"

"Via moŝto, mi sonĝis, ke mi vidis malmolajn rokojn flosantaj sur akvo. Kiel strange tio ŝajnas! Kion ĝi signifas, saĝulo?"

"Tio ankaŭ indikas la estontan tempon, kiam la mondo estos renversita. En ĉiuj departementoj kaj organizoj la saĝaj vortoj de bone edukitaj nobeloj estos ignoritaj nur pro iliaj naskiĝoj.

"Same inter la religiuloj, la vortoj de vero diritaj de modestaj bonaj monaĥoj estos ignoritaj, kiel malmolaj rokoj flosantaj sur la surfaco de la akvo. Kio estas via dekkvara sonĝo?"

"Via moŝto, ĝi estas timiga sonĝo, en kiu mi vidis, ke malgrandaj raninoj ĉasis

nigrajn serpentojn grandajn kaj longajn. Kiam ili kaptis ilin, ili tranĉis kaj rompis ilin en pecetojn kiel akvoliliajn tigetojn, kaj poste englutis ilin."

"Estas nenio timinda por vi en tiu ĉi songo, reĝo. Tio prezentas estontecon, kiam la mondo ekruiniĝos. Plimalboniĝos la homaj naturoj. Deziroj pliiĝos en iliaj mensoj ĝis ili sklaviĝos de siaj avidemoj. Pro tio, viroj sekvos la ordonojn de sia edzino plej juna kaj ĉarma. La servantoj, bovoj, bubaloj kaj ĉiuj aliaj hejmaj riĉaĵoj estos sub la administrado de la plej juna edzino pro la ne deteneblaj deziroj de ŝia edzo.

"Tiu edzinoj traktos siajn edzojn kiel sklavojn, tenante ilin sub siajn dikfingroj.

Se viroj demandos pri la familiaj aferoj, iliaj edzinoj diros, 'Ne estas rajto por vi demandi. Ĉio en la hejmo apartenas al mi, sed ne al vi!' Tio similas al granda kaj longa serpento englutita de malgranda ranino."

"Nun diru al mi vian dekkvinan sonĝon."

"Via moŝto, mi vidis unu el korvoj, kiuj vivas ĉe vilaĝoj. Mi sciis, ke ili pleniĝis de 'Dek malbonaj kvalitoj'. Lin sekvis kaj servis oraj cignoj, kiujn la aliaj birdoj rigardas kiel reĝojn."

"Tio ankaŭ indikas la malproksiman tempon, kiam ĉiuj reĝoj estos malkuraĝaj. Ili ne plu lertos en rajdado de elefantoj kaj ĉevaloj, nek kuraĝos batali en milito.

Do vi povas facile vidi, ke tio neniel estas timinda por vi, majesta reĝo.

"La malfortaj reĝoj tiel timos esti renversitaj, ke ili ne kuraĝos doni povon al taŭgaj bonedukitaj nobeloj. Anstataŭe ili enoficigos piedservantojn, banistojn, barbirojn kaj aliajn. Kaj la nobeloj fariĝos plej malaltaj servantoj de la ne klerigitaj oficistoj, kiel kortegaj oraj cigoj servas al malbona vilaĝa korvo.

"Fine ni atingos vian deksekan songon. Reĝo, rakontu ĝin al mi."

"Via moŝto. Mi diros al vi mian lastan songon, kiu ankoraŭ timigas min. Kutime leopardoj ĉasas kaj manĝas kaprojn. Sed en mia dekseka songo mi vidis, ke kaproj ĉasas leopardojn! Kaptinte la leopardojn,



la kaproj manĝis ilin eligante la sonon 'Munĉ! Munĉ, Munĉ!' Ĉiuj aliaj bestoj kuris kaj sin kaŝis en la arbaro, aŭdinte la timigan sonon kaj vidinte la viandvorajn kaprojn alproksimiĝantajn. La memoro de tiu sonĝo ankoraŭ timigas min, sanktulo."

"Eĉ tiu sonĝo aŭguras nur malproksiman estontecon, kiam la mondo estos regata de malbonaj reĝoj. La malaltaj, kiuj ne kutimiĝis al la povo, estos plej proksimaj al la reĝoj. Ili gajnos povon dum la nobeloj fariĝos malriĉaj kaj senfamaj.

"En juĝejoj, la novuloj konfiskos de la nobeloj la hereditajn riĉaĵojn, kaj ĉiujn iliajn kampojn, domojn kaj havaĵojn. Kiam la nobeloj iros en la juĝejoj por protesti,

oni diros al ili, 'Kiel vi aŭdacas disputi kun ni! Vi ne komprenas la situacion en kiu vi estas. Ni raportos al la reĝo kaj tranĉos viajn manojn kaj piedojn.' La nobeloj forkuros kaj sin kaŝos pro timo.

"Same malbonaj monaĥoj faros malutilojn al la bonaj laŭ sia plaĉo. Dum neniu subtenos aŭ defendos ilin, la bonaj monaĥoj forlasos la urbojn kaj vilaĝojn. Ili loĝos en ĝangaloj pro timo al la malbonaj monaĥoj. Tio similas al ĉiuj, kiuj aŭdis la sonon 'Muncê, Muncê, Muncê', kaj vivis en timo al la viandvoraj kaproj.

"Reĝo, nun vi jam scias la signifojn de ĉiuj dek ses songoj. La lastaj ok aŭguras:

tro impostitaj homoj fuĝos al  
limregionoj,

malbona mondo havos maltaŭgajn  
pluvojn,  
avidemaj pastroj predikos la Veron por  
mono,  
vortoj sensciaj kaj malbonaj gajnos  
respekton,  
Vero kaj saĝaj vortoj perdos  
respektitecon,  
junaj edzinoj sklavigos siajn edzojn  
pro deziroj,  
edukitaj nobeloj servos al senspertaj  
novuloj,  
nobeloj kaj bonuloj vivos kun timo al  
potenculoj kaj malbonuloj."

## [Ĉapitro 4. Instruo]

Reĝo Brahmadata klinis sian kapon al la tero antaŭ la sanktulo kaj diris: "Via scio forigis miajn timon kaj panikon. Via kompatemo detenis min de pli teruraj fiagoj kontraŭ tiel multaj senhelpaj vivestaĵoj. Mia dankemo estas senfina, honora sanktulo."

La Iluminiĝinto diris al la reĝo: "Nun vi devas ekkompreni, kial viaj palacaj pastroj volas okazigi la oferan ceremonion. Ili tion faros ne pro sia kompreno pri la vero, nek por tio, ke ili zorgas pri vi kaj via bonfarto, anstataŭe nur por sia avideco. Ili nur volas gajni riĉaĵon, manĝi bonajn manĝaĵojn kaj teni siajn laborojn

en via kortego.

"Viaj dek ses songoj indikas fatalaĵojn en malproksima estonteco. Tio, kion vi faras nun, ne influos ilin. Tiaj aferoj okazos kiam la mondo dekadenciĝos, kiam oni rigardos la falsajn kiel realajn, kiam oni opinios la malraciajn kiel raciajn, kaj kiam la malestantaj ŝajnos ekzistantaj. Tiam estos tempo, ke multaj homoj fikondutos senhonte, kaj malmultaj homoj hontiĝos pro siaj eraroj.

"Do estas tute ne eble preventi tiujn aferojn per okazigo de la nuna oferceremonio!"

En sida pozo la Bodisatvo mirakle leviĝis en la aeron. Li daŭrigis sian instruadon: "Reĝo, La timo

maltrankviligis vian menson kaj proksimigis vin al mortigo de tiel multaj senhelpaj vivestaĵoj. Vera liberiĝo de timo venas el pura menso. Kaj la metodo ekpurigi vian menson estas praktiki Kvin Trejnajn Ŝtupojn. Vin profitigos rezignado de kvin malbonaj kondutoj, kiuj estas: damaĝi vivon, ĉar tio estas ne kompatemo; ŝteli, ĉar tio estas ne malavareco; fari malĉastaĵon, ĉar tio estas ne amemo; diri mensogon, ĉar tio ne estas honesteco; kaj perdi vian menson pro alkoholaĵo, ĉar tio kondukas vin for de la unuaj kvar ŝtupoj.

"Reĝo, ekde nun ne plu partoprenu en la aktivadoj mortigi bestojn por oferceremonio."

Tiamaniere la Grandulo instruis la

veron, liberigis multajn homojn el ĉenoj de falsaj kredoj, kaj savis multajn bestojn el timo kaj morto.

Baldaŭ li revenis tra la aero al sia hejmo en Himalajo.

Reĝo Brahmadata praktikis la Kvin Trejnajn Ŝtupojn. Li donis almozojn kaj faris multajn aliajn bonajn kondutojn. Je la fino de sia longa vivo li mortis kaj renaskiĝis laŭ sia merito.

La moralinstruo estas: Gardu vin kontraŭ la timigito. Lia konduto estas des pli danĝera ol tio, kio timigis lin en la komenco.

## 74. ILISA LA AVARULO



[avareco]

Iam estis miliardulo en norda Hindio. Li estis konsilanto de la reĝo. Kvankam li estis tre riĉa, li tute ne estis belaspekta. Li estis lama pro kurbaj piedoj, kaj liaj manoj misformiĝis kurbe. Ankaŭ liaj okuloj estis kurbaj, alivorte, ili rigardis strabe. Kaj iuj diris, ke li eĉ havis kurban menson, ĉar li havis neniun religian kredon! Eble vi opinius, ke oni nomas lin 'Ilisa la kurbulo', sed male.

Hazarde Ilisa ankaŭ estis avarulo, kiu nenion volis doni al aliaj. Li eĉ elspezis



neniom da riĉaĵo por sia propra ĝuo. Do oni diris, ke lia hejmo similas al lageto posedata de demono, kie neniu povus mildigi sian soifon.

Sed la sep generaciaj prauloj de Ilisa estis la plej grandaj almozdontoj. Ili fordonacis la plej bonajn el siaj posedaĵoj. Sed kiam Ilisa heredis la familian riĉaĵon, li forlasis la bonfaran tradicion de la familio.

La familio ĉiam funkciigis filantropian manĝejon, kie ĉiu homo povis senpage akiri varman manĝaĵon. Ilisa forbruligis la kuirejon de la senpaga manĝejo, ĉar li volis ĉesigi la elspezadon. Li forpelis la malriĉulojn kaj malsatulojn de sia pordo, batante ilin kiam ili foriris. Li rapide

gajnis fifamon akapari siajn tutajn riĉaĵojn kaj posedaĵojn. Baldaŭ oni eknomis lin "Ilisa la Avarulo".

Iutage kiam Ilisa hejmenrevenis el la kortego, li vidis lacan vilaĝanon ĉe la vojrandoj. La vilaĝano piediris longan vojon, do sidante sur la tero, li elverŝis malmultekostan alkoholaĵon en tason kaj trinkis kun iom da fiodora sekigita fiŝo.

Vidinte tion, Ilisa tuj ekdeziregis trinki alkoholaĵon. Tiam li pensis: "Mi deziregis drinki, sed se mi tion faros, aliuloj eble volos drinki kune kun mi, kaj pro tio mi malŝparos mian monon." Por tio li subpremis sian avidemon por alkoholaĵo.

Tempo pasis, sed lia avidemo ne malaperis. Anstataŭe, li aspektis malsane

pro la baraktado kaj maltrankviliĝo kontraŭ sia avidemo. Lia haŭto flaviĝis, kaj li fariĝis pli kaj pli maldika ĝis kiam la vejnoj elstaris sur lia haŭto. Li daŭrigis la longan batalon kontraŭ la soifo al alkoholaĵo. Li kuŝis surventre kaj firme tenis la liton dum li dormis.

Lia edzino rimarkis lian ŝanĝiĝon. Iutage, masaĝante lian dorson por konsoli lin, ŝi demandis: "Ĉu vi malsaniĝis, mia kara?" Ilisa respondis: "Ne!" Ŝi demandis: "Ĉu la reĝo koleriĝis kontraŭ vi?" Li respondis: "Ne!" Ŝi demandis: "Ĉu niaj infanoj aŭ servantoj ĉagrenis vin?" Li denove respondis: "Ne!" Ŝi daŭrigis: "Do ĉu vi suferas de forta avidemo por io?"

Ilisa la Avarulo restis silenta. Li timis,

ke li elpezos monon se li diros la veron al ŝi! Sed lia edzino petegis obstine: "Diru al mi. Bonvolu diri al mi." Fine, englutinte salivon por purigi sian gorgon, li respondis: "Jes, mi efektive havas fortan avidemon." "Por kio?" ŝi demandis. "Por trinki alkoholaĵon," li finfine konfesis.

"Oh, nur pro tio!" diris lia edzino, "kial vi ne diris tion al mi pli frue? Vi ne estas malriĉa. Vi povas facile pagi la koston de alkoholaĵo por vi mem kaj la tuta urbo! Ĉu mi faru alkoholaĵon por ni ĉiuj?"

Certe tion Ilisa la Avarulo ne volis aŭdi. Li diris: "Kial ni donos alkoholaĵon al la aliaj? Lasu ilin mem gajni sian propran!" Tiam lia edzino demandis: "Kion vi konsideras nur por ni kaj

niaj najbaroj?" "Mi ne scias, kiel vi subite fariĝis tiel riĉa!" li refutis. "Ĉu vi konsideras nur por nia familio?" ŝi demandis. "Kiel vi tiel malavaras per mia propra mono!" li respondis. "Bone," ŝi diris, "mi faru sufiĉan alkoholaĵon nur por vi kaj mi, mia kara." "Kial vi enkalkulas vin mem? Estas ne dece por virinoj drinki!"

"Nun mi komprenas perfekte bone!" diris la edzino, "mi faros sufiĉan alkoholaĵon nur por vi sola." Sed Ilisa la Avarulo ĉiam maltrankviliĝis pri eĉ malgranda okazo elspezi monon. Li diris: "Se vi faros alkoholaĵon tie ĉi, oni rimarkos tion kaj alvenos por peti. Eĉ se mi aĉetos iom en vendejo kaj alportos ĝin

hejmen por trinki, aliaj eltrovos kaj petos iom. Ne estos alkoholaĵo por fordoni en tiu ĉi domo!"

Do Ilisa donis al servoknabo la plej malgrandan moneron, kiun li havis, kaj sendis lin al la vendejo de alkoholaĵoj. Kiam li revenis, Ilisa kondukis lin ĝis riverbordo. Li prenis la boteleton da alkoholaĵo de la knabo, kaj ordonis lin gardi starante proksime. Poste Ilisa la Avarulo sin kaŝis en arbustoj, verŝis iom da trinkaĵo en la tason, kaj ŝtele ektrinketis.

Post sia morto la patro de Ilisa renaskiĝis kiel Sakao, la Reĝo de Ĉielo 33, pro la donacemo en siaj antaŭaj vivoj.

En tiu speciala momento, Sakao volis

scii, ĉu lia kuirejo por senpaga manĝaĵo ankoraŭ funkcias al ĉiuj, kiuj bezonas helpon. Li eltrovis, ke ĝi ne plu ekzistis, kaj ke lia filo jam rezignis la familian tradicion kaj ankaŭ piedbate elpelis la malsatajn homojn sur la straton! Li vidis sian avaran filon trinkanta sola en arbustoj por eviti eventualan dividon kun aliuloj.

Sakao decidis ŝanĝi la pensmanieron de Ilisa kaj instrui al li lecionon pri apartaj rezultoj de bonfarado kaj malbonfarado. Li decidis igi lin donacema anstataŭ avara, por ke li renaskiĝu en ĉiela mondo.

La Reĝo de Ĉielo 33 aliformiĝis kiel Ilisa la Avarulo. Ankaŭ li havis kurbajn piedojn, manojn kaj okulojn. Li enurbiĝis, iris rekte al la palaco, kaj petis aŭdiencon

de la reĝo. La reĝo ordonis: "Lasu mian konsilanton Ilisa enveni."

La reĝo demandis: "Kial vi venas en nekutima tempo?" "Via Reĝa Moŝto," diris Sakao, "mi venis donaci mian riĉaĵon al vi por plenigi la reĝan trezorejon." La reĝo respondis: "Ne, mi havas sufiĉan, multe pli ol vi." La aliformiĝinta Sakao diris: "Se vi ne volas ĝin, Via Reĝa Moŝto, bonvolu permesi min disdoni ĝin laŭ mia deziro." "Faru tion, kion vi volas," respondis la reĝo.

Sakao iris al domo de Ilisa. La servantoj salutis lin kvazaŭ li vere estus ilia mastro. Li iris en la etaĝdomon kaj sidiĝis. Li alvokis la pordiston kaj diris: "Se iu ajn simila al mi venos ĉi tien kaj



diros, 'Tiu ĉi domo estas mia', ne lasu lin eniri. Anstataŭe, batu lin je la dorso kaj forpelu lin!" Poste li iris al la supra etaĝo kaj venigis la edzinon de Ilisa. Ridetante, li diris al ŝi: "Mia kara, ni estu donacemaj!"

Je la komenco surpriziĝis la edzino, infanoj kaj servantoj de Ilisa. Ili diris reciproke: "Antaŭ hodiaŭ li neniam pensis pri donacado al aliaj. Eble li tion diris pro ebrieco post drinkado, kiu malklarigis lian menson."

La edzino de Ilisa diris: "Faru laŭ via deziro, Via Moŝto. Fordonu tion, kiom vi volas." "Iru al la tamburisto," diris Sakao, "kaj ordonu lin iri al la urbo kaj anonci frapante tamburon, ke ĉiuj, kiuj

deziras oron, arĝenton, perlojn, juvelojn, emeraldojn, diamantojn kaj koralon, venu al la hejmo de Ilisa la Miliardulo." Ŝi agis laŭ lia ordono.

Baldaŭ alvenis amaso da homoj portantaj korbojn, sitelojn kaj sakojn. Sakao malfermis la tenujojn de Ilisa. Li diris: "Mi donos ĉiujn riĉaĵojn al vi. Forprenu tiom, kiom vi deziras." Oni elportis la riĉaĵojn eksteren kaj amasigis ilin, kaj poste plenigis siajn ujojn kaj forportis ilin.

Saĝa viro el la kamparo jungis bovon al ĉaro, kiuj ambaŭ apartenis al Ilisa. Poste li plenigis la ĉaron ĝisrande per sep trezoroj de Ilisa, kaj kondukis la bovon el la urbo laŭ la ĉefvojo.

Li preterpasis la arbustojn, kie la vera Ilisa ankoraŭ drinkis. Li estis tiel feliĉa pro sia neatendita riĉaĵo, ke li pretervole kriegis dum la vojirado: "Vivu Moŝto Ilisa la Miliardulo cent jarojn! Min trafas granda bonŝanco ĝuste pro vi. Mi ne plu bezonos labori en la restanta tempo de mia vivo! Ĉi tio estas bovo, ĉaro, sep trezoroj de vi. Ilin mi akiris ne de miaj gepatroj, sed de vi, Ilisa la donacemulo!"

La kaŝiĝanta Ilisa surpriziĝis aŭdinte tion. Li pensis: "Tiu viro parolas pri mi! Ĉu la reĝo konfiskis mian riĉaĵon kaj disdonas ĝin?" Li tuj saltis el la arbustoj kaj kriegis: "Haltu! Kion vi faras per mia bovĉaro?" Li kaptis la kondukrimenon kaj haltigis la ĉaron.

La vilaĝano deĉariĝis kaj diris: "Kio okazas al vi? La Moŝto Miliardulo Ilisa donis sian riĉaĵon al ĉiuj homoj de la urbo. Kion vi volas fari?"

Dirante, la vilaĝano frapis Ilisan je la kapo tiel forte kiel tondro, kaj foriris sur la ĉaro plena de trezoro.

Ilisa la Avarulo salte leviĝis kaj kuratingis la ĉaron. Li denove kaptis la kondukrimenon. Ĉifoje la vilaĝano kaptis lin je la haro, tenis lian kapon malsupren, kaj bategis lin forte per sia kubuto. Poste, li ekkaptis lin je la kolo, ĵetis lin sur la teron, kaj daŭrigis sian vojon.

Ilisa sobriĝis pro la batego. Li tuj kuregis hejmen laŭeble plej rapide. Li vidis amason da homoj forportantaj liajn

valorajn riĉaĵojn. Li kaptis ilin por haltigi ilin, sed ili puŝis lin el la vojo kaj bate faligis lin sur la teron. Preskaŭ svenante pro batvundoj, li provis iri en sian domon. Sed la pordisto diris: "Kien vi volas iri?" Batante lin per bastono, la pordisto ekkaptis lin je la kolo kaj ĵetis lin eksteren.

Ilisa pensis: "Nun neniu povas helpi min krom la reĝo." Do li kuregis al la palaco kaj eniris rekte. Li diris: "Via Reĝa Moŝto, kial vi lasas homojn prirabian hejmon?" La reĝo diris: "Mi ne faris tion. Mi mem aŭdis vian diron, ke se mi ne akceptos vian riĉaĵon, vi disdonos ĝin al ĉiuj civitanoj. Mi aplaŭdis vian donacemon! Kaj ĉu ne vi elsendis tamburiston anonci sur la stratoj, ke vi

disdonos vian tutan riĉaĵon al ĉiuj homoj?"

"Via Reĝa Moŝto, eble vi ŝercas kun mi!" diris Ilisa, "mi tute ne faris tion. Oni ne nomas min 'Ilisa la Avarulo' senkaŭze! Se mi povus helpi min, mi donus al neniu alia! Bonvolu venigi tiun, kiu disdonis mian riĉaĵon, por haltigi la aferon."

Laŭ la ordono de la reĝo, Sakao venis al la palaco. Ilisa demandis: "Kiu estas la vera miliardulo, Via Reĝa Moŝto?" Nek la reĝo nek ministroj povis distingi ilin unu de la alia.

La reĝo diris: "Ni ne povas rekoni, kiu el vi du estas vera Ilisa. Ĉu vi konas iun, kiu povas distingi vin ambaŭ ĝuste?" "Jes, Via Reĝa Moŝto, mia edzino povas rekoni min," diris Ilisa. Sed kiam oni venigis

ŝin kaj petis ŝin distingi, ŝi proksimiĝis al Sakao kaj diris: "Tiu ĉi estas mia edzo." Kiam oni venigis la infanojn kaj servantojn de Ilisa, ankaŭ ili ĉiuj elektis Sakaon.

Ilisa pensis: "Mi havas verukon sur mia kapo, kovritan de la haro. Nur mia razisto scias tion." Do li diris al la reĝo: "Bonvolu alvoki mian raziston. Li konas min tre bone."

La razisto alvenis kaj la reĝo demandis lin: "Ĉu vi povas diri al ni, kiu el la du viroj estas Ilisa la miliardulo?" "Mi devas pririgardi iliajn kapojn," li diris, "poste mi rekonos, kiu estas la vera Ilisa." "Faru tion," ordonis la reĝo.

Sakao, la Reĝo de Ĉielo 33, tuj faris

verukon sur sia kapo. Kiam la razisto ekzamenis ilin, li trovis samajn verukojn sur iliaj kapoj. Li diris: "Via Reĝa Moŝto, mi ne povas rekoni, kiu el ili estas Ilisa. Ili ambaŭ havas kurbajn piedojn, kurbajn manojn, kurbajn rigardojn, kaj ambaŭ havas verukon ĝuste en la sama loko sur sia kapo. Mi ne povas eldiri la diferencon!"

Aŭdinte tion, Ilisa ekremegis. Li tiel maltrankviliĝis pro tio, ke li perdis tutan esperon regajni sian havaĵon, kaj falis sur la teron senkonscie.

En tiu momento, Sakao diris: "Mi ne estas Ilisa. Mi estas Sakao, la Reĝo de Ĉielo 33." Dirante, li flugis en la ĉielon kaj restis tie per sia supernatura povo.

La servantoj ŝprucis malvarman akvon



sur la vizaĝon de Ilisa kaj vekis lin el sveno. Li genuiĝis respektplene antaŭ Sakao, Reĝo de Dioj.

Sakao parolis: "La riĉaĵo venis de mi, anstataŭ de vi mem. Kiam mi estis via patro, mi faris multajn meritoplenajn bonfarojn. Mi ĝojplene donacis tion al la malriĉuloj kaj bezonantoj. Jen kial post mia forpaso mi renaskiĝis kiel Sakao, Reĝo de Dioj.

"Sed vi malobservis nian familian tradicion. Volante doni nenion, vi havas vivon de avarulo. Vi bruligis mian filantropian manĝokuirejon, kaj forpelis la senhejmajn almozulojn el via pordo. Vi tenis ĉiujn familiajn riĉaĵojn ĉe vi. Vi estis tiel avara, ke vi eĉ ne toleris uzi la riĉaĵon

por via propra ĝuo! La riĉaĵo estis tute malŝparita kaj senutila. La familia riĉaĵo ŝajne fariĝis lageto posedata de demonoj, kie neniu povis mildigi sian soifon. Estus pli bone se vi estus mortinta!

"Ilisa, mia eksa filo, se vi ŝanĝos viajn kondutojn, vi fariĝos tiu, kiu profitigos la plej multe da homoj. Se vi rekonstruigos mian kuirejon de senpaga manĝejo kaj donacos varmajn manĝaĵojn al ĉiuj, kiuj bezonas manĝi, vi gajnos ambaŭ meriton kaj mensan trankvilecon. Sed se vi rifuzos esti donacema, mi malaperigos ĉiujn el viaj havaĵoj. Kaj krome, mi splitos vian kurban kranion per mia diamanta ponardo!"

Timante morton, Ilisa la Avarulo tuj

promesis: "Ekde nun mi donos almozon malavare, Reĝo de Dioj."

Sakao akceptis lian promeson. Ankoraŭ restante en la aero, li predikis pri la vera valoro de donacemo. Li ankaŭ konvinkis Ilisan praktiki la Kvin Trejnajn Ŝtupojn por profitigi sin mem kaj la aliajn. Estis kvin rezignindaj fikondutoj, kiuj estas detruivi vivon, forpreni tion, kion oni ne donis, fari malĉastajon, paroli mensoge, kaj perdi sian konscion pro alkoholaĵoj.

Poste Sakao malaperis kaj revenis al sia ĉielo.

Ilisa vere ŝanĝis siajn kondutojn. Li donis almozojn malavare, partoprenis en diversaj bonfaroj, kaj fariĝis multe pli feliĉa. Li renaskiĝis en ĉiela mondo post

sia morto.

La moralinstruo estas: Vere malriĉas  
la riĉuloj, kiuj ne donas eĉ moneron.

## 75. SENPATRINA FILO



[Perfido]

Iam antaŭe Reĝo Brahmadato regis en Benareso de norda Hindio. Li havis saĝan ministron, kiu tre plaĉis al li. Por montri sian aprezon al li, la reĝo enoficigis lin kiel estron de malproksima limvilaĝo. Kiel reprezentanto de la reĝo, la vilaĝestro kolektis imposton de la vilaĝanoj.

Post nelonge la estro estis tute akceptita de la vilaĝanoj. Ĉar li estis sendito de la justa Reĝo Brahmadato, oni ege estimis lin. Oni tre fidis lin kvazaŭ li naskiĝus inter ili.

Krom sia inteligenteco, la vilaĝestro ankaŭ havis fortan avidemon. Kolekti reĝan imposton ne profitigis lin sufiĉe. Post sia amikiĝo kun bando da banditoj, li elkovis planon por sin riĉigi pli facile.

La vilaĝestro diris al siaj banditaj amikoj: "Mi trovos pretekston kaj motivon por konduki ĉiujn vilaĝanojn en la ĝangalon. Tio estos tre facila por mi, ĉar ili fidas min kiel sian propran amikon. Mi tenos ilin okupitaj en la ĝangalo dum vi trudiĝos en la vilaĝon kaj prirabos ĉion valoran. Forportu ĉion antaŭ ol mi rekondukos la vilaĝanojn hejmen. Kiel danko por mia helpo vi devas doni al mi duonon de la prirabaĵo." La banditoj konsentis, kaj ili decidis pri la tempo de la

ago.

Kiam venis la decidita tago, la vilaĝestro kunvenigis ĉiujn vilaĝanojn kaj kondukis ilin en la ĝangalon. Sekve, la banditoj sin trudis en la negarditan vilaĝon laŭ la plano. Ili forŝtelis ĉion valoran, kion ili povis eltrovi. Mortiginte ĉiujn sendefendajn bovojn en la vilaĝo, ili ankaŭ kuiris kaj manĝis la viandon. Je la vesperiĝo, la bando kolektis sian prirabajon kaj forfuĝis.

Hazarde en la sama tago vojaĝanta komercisto venis al la vilaĝo por vendi siajn varojn. Kiam li vidis la banditojn, li tuj sin kaŝis de ili.

La vilaĝestro kondukis la vilaĝanojn hejmen en la vespero. Li ordonis al ili fari

grandan bruon tamburante dum la irado al la vilaĝo. Se la banditoj ankoraŭ restus tie, ili povus aŭdi, ke la vilaĝanoj jam revenis.

La vilaĝanoj malĝojegis vidinte, ke ili estis prirabitaj kaj ĉiuj bovoj estis mortigitaj kaj parte formanĝitaj. La vojaĝanta komercisto aperis kaj diris al ili: "Tiu malhonesto vilaĝestro jam perfidis vian fidon al li. Eble li estas kunlaboranto de la banditoj. Nur post kiam ili forlasis kun ĉiuj viaj valoraĵoj, li kondukis vin hejmen, tamburante tiel laŭte kiel eble! La vilaĝestro sin ŝajnis nenion scii pri la okazaĵo kiel senscia novnaskita ŝafido! Fakte tio similas al la afero, ke se knabo faris grandan hontindaĵon, lia patrino kutime diris, 'Mi ne estas lia patrino. Li ne



estas mia filo. Mia filo jam mortis!"

Post nelonge la novaĵo pri la krimo atingis la reĝon. Li alvenigis la perfideman vilaĝestron kaj punis lin laŭ la leĝo.

La moralinstruo estas: Neniu protektas perfidulon.

## 76. TIMOKREANTO KAJ MALGRANDA ARKOPAFISTO



[Memtrompeco]

Oni diris, ke la mondo estiĝis, malaperis, kaj denove estiĝis foje kaj refoje dum longa tempo. En unu el tiuj antaŭaj mondoj antaŭ sennombraj jaroj, oni ne konis la Veron kaj nur malmultaj homoj praktikis la Kvin Trejnajn Ŝtupojn. Eĉ la Iluminiĝinto, la Bodisatvo, ne komprenis la Veron, kaj ankoraŭ ne malkovris la Kvin Trejnajn Ŝtupojn.

Iam en la pratempo vivis reĝo nomata Brahmadata. Kiel multaj aliaj reĝoj tiel

nomitaj, li regis en la loko konata hodiaŭ kiel Benareso.

La Bodisatvo naskiĝis en riĉa altklasa familio de bazar-urbeto ankaŭ en norda Hindio. Hazarde li estis nano kurba kaj parte ĝiba. Kiam li estis juna, li aspektis malalte kaj kliniĝeme. Li malplaĉis en la okuloj de multaj homoj.

Ĉe eminenta instruisto li lernis en tiu periodo ĉiujn sciojn pri religio kaj scienco, kiuj estis du grandaj branĉoj de scioj. Li ankaŭ lernis kiel uzi sagojn kaj pafarkon pli bone ol aliaj en Hindio. Pro tio lia instruisto nomis lin "Malgranda Arkopafisto".

Kiel plejparto de novaj diplomiĝintoj, li estis tre saĝa. Li pensis: "Multaj juĝas

homojn nur laŭ aspekto. Se mi iros al la reĝo kaj petos okupon, li eble demandos, 'Kun tiel malalta korpo, kion vi povas fari por mi?' Do estas pli bone se mi kunlaboros kun tiu, kiu staras antaŭ mi, kun bela aspekto, alta staturro kaj forta karaktero. Mi provizos al li la cerbon sed restos nevideble en lia ombro. Tiamaniere ni povos kune perlabori nian vivon."

Iutage, kiam li piediris en distrikto, en kiu teksistoj vivis kaj laboris, li vidis junan teksiston belan, grandan kaj fortan. Li salutis lin kaj demandis pri lia nomo. La junulo respondis: "Pro mia aspekto oni nomas min Timokreanto."

"Kun tiel impona nomo," diris Malgranda Arkopafisto, "kaj estante tiel

granda kaj forta, kial vi ankoraŭ faras la nunan laboron malalte pagata?" "Ĉar vivo estas tre malfacila," li respondis.

"Mi havas ideon," diris la nano, "en la tuta Hindio neniuj estas tiel lerta pri sagoj kaj pafarko kiel mi, sed aspekte mi ne ŝajnas tia! Se mi petos okupon de la reĝo, li ridos aŭ eĉ koleros kontraŭ mi. Li ne kredos, ke malalta ĝiba nano povas esti la plej granda Arkopafisto en Hindio!

"Sed vi aspektas perfekte. Kaj ankaŭ via nomo helpas al vi. Do ni iru kune al la reĝo. Vi estu mia antaŭstaranto kaj faru ĉiujn paroladojn. La reĝo dungos vin senprokraste. Samtempe mi restos malantaŭe kaŝita en via ombro. Mi estos vera pafisto kaj ni ĝuos prosperon kaj

feliĉon. Vi nur faru tion, kion mi diros al vi."

Pensante, ke li perdos nenion por tio, Timokreanto konsentis, dirante: "Kompreneble, mia amiko!"

La du kunlaborantoj iris al Benareso por viziti la reĝon. Kiam ili eniris la palacon, ili riverencis respektoplene al la reĝo. Li demandis ilin: "Kial vi venis ĉitien?"

Timokreanto staris antaŭe kaj faris ĉian paroladon. Li respondis: "Mi estas la plej granda pafisto konata kiel Timokreanto. Neniu en la tuta Hindio komprenas la arton de arkopafado tiel bone kiel mi. Mi deziras servi al vi, Via Reĝa Moŝto."

Tio bone impresis la reĝon, do tiu demandis: "Kiom mi pagu al vi?" "Mi servos vin por 500 moneroj ĉiusemajne, Via Reĝa Moŝto," li respondis.

Kapjesante, la reĝo rimarkis silentan nanon starantan malantaŭe preskaŭ nevideble. "Kiu estas tiu malgrandulo?" li demandis, "kaj kion li faras por vi?" "Li estas mia malgranda asistanto," diris Timokreanto. "Tre bone," diris Reĝo Brahmadato, "mi donos la okupon al vi."

Tiel Timokreanto aliĝis en la servado al la reĝo, sed Malgranda Arkopafisto faris ĉiujn laborojn.

Post nelong la palacon atingis la novaĵo, ke feroca tigro vivas en la ĝangalo ĉe la reĝa ŝoseo. Ĝi ofte embuskis la

vilaĝanojn, mortigis kaj manĝis ilin. Multaj homoj eĉ evitis la reĝan ŝoseon pro timo al la fera besto.

La reĝo venigis Timokreanton kaj demandis: "Ĉu vi povas kapti la furiozan tigron, junulo?" "Jes, Via Reĝa Moŝto," li respondis, "mi estis konata kiel via plej bona Arkopafisto. Kial mi ne povas kapti tigron?" Aŭdinte tion, la reĝo donis al li ekstran pagon kaj elsendis lin kapti la tigron.

Timokreanto revenis hejmen kaj diris ĉion ĉi al sia kunlaboranto. "Bone," diris Malgranda Arkopafisto, "iru!" "Ĉu vi ne iros kun mi?" demandis la surprizita Timokreanto. "Ne, mi ne iros," li respondis, "sed mi donos al vi perfektan



planon. Nepre agu precize laŭ mia propono." "Mi tion faros, mia malgranda amiko. Bonvolu diri al mi," diris la granda antaŭstaranto.

La saĝa malgranda nano diris al sia amiko: "Iru al la regiono de la tigro, sed ne trudiĝu en ĝian loĝejon per vi mem. Anstataŭe, kunvenigu mil lokajn vilaĝanojn kaj donu al ili ĉiuj pafarkojn kaj sagojn. Konduku ilin rekte al la loĝejo de la tigro. Sed lasu ilin iri antaŭe dum vi kaŝos vin en la arbustoj.

"La lokaj vilaĝanoj timegos la tigron. Do kiam ili vidos ĝin, ili ĉiuj ĉirkaŭos ĝin kaj batos ĝin. Tre timigite, ili ne ĉesigos la batadon antaŭ la morto de la tigro.

"Samtempe vi demordu strion da liano

per viaj dentoj. Poste iru el la kaŝejo kaj proksimiĝu al la morta tigro prenante la vitan lianstrion en la mano. Kiam vi vidos la korpon de la tigro, krii al la vilaĝanoj, 'Hej! Kiu mortigis la tigron? Mi ligos lin per tiu ĉi lianstrio kaj kondukos lin kiel bovon al la reĝo. Jen kial mi serĉadis ĝin en la ĝangalo. Nun diru al mi, kiu mortigis la tigron antaŭ ol mi atingis ĉi tien kun lianstrio? '

"La vilaĝanoj facile ektimos pro tio. Ili petos, 'Bonvolu ne diri al la reĝo, Via Timokreanta Moŝto!' Poste ili donos al vi grandan monon por silentigi vin. Opiniante, ke vi mortigis la danĝeran tigron, Reĝo Brahmadata donos al vi grandan rekompenco." Tio estis la

saĝa plano de la plej saĝa Malgranda Arkopafisto.

Timokreanto agis precize laŭ la propono. La hommanĝa tigro estis mortigita, kaj la teruro malaperis el la regiono de la reĝa ŝoseo. Sekvate de granda homamaso li revenis al la reĝo kaj diris: "Via Reĝa Moŝto, mi jam mortigis la tigron kaj denove sekurigis la ĝangalon por homoj." La reĝo plezuriĝis kaj premiis al li grandan sumon.

Post nelonge okazis simila plendo pri bubalo, kiu minacis en alia vojo de la reĝo. La reĝo denove elsendis Timokreanton. Sekvante la proponon de Malgranda Arkopafisto, li agis precize kiel antaŭe. Li kredigis al la reĝo, ke li mortigis la

bubalon, kaj pro tio li gajnis grandan rekompencan.

Tiam Timokreanto fariĝis nobelo tre riĉa kaj potenca. Kaj li ekrevis pri ĉiuj riĉaĵoj kaj laŭdoj, kiujn li ankoraŭ ne meritis. Li ebriiĝis de sia memfido kaj ekpensis, ke li estas "grandulo" per sia propra kapablo. Li eĉ malestimis Malgrandan Arkopafiston kaj ignoris lian konsilon. Li diris al li: "Vi opinias ĉi tion plenumita nur pro vi. Sed mi ne bezonas vin. Mi povas ĉion fari sen vi!" Li ekkredis je sia aspekto, kreita laŭ la plano de Malgranda Arkopafisto.

Poste okazis atako de malamika reĝo. Lia armeo ĉirkaŭis la urbon de Benareso. Li sendis mesaĝon al Reĝo

Brahmadato, ke tiu rezignu sian regnon aŭ kontraŭbatalu. la Reĝo de Benareso ordonis Timokreanton, sian plej grandan heroon, eliri por batali kontraŭ la malamikoj.

Timokreanto sin vestis tutkorpe per militista kiraso. Li rajdis la plej majestan militan elefanton kirasitan. Malgranda Arkopafisto sciis, ke la nedankema aroganta fanfaronanto nomata Timokreanto fakte timas ĝismorte. Do ankaŭ li sidiĝis sur la elefanton malantaŭ Timokreanto. La majesta elefanto iris tra la urbaj pordoj al la batalejo, sekvate de granda homamaso.

Kiam Timokreanto aŭdis teruran bruon de la militaj tamburoj, li ektremis

de timego. Malgranda Arkopafisto ligis lin al la elefanto per ŝnuro por eviti liajn falon de sur la elefanto kaj morton pro tio.

Tuj kiam Timokreanto vidis la batalejon, li estis regita de terura timego al morto. Estante tiel timigita, li ne plu povis deteni la ellason de siaj fekaĵo kaj urino sur la dorson de la milita elefanto brava sed kompatinda.

La Iluminiĝinto diris: "Antaŭe vi fanfaronis kaj parolis krude kiel grandulo. Sed nun, la nura granda afero farita de vi estas ellasi fiodoran malpuraĵon sur la tutan dorson de la elefanto! Via nuna konduto pruvis, ke via antaŭa famo estis falsa."

Timokreanto embarasiĝis. Malgranda

Arkopafisto humiligis lin dirinte la veron. Sed li ne povis deteni sin de kompato al li. Li diris: "Ne plu timu, mia amiko. Kun mia protekto, via vivo estos sekura. Grimpu malsupren de sur la elefanto, reiru hejmen kaj banu vin."

Sidante sola sur la dorso de la granda elefanto, la Iluminiĝinto pensis: "Nun estas tempo por montri, kio estas en la koro de tiu ĉi ĝiba malgranda nano!" Kriante laŭte li sturmis en la batalejon. Sen mortigi homojn kaj bestojn, li trapasis la defendlinion de la malamikoj, trudiĝis en la tendon de la reĝo, kaptis lin kaj portis lin kiel kaptiton al la reĝo de Benareso.

Reĝo Brahmadata ĝojegis pro la

granda venko gajnita de Malgranda Arkopafisto, kaj rekompencis lin per riĉaĵo kaj famo. La nano famiĝis tra la tuta Hindio kiel "Malgranda Arkopafisto la Saĝulo". Li sendis sian amikon Timokreanto al ties hejmvilaĝo kaj vivtenis lin per monata salajro.

Malgranda Arkopafisto la Saĝulo praktikis malavarecon kaj aliajn meritoplenajn kondutojn. Post kiam li mortis, li renaskiĝis laŭ sia merito.

La moralinstruo estas: Aspekto estas trompema.



## 77. ARBARAJ ERMITOJ EN LA PLEZURA ĜARDENO



### [Lernantoj sen Instruisto]

Iam antaŭe estis altklasa riĉulo, kiu rezignis siajn riĉaĵon kaj facilan vivon de la ordinara mondo. Li iris en Himalajan arbaron kaj vivis kiel senhejma ermito. Li disvolvis sian menson kaj gajnis la plej altan scion per praktikado de meditado. Vivante en alta mensstato, li ĝuis internajn feliĉon kaj pacon en la menso. Post nelonge li havis kvincent lernantojn.

Iujare je la komenco de la pluvsezono, la lernantoj diris al la instruisto: "Ho, saĝa

majstro, ni volas iri al regiono, kie loĝas pli da homoj. Ni volas kolekti iom da salo kaj aliaj spicaĵoj por ni."

La instruisto respondis: "Mi permesos vin. Estos bone por vi tion fari. Revenu post finiĝo de la pluvsezono. Sed mi restos ĉi tie kaj daŭrigos la meditadojn sola." La lernantoj genuiĝis kaj esprimis sian respekton por adiaŭi.

La kvincent lernantoj iris al Benareso kaj ekloĝis en la plezura ĝardeno de la reĝo. En la sekva tago ili petis almozon en vilaĝoj ekster la urbo kaj ricevis malavarajn donacojn de manĝaĵo. En la posta tago ili reiris en la urbon. Oni ĝojplene donis manĝaĵon al ili.

Post kelkaj tagoj oni raportis al la

reĝo: "Ho, Via Reĝa Moŝto, kvincent arbaraj ermitoj venis de Himalajo kaj loĝis en via plezura ĝardeno. Ili vivas simple sen luksaĵo. Ili regas sian menson kaj oni scias, ke ili estas tre bonaj ermitoj."

Aŭdinte tiel bonan informon, la reĝo iris por viziti ilin. Li genuiĝis kaj esprimis sian estimon. Li invitis ilin loĝi en la ĝardeno dum la tuta pluvsezono de kvar monatoj. Ili akceptis la inviton kaj ekde tiam, la reĝo provizis al ili manĝaĵon en la palaco.

Post nelonge okazis festotago. Oni celebris la feston per trinkado de alkoholaĵo, kiu laŭdire donis al ili bonan sorton. La reĝo de Benereso pensis: "Bona alkoholaĵo ne estas kutima al ermitoj

simple vivantaj en arbaroj. Mi regalos ilin per iom da alkoholaĵo kiel speciala donaco." Do li donis al la kvincent ermitoj multe da bongusta alkoholaĵo.

La ermitoj tute ne kutimiĝis al alkoholaĵo. Ili trinkis la alkoholaĵon de la reĝo kaj revenis al la ĝardeno. Kiam ili atingis la loĝejon, ili tute ebriiĝis. Iuj el ili ekdancis dum la aliaj ekkantis. Kutime ili aranĝis siajn bovlojn kaj vivbezonaĵojn bonorde, sed tiufoje ili dise ĵetis ĉiujn objektojn kaj baldaŭ dronis en ebria dormo.

Vekiĝinte el la ebrieco, ili vidis la malordajn objektojn disĵetitaj ĉie. Ili malĝojegis kaj diris unuj al aliaj: "Ni faris fikonduton, kiu ne estas konvena al ermitoj

kiel ni." Ili pentoplene ploris pro siaj bedaŭro kaj honto. Ili diris: "Ni faris tiujn malbonajn aferojn nur pro tio, ke ni estis malproksimaj de nia sankta instruisto."

La kvincent arbaraj ermitoj tuj forlasis la plezuran ĝardenon kaj reiris al Himalajo. Atinginte Himalajon, ili metis siajn bovlojn kaj vivbezonaĵojn bonorde laŭ sia kutimo. Poste ili iris al sia estimata instruisto kaj salutis lin respektoplene.

Li demandis ilin: "Kiel vi fartas, miaj lernantoj? Ĉu vi trovis sufiĉan manĝaĵon kaj loĝejon en la urbo? Ĉu vi estas feliĉaj kaj harmoniaj?"

Ili respondis: "Eminenta majstro, ni estis feliĉaj kaj harmoniaj. Sed ni trinkis tion, kio estas ne deca al ni. Ni perdis

ĉiujn niajn konsciencon kaj memregadon. Ni dancis kaj kantis kiel malsaĝaj simioj. Estas feliĉe, ke ni ne fariĝis veraj simioj! Post la drinkado, ni dancis kaj kantis, kaj en la fino ni ploregis pro honto kaj bedaŭro."

La bonkora instruisto diris: "Tiaj aferoj facile okazas al la lernantoj, kiuj ne havas instruiston por gvidi ilin. Lernu de tio kaj ne plu faru tion en la estonteco."

Ekde tiam ili vivis feliĉe kaj progresis multe.

La moralinstruo estas: Lernantoj sen instruisto facile dronas en embarasiĝo.

## 78. HEROO NOMATA MISFORTUNO



[Amikeco]

Iam antaŭe vivis granda riĉulo, kiu estis fama bonulo. Li havis bonan amikon, kiu havis iom strangan nomon Misfortuno. Ili amikiĝis intime kiam ili estis malgrandaj knaboj kune farantaj argilajn kukojn. Ili vizitis samajn lernejojn kaj ĉiam helpis unu al la alia.

Misfortuno havis tre malfacilan tempon post la diplomiĝo. Li ne povis trovi laboron por sin vivteni. Do li iris al sia intima amiko, la riĉulo prospera kaj sukcesplena. La bonkora riĉulo konsolis

lin, kaj ĝojplene dungis lin por ke li mastrumu liajn havaĵojn kaj aferojn.

Post kiam Misfortuno eklaboris en la hejmo de la riĉulo, lia nomo fariĝis familiara en la tuta domo. Oni diris: "Atendu momenton, Misfortuno." "Rapide, Misfortuno." "Faru ĉi tion, Misfortuno." "Faru tion, Misfortuno."

Post nelonge la najbaroj de la riĉulo venis al li kaj diris: "Kara amiko kaj najbaro, ni maltrankviliĝas pri tio, ke misfortuno trafos vin. Via mastrumanto de la etaĝdomo havas nomon tre strangan kaj malbonaŭguran. Ne plu lasu lin loĝi ĉe vi. Lia nomo plenigis vian domon per la diro, 'Atendu momenton, Misfortuno.' 'Rapidu, Misfortuno.' 'Faru ĉi tion, Misfortuno.'



'Faru tion, Misfortuno.' Oni nur uzas la vorton 'Misfortuno' kiam ili volas kaŭzi al iu malbonan ŝancon aŭ malfeliĉon. Eĉ hejmaj feoj timiĝus kaj forkurus senĉese aŭdinte tiun vorton. Tio nur donos misfortunon al via familio. La viro nomata Misfortuno estas malbeno al vi. Li estis mizera kaj malbela. Kian profiton vi povos havigi al vi restigante tian homon ĉe vi?"

La riĉulo respondis: "Misfortuno estas mia plej bona amiko! Ni subtenis kaj prizorgis unu la alian ekde kiam ni estis malgrandaj knaboj kune farantaj argilajn kukojn. Mi ne povas rifuzi lin kaj perdi nian amikecon nur pro lia nomo. Krome, nomo nur utilas por rekoni homon.

"La saĝuloj ne atentis pri la nomoj.

Nur malsaĝuloj estas superstiĉaj pri la sonoj, vortoj kaj nomoj. Nomoj donas nek bonan ŝancon, nek malbonan ŝancon." Tiel dirinte, la riĉulo rifuzis sekvi la admonon de siaj enmiksiĝemaj najbaroj.

Iutage li forvojaĝis al sia hejmvilaĝo. Antaŭ sia forlaso, li petis sian amikon Misfortuno mastrumi lian hejmon.

Hazarde, bando da banditoj aŭdis pri la forvojaĝo de la riĉulo. Ili opiniis, ke estas perfekta tempo por prirabi lian etaĝdomon. Do ili sin armis per diversaj armiloj kaj ĉirkaŭis la domon de la riĉulo dum nokto.

Samtempe, la fidela Misfortuno supozis, ke eble okazos prirabado fare de banditoj. Do li restis tutan nokton por

gardi la posedaĵon de sia amiko. Kiam li vidis rabistojn ĉirkaŭ la domo, li vekis ĉiujn en la hejmo. Li ordonis ilin sonigi kornojn, frapi tamburojn kaj fari tiel grandan bruon kiel ili povis.

Aŭdinte tion, la banditoj pensis: "Oni informis al ni eraran mesaĝon. Certe loĝas multaj homoj en la etaĝdomo kaj la riĉulo ankoraŭ restas en la hejmo." Do ili tuj forkuris forĵetinte siajn bastonojn kaj aliajn armilojn.

En la sekva mateno, oni iris el la etaĝdomo kaj surpriziĝis vidinte la forĵetitajn armilojn. Ili diris unuj al aliaj: "Se ni ne havus tiel saĝan domprotektanton, ni perdus ĉiujn havaĵojn en la etaĝdomo. Misfortuno estas heroo!

Anstataŭ alporti misfortunon, tiu granda amiko estas granda beno al la riĉulo."

Kiam la mastro de la etaĝdomo revenis, liaj najbaroj vidis lin kaj raportis la okazaĵon al li. Li respondis: "Vi ĉiuj proponis, ke mi forpelu mian amikon. Se mi tiel agus laŭ via propono, mi havus neniun moneron hodiaŭ!

"Kune piediri sep paŝojn estas sufiĉe por komenci amikecon; daŭre piediri dek du paŝojn formas intiman amikecon; resti kune dum monato starigas interligon de fideleco, kaj post pli longa tempo, la amiko fariĝos dua memo. Do mia amiko Misfortuno ne plu estas misfortuno, sed granda beno!"

La moralinstruo estas: Ju pli longas la amikeco, des pli grandas la rekompenco.

## 79. DEMANDO DE SEP-JARA

### KNABO



#### [Ses Valoraj Metodoj]

Iam antaŭe riĉulo vivis en Benareso de norda Hindio. Li havis filon, kiu estis tre inteligenta, scivolema kaj lernema. La knabo decidis eltrovi, kio estas vere valora, kvankam li estis nur 7-jara.

Iutage la malgranda knabo demandis sian patron: "Kiel ni gajnu la plej valorajn aferojn en la homa vivo?"

Lia patro respondis: "Nur valoraj metodoj kondukas al valoraj celoj. Jen ses valoraj metodoj:

Tenu vin sana kaj forta;  
estu racia en ĉiu okazo;  
aŭskultu tiujn, kiuj havas pli da  
spertoj;  
lernu de tiuj, kiuj havas pli da scioj;  
vivu laŭ la Vero;  
agu kun sincereco, sed ne nur kun  
energio."

La knabo atente aŭskultis la vortojn de la patro. Ekde tiam li strebis praktiki tiuj metodojn. Kiam li plenkreskis kaj fariĝis saĝulo, li ekkonsciis, ke la ses valoraj metodoj estas la plej gravaj kaj nedisigeblaj aferoj en la homa vivo.

La moralinstruo estas: Serioza demando meritas seriozan respondon.

## 80. LECIONO EL SERPENTO



### [Valoro de Bona Konduto]

Iam antaŭe Reĝo Brahmadata de Benareso havis tre eminentan pastran konsilanton. Li naskiĝis en riĉa nobela familio. Li estis ne nur inteligenta kaj erudicia, sed ankaŭ malavara pri siaj riĉaĵo kaj scio, el kiuj li retenis neniom. Ĉiuj rigardis lin homo bonkora kaj bonkonduta.

Per praktikado de la Kvin Trejnaj Ŝtupoj, li tenis sian menson for de la kvin fikondutoj. Li trovis, ke li pliboniĝos en sia propra kutimo, rezigninte ĉiujn fikondutojn, kiuj estas:



detruu vivon, ĉar por mortigi iun alian,  
vi ankaŭ mortigas parton de vi mem;

preni tion, kion oni ne donis al vi, ĉar  
tio kolerigas la posedanton kontraŭ vi;

fari malĉastaĵon, ĉar tio kondukas vin  
al doloro de ĵaluzo kaj malamo;

paroli mensoge, ĉar vi povas  
malhonesti al vi mem kaj aliaj samtempe;

perdi prudenton pro alkoholaĵo,  
ĉar tiam vi eble damaĝas vin mem pro  
aplikado de aliaj kvar fikondutoj.

Vidinte lian vivmanieron, Reĝo  
Brahmadato pensis: "Tiu vere estas  
bonulo."

La pastro avidis lerni pli multe pri  
la valoro de boneco. Li pensis: "La reĝo  
honoras kaj respektas min multe pli ol

aliajn pastrojn. Sed mi volas scii, pro kio li vere respektas min. Ĉu pro mia klaso, nobela deveno aŭ familia riĉaĵo? Ĉu pro mia profunda scio kaj granda saĝo? Aŭ pro mia bona konduto? Mi devas trovi la respondon pri tio."

Do li volis fari provon por trovi la respondon. Li decidis sin ŝajnigi ŝtelisto.

Sekvan tagon, kiam li forlasis la palacon, li trapasis la reĝan monerfariston, kiu faris monerojn el oro. La bona pastro prenis moneron kaj daŭrigis sian iradon el la palaco sen intenco posedi ĝin. Ĉar la monerfaristo tre estimis la faman pastron, li restis sidanta kaj diris nenion.

En la dua tago la falsa ŝtelisto prenis du monerojn. La kortega monerfaristo

ankoraŭ ne protestis.

Fine en la tria tago la pastro favorata de la reĝo prenis manplenon da ormoneroj. Ĉifoje la monerfaristo tuj kriis spite al la famo kaj rango de la pastro: "Jen la tria fojo por vi prirabi Lian Reĝan Moŝton." Kaptante lin, li kriis: "Mi kaptis la ŝteliston, kiu ŝtelis monon de la reĝo! Mi kaptis la ŝteliston, kiu ŝtelis monon de la reĝo! Mi kaptis la ŝteliston, kiu ŝtelis monon de la reĝo! Mi kaptis la ŝteliston, kiu ŝtelis monon de la reĝo!"

Tuj alkuris amaso da homoj, kriante: "Aha! Vi ŝajnigas vin pli bona ol ni. Ekzemplo de bonkonduco!" Ili batis lin, ligis liajn manojn post lia dorso, kaj kondukis lin al la reĝo.

Sur la vojo ili iris preter kelkaj serpent-

sorĉistoj, kiuj amuzis la rigardantojn el la kortego per venenaj kobroj. Ili tenis la serpentojn je la kolo kaj vosto, volvis ĝin ĉirkaŭ sian kolon por montri, kiel kuraĝaj ili estas.

La ligita kaptito diris al ili: "Estu atentemaj! Ne kaptu la kobron je la vosto, ne kaptu ĝin je la kolo kaj ne volvu la venenan serpenton ĉirkaŭ vian kolon. Ĝi mordus vin kaj alportus vian vivon al subita fino!"

La serpent-sorĉistoj diris: "Senscia pastro, vi ne konas tiun ĉi kobron. Fakte ĝi estas tre ĝentila kaj bona, tute ne tiel malbona kiel vi! Vi estas la ŝtelisto, kiu ŝtelis monon de la reĝo. Pro via konduto malbona kaj krima oni eskortas vin kun

viaj manoj ligitaj post via dorso. Sed ne necesas ligi la bonan serpenton!"

La pastro pensis: "Eĉ venena kobro, kiu mordas aŭ damaĝas neniun, estas nomata 'bona'. Fakte bonkonduito estas la kvalito, kiun oni plej admiras en la mondo!"

Kiam ili atingis la tronon ĉambron, la reĝo demandis: "Kio okazis, miaj amikoj?" Ili respondis: "Li estas la ŝtelisto, kiu priŝtelis vian reĝan trezorejon." La reĝo diris: "Do punu lin laŭ la leĝo."

La pastra konsilanto diris: "Via Reĝa Moŝto, mi ne estas ŝtelisto!" "Do pro kio vi prenis la orajn monerojn de la palaco?" demandis la reĝo.

La pastro klarigis: "Mi faris tion

nur kiel provon por trovi kial Via Reĝa Moŝto pli honoras kaj respektas min ol aliajn, ĉu pro mia familia fono aŭ riĉaĵo, aŭ pro mia profunda scio. Ĝuste pro tio mi sukcese foriradis preninte unu kaj du orajn monerojn fojrefoje. Ĉu vi respektas mian bonkonduton pli ol tiun de aliuloj? Estas klare, ke nur pro preno de manpleno da ormoneroj mi ne plu havis la titolon 'bonulo'. Nur tio ŝanĝis respekton en humiligon!

"Eĉ venena kobro, kiu damaĝas neniun, estas nomata 'bona'. Do ne plu necesas alia titolo."

Por emfazi la lecionon, kiun li ĉerpis, la saĝa pastro diris:

"Mi trovis, ke altklasa deveno, riĉaĵo

aŭ eĉ abunda scio estas malpli admirindaj ol boneco por la homaro."

La reĝo pardonis sian eminentan pastran konsilanton.

La pastra konsilanto petis, ke la reĝo permesu lin forlasi la servadon en ordinara mondo kaj fariĝi arbara ermito. Post la sepfoja rifuzado, la reĝo finfine donis al li la permeson.

La pastro iris al Himalajo kaj meditis pace. Post kiam li mortis, li renaskiĝis en ĉiela mondo.

La moralinstruo estas: Oni plej admiras bonan konduton.

## 81. PASTRO ADORA AL FORTUNO



[Superstiĉo]

Iam antaŭe la Iluminiĝinto naskiĝis en altklasa familio de nordokcidenta Hindio. Kiam li plenkreskis, li ekkomprenis, ke lia ordinara vivo ne povas doni al li daŭran feliĉon. Li do forlasis ĉion kaj transloĝiĝis en Himalajon kiel arbara ermito. Per diligenta meditado li atingis saĝon kaj mensan trankvilecon.

Iutage li decidis iri al la urbo Rajagaha el la arbaro. Post kiam li atingis la urbon, li tranoktis en la reĝa plezura ĝardeno.

En la sekva mateno li iris en la urbon



por peti almozon. La reĝo vidis lin kaj plezuriĝis pro lia sinteno modesta kaj digna. Do li invitis lin al la palaco, petis lin sidiĝi kaj regalis lin per plej bonaj manĝaĵoj. Poste li invitis lin loĝi en la ĝardeno por ĉiam. La ermito konsentis, kaj ekde tiam li loĝis en la reĝa plezura ĝardeno kaj manĝis en la palaco.

Tiam en la urbo vivis pastro, kiun oni nomis 'Fortuna Tuko'. Li kutime aŭguris sorton bonan aŭ malbonan per ekzamenado al peco da tuko.

Li havis novan vestaĵon. Iutage post sinbano li ordonis al sia servanto alporti la novan vestaĵon. La servanto trovis, ke ĝi estas iom ronĝita de musoj, kaj li raportis tion al la pastro.

Fortuna Tuko tuj pensis: "Estas danĝere teni en la domo la vestaĵojn rongitajn de musoj. Tio estas certa signo de fatalaĵo, kiu povus ruinigi mian hejmon. Krome, mi eĉ ne povas doni ĝin al miaj infanoj aŭ servantoj. Tiel la fatalaĵo ankoraŭ ne forlasos mian domon! Fakte, al neniu alia mi povos fordoni la omenan vestaĵon. La nura sekura metodo estos forĵeti ĝin por ĉiam. Estas plej bone ĵeti ĝin en lokon, kien oni metis kadavrojn por ke sovaĝaj bestoj manĝu. Sed kiel mi tion faru? Se mi ordonos al servanto fari tion, li tenos la vestaĵon ĉe si pro sia avido kaj la fatalaĵo ankoraŭ restos en mia hejmo. Do mi povas konfidi la taskon nur al mia filo."

Li venigis sian filon kaj diris ĉion pri la omena vestaĵo iomete rongĝita de musoj. Li atentigis lin eĉ ne tuŝi la vestaĵon per mano. Li ordonis, ke la filo portu ĝin al kadavrejo per bastono, forĵetu ĝin, kaj poste sin banu de la kapo ĝis piedoj antaŭ ol reveni hejmen.

La filo obeis sian patron. Kiam li atingis la kadavrejon portante la vestaĵon per bastono, li trovis, ke la ermito sidas ĉe la pordo. Kiam li forĵetis la omenan vestaĵon, la ermito prenis ĝin. La ermito ekzamenis ĝin kaj vidis la etajn dentspurojn de musoj, sed preskaŭ ne rimarkeblajn, li do portis la vestaĵon al la plezura ĝardeno.

Sin baninte, la filo raportis la okazaĵon

al Pastro Fortuna Tuko. Pastro Fortuna Tuko tuj pensis: "La omena vestaĵo kaŭzos grandan fatalaĵon al la sanktulo plej plaĉa al la reĝo. Mi devas atentigi lin." Do li iris al la plezura ĝardeno kaj diris: "Estimata Majstro, la omenan vestaĵon vi prenis, sed bonvolu forĵeti ĝin! Ĝi estas omena kaj alportos fatalaĵon al vi."

Sed la ermito respondis: "Ne, iu ajn objekto, kiun aliuloj forĵetis en la kadavrejon, estas bonaŭgura por mi! Ni arbaraj meditatoj ne zorgas pri sorto bona aŭ malbona. Ĉiuj Budhoj kaj Iluminiĝintoj jam rezignis superstiĉojn pri la sorto. Ĉiuj saĝuloj devas tiel agi. Neniu scias pri la estonteco!"

Aŭdinte la vere saĝajn kaj iluminajn

vortojn de la ermito, Pastro Fortuna Tuko eksciis, kiel malsaĝa li estas. Ekde tiam li rezignis multajn superstiĉojn de si mem kaj sekvis la instruon de la modesta ermito.

La moralinstruo estas: Omeno por malsaĝuloj povas esti beno por saĝuloj.

## 82. FALSA SANKTULO



### [Hipokriteco]

Iam antaŭe estis viro, kiu ŝajnis sanktulo laŭ aspekto kaj konduto. Kun la korpo volvita per ĉifonaĵo kaj longaj haroj distaŭzitaj sur la kapo, li sin vivtenis almozpetante en malgranda vilaĝo. Kun ruzeco kaj malnobleco en la menso, li ŝajnis, ke li forlasis la kroĉigemon al la ĉiutaga mondo, sed fakte li estis falsa sanktulo.

Riĉulo en la vilaĝo volis akiri meritojn per bonfarado, do li konstruigis simplan templeton en la proksima arbaro por la

sanktulo. Li ankaŭ regalis lin per la plej bonaj manĝaĵoj el sia propra hejmo.

Li opiniis, ke ĉi tiu sanktulo kun distaŭzitaj haroj kondukas sincere kaj bone, kaj neniam faros malbonaĵon. Li timis banditojn, do li portis sian familian riĉaĵon de 100 ormoneroj al la malgranda templo. Li enterigis ĝin kaj diris al la sanktulo: "Via Estimata Moŝto, bonvolu prizorgi mian familian riĉaĵon."

La sanktulo respondis: "Ne maltrankviliĝu pri tiaj aferoj ĉe sanktulo kiel mi. Ni sanktuloj jam rezignis la avidemon al la ordinara afero. Ni havas nek avidemon nek deziron por preni alies posedaĵon."

"Tre bone, Via Estimata Moŝto," diris

la riĉulo. Li foriris pensante, ke li estas tre saĝa konfidi sian riĉaĵon al tiel bona sanktulo.

Sed la malica sanktulo pensis: "Aha! La trezoro de 100 ormoneroj sufiĉas por mi vivi en la resta tempo de mia vivo. Mi ne plu bezonos labori aŭ peti almozon!" Do post kelkaj tagoj li ŝtele elfosis la riĉaĵon kaj enterigis ĝin ĉe la vojo.

En la sekva tago li iris al la hejmo de la riĉa vilaĝano kaj manĝis kiel kutime. Manĝinte ĝissate, li diris: "Plej honora sinjoro, mi loĝis ĉi tie vivtenate de vi jam dum sufiĉe longa tempo, sed la sanktuloj, kiuj jam forlasis la mondan deziron, ne devas tro kroĉiĝi al nur unu vilaĝo aŭ patrono. Tio malpurigos la menson de



sanktulo , kia mi! Do bonvolu permesi min foriri modeste."

La riĉulo petegis foje kaj refoje, ke li restu, sed vane. Do li konsentis finfine: "Se vi ne plu volas resti, iru laŭ via volo, Estimata Majstro." Li akompanis la sanktulon ĝis vilaĝlimo kaj adiaŭis lin.

Irinte mallongan vojon sola, la falsa sanktulo pensis: "Mi devas certigi min, ke la malsaĝa vilaĝano ne suspektu min. Li tiel fidas min, ke li kredas ĉion. Do mi trompu lin per saĝa artifiko!" Li ŝovis sekan herberon en siajn distaŭzitajn harojn kaj reiris al la vilaĝo.

Vidinte lin, la riĉulo demandis: "Estimata Majstro, kial vi revenis?" Li respondis: "Kara amiko, ĉi tiu herbero el

la pajla tegmento de via domo gluiĝis en miaj haroj. Estas plej malbone kaj malpure por sanktulo kiel mi 'preni tion, kion oni ne donis'."

La mirigita vilaĝano diris: "Nenio gravas, Via Moŝto. Bonvolu demeti ĝin kaj daŭrigi vian vojon. Sanktulo kiel vi eĉ ne prenas herberon kiu apartenas al aliuloj. Kiel mirinda tio estas! Kiel nobla estas vi, la plej pura el sanktuloj! Kiel fortuna mi estas havi honoron por vin vivteni!" Li des pli fidis lin ol antaŭe, riverencis respektoplene kaj adiaŭis lin denove.

Ĝuste en tiu tempodaŭro la Iluminiĝinto vivis kiel komercisto. Dum sia vojaĝo li haltis por tranokti en la vilaĝo, kaj hazarde aŭdis la tutan paroladon inter

la vilaĝano kaj tiel nomata "plej pura sanktulo". Li pensis: "Tio sonas ridinde! Tiu viro certe ŝtelis ion multe pli valoran ol sekan herberon, por kiu li revenis al la posedanto."

La komercisto demandis al la riĉa vilaĝano: "Amiko, ĉu vi donis ion, ke tiu ĉi sanktulo tenu por vi?" "Jes, amiko," li respondis, "mi konfidis lin gardi mian familian riĉaĵon de 100 ormoneroj." "Mi proponas, ke vi iru kontroli, ĉu ĝi ankoraŭ restas en sia antaŭa loko."

Maltrankviliĝinte, la riĉulo hastis al la arbara templo, fosis la teron, kaj trovis, ke lia trezoro malaperis. Li tuj kuris al la komercisto kaj diris: "Oni forŝtelis ĝin!" "Amiko," respondis la vojaĝanto, "ĝin

forprenis neniu alia krom la tiel nomata sanktulo. Ni kaptu lin kaj reprenu vian trezoron."

Ili ambaŭ postkuris tiel rapide kiel eble. Post kiam ili atingis la falsan sanktulon, ili konfesis lin, kie li kaŝe translokis la monon. Ili iris al la kaŝejo ĉe la vojrandoj kaj elfosis la enterigitan trezoron.

Vidinte la brilajn ormonerojn, la Bodisatvo diris: "Vi estas sanktulo tute hipokrita. Vi lerte diris ĉiujn belajn vortojn admirindajn por ĉiuj, ke oni ne 'prenu tion, kion aliaj ne donis'. Vi hezitis forlasi eĉ kun herbero, kiu ne apartenas al vi, sed facile ŝtelis cent ormonerojn!" Post la sarkasma kritiko, li konsilis al la

falsa sanktulo, ke por sia propra boneco li  
ŝanĝu sian konduton .

La moralinstruo estas: Estu  
singardema kontraŭ ŝajnigita honestulo.

## 83. UNUDIREKTA GASTAMO



**[Sendankeco]**

Iam antaŭe du komercistoj reciproke korespondis, sed ili neniam intervidiĝis. Unu el ili vivis en Benareso, dum la alia en malproksima limvilaĝo.

La vilaĝa komercisto sendis grandan karavanon al Benareso. Ĝi havis 500 ĉarojn plenajn de fruktoj, legomoj kaj aliaj produktoj. Li ordonis al siaj subuloj vendi ĉiujn varojn per la helpo de la urba komercisto.

Atinginte la urbon, ili rekte vizitis la urban komerciston. Ili transdonis al li la

alportitan donacon. Li ĝojplene invitis ilin loĝi en lia propra domo. Li eĉ donis monon al ili por ilia ĉiutaga elspezo. Li regalis ilin kun la plej granda gastamo. Li demandis pri la bonfarteco de la vilaĝa komercisto, kaj prezentis donacon por ke ili portu ĝin al li. Kutime lokanoj povis akiri bonan prezon, do li zorgis, ke ĉiuj iliaj varoj vendiĝis en justa prezo. Ili revenis hejmen kaj diris al sia mastro ĉion, kio okazis en la urbo.

Poste la urba komercisto sendis karavanon de 500 ĉaroj al la limvilaĝo. Liaj subuloj ankaŭ portis donacojn al la vilaĝa komercisto. Post kiam ili venis al la vilaĝa komercisto, li demandis: "De kie vi venis?" Ili respondis, ke ili venis de la

urba komercisto, kiu ofte korespondis kun li.

Akceptinte la donacojn, la vilaĝa komercisto malĝentile ridis kaj diris: "Ĉiuj povus diri, ke ili venis de la urba komercisto!" Poste li elpelis ilin, doninte al ili nek loĝejon, nek donacon, nek helpon.

La karavanistoj iris al la urbeto bazaro kaj faris negocon laŭ sia kapablo sen helpo de la lokano. Ili revenis al Benareso kaj raportis al sia mastro ĉion, kio okazis en la limvilaĝo.

Post nelonge la vilaĝa komercisto sendis alian karavanon de 500 ĉaroj al Benareso. Liaj subuloj denove portis donacojn al la urba komercisto. Kiam la subuloj de la urba komercisto vidis ilin,



ili diris al li: "Ni scias kiel provizi taŭgajn loĝejojn, manĝaĵojn kaj monon al tiuj homoj."

Ili kondukis la alvenintojn ekster la urbaj muroj al bona loko por tendumi kaj tranokti. Ili diris, ke ili reiros al Benareso por prepari manĝaĵon kaj monon por la gastoj.

Anstataŭe ili kolektis ĉiujn siajn kamaradojn kaj revenis al la kampadejo je la noktmezo. Ili forrabis ĉiujn 500 ĉarojn, inkluzive de la kostumoj de la vilaĝaj komercistoj. Ili forpelis la bovojn, malmuntis kaj forportis la radojn de la ĉaroj.

Tiuj vilaĝanoj teruriĝis. Ili kuregis hejmen tiel rapide, kiel iliaj kruroj kapablis

porti ilin.

La subuloj de la urba komercisto rakontis al li ĉion, kion ili faris. Li diris: "Tiuj, kiuj forgesis sian dankemon kaj ignoris simplan gastamon, ricevas tion, kio indas al ili. Tiuj, kiuj ne aprezas la ricevitan helpon, baldaŭ trovos, ke neniu volas helpi ilin plu."

La moralinstruo estas: Se vi ne helpas aliajn homojn, vi ne povas revii, ke la aliaj helpu vin.

## 84. VENENAJ ĴETKUBOJ



[**Trompo**]

Iam antaŭe en Benareso vivis riĉulo, kiu tre ŝatis vetludon. Li ofte ludis ĵetkubojn kun alia emulo, kies cerbo laboris ruze.

Malsame kiel la riĉulo honesta kaj malkaŝema, la kunludanto estis ruza kaj malhonesto. Kiam li gajnis sinsekve, li daŭrigis la ludadon, sed tuj kiam li ekperdis, li kutime kaŝe metis ĵetkubon en sian buŝon kaj englutis ĝin. Poste li pretekstis, ke ĵetkubo perdiĝis, kaj ĉesigis la ludadon pro tio.

Fine la riĉulo rimarkis trompon de la ruzulo kaj iutage decidis doni al li lecionon. Li ŝmiris venenon sur ĵetkubojn kaj sekigis ilin, por ke oni ne vidu la venenon. Li portis la ĵetkubojn al la kutima loko kaj proponis: "Ni ludu ĵetkubojn!"

La ruzulo konsentis. Ili starigis vetludan tablon kaj ekludis. Kiel kutime, la ruzulo komencis gajni ĉiun kubĵeton. Sed tuj kiam li ekperdis la ludon, li ŝtele metis ĵetkubon en sian buŝon.

Vidinte tion, la riĉulo diris: "Englutu ĝin, kaj poste io okazos al vi. Via propra malhonesteco ege suferigos vin."

Englutinte la venenan kubon, la ruzulo falis teren kaj svenis pro sufero. La

bonkora riĉulo pensis: "Jam sufiĉe, nun mi devas savi lin."

La riĉulo pretigis medicinan miksaĵon por kaŭzi vomadon. Post kiam la ruzulo prenis la miksaĵon helpe de la riĉulo kaj elvomis la venenan ĵetkubon, la riĉulo donis al li trinkaĵon el klara butero, densa fruktsuko, mielo kaj kansukero por resanigi lin.

Poste li admonis la ruzulon ne plu trompi fidelan amikon. Post kiam ambaŭ vetludantoj pasigis sian tutan vivon, ili renaskiĝis laŭ siaj kondutoj.

La moralinstruo estas: Trompi amikon alportos al vi malbonan sekvon.

## 85. MISTERO DE LA PERDITA

### KOLRINGO



#### [Ĉapitro 1. Krimo kondukis al alia krimo]

Iam antaŭe, Reĝo Brahmadata regis en Benareso de norda Hindio. La Iluminiĝinto fariĝis unu el liaj ministroj post la finiĝo de sia lernado.

Iutage la reĝo eliris al sia plezura ĝardeno. Amaso da korteganoj iris kun li. Ili vizitis multajn partojn de la bela ĝardeno. Ĉe la malvarmeta arbaro ili iris al bela klara lageto. La reĝo ekvolis naĝi, do li plonĝis en la akvon. Poste li invitis

ĉiujn sinjorinojn de sia haremo naĝi kun li en la refreŝiga lageto.

Babilante kaj ridante, la haremaj sinjorinoj demetis ĉiujn siajn ornamaĵojn kaj juvelojn de siaj kapo, kolo, oreloj, brakoj, fingroj, talio, maleoloj kaj piedfingroj. Kune kun siaj eksteraj vestaĵoj, ili donis ĉiujn ornamaĵojn al siaj servantinoj por gardi. Poste ili saltis en la lageton, en kiu naĝis Reĝo Brahmadata.

La reĝo iam donis al sia favorata reĝino kolringon el tre valoraj perloj. Ŝi tiel ŝatis ĝin, ke ŝi nomis ĝin "Plej Valora".

Hazarde scivolema simiino vidis tion de proksima arbobranĉo. Ŝi atenteme gvatis el inter la verdaj folioj. Kiam ŝi ekvidis la perlan kolringon "Plej Valora",

ŝiaj okuloj preskaŭ elsaltis de ŝia kapo.

Imagante kiel bela ŝi aspektus portante la belan kolringon de la reĝino, ŝi pacience fiksrigardis la servantinon, kiu gardis ĝin. Komence la servantino gardis ĝin tre zorgeme. Sed baldaŭ ŝi estis dormema pro varmo de la suno. Kiam la simiino vidis, ke la servantino ekdormetis, ŝi tuj saltis de la arbo tiel rapide kiel vento. En palpebrumo ŝi kaptis la kolringon nomatan "Plej Valora", metis ĝin ĉirkaŭ sian kolon kaj rapide grimpis sur la arbon.

Timante, ke aliaj simiinoj vidos ĝin, la malgranda ŝtelistino kaŝis la brilan perlan kolringon en kavon de la arbo. Poste ŝi sidis tie por gardi sian priŝtelaĵon. Ŝi sin tenis kvieta kaj aspektis kiel senkulpa



monaĥino!

Post unu aŭ du minutoj la servantino vekigis de sia hazarda dormeto kaj timeme pririgardis la posedaĵojn de la reĝino. Kiam ŝi vidis, ke la kolringo perdiĝis, ŝi ekkriis pro timo. "Helpu! Helpu! Iu ŝtelis la perlan kolringon 'Plej Valora' de la reĝino!"

Kurinte al ŝi, la sekurigaj gardistoj foriris raporti la ŝteladon al la reĝo. Li ordonis al ili tuj kapti la ŝteliston antaŭ ĉio. Timante la koleron de la reĝo, la gardistoj tuj kuregis freneze ĉirkaŭ la plezura ĝardeno por serĉi la ŝteliston.

Ĝuste tiam malriĉa junulo piediris ekster la ĝardeno. Li reiris al sia malproksima hejmvilaĝo, paginte la

modestan imposton al la reĝa trezorejo. La tumulto en la ĝardeno timigis lin, do li ekforkuris.

Malfeliĉe, la sekurigaj gardistoj vidis lin kuranta kaj diris inter si: "Sendube tiu devas esti la ŝtelisto!" Ili sin ĵetis tra la ĝardena pordo, kaj kaptis la senkulpan junulon post mallonga postkurado. Ili ekbatis lin kriante: "Vi malbona ŝtelisto. Konfesu, ke vi ŝtelis la perlan kolrington 'Plej Valora' de la reĝino."

La kompatinda junulo pensis: "Se mi diros, ke mi ne ŝtelis ĝin, ili certe batos min ĝismorte. Sed se mi konfesos pri ŝtelo, ili kondukos min al la reĝo." Do li diris: "Jes, mi konfesas, ke mi prenis la kolrington." Aŭdinte tion, la sekurigaj

gardistoj katenis kaj trenis lin al la reĝo.

Informiĝinte pri la konfeso de la junulo, la reĝo demandis al li: "Kie estas la kolringo 'Plej Valora' nun? Kion vi faris per ĝi?"

La saĝa kaptito respondis: "Via Reĝa Moŝto, Mi estas tre malriĉa. Neniam en mia vivo mi posedis ion tute valoran, nek plej valoran liton, nek plej valoran seĝon, kaj kompreneble, nek la perlan kolrington plej valoran. Via reĝa Financa Ĉefkonsilisto ordonis min ŝteli la perlon 'Plej Valora', kaj mi jam donis ĝin al li. Nur li scias, kie ĝi estas nun."

Reĝo Brahmadato tuj venigis sian Financon Ĉefkonsiliston kaj demandis: "Ĉu vi prenis la perlon 'Plej Valora' de

tiu ĉi junulo?" "Jes, Via Reĝa Moŝto," li respondis. "Kie ĝi estas nun?" demandis la reĝo. "Mi donis ĝin al la Reĝa Instruista Pastro."

La reĝo alvenigis la Reĝan Instruistan Pastron kaj demandis lin pri la ŝtelita kolringo. Li respondis: "Mi donis ĝin al la Kortega Muzikisto."

La reĝo venigis la Kortegan Muzikiston kaj demandis lin pri la perlo. Li respondis: "Mi donis la perlon 'Plej Valora' al altranga prostituitino."

Kiam oni trovis la altrangan prostituitinon kaj kondukis ŝin al la reĝo, la reĝo demandis, kion ŝi faris per la perla kolringo de la reĝino. Sed ŝi respondis: "Via Reĝa Moŝto, mi scias nenion pri la

perla kolringo!"

Kiam la suno ekmalleviĝis, la reĝo diris: "Ni daŭrigu la enketon morgaŭ."

Li transdonis la kvin suspektitojn al siaj ministroj kaj revenis al la palaco por ripozi.

## [Ĉapitro 2. Solviĝis La Mistero]

Samtempe, la reĝa ministro, kiu hazarde estis la Iluminiĝinto, jam aŭdis kaj vidis ĉion, kio okazis en la plezura ĝardeno. Li konsciis, ke li povas solvi la misteron per zorgema esplorado, kaj tro hastemaj konkludoj facile eltiros erarajn respondojn. Do li ekesploris kaj analizis la kazon en sia menso.

Li pensis: "La kolringo perdiĝis en

la plezura ĝardeno, sed oni kaptis la kompatindan junan vilaĝanon ekstere. La pordoj estis garditaj de fortaj gardistoj, do la vilaĝano tute ne povis iri en la ĝardenon por ŝteli la kolringon. Same, neniu en la ĝardeno eliris kun la ŝtelita kolringo. Do ŝajnis, ke neniu el tiuj homoj povis foriri kun la perlo 'Plej Valora', de interne kaj ekstere!

"Kia mistero! La unue akuzita junulo diris, ke li donis ĝin al la Financa Ĉefkonsilisto por sin savi. La Financa Ĉefkonsilisto eble pensis, ke la afero iros pli facile por li, se involviĝos la Reĝa Instruista Pastro. La pastro eble akuzis la Kortegan Muzikiston por ke tiu faru ilin plezuraj en la palaca malliberejo. Kaj

la Kortega Muzikisto eble opiniis, ke ili povos forigi sian mizeran solecon de mallibera vivo, restante kun la altklasa prostituitino. Pro tio li diris, ke li donis la kolringon al ŝi. Post la zorgema esplorado, oni povas facile vidi, ke neniu el la kvin suspektitoj estas vere kulpaj. Sed la ĝardeno estas plena de simiinoj petolemaĉaj kiel konate. Sendube iu simiino pensis, ke 'Plej Valora' povas igi ŝin pli supera ol la aliaj, do ŝi prenis la kolringon en la manoj."

Do li iris al la reĝo kaj diris: "Via Reĝa Moŝto, se vi transdonos la suspektitojn al mi, mi povos enketi por vi." "Per ĉiaj rimedoj, mia saĝa ministro," diris la reĝo, "enketu la kazon per vi mem."

La ministro venigis siajn servantojn. Li ordonis, ke ili tenu la kvin suspektitojn en sama loko, sin kaŝu proksime por subaŭskulti, kion ili diros, kaj poste faru raporton pri ĉio.

Kiam la kvin malliberuloj opiniis, ke ili estas solaj, ili ekbabilis libere. Unue la Financa Ĉefkonsilisto diris al la malriĉa vilaĝano: "Vi malgranda trompisto! Ni neniam intervidiĝis antaŭe. Do kiam vi donis la ŝtelitan kolringon al mi?"

La junulo respondis: "Via Sinjora Moŝto, la plej eminenta konsilisto de la granda reĝo, mi neniam havis valoraĵon, nek kadukajn liton kaj seĝon. Kompreneble mi neniam vidis la kolringon 'Plej Valora'! Mi eĉ ne sciis pri kio oni parolas. Morte



timigite de la reĝaj gardistoj, mi nur menciis vin kun espero, ke la gravulo kiel vi povus liberigi nin ambaŭ. Bonvolu ne koleri kontraŭ mi, via moŝto."

La Reĝa Instruista Pastro diris al la Financa Ĉefkonsilisto: "Vi jam aŭdis klare, ke tiu ĉi junulo konfesis, ke li ne donis ĝin al vi, do kiel vi povus transdoni ĝin al mi?" la Financa Ĉefkonsilisto respondis: "Ni ambaŭ estas en altaj rangoj, do laŭ mi se ni estos kune kaj helpos reciproke, ni povos likvidi la aferon."

La Kortega Muzikisto demandis: "Ho, La Reĝa Instruista Pastro, kiam vi donis la perlan kolringon de la reĝino al mi?" "Mi pensis, ke se vi estas malliberigita kun ni," diris la pastro, "via muziko povos

plezurigi nin. Jen kial mi mensogis."

Poste la virino diris al la Kortega Muzikisto: "Vi, mizera trompisto! Kiam mi iris al vi aŭ vi venis al mi? Ni neniam intervidiĝis antaŭe. Do kiam vi povis doni al mi la ŝtelitan perlon?" Li diris al ŝi: "Kara junulino, bonvolu ne koleri kontraŭ mi. Mi nur akuzis vin por tio, ke via ĉeesto povos fari nin feliĉaj kiam ni malliberiĝos kune."

Anstataŭ la kompatinda timigita fremdulo kaj la ruzaj registaraj oficistoj, nur la prostituitino diris la veron. Do neniu akuzis ŝin pro transigo de la kulpo.

Kompreneble, la servantoj de la saĝa ministro jam subaŭskultis la tutan babiladon. Kiam ili raportis ĝin al li, li

konsciis, ke lia supozo jam konfirmiĝis. Sendube simiino prenis la kolrington. Do li pensis: "Mi devas fari planon por repreni ĝin."

Laŭ lia aranĝo oni faris manplenon da malkaraj imitaĵoj de juvelaj ornamaĵoj, kaptis kelkajn simiinojn en la reĝa plezura ĝardeno, kaj ornamis ilin per la imitaj ornamaĵoj, kun kolringoj ĉirkaŭ iliaj koloj, kaj braceletoj ĉirkaŭ iliaj brakoj kaj maleoloj. Poste oni liberigis ilin en la ĝardenon. La ministro ordonis, ke la servantoj observu ĉiujn simiinojn atenteme, kaj kiam ili vidos iun ajn kun la perdita perla kolringo, ili timigu ŝin, por ke ŝi forĵetu ĝin.

La simiino, kiu prenis la kolrington

"Plej Valora", daŭre tenis ĝin en la kavo de la arbo. La aliaj simiinoj paradis tien kaj reen dirante: "Rigardu, kiel belaj ni estas! Ni havas belajn kolringojn kaj braceletojn." Ŝi ne plu eltenis la vidon kaj aŭdon de tio. Ŝi pensis: "Tiu estas nenio alia krom senvaloraj imitaĵoj." Por paradi, ŝi surmetis la kolrington "Plej Valora" faritan el veraj perloj.

La servantoj senprokraste timigis ŝin, kaj ŝi tuj forĵetis la kolrington. Ili portis ĝin al sia mastro, la saĝa ministro. Li donis ĝin al la reĝo kaj diris: "Via Reĝa Moŝto, jen estas la perla kolringo "Plej Valora". Neniu el la kvin, kiuj estis akuzitaj, estas la vera ŝtelisto. Anstataŭe, ĝi estis forprenita de avida malgranda simiino vivanta en via

Plezura Ĝardeno."

La reĝo demandis mirigite: "Kiel vi trovis, ke ĝin prenis simiino? Kaj kiel vi reprenis ĝin?" La ministro raportis al li la tutan historion.

La reĝo diris: "Vi vere estas la ĝusta persono por la profesio. En tempo de bezono estas la saĝulo, kiun oni plej aprezas." Poste la reĝo rekompencis lin per amaso da valoraĵoj. Oni ŝutis al li sep valoraĵojn, kiuj estis oro, arĝento, perloj, juveloj, emeraldo, diamantoj kaj koralo.

La moralinstruo estas: Oni ŝtelas pro avido, mensogas pro timo kaj trovas Veron pro esploro.

## 86. MALSINGARDEMA LEONO



[Singardemo]

Antaŭ tre longa tempo, la Kvin Trejnaj Ŝtupoj ankoraŭ ne estis konataj en la mondo. En Benareso vivis granda riĉulo, kiu havis gregon da bovinoj. Li dungis paŝtiston por prizorgi ilin.

Kiam la rizplantoj ekhavis spikojn, la paŝtisto kondukis la bovinojn al arbaro por paŝti. De tie li alportis lakton, buteron kaj fromaĝon al la riĉulo en Benareso.

Hazarde la bovinoj dronis en timiga situacio loĝante en la arbaro, ĉar feroca leono vivis proksime. Perceptinte la

ekziston de la leono, la bovinoj sentis konstantan teruron. Tio faris ilin tiel nervozaj kaj timigitaj, ke ili estis tro malfortaj por produkti lakton.

Iutage la posedanto de la bovinoj demandis al la paŝtisto, kial li alportas tiel malmulte da lakto, butero kaj fromaĝo. Li respondis: "Sinjoro, bovinoj bezonas trankvilecon kaj senĝenecon por produkti lakton. Viaj bovinoj ĉiam suferas de timo kaj nervozeco pro leono en la proksimo. Do ili malfacile produktas lakton."

"Mi komprenas," diris la riĉulo. Pripensinte kiel kaptisto de bestoj, li demandis: "Ĉu la leono estas intima al iu alia besto?" La paŝtisto respondis: "Jes, sinjoro. En la arbaro vivas speco da

malaltaj cervoj nomataj 'cervetoj'. Eĉ la plenaĝaj el ili altas nur je ĉirkaŭ futo. La leono fariĝis bona amiko al tia cervetino."

La riĉulo de Benareso diris: "Do miaj bovinoj trankviliĝos kaj produktos tiom da lakto kiom antaŭe. Jen kion vi faru. Kaptu la amikino de la leono kaj ŝmiru venenon sur ŝian tutan korpon. Poste atendu kelkajn tagojn antaŭ ol liberigi ŝin. Ŝi estos la logaĵo en kaptilo por kapti la leonon. Post kiam la leono mortos, portu ĝin al mi. Poste miaj bovinoj estos denove sekuraj kaj feliĉaj."

La paŝtisto precize agis laŭ la ordono de la mastro. Kiam la leono revidis sian amatan amikino, ĝi tiel ekzaltiĝis, ke ĝi tute forgesis sian singardemon. Eĉ sen



snufi la aeron ĉirkaŭ ŝi, ĝi tuj ĝojplene lekis ŝian tutan korpon. Pro la troa ĝojo kaj manko de singardemo, la kompatinda leono falis en la venenan kaptilon kaj tuj perdis la vivon.

La moralinstruo estas: Tro multe da bona afero eble estas danĝera.

## 87. SANKTULO STREBANTA AL PLISANKTECO



**[Ekstremeco]**

Iam antaŭe la Iluminiĝinto vivis en la mondo, kie plej multaj religioj estis similaj. Ili instruis, ke la metodo por forigi suferon el la menso estas suferigi la korpon anstataŭe. Eble ŝajne strange, plej multaj homoj opiniis, ke la plej sanktaj el la sanktuloj estis tiuj, kiuj plej serioze torturis siajn korpojn. Ĉar ĉiuj tiel opiniis, la Bodisatvo decidis eltrovi per si mem, ĉu tio estas vera.

Li ne plu daŭrigis ordinaran ĉiutagan vivon, sed fariĝis sanktulo laŭ tiama kutimo. Tio signifis, ke li rezignis ĉion, eĉ siajn vestaĵojn. Li sin tenis nuda, kun la korpo kovrita nur per polvo kaj malpuraĵo.

Por eviti avidon al bonaj manĝaĵoj, li sin devigis manĝi nur naŭzaĵojn, kiuj estas malpuraĵo, urino kaj bovfekaĵo.

Li loĝis en la plej danĝeraj partoj de la arbaro por ke li povu koncentri sian menson senĝene. Se li vidis homon, li tuj forkuris kiel timema cervo.

En vintro li pasigis siajn tagojn sub la arboj kaj noktojn sub la ĉielo. Do tage li estis trempita de malvarma akvo falanta de glacipendaĵoj sur la arbobranĉoj, kaj nokte li estis kovrita de falinta neĝo. Tiamaniere

en vintro li suferigis sian korpon per plej ekstrema frosto tagnokte.

En somero li pasigis siajn tagojn sub la ĉielo kaj noktojn sub la arboj. Do tage li suferis de brulo el la plej arda sunradio, kaj nokte li eltenis venton sub la ĉielo. Tiamaniere en somero li suferigis sian korpon per ekstrema varmo tagnokte.

Tiel li klopodadis por kvietigi sian menson. Li estis tiel firmvola, ke li pasigis sian tutan vivon tiamaniere.

Poste tuj antaŭ sia morto, li ekvidis iluzion de si mem renaskiĝi en infera mondo. La iluzio trafis lin kiel fulmo, kaj li eksciis, ke ĉiuj metodoj, per kiuj li torturis sian korpon, estis tute senutilaj. El ili ne rezultis la mensa paco. Do li rezignis

sian falsan kredon kaj ekpersistis en la Vero. Li forpasis kaj renaskiĝis en ĉiela mondo!

La moralinstruo estas: "La Vero povas liberigi vin eĉ en la plej lasta momento.

## 88. REĜO LA GRANDULO

### KLARVIDO



[Efemereco]

Laŭdire homoj havis du manierojn por praktiki religion. Unu el ili estis vivi malproksime de la ordinara ĉiutaga mondo kiel monaĥo, monaĥino aŭ ermito. La plej alta celo de tiuj, kiuj sincere praktikis religion en tiu ĉi maniero, estis rekta spertado de komplementa Vero, kiu estas komplementa Iluminiĝo.

La alia maniero por praktiki religion estis vivi en la ordinara mondo. La plej alta celo de tiuj sinceraj, estis harmonio

de nedividita mondo, la paca vivo sub la perfekte bona reganto, la "Reĝo de la Mondo."

Iam la Iluminiĝinto naskiĝis kaj nomiĝis Klarvido. Dum sia elkreskado, li praktikis dek regulojn bonkonduatajn: senavideco, senmalamado, sendamaĝado, memregado, pacienco, ĝentileco, virto, malavareco, malkaŝemo kaj kompatemo.

La homoj en la mondo ekrimarkis la bonkonduaton kaj justecon de Klarvido, kiu vivis rigore laŭ tiuj reguloj. Do la proksimaj homoj iom post iom memvole vivis sub lia regado prenante lin kiel la reĝon, anstataŭ sub tiamaj malhonestaj politikistoj.

Kun la disvastiĝo de lia famo, ĉiuj

reĝoj de la mondo venis al Klarvido kaj petis: "Venu, Via Moŝto. Vi estas bonvena. Mia regno estos la via. Konsilu min kiel regi ĝin en via nomo."

Klaravido diris: "Ne damaĝu vivestaĵojn. Ne prenu tion, kion oni ne donis al vi. Ne faru malĉastaĵon. Ne mensogu. Ne prenu ebriigaĵon, kiu nebulos vian menson. Miaj ordonoj al la mondo nur estas tiuj kvin. Se oni obeas la kvin ordonojn, mia sesa regulo estas libereco por ĉiuj sekvi la lokajn kutimojn kaj religiojn."

Post kiam ĉiuj homoj en la mondo venis vivi sub lia paca regado, li famiĝis kiel la Grandulo Klarvido, Reĝo de la Mondo. Lia kortega urbo, kiu estis



la ĉefurbo de la tuta mondo, nomiĝis Kusavati. Ĝi estis bela kaj prospera urbo kun kvar pompaj pordoj respektive el oro, arĝento, jado kaj kristalo.

Ekster la pordoj, Kusavati estis ĉirkaŭita de sep vicoj da palmarboj: vico de arboj kun oraj trunkoj, arĝentaj folioj kaj fruktoj; vico de arboj kun arĝentaj trunkoj, oraj folioj kaj fruktoj; vico de arboj kun katokulaj trunkoj, kristalaj folioj kaj fruktoj; vico de arboj kun kristalaj trunkoj, katokulaj folioj kaj fruktoj; vico de arboj kun agataj trunkoj, koralaj folioj kaj fruktoj; vico de arboj kun koralaj trunkoj, agataj folioj kaj fruktoj; kaj fine vico de arboj kun trunkoj, folioj kaj fruktoj el ĉiuj specoj da juveloj ekzistantaj

en la mondo!

Kiam brizo blovis tra inter tiuj mirindaj palmarboj, la oreplaĉaj melodioj de milda muziko aŭdiĝis tra la tuta urbo. La muzikoj estis tiel ĉarmaj kaj agrablaj, ke iuj civitanoj ĉesigis sian laboron kaj ekdancis ĝojplene.

La Grandulo Klarvido, Reĝo de la Mondo, havis liton inkrustitan per juveloj el la mirindaj palmarboj. Post longa justeca kaj paca regado, li kuŝis sur la riĉa lito dum sia lasta tempo. Li sciis, ke lia fino alproksimiĝas.

El ĉiuj liaj 84000 reĝinoj, tiu, kiu plej amis lin, nomiĝis "Plej Plezura". Eksciinte la staton de lia menso, ŝi diris: "Vi regas ĉiujn urbojn de la mondo, inkluzive de

tiu ĉi bela Kusavati kun ĝiaj kvar pompaj pordegoj kaj sep vicoj da mirindaj palmarboj. Pensu pri tio kaj estu feliĉa!"

La reĝo de la mondo diris: "Ne, mia kara reĝino. Ne diru tion. Anstataŭe vi devas kuraĝigi min rezigni la kroĉiĝemon al la urboj de la mondo kaj al ĉiuj havaĵoj." Surprizite de tio, ŝi demandis: "Kial vi diris tion, Via Moŝto?" "Ĉar hodiaŭ mi mortos," li diris.

La reĝino Plej Plezura ekploregis per torentaj larmoj. Ĉiuj aliaj 84000 reĝinoj ankaŭ verŝis siajn larmojn. Kaj la ministroj kaj la tuta korteganaro, viroj kaj virinoj, ne plu povis deteni sian plorsingultadon. Larmoj torentis el ĉies okuloj.

Sed Reĝo la Grandulo Klarvido diris:

"Viaj larmoj estas senutilaj. Estu en paco." Aŭdinte tion, la lamentaj subuloj kaj regnanoj silentiĝis. Poste li diris al Reĝino Plej Plezura: "Mia reĝino, ne ploru. Ne lamentu. Ĉiuj ekzistantaj, ĉu regno kovranta la tutan mondon, ĉu nur sezamsemo, ne povas daŭri poreterne. Ĉiuj naskiĝintaj, ĉu reĝo de la mondo, ĉu plej malriĉa kaj humila ŝtelisto, kadukiĝos kaj mortos. La nura vera feliĉo kuŝas en la momento kiam estas nek naskiĝo nek kadukiĝo."

Tiamaniere la Iluminiĝinto atentigis ilin pri tio, kion plejmulte da homoj ne volas pensi, ke ĉiuj aferoj renkontos sian finon. Li konsilis, ke ili estu malavaraj kaj bonkondutaj. Poste la Reĝo de la Mondo

mortis kiel aliaj. Li renaskiĝis kiel dio en  
ĉiela mondo, kie li mortis denove kiel la  
aliaj.

La moralinstruo estas: Ĉiuj bonaj  
aferoj havas sian finon.

## 89. REĜIDO KAJ DEMONINO



### [Ĉapitro 1. Kvin Viktimoj en la Arbaro]

Iam Reĝo Brahmadata regis en Benareso de norda Hindio. La Iluminiĝinto naskiĝis kiel lia 100-a filo, kaj elkreskis kiel saĝa junulo.

Tiam Silentaj Budhoj frekventis la Palacon por ricevi almozmangajaĵon. Ili nomiĝis Budhoj ĉar, jam iluminiĝinte, ili sciis la Veron kaj spertis la vivon de realeco en ĉiu momento. Ili nomiĝis Silentaj, ĉar ili ne predikis la Veron pro sia scio, ke tiam neniu alia povis kompreni ĝin. Sed plene de kompatemo al ĉiuj

mizeraj vivestaĵoj, Silentaj Budhoj deziris helpi ĉiujn, kiuj petis helpon de ili.

Iutage la juna reĝido pensis pri siaj 99 pliaĝaj fratoj kaj volis scii, ĉu li havos ŝancon por fariĝi reĝo de Benareso. Li decidis demandi Silentajn Budhojn pri tio.

En la sekva tago Silentaj Budhoj venis kiel kutime por kolekti manĝaĵon en la palaco. La reĝido alportis purigitan akvon kaj lavis iliajn piedojn. Kiam ili sidiĝis, li donis al ili bongustan nutraĵon por manĝi. Antaŭ ol doni la sekvan pladon, li demandis al ili: "Laŭvice mi estas la 100-a al la trono. Ĉu estas la ŝanco, ke mi fariĝos Reĝo de Benareso?"

Ili respondis: "Reĝido, kun tiel multaj pliaĝaj fratoj vi ne havos ŝancon por fariĝi

reĝo ĉi tie. Sed eble vi fariĝos la reĝo de Takasila. Se vi atingos tien en sep tagoj, vi povos fariĝi reĝo. Sed sur via vojo estas danĝera arbaro. Vi devas iri tra ĝi, ĉar ĉirkaŭiri la arbaron konsumos al vi duoble pli longan tempon.

"Tiu arbaro estas konata kiel 'Demona Arbaro', ĉar en ĝi plenas diversaj demonoj viraj, inaj kaj eĉ infanaj! La demoninoj plej ofte pasigas multe da tempo ĉe la vojo. Per sia magio ili viziigas konstruaĵojn kaj tutajn urbojn laŭ la vojo.

"La konstruaĵoj havas plafonojn ornamitajn per steloj, kaj belegajn riĉajn litojn kovritajn de silkaj kurtenoj el diversaj koloroj. Sidante en tiuj litoj la demoninoj sin ŝajnigas plej dolĉaj kaj



plezuraj feinoj. Kun mielaj vortoj ili tentas la vojaĝantojn dirante, 'Vi aspektas lace. Envenu, sidiĝu, trinku ion kaj poste daŭrigu vian vojaĝon.'

"Ili proponas, ke oni akceptu la inviton kaj sidiĝu, poste ili tentas la vojaĝantojn al ardaĵ deziroj per siaj belaj korpoj. Cedinte al siaj deziroj, la vojaĝantoj estas mortigitaj kaj manĝitaj dum ilia sango estas ankoraŭ varma!

"Tiamaniere tiuj, sorĉitaj de vido, estas kaptitaj pro la korpoj de virinoj. Tiuj, sorĉitaj de sono, estas kaptitaj pro la kantoj kaj muzikoj, kiujn faras demoninoj. Tiuj, sorĉitaj de odoro, estas kaptitaj pro ĉielaj parfumoj, kiujn eligas demoninoj. Tiuj, sorĉitaj de gustumo, estas kaptitaj pro

bongustaĵoj, kiujn donas demoninoj. Tiuj, sorĉitaj de tuŝo, estas kaptitaj pro la luksaj litoj kaj veluraj seĝoj de la demoninoj.

"Sed se vi povos regi ĉiujn viajn kvin sensojn kaj deteni vin de rigardo al la sorĉe ĉarmaj demoninoj, nur tiam vi povos fariĝi la Reĝo de Takasila en sep tagoj."

La dankema Bodisatvo respondis: "Dankon al vi, estimataj honoruloj, mi sekvos vian admonon. Kun via averto en koro, kiel mi povus kapti la ŝancon por rigardi ilin?"

Poste li petis de Silentaj Budhoj specialan magian benon por protekti lin sur sia danĝera vojaĝo tra Demona Arbaro. Do ili ĉantis protektan benon sur fadenon kaj iom da sabloj. Li akceptis la

benajojn, respekte adiaŭis ilin kaj siajn reĝajn gepatrojn.

Reveninte hejmen, li anoncis al siaj proksimaj servantoj: "Mi iros al Takasila por akcepti tronon. Vi restu ĉi tie." Sed kvin el ili diris: "Ankaŭ ni volas iri kun vi." "Ne," li diris, "vi ne povas iri kun mi. Oni jam atentigis min, ke sur la vojo estas ĉarmaj demoninoj. Ili tentas la homojn, kiuj ne povas rezisti al siaj deziroj venantaj el siaj kvin sensoj. Poste ili mortigos siajn viktimojn kaj manĝos ilin dum ilia sango estas ankoraŭ varma. Estas tro danĝere por vi. Mi defendos min mem kaj vojaĝos sola."

Sed la kvin servantoj insiste diris: "Se ni iros kun vi, Via Reĝida Moŝto,

ni nin detenos de rigardo al tiuj ĉarmaj demoninoj. Ni akompanos vin ĝis Takasila." "Se vi insistas, do ni iru kune," konsentis la reĝido, "sed firme tenu vian decidemon."

La demoninoj atendis ilin en Demona Arbaro. Ili jam magie estigis belajn vilaĝojn kaj urbojn kun belaj domoj kaj palacoj laŭ la vojo.

Hazarde, unu el la kvin servantoj estis facile sorĉita de vido al la sveltaj figuroj de virinoj. Do li postiĝis por admiri ilin. La maltrankvila reĝido demandis: "Kial vi postiĝas, mia amiko?" "Miaj piedoj doloras al mi," diris la servanto, "lasu min sidiĝi kaj ripozi momenton en unu el la domoj. Poste mi atingos vin." "Mia bona amiko,"

diris la reĝido, "tiuj estas demoninoj. Do ne ĉasu ilin!"

Sed blindigite de la vida tentaĵo, la servanto respondis: "Via Moŝto, mi ne ŝanĝos mian decidon. Kio ajn okazos, lasu tion okazi!" Farinte la lastan averton, la reĝido povis fari nenion alian ol daŭrigi sian vojon kun la aliaj kvar.

La postiginta servanto alproksimiĝis al la belaj demoninoj, kiuj sorĉis lin. Post la plena plezuro kun la viro, la demoninoj tuj mortigis kaj manĝis lin.

Poste la demoninoj iris pluen en Demona Arbaro kaj kreis alian miraĝon de bela etaĝdomo. Sidante, ili kantis la plej sorĉajn melodiojn akompanate de belaj sonoj el ĉiaj muzikiloj. Unu el la

restaj servantoj sorĉiĝis de la bela muziko. Do ankaŭ li postiĝis kaj englutiĝis de la ankoraŭ malsataj demoninoj.

La demoninoj iris pluen laŭ la vojo kaj kreis alian magian etaĝdomon plenan de bonodoroj el ĉiuj parfumoj de la ĉielo. Ĉifoje la servanto, kiu amis dolĉan bonodoron, postiĝis kaj estis manĝita.

Sekve la demoninoj kreis fabelan restoracion plenan de manĝaĵoj plej bongustaj el la ĉielo. La amanto de gustumado al la plej bonaj manĝaĵoj postiĝis kaj estis manĝita laŭvice.

Poste la demoninoj daŭre iris pluen laŭ la vojo, kreis molajn luksajn litojn kaj velurajn seĝojn, kaj sidis sur ili. La lasta servanto de la reĝido estis amanto de

komforta tuŝado al la plej molaj kaj luksaj teksaĵoj. Do li postiĝis, renkontis sian morton, kaj estis tuj manĝita de la avidaj demoninoj.

La okazaĵoj kaŭzis al la Iluminiĝinto solan iradon en Demona Arbaro. Iu demonino pensis: "Aha! Tiu estas vere firmvola. Sed mi estas des pli obstina. Mi ne ĉesos en mia klopodo antaŭ ol manĝi lin!" Do ŝi obstine sekvis lin kvankam ĉiuj aliaj demoninoj ne plu persistis.

Kiam ŝi alproksimiĝis al la rando de Demona Arbaro, kelkaj arbohakistoj vidis ŝin kaj demandis: "Aminda junulino, kiu iras antaŭ vi?" "Ni estas novaj geedzoj," mensogis la demonino, "kaj li estas mia purega edzo, kiu forkuris de mi en nia

nupta nokto. Jen kial mi postkuras lin."

La hakistoj kuratingis la reĝidon kaj demandis: "Honora sinjoro, la junulino flore delikata kaj orhaŭta forlasis sian familion por vivi kun vi. Kial vi ne iras kun ŝi anstataŭ lasi ŝin postkuri vin?"

La reĝido respondis: "Bonkoraj sinjoroj, ŝi ne estas mia edzino. Ŝi estas demonino. Ŝi mortigis miajn kvin servantojn kaj manĝis ilin dum ilia sango estis varma!"

Sed la ŝajne aminda demonino diris: "Rigardu, sinjoroj, kiel malamo faras la edzojn nomi siajn proprajn edzinojn demoninoj kaj malsataj diabloj! En kia mondo ni vivas!"



Daŭre sekvante la reĝidon, la obstina demonino magie sin vidigis kiel gravedulinon. Poste ŝi sin aliformigis kiel novan patrinon portantan bebon sur la dorso. Vidinte la junan paron, ĉiuj homoj demandis la junulon kiel la hakistoj. Ĉiufoje la Bodisatvo ripetis: "Ŝi ne estas mia edzino. Ŝi estas demonino.Ŝi mortigis miajn kvin servantojn kaj manĝis ilin dum ilia sango estis ankoraŭ varma!"

## **[Ĉapitro 2. Festeno en la Palaco]**

Fine ili atingis urbon Takasila. La demonino malaperigis sian "filon" kaj sole sekvis lin.

Ĉe la urba pordego la reĝido haltis

kaj iris en gastejon. Pro la magia povo de benaj fadeno kaj sabloj donacitaj de Silentaj Budhoj, la demonino ne sukcesis sekvi lin internen. Ŝi do restis ekstere kaj faris sin feine belaspekta.

La reĝo de Takasila hazarde vidis ŝin kiam li iris al sia plezura ĝardeno. Sorĉite de ŝia beleco, li decidis posedi ŝin. Li sendis servanton por demandi, ĉu ŝi jam edziniĝis. Kiam li faris tion, ŝi respondis: "Jes, mia edzo ripozas en la gastejo."

Aŭdinte tion, la reĝido kriis el la ĉambro: "Ŝi ne estas mia edzino. Ŝi estas demonino. Ŝi mortigis kvin servantojn, kiuj sekvis min, kaj manĝis ilin dum ilia sango estis ankoraŭ varma!" Ŝi denove plendis: "Vidu, sinjoro, kiel malamo povas

fari edzojn nomi siajn edzinojn demoninoj kaj malsataj diabloj! En kia mondo ni vivas!"

La servanto reiris al la reĝo kaj raportis ĉion, kion ambaŭ gejunuloj diris. La reĝo respondis: "Aĵo sen posedanto apartenas al la reĝo." Do li alvenigis la demoninon kaj sidigis ŝin sur la reĝan elefanton. Post kiam la procesio revenis al la palaco, li prenis ŝin kiel sian unuan reĝinon.

Tiuvespere, la reĝo lavis al si la harojn kaj korpon, prenis vespermanĝon kaj iris al la lito. La demonino prenis sian vespermanĝon, faris sin pli bela ol antaŭe kaj sekvis la reĝon al lia lito. Plezuriginte lin, ŝi turnis sian dorson al li

kaj ekplorsingultis.

La reĝo demandis: "Kial vi ploras, mia koro?" "Via Moŝto," ŝi diris, "vi akiris min ĉe la vojrandoj. Tiu ĉi palaco plenas de ĵaluzaj virinoj. Ili diras, 'Ŝi havas nek patrinon, nek patron, nek familion nek regnon. Ŝi estas trovita ĉe la vojo.' Ne lasu ilin mokridi min tiamaniere, Via Moŝto. Donu al mi privilegion super la tuta regno, ke neniu kuraĝas kontraŭstari min."

"Mia kara," respondis la reĝo, "mi havas nenian potencon super la tuta regno. Mia aŭtoritato estas nur super tiuj, kiuj kontraŭis kaj rompis la leĝon." Sed la reĝo tre plezuriĝis pri ŝia fizika ĉarmo, do li daŭrigis: "Mia koro, mi garantios al vi perfektan aŭtoritaton super ĉiuj, kiuj loĝas

en mia palaco."

Kontentiĝinte pri tio, la nova reĝino atendis ĝis la reĝo endormiĝis. Poste ŝi sekrete kuris al sia hejmo en la demona urbo. Ŝi kolektis la demonojn, demoninojn kaj eĉ la malsatajn malgrandajn demonidojn. Poste ŝi kondukis ilin al la palaco. Ŝi mortigis la reĝon, sian novan edzon, kaj englutis lin tutan krom la ostoj! La aliaj demonoj manĝis ĉiujn homojn loĝantajn en la palaco, kaj eĉ la hundojn kaj kokojn, lasante nur ostojn.

En la sekva mateno oni trovis surprizite, ke la palacaj pordegoj estis ŝloŝitaj. Maltrankvile ili rompis la fenestrojn per hakiloj kaj eniris. Ili trovis neniun alian krom homaj kaj bestaj ostoj

disĵetitaj en diversaj lokoj. Nur tiam ili eksciis, ke la viro en la gastejo diris prave kaj la nova reĝino estas homvora demonino.

Samtempe la Iluminiĝinto sin protektis kontraŭ la demonino dum la nokto. Li jam disŝutis la benajn sablojn sur la tegmentojn de la aliaj domoj kaj ĉirkaŭvolvis la benan fadenon ekster la muroj. Ĝis la tagiĝo li estis ankoraŭ sendorma en la ĉambro, starante singardeme kun spado en la mano.

Puriginte la fuŝaĵon en la palaco, la civitanoj diskutis pri la situacio inter si. Ili diris: "Evidente la viro en la gastejo estas mastro de siaj sensoj, ĉar li eĉ ne ekrigardis la danĝeran belecon de

la demonino. Ni prosperiĝos se en nia regno regos tiu sinjoro tiel nobla, saĝa kaj firmvola. Ni faru lin la nova reĝo."

Kun unuanima konsento ili iris en la gastejon kaj invitis la reĝidon kiel sian reĝon. Kiam li akceptis ilian peton, ili akompanis lin al la palaco, sidigis lin sur amason da juveloj kaj kronis lin kiel reĝon.

Li regis juste, sekvante dek regulojn de bona mensregado. Li evitis la kvar devojigajn kondutojn, kiuj estas antaŭjuĝo, kolero, malkuraĝo kaj malsaĝo. Li ĉiam tenis en sia memoro la admonon de Silentaj Budhoj, kiuj gvidis lin al la trono. Malsame kiel siaj kvin malfeliĉaj servantoj, li rezistis kontraŭ la blindigaj

deziroj al plezuroj de kvin sensoj. Nur tiam li povis profitigi siajn regatojn per sia saĝa regado.

La moralinstruo estas: Vivante nur por sensaj plezuroj, la malsaĝuloj estis formanĝitaj.



## 90. HOMO NOMATA MALBONO



### [Memakcepteco]

Iam vivis mondfama instruisto en Takasila de nordokcidenta Hindio. Li donis sanktajn instruojn al 500 altklasaj lernantoj.

Hazarde iu el tiuj lernantoj nomiĝis "Malbono" de siaj gepatroj. Iutage li pensis: "Estas malbone por mi aŭ aliaj kiam oni diras al mi, 'Venu, Malbono', 'Iru, Malbono', 'Faru ĉi tion, Malbono' kaj 'Faru tion, Malbono'. Mia nomo eĉ sonas malhonore kaj misfortune."

Do li iris al la instruisto kaj petis, ke

tiu donu al li pli plaĉan nomon, kiu povos alporti bonan sorton anstataŭ malbonan. La instruisto diris: "Iru tien, kien vi ŝatas, mia filo, kaj trovu pli bonan nomon. Kiam vi revenos, mi oficiale donos al vi la novan."

La junulo nomata Malbono forlasis la urbon kaj vojaĝis de vilaĝo al alia ĝis li venis al granda urbo. Iu ĵus mortis, kaj Malbono demandis, kio estis lia nomo. Oni respondis: "Lia nomo estis 'Vivo!'" "Ĉu 'Vivo' ankaŭ mortis?" demandis Malbono. Oni respondis: "Ĉu lia nomo estis Vivo aŭ Morto, li devis morti. Nomo estas vorto nur uzata por rekoni homon. Nur malsaĝulo ne scias pri tio!" Aŭdinte tion, Malbono ne plu sentis bedaŭron pri

sia propra nomo, sed li ankoraŭ ne trovis la bonon en ĝi.

Kiam li pluiris en la urbo, ŝuldsklavino batiĝis de siaj mastroj sur strato. Li demandis: "Kial oni batas ŝin?" Oni respondis: "Ĉar ŝi estas sklavino ĝis ŝi elpagos la ŝuldon al siaj mastroj. Ŝi revenis hejmen de laboro eĉ sen mono por kovri la interezon de sia ŝuldo." "Kio estas ŝia nomo?" li demandis. "Ŝia nomo estas 'Riĉa'," ili respondis. "Nomate 'Riĉa', ŝi eĉ ne havas monon por pagi la interezon?" demandis Malbono. Ili respondis: "Ĉu ŝia nomo estas Riĉa aŭ Malriĉa, ŝi havas neniom da mono. Nomo estas vorto nur uzata por rekoni homon. Nur malsaĝulo ne scias pri tio!" Aŭdinte tion, Malbono

malpli interesigis pri la ŝanĝo de sia nomo.

Forlasinte la urbon, li renkontis viron survoje, kiu perdis sian vojon. Li demandis lin: "Kio estas via nomo?" Li respondis: "Mia nomo estas 'Vojgvidisto!'" "Ĉu vi volas diri, ke eĉ 'Vojgvidisto' ankaŭ perdiĝas?" demandis Malbono. La viro respondis: "Ĉu mia nomo estas Vojgvidisto aŭ Vojaĝanto, mi perdis mian vojon. Nomo estas vorto nur uzata por rekoni homon. Nur malsaĝulo ne scias pri tio!"

Tiam tute kontentiĝinte pri sia propra nomo, Malbono revenis al sia instruisto.

La mondfama instruisto de Takasilo demandis lin: "Kiel vi fartas, mia filo? Ĉu vi trovis bonan nomon?" Li respondis:

"Sinjoro, tiuj kun nomo Vivo aŭ Morto same mortas, kun nomo Riĉa aŭ Malriĉa same havas neniom da mono kaj kun nomo Vojgvidisto aŭ Vojaĝanto povas same perdi la vojon. Nun mi scias, ke nomo estas vorto nur por rekoni homon. Malsame kiel niaj kondutoj, la nomo kaŭzas nenion. Do mi estas kontenta pri mia nomo. Ne plu necesas ŝanĝi ĝin."

La instruisto resumis la lecionon, kiun lia lernanto lernis tiamaniere: "Vidinte, ke Vivo mortis, Riĉa malriĉas kaj Vojgvidisto perdiĝas, Malbono jam akceptis sin mem."

La moralinstruo estas: Rozo kun alia nomo ankoraŭ bonodoras same dolĉe.

## 91. VIRO NOMATA SAĜO



[**Trompo**]

Iam antaŭe la Iluminiĝinto naskiĝis en komercista familio en Benareso de norda Hindio. Li nomiĝis Saĝo. Kiam li plenkreskis, li ekfaris komercon kune kun viro, kies nomo hazarde estis Saĝego.

Foje Saĝo kaj Saĝego kondukis karavanon de 500 ĉaroj en kamparon. Elvendinte siajn varojn ili revenis al Benareso kun granda profito.

Kiam ili dividis la enspezon, Saĝego diris: "Mi devas havi profiton duoble pli ol vi." "Pro kio?" demandis Saĝo. "Ĉar vi

estas Saĝo kaj mi estas Saĝego. Evidente Saĝo devas gajni nur duonon de Saĝego."

Saĝo demandis: "Ĉu ni ambaŭ ne investis la saman sumon por la karavana vojaĝo? Pro kio vi enspezas duoble?" Saĝego respondis: "Pro mia kvalito de Saĝego." Tiel ili kverelis, evidente neĉesigeble.

Poste Saĝego pensis: "Mi havas planon venki en la kverelado." Do li iris al sia patro kaj petis lin sin kaŝi en granda malplena arbo. Li diris: "Kiam mi kaj mia kamarado alproksimiĝos kaj demandas, kiel ni dividu la profiton, vi diru, 'Saĝego devas gajni duoble.'"

Saĝego reiris al Saĝo kaj diris: "Mia amiko, neniuj el ni volas kvereli. Ni iru al

la maljuna sankta arbo kaj petu la arban spiriton por solvi la problemon."

Kiam ili iris al la arbo, Saĝego parolis serioze: "Mia Honora Arba Spirito, ni havas problemon kaj bonvolu solvi ĝin por ni." Lia patro kaŝita en la malplena arbo demandis per afektita voĉo: "Kio estas via problemo?" Lia trompema filo respondis: "Ni kune faris komercon. Diru al ni, kiel ni dividu la profiton." Denove per afektita voĉo lia patro respondis: "Saĝo ekhavas unu porcion kaj Saĝego du."

Aŭdinte tion, Saĝo decidis eltrovi, ĉu vere estas la arba spirito, kiu parolis el la interno de la arbo. Do li ĵetis iom da seka fojno en la kavernon kaj bruligis fajron. La patro de Saĝego tuj kaptis branĉon, saltis



el la flamoj, kaj falis sur la teron. Li diris per sia propra voĉo: "Kvankam nomata Saĝego, mia filo estas nur sprita trompisto. Mi estis bonŝanca, ke la tiel nomata Saĝo estas vere saĝa, tiel ke mi elfuĝis nur duone rostita!"

Saĝo kaj Saĝego dividis sian profiton egale. Poste ili ambaŭ mortis kaj renaskiĝis laŭ sia konduto.

La moralinstruo estas: Trompisto eble estas sprita, sed neniel prudenta.

## 92. ATINGI "NENION"



[Nenio]

Iam antaŭe la Bodisatvo, la Iluminiĝinto, naskiĝis en superklasa familio de norda Hindio. Post kiam li elkreskis, li rezignis la ordinarajn dezirojn al ĉiutaga mondo kaj fariĝis ermito. Li iris al la Himalaja montaro, kie 500 aliaj ermitoj fariĝis liaj disĉiploj.

Post diligenta meditado dum longaj jaroj, li gajnis supernaturajn povojn, kiaj flugado tra la aero kaj kompreno pri alies penso sen aŭskulti ilian paroladon. Tiuj specialaj povoj ege impresis liajn 500

disĉiplojn.

En pluvsezono lia ĉefdisĉiplo kondukis 250 el liaj disĉiploj en montaran vilaĝon por kolekti salon kaj aliajn vivbezonaĵojn. Hazarde okazis, ke tiam estis tempo por vivfino de la iluminiĝinto. La 250 disĉiploj, kiuj ankoraŭ restis ĉe li, eksciis tion kaj demandis lin: "Ho, plej sankta majstro, kio estas via plej granda atingo post via vivlonga praktikado de bonkonduito kaj meditado?"

Estis malfacile por li paroli je la morta momento. La lasta vorto de la Iluminiĝinto estis: "Nenio." Poste li renaskiĝis en ĉiela mondo.

Dezirante aŭdi iom pri lia mirinda magia povo, la 250 disĉiploj tute

malesperiĝis. Ili diris inter si: "Post la vivlonga praktikado de bonkonduito kaj meditado, nia kompatinda majstro atingis 'nenion'." Ili opiniis lin malsukcesa, do ili cindrigis lian kadavron sen specialaj ceremonio, honorigo kaj eĉ respekto.

Post kiam la ĉefdisĉiplo revenis, li demandis: "Kie estas nia majstro?" "Li mortis," ili diris al li. "Ĉu vi demandis pri lia plej alta atingo?" "Kompreneble ni demandis," ili respondis. "Kaj kion li diris?" demandis la ĉefdisĉiplo. "Li diris, ke li atingis 'nenion'," ili respondis, "do ni ne okazigis funebran ceremonion por li kun speciala honorigo."

La ĉefdisĉiplo diris: "Fratoj, vi ne komprenas la signifon de nia instruisto.

Li jam atingis superan saĝon de 'Nenio'. Li komprenis, ke la nomoj de aferoj ne estas tio, kio ili vere estas. Ne troviĝas ekzistado de tiel nomataj 'ĉi tiu afero' aŭ 'tiu afero', nek ekzistas la 'afero' mem." Tiamaniere la ĉefdisĉiplo klarigis pri la mirinda atingo de la granda majstro, sed ili ankoraŭ ne kaptis la veran sencon.

Samtempe, el sia ĉiela mondo, la renaskiĝinta Iluminiĝinto vidis, ke oni ne komprenis la klarigon de lia antaŭa ĉefdisĉiplo. Li do forlasis la ĉielan mondon kaj aperis en la aero super la monaĥejo de siaj antaŭaj disĉiploj. Laŭdinte la saĝon de sia ĉefdisĉiplo, li diris: "Tiu, kiu aŭdis la Veron kaj komprenis ĝin per si mem, estas multe pli bona ol cent malsaĝuloj, kiuj

elspezis cent jarojn en vana cerbumado."

Tiel predikinte, la luminiĝinto kuraĝigis la 500 disĉiplojn daŭrigi la serĉadon de la Vero. Post vivlonga serioza meditado, ĉiuj 500 disĉiploj mortis kaj renaskiĝis en la sama ĉiela mondo kune kun sia antaŭa majstro.

La moralinstruo estas: **Aŭskultu atente la parolon de saĝulo!**

## 93. SAĜA ADMONO DE LA PATRINO



### [Neperforteco]

Iam antaŭ longa tempo, la filo de Brahmadata regis juste en Benareso de norda Hindio. Okazis, ke Reĝo de Kosalo lanĉis militon, mortigis la Reĝon de Benareso kaj prenis lian reĝinon kiel sian edzinon.

Tiam la filo de la reĝino sukcese eskapis tra akvokondukilo. Fine li starigis grandan armeon en la kamparo, kaj ĉirkaŭis la urbon. Li sendis mesaĝon al la reĝo, la mortiginto de sia patro kaj la edzo de sia patrino. Li informis lin, ke tiu cedu

la regnon aŭ kontraŭbatalu.

La patrino de la reĝido, la reĝino de Benareso, aŭdis pri la provoko de sia filo. Ŝi estis ĝentila kaj bonkora virino, kiu ĉiam volis preventi perforton, suferigojn kaj mortigojn. Do ŝi sendis mesaĝon al sia filo: "Ne necesas riski la batalon. Estos pli saĝe ĉirkaŭfermi ĉiujn enirejojn de la urbo. Eventuala manko de manĝaĵo, akvo kaj brullignaĵo konsumos la civitanojn. Poste ili cedos la urbon al vi sen ajna batalo."

La reĝido decidis sekvi la saĝan admonon de sia patrino. Lia armeo blokadis la urbon dum sep tagoj kaj noktoj. Poste la civitanoj kaptis sian maljustan reĝon, detranĉis lian kapon kaj prezentis ĝin al la reĝido. Li eniris la urbon triumfe



kaj fariĝis nova reĝo de Benareso.

La moralinstruo estas: Bonkora  
admono estas saĝa konsilo.





Danke al  
gesamideanoj Augusto,  
Michel, Prŝemek, Laŭrent, Eto,  
Wen Jingen, Weida, Zhao Jianping,  
Xiaoxiao kaj ĉiuj aliaj,  
kiuj afable helpis en korektado  
kaj voĉlegado  
de tiu ĉi rakontaro.